# La tataroj de Krimeo


**kaj ties komplika historia de la lukto por ekzistado kaj propraj rajtoj kiun la homaro pli malpli ignoras**

Historiaj, etnodemografiaj, onomastikaj, politikaj, kulturaj kaj juraj aspektoj

*Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)*

## Krimeo en antikvaj tempoj

La nomo Krimeo (tatarlingve Qırım, ruslingve Крым, ukrainlingve Крим) eble devenas de la mongol-tatara lingvo (qrım) kaj signifas „fortikaĵo“,[1] aŭ ĝi havas aŭtentikan krime-tataran originon kun la signifo „roko“. Povas ankaŭ esti, ke tiu nomo estas ligita kun la legendeca antikva popolo de la cimeroj,[2] kiu vivis sur la Krimea duoninsulo en la 12a jc. a.Kr. Kun la cimeroj la mitologiaj taŭridanoj[3] estas konsiderataj kiel prapopoloj de Krimeo, kiu iam estis nomata Taŭrido. La klimataj kaj geostrategiaj kondiĉoj de la duoninsulo helpis al Taŭrido aŭ Krimeo fariĝi alloga kaj dezirinda loĝejo por multaj popoloj. Krom la cimeroj kaj taŭridanoj sur Krimeo aperis grekoj (8a jc. a.Kr.), ´bosporanoj´[4] kaj ´sarmatoj´[5] (5a jc. a.Kr.), ´skitoj´ (3a jc. a.Kr.), romianoj (1a jc. a.Kr.), alanoj (1a jc. p.Kr. ),[6] gotoj (3a jc.),[7] hunoj kaj bizancanoj (4a jc.), bulgaroj (bolgaroj) kaj ĥazaroj (7a jc.),[8] peĉenegoj kaj kipĉakoj (10a jc.),[9] armenoj (12 jc.), italoj (t.e. precipe ĝenovanoj kaj venecianoj, 13a jc.), adigeoj-ĉerkesoj kaj, finfine, tataroj (14a jc.).[10]





Krimeo en la helena tempo (5jc a.K.) kaj en la tempo de Kieva Rusio (9-10aj jc.)

Piednotoj:
[1] Laŭ iuj etimologoj la saman originon eble havas la rusa vorto *kreml´*.
[2] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Cimeroj.
[3] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tauri.
[4] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Bosporanisches_Reich.
[5] Mapon vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Sarmaten.
[6] Mapon vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Skythen#/media/File:Scythia-Parthia_100_BC.png.
[7] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Krimgoten. Pri germanaj restaĵoj ĉe la Nigra Maro vd. Loewe, R.: Die Reste der Germanen am Schwarzen Meer. Halle 1896. Reeldono Paderborn 2013. (Vd. la titolon ankaŭ sub Google Books).
[8] Mapojn vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Chasaren.
[9] Mapon vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Petschenegen#/media/File:Khazarfall1.png.
[10] Komp. https://ru.wikipedia.org/wiki/Крым#.D0.98.D1.81.D1.82.D0.BE.D1.80.D0.B8.D1.8F.

Kiam la taŭridanoj devis cedi siajn lokojn al la grekoj, estis fonditaj la urboj Kerkintida (Evpatorija), Kalamita (Sebastopolo), Kalos-Limen (Ĉernomorsk) kaj Ĥersoneso, kiu komence estis nomata Herakleia.[11] En la jaro 63 a.Kr. la loĝantoj de Ĥersoneso vokis la romianojn, kiuj estis petataj protekti ilin kontraŭ la „barbaroj“. Tiel, Ĥersoneso fariĝis parto de la imperioj de Romo kaj Bizanco ĝis la malfrua 7a jarcento. En la 8a kaj 9a jarcentoj la urbo troviĝis sub ĥazara influo.

Inter aliaj faktoj estas tiu, ke Krimeo neniam apartenis al la Kieva Regno (kiu ekzistis en la 9a-13a jc.), kiun la rusoj konsideras kiel sian lulilon.[12] Kun jena escepto: Ĉirkaŭ la jaro 985 la princo de Kievo, Vladimiro Ia Svjatoslaviĉ (kiu vivis inter 960 kaj 1015[13]), sieĝis kaj finfine konkeris la urbon Ĥersoneso kun la celo devigi la edziĝon kun Anna, la fratino de la bizanca imperiestro. Saman preman minacon li direktis kontraŭ Konstantinopolo mem. Bizanco konsentis sed starigis kiel kondiĉon la bapton de Vladimiro, kiu antaŭe estis sovaĝa pagano. Tiel, laŭ la legendo, en la jaro 987 aŭ 988 princo Vladimiro de Kievo estis baptita en Korsuno/Ĥersoneso. Kaj nur poste li redonis la urbon al la grekoj kaj kristanigis sian Kievan landon.[14] Mi rakontas ĉion tion, ĉar surbaze de tiu legendo V.V. Putin, prezidento de Rusio, konstruis la dubindan historian pretendon de Ruslando pri Krimeo, kiam li aneksis ĝin en marto 2014.[15] Tiuj nebulaj historiaj okazaĵoj ĉirkaŭ Vladimiro en la mezepoko nature neniel sufiĉas kiel seriozaj sciencaj argumentoj por deklari Krimeon malnova rusa tero aŭ simile. Cetere, povas esti, ke Vladimiro estis baptita jam en Kievo antaŭ sia militiro kontraŭ Krimeo. Ĉar la slavoj ne atingis Krimeon, kiam ili disvastiĝis en la 7-8aj jarcentoj de sia prapatrujo suden, okcidenten kaj sudorienten, ili eĉ ne apartenas al la originaj popoloj de Krimeo.[16]



Scenoj lige kun la bapto de Vladimiro

Pri la frua periodo de Krimeo originalaj fontoj malabundas kaj historiografiaj konoj troviĝas en la nebulo.[17] Sed estas vere, ke la duoninsulo ĉiam staris en la fokuso de gravaj historiaj okazaĵoj, tiel ke en la mondo ĝi estas sufiĉe bone konata kiel sensacia historia kaj geografia loko, pri kiu historiistoj, etnologoj,

[11] Bildojn vd. sub http://eo.wikipedia.org/wiki/Ĥersoneso.
[12] Mapojn vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Kieva_Regno, http://de.wikipedia.org/wiki/Kiewer_Rus, https://ru.wikipedia.org/wiki/Древнерусское_государство.
[13] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kieva_Regno. Libron pri tiu ĉi reganto verkis: Wolle, S.: Wladimir der Heilige. Russlands erster christlicher Fürst. Berlin 1991.
[14] Legu la tutan koncernan rakonton en la „Kroniko de Nestoro“ (aŭ Kroniko de Radziwiłł) sub la jaro 988. En la frua 13a jarcento Ĥersoneson ricevis la Ĝenova Respubliko, kiu okupis sudan Krimeon kiel kolonion ĝis kiam ĉirkaŭ la jaro 1400 la urbo estis detruita de la mongol-tataroj („Blanka Hordo“). Ĥersoneso ne estis rekonstruita, kaj en 1783 carino Katerina IIa fondis apud ĝi la novan urbon Sebastopolo.
[15] Vd. http://www.sueddeutsche.de/politik/russlands-version-der-historie-geschichtsstunde-mit-dem-heiligen-wladimir-1.2255602, http://derstandard.at/2000009018943/Putins-Rede-zur-Lage-der-Nation-Der-heilige-Wladimir kaj http://kremlin.ru/events/president/news/47173.
[16] Mapon vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Slawen#mediaviewer/File:Slav-7-8-obrez.png. M. Lomonosov asertis, ke la „sarmatoj“ estis slavoj, kaj Katerina IIa klopodis konstrui teorion de parenceco inter skitoj kaj slavoj.
[17] La esencaj fontoj estas listigitaj de Kozlov/Ĉiĵova 2003, p. 138-42. La teksto „Tatariae descriptio“ de la pola diplomato Martinus Broniovius el la jaro 1579 estas konsiderata kiel unu el la plej frua fonto kun detala karakterizo de la sociaj strukturoj de la Krimea ĥanlando (vd. Albrecht, S./Herdick, M./Daim, F.: Im Auftrag des Königs. Ein Gesandtenbericht aus dem Land der Krimtataren. Regensburg 2011).

orientologoj kaj turistoj pasie interesiĝis. Se oni okupiĝas pri la historio de Krimeo, oni dependas antaŭ ĉio de la turka, rusa kaj ukraina historiografioj, kies vidpunktoj, klarigoj kaj interpretoj povas draste varii kaj kontraŭdiri unu la aliajn (rusaj kaj ukrainaj historiistoj, kiuj kutimas misuzi la historiografion por politikaj kaj propagandaj celoj, eĉ daŭre riproĉas unu al la aliaj, ke ili falsas la historion). Do, la historia bildo, imago aŭ memoro, kiu aperis pri Krimeo, estas sufiĉe ambivalenta kaj konfuza, pro kio Krimeo iusence mem fariĝis mito kaj legendo de la monda historio[18] kaj subjektive manipulebla objekto de la politiko.




Kuriozaĵo de la monda historio: Suda Krimeo kiel kolonio de la Ĝenova Respubliko en la 13-15 jarcentoj (ruĝa koloro)
(Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Genueser_Kolonien#Krim)
Blua koloro: Krimea ĥanlando; verda koloro: Teodora princlando (vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Teodoro_(princlando). La ĉefurbo de tiu ĉi princlando estis nomata de la tataroj Mangup-Kale.
Krom tiuj, ankaŭ la Trabzona imperio posedis koloniojn sur Krimeo (Perateia, Ĥerson kaj Kerĉ, vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Trebizonda_imperio).

## Etnaj deveno kaj difino de la tataroj de Krimeo

Traktante la historion de Krimeo, unuavice oni devas okupiĝi pri la historio de la tataroj de Krimeo kaj de la Krimea ĥanlando, kiuj plej signife influis la kulturon de la duoninsulo antaŭ la alveno de la rusoj. Tiuj „tataroj", kiuj alvenis en Krimeo en la dua duono de la 14a jarcento, estis la posteuloj de la „Ora Hordo",[19] kies fondinto probable estis ĥano Batu (nepo de Ĝingis-Ĥano) kaj kies teritorio disvastiĝis tra Ruslando, Ukrainio (Ukrajno) kaj parto de Meza Azio.[20] En la 14-15a jarcentoj la „Ora Hordo" disfalis pro eksteraj kaj internaj faktoroj kaj dissplitiĝis laŭ diversaj unuoj, inter kiuj reestabliĝis la ĥanlandoj de Kazano, Astraĥano, Siberio, la „Blanka Hordo" (en Kazaĥstano), la Nogaja hordo[21] kaj la Krimea ĥanlando, kiu same estis parto de la regno de la „Ora Hordo".[22] Pri la Krimea ĥanlando kiel ŝtata formaĵo temos detale ĉi-sube.

La nocio „tataroj" ne estas la etnonimo de unuopa popolo sed estis uzata por resumi tutan grupon de islamaj turkidaj popoloj. La vorto originas el la greka lingvo kaj havis nete negativan, eĉ teruran signifon: la tataroj venis el la infero! Post kiam la rajdistoj de la „Ora Hordo", kiu mem konsistis el multaj diversaj triboj de Azio kaj Kaŭkazio, ricevis en la okupataj regionoj la nomon „tataroj", ĉi tiu nomo enradikiĝis ankaŭ sur Krimeo, kie ili aperis kaj ekloĝis. Tiu nomo devis distingi la novajn mastrojn disde la „barbaroj", kiuj pli frue invadis la duoninsulon kaj timigis ĝiajn loĝantojn, pro kio ili estis konsiderataj kiel pli danĝeraj ol la tataroj mem. Nuntempe oni uzas tiun etnonimon por nomi la turkidajn popolojn

---

[18] La plej bona okcidenta prezentaĵo de la historio de la tataroj de Krimeo restis la libro de Fisher, A. W: The Crimean Tatars. Stanford 1978. Antaŭe la sama aŭtoro verkis ankaŭ: The Russian Annexation of the Crimea, 1772-1783. London 1970. Krom amaseto da unuopaj artikoloj kaj studoj aperis: Klein, D. (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Wiesbaden 2012 (enhavo: http://d-nb.info/1020886579/04).
[19] Bazajn informojn vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ora_Hordo.
[20] Mapon vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ora_Hordo.
[21] Mehr über die Nogaier Horde s. unter https://de.wikipedia.org/wiki/Nogaier-Horde.
[22] La unua ĉefurbo de la krimea ĥanlando antaŭ 1441 estis Staryj Krym (kr.t.: Eski Qırım, de diversaj popoloj nomata Taphrae, Cremum, Solhat, Crim laŭ Broniovius), kie la emiro de la „Ora Hordo" havis sian krimean rezidejon. En tiu loko troviĝis moskeoj, derviŝaj monaĥejoj kaj medresoj kaj propra tatara stampejo de moneroj. Pri la loko vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Starokrimo.

vivantajn ĉefe en Tatario aŭ Tatarstano (tataroj de Kazano[23]) kaj Baŝkirio aŭ Baŝkortostano,[24] kiuj estas respublikoj en la Ruslanda Federacio, kaj por la tataroj de Krimeo mem.

La etna deveno de la tataroj de Krimeo estas konkludebla laŭ la klasifikado de la dialektoj de la krime-tatara lingvo: La lingvo de la stepaj (nordaj) krime-tataroj apartenas al la kipĉaka (polovca) grupo, dum la lingvo de la montaraj-apudbordaj (sudaj) tataroj apartenas al la oguza (selĝuka) grupo.[25] Ŝajnas, ke inter tiuj du ĉefaj grupoj ekzistis (aŭ ekzistas) iu „meza“ dialekto, kiu servis kiel bazo por la literatura lingvo. La krime-tatara lingvo unue estis skribata per arabaj, poste per latinaj ( 1929) kaj cirilaj (1937) literoj.[26] Anstataŭ la ŝamanismo de la „Ora Hordo“, la tataroj adoptis la islaman kredon (sunaisman). La islamo ne nur esence influis la kulturon de la tataroj de Krimeo,[27] sed nature faciligis al ili la rilatojn kun la turkoj de la Otomana Imperio kaj samtempe distancigis ilin de la slavoj, kiuj vivis norde de ili. Dank´ al la kontribuo de la tataroj de Krimeo la islamo estis enkondukita en Ukrainion. Per la alveno kaj ekloĝado de la tataroj sur Krimeo kaj la fondo de la Krimea ĥanlando (pri kiu temos la venonta alineo) populariĝis samtempe la nomo de Krimeo por la tuta duoninsulo, kiu antaŭe estis nomata Taŭrido, kiel menciite. La nuntempaj tataroj de Krimeo preferas la formon „Qırım“ kaj mem nomas sin „Qırımtatarları“ aŭ simple „Qırımlı“, anoj, homoj, loĝantoj de Krimeo (aŭ, metafore, de la krimeaj fortikaĵoj).

Estis farita ankaŭ la provo klarigi la etimologion de la radiko ´tat´, kiu verŝajne venas el la ĉina lingvo kaj estas la nomo de mongollingva (aŭ manĉur-tunguza) tribo, kiu loĝis en nordorienta Mongolio kaj kiu estis unuafoje menciita en tjurkaj runaj surskriboj en la 8a jarcento.[28]




Teritorio de la „Ora Hordo“; origina teritorio de la nogaja hordo; teritorio de la krimea ĥanlando

## Fondo de la krime-tatara ŝtato (1441)

Post sia alveno en Krimeo la tataroj ekloĝis ĉefe en ĝiaj orientaj kaj apudbordaj regionoj kaj poste komencis enpenetri ankaŭ la nordajn stepojn. Krimeo apartenis unue al la administra distrikto (uluso) de Mamajo, poste de Toktamiŝo, kiu estis alia ĝingisido ĥano de la „Ora Hordo“. Kiam Toktamiŝo estis venkita de Timuro (Tamerlano) en 1398,[29] li forlasis Krimeon, trovante ekzilon en la Lit(o)va grandprinclando, kie kun la apogo de princo Vitaŭto Toktamiŝo vane klopodis restarigi sian potencon super la „Ora Hordo“. En 1399 li estis definitive venkita de Timuro, kiu celis restarigi la Mongolan

[23] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Tataroj. Historie estas konataj la tataroj de Kazano kaj la tataroj de Astraĥano.
[24] Laŭ la censo de oktobro 2002 la tataroj daŭre formis la duan plej grandan etnan malplimulto en Ruslando kun 5,554 mln. homoj (3,87%), kvazaŭ kiel ironio de la historio. La kvaran kaj kvinan rangojn okupas la baŝkiroj kun 1,673 mln. (1,16%) kaj la turklingvaj ĉuvaŝoj kun 1,637 mln. homoj (1,14%). (Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_Völker_in_Russland). Kvazaŭ ili terure timas la tatarojn kaj islamanojn ĝis nun, la rusoj subpremas ĉiuspecajn naciajn emancipigan kaj sendependisman strebadojn de ilia flanko, utiligante la pretekstojn de separatismo kaj islamisma terorismo.
[25] Al la kipĉaka (polovca) grupo apartenas ankaŭ la lingvoj de la karaĉajoj, karakalpakoj, kumikoj, nogajoj, kara(im)oj, kazaĥoj, kirgizoj kaj baŝkiroj (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kiptschakische_Sprachen), dum al la oguza (selĝuka) grupo apartenas la turka, azer(bajĝan)a kaj gagaŭza lingvoj (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Oghusische_Sprachen).
[26] Laŭ Kozlov/Ĉiĵova 2003, p. 147s. Vd. ankaŭ sub http://en.wikipedia.org/wiki/Crimean_Tatar_language.
[27] Pri la aktuala situacio de la islamo en Ukrainio vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Islam_in_der_Ukraine.
[28] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Татары_(этноним), aliaj klarigoj vd. Kozlov, S.Ja. / Ĉiĵova, L.V.: Tjurkskie narody Kryma. 2003, p. 143.
[29] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Toktamisch kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Tamerlan.

imperion kaj fondis la dinastion de la timuridoj, kaj liaj spuroj perdiĝis. Lia hordo tamen restis sur Krimeo, kie ĝi daŭrigis influi la elektadon de la ĥanoj de Krimeo, kiuj pretendi akiri la tutan potencon pri la „Ora Hordo“.

La strebado de la krimeaj tataroj emancipiĝi el la „Ora Hordo“ ebligis al ili praktikadi aŭtonoman vivstilon kaj gvidi memstaran politikon. Laŭ iuj skribaj fontoj, *Ulu-Muhammed,* ĥano de la „Ora Hordo“, estas konsiderata kiel fondinto de la Krimea ĥanlando,[30] kiu establiĝis kiel politika formaĵo de la krimeaj tataroj. Kiel oficiala dato de la fondo validas la jaro 1441, kiam la krimeaj tataroj formale apartiĝis de la „Ora Hordo“. Gvida forto en ĝi fariĝis la „tatara“ dinastio Geraj (aŭ Giraj/Giray, kr. Tat. Миңлегәрәй, Менъли Герай, Meñli Geray, منكلى كراى)[31] kies unua ĥano nomiĝis ***Haĝi (Hacı) Ia Geraj*** (1441-66),[32] kiu estis surtronigita anstataŭ Ulu-Muhammed. Kiel ĥano povis oficí ne iu ajn hazarda tataro, sed li devis plenumi kelkajn kondiĉojn, ekzemple aparteni al la (nobela aŭ aristokrata) dinastio Geraj, esti inda kaj respektata persono kaj bona politikisto-diplomato, kaj prefere esti favorata kaj apogata de la triboj (aŭ familioj) de la Ŝirinanoj kaj Barinanoj, pri kiuj pli detale temos ĉi-sube. Sed la unua regadoperiodo de Haĝi Geraj daŭris nur mallonge. Ses jarojn li devis kaŝiĝi antaŭ la persekuto de sia rivalo Sejid-Aĥmed en la Lit(o)va grandprinclando. Post la morto de emiro Hejder, la Ŝirinanoj kaj aliaj dumaj regantoj de Krimeo revenigis lin en 1448/9 kaj restarigis lian potencon kiel ĥanon, venkante malamikon Sejid-Aĥmed kaj forpelante la tribon Kungrat el Krimeo. Ekde tiu momento la Krimea ĥanlando definitive falis en la manojn de la dinastio Geraj. Postaj ĥanoj nomiĝis Nur Devlet, Meñli, Muhamed, Saadet, Islâm, Sahib, Ğazi, Toqtamış, Selâmet, Canibek, İnayet, Bahadır, Adil, Murad, Safa, Selim, Qaplan, Fetih, Arslan, Halim, Maqsud, Qırım, Bahadır, Şahin. Pli detale ili estos traktitaj ĉi-sube. Fakte ĉiuj krime-tataraj ĥanoj, entute 54, apartenis al la dinastio Geraj, kiu aparte fieris pro tio, ke ĝi estas ĝingisida, kaj pri kiu la tataroj (kaj turkoj) estis interesataj, ke ĝi ekzistu longdaŭre. Anstataŭ Staryj Krym, kiel nova ĉefurbo de la krimea ĥanlando estiĝis **Baĥĉisarajo** (kr.-tat.: Baqçasaray, Багъчасарай), kiu ankoraŭ nuntempe estas signifa kultura kaj alloga turisma centro.[33]



Ĥano Meñli Ia Giray kun sia filo Meĥmed Ia Geraj ĉe sultano Bajezid IIa
Ĥanoj Islam IIIa sur ĉevalo; Devlet Ia, Sahib IIa; Adil, Ŝahin Geraj.

## Politika kaj socia karakterizo kaj ŝtata strukturo de la Krimea ĥanlando

Krom la dinastio Geraj mem, centran politikan rolon en la Krimeo ĥanlando ludis la triboj aŭ familioj de *Şirin, Barın, Argın* kaj *Kıpçak.* Krom tiuj triboj, sur Krimeo ekzistis ankaŭ aliaj, kiuj nomiĝis Sidciut, Mansur, Ojrat, Merkit, Ablan, Burulĉa, Konrat, Suban-Gazi, Jaŝlav, Argyn kaj Dair, sed ili estis hierarkie malpli altstaraj ol la kvaropo kaj ne ludis gravan politikan rolon en la ĥanlando. Ŝajnas, ke tiu sistemo de la regado de kvar triboj havis tradicion inter turkidaj popoloj, sed (laŭ Ivanics) ĝi eble tamen estis originalaĵo ĉe la ĝingisidaj dinastioj. La genezo, deveno kaj kariero de la familio Ŝirin estas malmulte konataj kaj apenaŭ esploratai. La sciencistoj prave demandis sin de kie tiu tribo venis kaj ĉu ĝi estas

[30] Kr.-tat.: Qırım Hanlığı aŭ Qırım Yurtu; ruse/ukr.: ĥanstvo, angle: khanate, germane: Khanat/Chanat. Pri la krimetatar-lingva terminologio vd. https://tt.wikipedia.org/wiki/Кырым_ханлыгы. Mapon, kiu montras ĝiajn disvastiĝon kaj influzonon en la jaro 1600, vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Krimea_Ĥanlando kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Friede_von_Küçük_Kaynarca.
[31] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Giray_dynasty.
[32] Vd. Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Hacı_I._Giray. En mia studo mi uzas la formon Giraj, ĉar la litero y ne ekzistas en Esperanto. La sinsekvon de la regantaj ĥanoj de Krimeoj vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_Crimean_khans.
[33] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Baĥĉisarajo.

malnova aŭ nova, kiel ĝi povis tiel karieri kaj transpreni la gvidan politikan rolon en la ĥanlando, despli ke antaŭ la 14a jarcento la Ŝirinanoj ne apartenis al la plej signifaj familioj de la „Ora Hordo“. Kio koncernas la kipĉakanojn, kiuj sendube estis turklingvaj, ili formis memstaran etnon jam en la 11a jarcento kaj fariĝis tribo, kiu estis plene integrita en la mongolan regnon. La Argın-anoj estis miksita tjurk-mongola tribo, kiu aperas en la fontoj de la 13a jarcento, kaj ankaŭ la Barın-anoj estis turkigita mongola tribo. Koncerne la Ŝirinanojn ne estas certe, ĉu origine ili estas turklingvaj. Eble ili eĉ havis hindeŭropan originon kaj apartenis al la triboj de la legendecaj alanoj aŭ „azoj“. La paŝtejoj de la „azoj“ troviĝis sudokcidente de la Aralo, dum la paŝtejoj de la Ŝirinanoj troviĝis ĉe la meza parto de la rivero Syr-Darja. Laŭ la fontoj, la praŭlo de la tribo Ŝirin estis Rüktemir, kiu devenis de iu aza branĉo, kiu nomiĝis Ŝirin. En la persa lingvo ´ŝirin´ signifas ´dolĉa´, ´agrabla´, ´bela´. En la islama mondo Ŝirin estas ofta virina nomo, kaj kiel vira nomo ĝi ekzistas praktike nur ĉe la tataroj. Kia ajn estas la genezo de tiu ĉi nomo, grave estas, ke la kvar menciitaj ĉeftriboj formis laŭ turkaj indikoj de generacioj la originalajn tribojn de Toktamiŝo, ano de la dinastio de Toka Temür, kaj lia familio. Interese estas, ke la menciitaj kvar triboj ekaperis ĝuste tiam, post kiam la kvar triboj de ĥano Batu perdis sian potencon. La potenco de la Ŝirinanoj, kiuj funkciis kiel „bejlerbejoj“ (ĉefoj de la ĉefoj) sub Toktamiŝo, kies vivo estis savita de Rüktemir, kaj kiuj ankaŭ posedis grandan armeon, konsiderinde kreskis post kruelaj kaj mortigaj internaj luktoj en la „Ora Hordo“. Por eviti detruon aŭ estingiĝon de la propra tribo, la ĥano kunmetis apartan trupon, kiu konsistis el liaj filoj kaj unu el la tribaj gvidantoj, kiuj ricevis la ordonon fuĝi al Krimeo. La Ŝirinanoj do forlasis la volgan regionon verŝajne en la 30aj jaroj de la 15a jarcento en la direkto de Krimeo, kiu estis elektita de ili kvazaŭ kiel ekzilo aŭ nova kaj malpli danĝera loĝlando por pluvivi. Tiun ĉi historian decidon iri al Krimeo, kiu estis konkerota, faris Mamak, la filo de Tegene (Ŝirin). Por esplori la aferojn, la kvar menciitaj gvidaj triboj de Toktamiŝo sendis sub la gvido de la Ŝirinaj kaj Barın-aj bejoj ambasodorojn al la grandprinco de Litvo (Litovujo) por elekti unu el tie vivantaj tataraj elmigrintoj kiel ĥanon de Krimeo. Tiel estis elektita *Haĝi Geraj*, filo de Gıyaseddin b. Taŝtemür, kiu staris ĉe la komenco de la krimea ĥanlando, kiu ekzistos 300 jarojn. Rimarkinda afero estas, ke la kombino de la regadosistemo de la kvar menciitaj gvidaj triboj plus la dinastio Geraj, kiuj oficiale fondis tiun ĥanlandon, restis daŭra kaj stabila, malgraŭ internaj kvereloj kaj tensioj kun Turkujo, ilia ´protekta´ potenco, kaj malgraŭ malfacilaĵoj kun la aliaj najbaraj ŝtatoj, kun kiuj la tataroj vivis pli malpli en paco, se oni ne konsideras iliajn militirojn kontraŭ ili.[34]

La politika regadosistemo de la krimea ĥanlando do estis/as vere rimarkinda. Estas konate, ke la ĥanoj de Krimeo ne posedis absolutan potencon kiel iliaj ´kolegoj´ en Ruslando kaj Turkujo. Ĝuste por eviti la absolutan povon la ĥanoj devis dividi la potencon kun aliaj tataraj familioj – nome kun la gvidantoj de la menciitaj kvar familioj *Şirin, Barın, Argın* kaj *Kıpçak*, kiuj estis nomataj *karaçı bey*-oj. La plej prestiĝa inter ili estis la anoj de la familio Ŝirin, kies estro guis aŭtoritaton, kiu estis preskaŭ same granda kiel tiu de la ĥano mem, kiu estris la konsilion (divanon). Multaj filinoj de Ŝirin-anoj edziniĝis al la ĥanoj kaj tiel portis la nomon Geraj. La konsisto de la kvaropo Ŝirin, Barın, Argın kaj Kıpçak validis ĉefe por la 15a jarcento, dum en aliaj jarcentoj ekzistis aliaj kombinoj kiel Ŝirin, Barın, Mansur kaj Siciut en la 18a jarcento. En iuj periodoj estis eĉ kvin familioj, inter kiuj la familio Ŝirin tamen povis konservi sian gvidan pozicion dum la tuta daŭro de la ekzisto de la krimea ĥanlando.

Por esti oficiale agnoskita kaj formale enoficigita kiel ĥano, necesis trapasi specialan festan ceremonion. La kvar *karaçı bey*-oj devis proklami la elektitan ĥanon sur blanka felttapiŝo. Sian povon la nova ĥano povis konservi tiel longe kiel la kvar *karaçı bey*-oj agnosks kaj subtenis lin kiel ĥanon. Eĉ ekzistis hierarkio inter la kvar *karaçı bey*-oj: Tiu kun la plej alta rango estis nomata *baş karaçı.* Li rajtis kunvoki la *kurultajon,*[35] en kiu nova ĥano estis elektita aŭ eksigita. La kvar *karaçı bey*-oj estis ankaŭ la ĉefaj figuroj, kiuj traktis en la divano (kr.t.: *körünüş*) aferojn de la interna kaj ekstera politiko. Ili sigelis la dokumentojn de la decidoj de la divano kaj konsultis la konsilon de la kleruloj de la ulemo (aŭ ulamo)[36] por certiĝi, ĉu tiuj decidoj konformas al la Ŝario. Nur en tiu kazo ili prezentis ilin al la ĥano. Krome, la *karaçı bey*-oj flegis kontaktojn kun eksterlandaj regantoj, antaŭ ĉio kun la grandprincoj de Moskvo kaj Litvo (Litovujo) kaj kun la reĝo de Pollando. La *baş karaçı* rilatis kun la otomana sultano. Ĥana dokumento, kiu proklamis la pacon, validis nur kiam ĝi estis sigelita de la kvar *karaçı bey*-oj. Rilate la

[34] Vd. Ivanics, M.: Die Șirin. Abstammung und Aufstieg einer Sippe in der Steppe. In: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. p. 29-41.
[35] Kr.-t.: Koryltaj. Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Kurultai kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Majlis.
[36] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ulama.

aferojn de sia tribo la *karaçı*-oj estis liberaj kaj tenis internan hierarkion, kiu similis al la hierarkio de la ĥanlando mem. En la militiroj de la ĥano ili portis siajn proprajn flagojn. La ofico de la *karaçı bey*-o estis heredata laŭ la principo de la seniorato, kiu estis konfirmita de la ĥano per speciala akto. La kvar *karaçı bey*-oj (plej maljunaj bejoj de la tribo) estis rekte kontrolataj de la ĥano, kiu ne rajtis eksigi ilin nek mortigi ilin sen serioza kialo.[37] Aliflanke, se la *karaçı bey*-oj deziris, ili ankaŭ povis rompi la lojalecon al la oficanta ĥano. En la ĥanlando evoluis propraj kompleksaj strukturoj socia, jura kaj lerneja kun funkcianta administra aparato. La jura sistemo baziĝis sur tataraj kaj turkaj principoj. Ne-islamanoj devis pagi pli altajn impostojn. La judoj ĝuis specialan socian statuson kaj ne estis diskriminaciataj aŭ persekutataj kiel tio okazis en aliaj landoj de Eŭropo.[38] Entute, la krimea ĥanlando montris aŭ posedis ĉiujn esencajn trajtojn de frumoderna ŝtato, karakterizata de la ekzisto de centra registaro, jura ordo, diferencita socia sistemo, urba loĝantaro kiel esenca tavolo, ekstera komerco, eduka sistemo. La krimea ĥanlando adoptis la kristanan tempokalkuladon, enkondukis propran monunuon, flegis la literaturon kaj arton, precipe ŝtonan gravuradon, kaj alte taksis la gastamon. Tamen, la politika karaktero de la krimea ĥanlando ne povas esti komparata kun tiu de eŭropaj aŭ aziaj regnoj (kiel Francujo, Aŭstrujo, Ruslando aŭ Turkujo), ĉar ĝi estis nek monarkiisme nek absolutisme nek despotisme regata ŝtato.[39] Ĝi estis politika kreaĵo „sui generis" kaj similis pli multe al ŝtatoj de orienta Eŭropo (laŭ A. Fisher), kvankam ĝi transprenis certajn tradiciojn de la „Ora Hordo".[40]

Historiistoj atentigis pri tio, ke en la 17-18a jarcentoj la krimea ĥanlando funkciis kvazaŭ kiel ekvilibrigilo inter Pollando-Litovio kaj Moskvo kaj eĉ ludis influan rolon en la komplika konstelacio de la ekstera politiko en orienta Eŭropo. Tion montras korespondaĵoj inter krimeaj ĥanoj kaj reĝoj de aliaj ŝtatoj. En ĉi tiu studo ni jam menciis la pragmatan sintenon de la krimeaj ĥanoj, kiuj eĉ kontraŭdiris la volon de la sultano, se ili ne volis partopreni la militojn de la otomanoj. Same la krimeaj tataroj povis rifuzi militon kontraŭ la poloj, kvankam la rusa caro alvokis ilin helpi al la rusoj. Aŭ inverse la krimea ĥano povis malakcepti militon kontraŭ svedoj kaj rusoj malgraŭ deziro de poloj. Ktp.[41]

La teritoria strukturo de la krimea ĥanlando similis al la tjurk-mongola sistemo kaj estis organizata laŭ la islama juro. La ĥanoj, kalgoj, bejoj hodĵoj (aŭ hoĝoj), aristokratoj (murzoj[42]), komunumoj, vakufoj[43] kaj kamparanoj havis siajn proprajn terposedaĵojn.

Kvankam la ĥano estis la ŝtatestro kaj ĉefa komandisto de la armeo, kiu konsistis (laŭ Broniovius) el 120-130´000 soldatoj, lia reala potenco estis limigita. Li ne rajtis mem preni interezojn de la bienoj de la bejoj nek de tiuj de iliaj vasaloj. Ĉia provo malrespekti tiun regulon povis kaŭzi lian eksigon de la ofico kiel ĥano. Kiel enspezojn la ĥano ricevis monon  (pension) el Turkujo, doganojn kaj impostojn de la nogajoj kaj ĉerkesoj kaj krimeaj tataroj mem, krome tributpagojn de la pola reĝo, de la moskvaj princoj kaj moldava reganto. Por diskuti gravajn ŝtatajn temojn la ĥano devis kunvoki la divanon, kiu konsistis el reprezentantoj de la bejaj familioj, de eklezíaj kaj juraj reprezentantoj. La decidoj de la divano, kiuj estis prenitaj per la plimulto de la voĉoj, neniel povis esti ŝanĝita de la ĥano. La bejoj dependis de la ĥano tiel, ke ili devis partopreni kun li en militoj kaj porti militajn kostojn. Proklami militon la ĥano mem ne povis, ĉar por tio necesis kunvoki la konsilion de la *bejoj*. Do, la pozicio de la ĥano estis sufiĉe malcerta aŭ fragila, des pli ke li povis en ĉiu momento perdi la apogon de la bejoj kaj de la sultano mem. Inter la administraj oficistoj de la ĥano ekzistis *baskakoj*,[44] doganistoj, enkasigantoj de interezoj kaj impostoj, impostistoj ĉe pontoj kaj foiroj. Ĉefaj doganejoj troviĝis en Perekop (kr.t.: Or Qapı)[45] kaj Evpatorio. La

---

[37] Vd. Mária Ivanics: Die Şirin. Abstammung und Aufstieg einer Sippe in der Steppe. In: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. p. 27-29.

[38] Pri la historio de la juda diasporo sur Krimeo vd. la artikolon pri Krimeo en la Juda Enciklopedio de Brokgauz i Efron (https://ru.wikisource.org/wiki/%D0%95%D0%AD%D0%91%D0%95/%D0%9A%D1%80%D1%8B%D0%BC).

[39] La rusa Vikipedio klasifikas ĝin kiel „Korporacia (r. soslovno, germ. ständisch)-reprezenta monarkio". Tia ŝtatformo ekzistis ankaŭ en la Pola Respubliko (Rzeczpospolita) de la 16-18 jc., la Rusa Carlando dum la tempo de la Semskij Sobor (16-17 jc.), sed ankaŭ en Francio kaj Nederlando dum la Ĝeneralaj Statoj, kaj en la Sankta Romia Imperio kun ties Reichstag-o.

[40] Vd. ankaŭ la kontribuaĵon de Kerstin S. Jobst Jobst: Vision und Regime. In: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. p. 213.

[41] Vd. Kołodziejczyk, D. : Das Krimkhanat als Gleichgewichtsfaktor in Osteuropa (17.-18. Jahrhrhundert). En: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. S. 47-58

[42] Signifon vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Morza.

[43] Signifon vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ŭakfo.

[44] Signifon vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Баскак

[45] Pri la signifo de tiu loko vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Perekopa_terkolo kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Perekop_(Armjansk).

*bejliko*, tereno de la bejo, havis grandan politikan signifon en la ŝtato de la ĥano, ankaŭ ĝi havis sian ĉefurbon, rezidejon kaj konsilion (divanon). La bejo havis la rajton edziĝi al filino de la ĥano, por fariĝi lia bofilo. Ĉiu bejo funkciis en sia tereno kiel supera juĝisto kaj estis nomita fare de la *kadi*-o, kiu havis propran *kadilikon*. En la 18a jarcento sur Krimo ekzistis 48 kadilikoj, al kiu apartenis 1604 vilaĝoj. Ĉiuj juraj demandoj, pri kiuj la bejo okupiĝis sur sia tereno, troviĝis ekster la kompetenco de la ĥano. Post la morto de la bejo sekvis lia plej aĝa filo kiel posteulo, kaj se tiu mortis, la vico estis ĉe la *nuradino*, la dua filo.

La dua rangulo en la hierarkio de la ĥanlando nomiĝis *kalgi-sultano*, kiu estis la heredanto de la trono, kiu vivis en sia palaco en Ak-Meĉet´ (Simferopolo). La tria persono estis la *nuradino*, kaj la kvara estis la *or-bejo*, kiu same apartenis al la ĥana familio. Li estis tiu, kiu devis gardi la pordegon ĉe Perekop (iama Tafros), kie estis la enirejo al la krimea duoninsulo, kaj li devis esti aparte fidinda ano de la familio.

La aristokrataro (*murzoj*) konsistis el du kategorioj: rektaj posteuloj de la bejoj kaj cetera tatara nobelularo. Post kiam la ĥanlando fariĝis dependa de Turkujo en 1475, aperis nova kategorio de „korteguloj“, kiuj gardis la palacon de la ĥano. La gardistoj (aŭ gvardianoj) ĝuis pli malaltan estimon ol la murzoj. Ĉiuj tiuj kategorioj formis la tavolon de armitaj fortoj, kiuj partoprenis en milito.

Ekster tiuj tavoloj troviĝis la ekleziularo, sciencistoj kaj laboristoj. Pinte de la ekleziuloj estis la *muftio*,[46] kiu apartenis al la ĥana divano, same kiel la kadio kaj aliaj altrangaj oficistoj (*agi*-oj) kaj ĝuis altan prestiĝon ĉe ĉiuj tavoloj. Apartan tavolon formis sur Krimeo la metiistoj.

La tataroj de Krimeo konsistis el diversaj hordoj aŭ klanoj, kiuj vivis en malgrandaj vilaĝaj komunumoj kaj havis kontakton inter si. Pri la nomada vivado la tataroj iom post iom rezignis. Estis konstruataj fortikaĵoj kaj sufiĉe impresaj urboj. La tataroj tute ne intencis forpeli la loĝantojn, kiuj tie jam vivis. Male, ili toleris siajn kunloĝantojn, eĉ se ili havis alian religian kredon aŭ kulturon, kaj integris ilin en sian socion. Iom post iom la aliaj loĝantoj de la duoninsulo eĉ transprenis la morojn kaj vivstilon de la tataroj, tiel ke iusence ili mem fariĝis tataroj. Eble laŭ tiu procezo oni povas imagi kaj kompreni la genezon de la tiama krimea popolo, kiu konsistis el multaj diversaj komponantoj, fariĝante integra parto de la unika krimea civilizacio, en kiu geedziĝoj inter muzulmanoj kaj kristanoj ne estas raraĵo.[47]

La popolo de Krimeo estis libera. En tempoj de paco la loĝantaro okupiĝis pri agrikulturo kaj bruta produktado. En tempoj de milito la tataroj rabadis la posedaĵojn de la najbaroj. Eksterlandaj vojaĝantoj vidis la tatarojn konstante armataj kaj pretaj por militi. Kiuj ne partoprenis en milito, tiuj devis provizi la militistojn per armiloj kaj vestaĵoj. La armeo estis formita laŭ dekmilo, milo, cento, deko. La armeo konsistis el taĉmentoj de rajdistoj kaj piedirantoj kaj el kelkaj kanonoj. La soldatoj havis longajn tatarajn sabrojn kaj sagojn, turkajn aŭ persajn ponardojn kaj mallongajn lancojn, poste aperis ankaŭ pafiloj. Murzoj kaj bejoj eĉ portis kirasojn. Ĉiu unuo portis sian propran flagon, kiu havis alian koloron. La unuan lokon en la tabelo okupis ŝirina bejo, kiu portis la flagon ricevitan de la sultano. Uzataj estis bonkvalitaj kaj valoraj turkaj, arabaj kaj alilandaj ĉevaloj. La komencon de milito heroldoj el Baĥĉisarajo diskomunikis kelkajn tagojn antaŭe en la tuta ĥanlando. En ĉiu kadiliko ekzistis aparta punkto, kie la soldatoj kolektiĝis por iri tra la pordego de Perekop al la norda stepo. En Perekop okazis muzikado kaj preĝado. Antaŭ la militiro spionoj iris observadi la atakotan regionon. La soldatoj kunportis nutraĵojn por tri ĝis kvar monatoj: biskvitojn, tritikon, sekan viandon, fromaĝon, kiujn ili konservis en ledaj sakoj apud la selo. En la 17a jarcento la tataroj militiris dufoje jare, precipe somere.[48] Kiel Broniovius (pri li vd. ĉi-sube) klarigis, la tatara armeo celis ankaŭ iomete blufi; ne ĉiuj soldatoj portis armilojn, kaj la simpluloj kunportis po kelkajn ĉevalojn kun si, kio faris la impreson, ke temas pri giganta armeo (kiun cetere konsistigis, krom la plej fortaj viroj de la ĥanlando, ankaŭ kelkcent turkaj janiĉaroj). La tataroj de Krimeo estis timataj kiel lertaj batalantoj kaj precipe kiel bonegaj arkopafistoj.

Meze de la 15a jarcento en la krimea ĥanlando oni nombris pli ol duonmilionon da subuloj aŭ regatoj. Certe, la vivo de la tataroj de Krimeo ne estis nur bona kaj gaja. Malsatkrizoj kaj problemoj kun la kultivado de la tero estis la ĉefaj kaŭzoj, kial la tataroj de Krimeo komencis entrepreni militirojn kontraŭ suda Ukrainio, Litovujo kaj la Moskva Regno. Kvankam ilia celo ne estis konkeri fremdan teritorion, la militiroj de la tataroj timigis kaj terurigis la homojn en la regionoj, kie la rajdistoj el Krimeo aperis. Dum siaj militiroj la tataroj de Krimeo rabis nutraĵojn kaj akiris sklavojn, kiujn ili pluvendis al la

---

[46] Signifon vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Muftio.
[47] Vd. la kontribuaĵon de Kerstin S. Jobst en http://www.schnell-und-steiner.de/artikel_6833.ahtml, p. 18.
[48] Vd. Kozlov, S.Ja. / Ĉiĵova, L.V.: Tjurkskie narody Kryma. Karaimy, Krymskie tatary, Krymčaki. Moskva 2003, p. 177-83.

turkoj, kiuj plej multe profitis de tiu ĉefa ´eksport-produkto´ de la krime-tatara ĥanlando. Precipe en Eŭropo la tataroj – kie ili estis nomataj ankaŭ tartaroj – estis timataj kiel fifamaj sklavigantoj de kristanoj (kvankam ĉi tiun metion praktikadis ankaŭ aliaj popoloj), pro kio rusoj kaj eŭropanoj klopodis misfamigi ilin kiel ´sovaĝulojn´.

Malgraŭ ĉia admiro por la ŝtata sistemo de la krimeaj tataroj, certe, la brutalaj rabaj militiroj , kaj la sklava komercado, en kiuj ili partoprenis, estas, almenaŭ el moderna kompreno, neniel aprobindaj sed estus kondamnindaj kiel grava lezo de la homaj rajtoj kaj kiel krimo kontraŭ la homeco. Certe, la generacio de 1944 kaj la nuntempaj generacioj de krimeaj tataroj ne kulpas pri tiuj krimoj de siaj antaŭuloj de la 15-18aj jarcentoj, pri kiuj ne estas konate al mi, ĉu la krimeaj tataroj transprenis la historian respondecon.



Krime-tataraj militistoj (en la mezo kun pola soldato)

## Skiza politika historio de la Krimea ĥanlando

Sekvas konciza sed iom pli detala priskribo de esencaj okazaĵoj en la tempo de la regado de unuopaj krimeaj ĥanoj, kiun ni dankas al la kroniko de *Haĝi Abd al-Gafari Kırımını,* kiu postlasis unikajn sciigojn pri la internaj politikaj cirkonstancoj de la Krimea ĥanlando kaj ilustras la komplikajn internajn konfliktojn inter la ĥanoj kaj la regantaj triboj unuflanke kaj la eksterajn rilatojn kun la grandpotencoj, kiuj ĉirkaŭis la krime-tataran ĥanlandon, unuavice Turkujo, Pollando-Lit(o)vujo kaj Ruslando.

Post la morto de la patro, ***Nur-Devlet***, filo de *Haĝi-Geraj*, la unua ĥano, okupis la tronon kiel ĥano de Krimeo tri fojojn: en 1466-7, en 1467-9 kaj en 1475-6. ***Meñli[49] Geraj***, (1445/78-1515), kiu rivaladis kun sia frato Nur-Devlet, oficis kiel ĥano en la jaroj 1466, 1469-1475 kaj povis definitive instaliĝi nur en 1478-1515. Agnoskante la hegemonion de la sultano,[50] kiu celis inkluzivi Krimeon en sian regadosferon, en 1502 Nur-Devlet kontraŭbatalis la armeon de la „Ora Hordo“ en tiu grado, ke praktike ĝi ĉesis ekzisti. En tio caro Ivano IIIa kaj la pola reĝo Sigismundo Ia estis liaj aliancanoj. Fakte, la krimeaj ĥanoj eĉ influis la aferojn en la ĥanlando de Kazano kontraŭ la rusoj. Tiel, kun ĥano ***Muĥamed Ia Geraj*** (1515-23) estis interkonsentite, ke lia frato ***Sahib Geraj*** fariĝu ĥano de Kazano (1521-5). Sentante sin sufiĉe forta, ambaŭ ĥanoj baldaŭ entreprenis ambician militiron kontraŭ Moskvo. Malpli sukcesa evidentiĝis la milito de Muĥamed Geraj kontraŭ Astraĥano (1523), en kiu li estis mortigita pro nogaja trompo. Lia filo ***Gazi Ia Geraj***, kiu fariĝis nova ĥano en 1423 por unu-du jaroj, almenaŭ sukcesis rekonduki sian armeon al Krimeo sed poste pereis pro nekonataj cirkonstancoj. ***Saadet Ia Geraj*** (1524-32), lia posteulo, kiu ĝuis la amikecon de la aktuala sultano, devis savi la restaĵojn de la prestiĝo de la ĥanlando. Saadet enkondukis reformojn laŭ la gusto de la sultano kaj renovigis la armeon, sed la rivaleca bato inter la regantaj triboj elĉerpis liajn fortojn; fine li perdis la potencon favore al ***Islam Ia Geraj***, frato de la mortigita Gazi Geraj kaj filo de Muĥamed Geraj. Islam estis subtenata de la Ŝirinanoj, kiuj opoziciis kontraŭ la porsultana politiko de Saadet kaj liaj reformoj, kiuj celis pli fortan pozicion de la krimea ĥano. Sed jam en la jaro de

[49] Prononco supozeble kiel germana ng.
[50] En 1478 regis sultano Mehmet IIa (nomata la Konkeranto). Liston de otomanaj (aŭ osmanidaj) sultanoj vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_osmanidaj_imperiestroj.

sia nomumo, en 1532, Islam estis mortigita, kaj nova, pli signifa ĥano fariĝis ***Sahib Ia Geraj*** (1501/32-51), kiu jam estis menciita kiel ĥano de Kazano. Sub Sahib estis konstruita la sola marhaveno de la ĥanlando en Kezlev/Gözleve (Evpatorija), kiu konkurencis kun la otomana haveno Kafo (apud Feodosija). Ĉar tiu ĥano, kiu mirinde prosperigis la ekonomion kaj fortigis la armeon de la ĥanlando, estis forta kaj sukcesa reganto, li rikoltis ankaŭ ĵaluzon kaj malaprezon flanke de la Ŝirinaj bejoj kaj de la sultana burokrataro, kiu volis eviti tro grandan potencon de tiu krimea ĥano. Lia posteulo fariĝis ***Devlet Ia Geraj*** (1512/51-77), nepo de Meñli Ia Geraj. Devlet famiĝis en la historio pro tio, ke li lanĉis kelkajn timindajn militirojn kontraŭ Ruslando, inter kiuj la plej elstara finiĝis per la bruligo de Moskvo. La regado de ĥano ***Meĥmet IIa Geraj*** (1577-84), filo de Devlet, estis karakterizita per tio, ke la armeo de la krimea ĥanlando partoprenis en malsukcesa militiro de la otomanoj kontraŭ Persio. La venonta signifa ĥano ***Gazi IIa Geraj*** (1588-96) enkondukis reformojn, reduktante la povon de la divano, ke nur la plej aĝa filo povas heredi la tronon, [51] kaj armigis la personan gvardion per fajropafiloj. Li partoprenis militon de la sultano kontraŭ Persio kaj Hungario kaj klopodis distancigi la rusan teritorion de la krimea ĥanlando. Fondi novan ĉefurbon ĉe la rivero Dnepro tamen fiaskis, kaj nova rezidejo fariĝis Kezlev/Gözleve, kie ankaŭ la arĝentaj moneroj de la ĥanlando estis produktitaj. Kune kun la nogajoj, kiuj estis priskribitaj eĉ kiel pli sovaĝaj ol la tataroj mem,[52] Gazi entreprenis en 1591 militiron kontraŭ Moskvo, kie regis caro Boris Godunov, kun kiu la tatara ĥano unue rilatis diplomatie. Kvankam la armeo de Gazi atakadis la urbon tagnokte, li mem perdis multajn soldatojn. Pro la senespera situacio, ĉar la rusa artilerio estis tre efika, la ĥano decidis retiriĝi al Krimeo, kie lia prestiĝo rapide falis. La malamikeco inter la Ŝirinanoj kaj Mansuranoj kaŭzis, ke la sekva ĥano, ***Toktamiŝo Geraj***, filo de Gazi, kiu surtroniĝis en 1607, estis mortigita kaj anstataŭigita per ***Selamet Geraj*** laŭ prefero de la sultano, tiel ke skismo okazis inter la regantaj triboj de la krimea ĥanlando. Selamet, kiu oficis kiel ĥano ĝis 1610, kontraŭbatalis siajn fratojn Muĥamed kaj Ŝahin kaj forpelis ilin. Ankaŭ lia posteulo, ***Dĵanibek Geraj***, filo de Mubarek Geraj, kiu okupis la tronon de 1610 ĝis 1623 kaj denove de 1627 ĝis 1635, daŭrigis sian privatan militon kontraŭ Muĥamed kaj Ŝahin, kiuj foriris al Turkujo kaj Persujo. Post sia liberiĝo Muĥamed estis reinstalita kiel ĥano, kaj Dĵanibek migrs al Rodiso (Rodoso) en la ekzilon, kie la eksigitaj ĥanoj ofte atendis sian momenton por eventuale reveni al la povo en Krimeo. Laŭ ordono de la sultano ĥano ***Muĥamed IIIa Geraj***, kiu regis ĝis 1627 aŭ 1628, devis komenci la konstruadon de la planita fortikaĵo apud la rivero Dnepro kiel defendosistemo kontraŭ la kozakoj, kiuj tie aperis kiel nova milita faktoro. Ĉar li ne volis malbonigi la rilatojn kun la kozakoj kaj preferis firmigi la aliancon kun ili, li donis al ili signifajn privilegiojn, kiujn ili povis utiligi sur Krimeo. Kiam en 1627 unu el la Mansuranoj arestis Muĥamedon, la kozakoj helpis liberigi lin. Sed tiu vakua situacio estis utiligita de *Dĵanibeko,* kiu denove akaparis la ĥanan tronon, dum Muĥamedo kaj Ŝahino aliĝis al la kozakoj de Saporoĵe, de kie poste ili provis reveni al la povo en la ĥanlando. Dum iu batalo kun Dĵanibeko Muĥamedo pereis kaj Ŝahino estis arestita, sed la sultano donacis al li la vivon kaj ekziligis lin al Rodiso (Rodoso). Ĝuste tiuj eventoj kaj cirkonstancoj enkondukis bazan ŝanĝon en la diplomatiaj rilatoj inter la ĥanoj kaj la Alta Pordo.[53] Dum antaŭe la elekto de nova ĥano suverene okazis en la kurultajo aŭ fare de la eksa ĥano kaj devis esti aŭtomate konfirmita de la sultano, ekde nun la decido pri nova okupanto de la trono en la Krimea ĥanlando estis farita en Istanbulo. Samtempe, la ĥano ankaŭ perdis la rajton elekti la duan rangulon, la kalgon, kiu same estis nomita de Istanbulo. Nur sian duan anstataŭanton, la nuredinon, la ĥano povis mem elekti. Per tio la ĥanoj de Krimeo konsiderinde perdis sian potencon, tamen sen fariĝi nuraj subuloj aŭ ludpilkoj de la otomanoj. Influi la decidon pri la elekto de nova ĥano povis nur lobioj de la ĥanlando en la ĉefurbo de la otomana imperio.[54]

---

[51] La funkcio de la kalgo (kalga), kiu signifis laŭrange la duan hierarkiulon en la ŝtato de la krimeaj hanoj, estis enkondukita en 1486 de Meñli Ia Giraj kaj okupata ĉiam de Giraj-anoj. Multaj el tiuj kalgoj ankaŭ heredis la tronon de la antaŭa ĥano, kiu devis esti konfirmita de la sultano (vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Калга).

[52] Vd. la kontribuaĵon de Kerstin S. Jobst en http://www.schnell-und-steiner.de/artikel_6833.ahtml, p. 18.

[53] Pri la signifo vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Sublima_Pordo.

[54] Vd. Papp, S.: Die Inaugurationen der Krimkhane. En: En: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. S. 88. La aŭtoro de ĉi tiu artikolo aldonis interesajn detalojn pri la diplomatiaj rilatoj inter ĥanoj de Krimeo kaj Alta Pordo okaze de la inaŭguro de nova ĥano (precipe en la 17a jc.) kaj povis montri la komplikajn rilatojn, kiuj regis inter ambaŭ flankoj.







Mapoj de la regiono pri la situacio en la 17a jarcento

La sekva ĥano, ***Inajet Geraj***, klopodis reekvilibrigi la diversajn tribajn rivalecojn, subtenante la Ŝirinajn bejojn, kaj igis la Mansuranojn foriri al Turkujo. Sed tiam ekribelis la nogajoj, kiuj rifuzis submetigi al tiu ĥano. Por sufoki la ribelon de la nogajoj li utiligis la helpon de la kozakoj. Inajet rifuzis la ordonon de la sultano militi kontraŭ Persio kaj eĉ venkis la otomanojn en iu batalo ĉe Kafo. Kun Ruslando kaj Pollando Inajet subskribis pactraktatojn, kio ne plaĉis al la turkoj. Li estis vokita al Istanbulo kaj survoje mortigita. La sekva Gerajano, kiu fariĝis hano de Krimeo, nomiĝis *Bahadır,* kiu kiel infano vivis en Turkujo kiel filo de Selamet. Li povis firmigi sian pozicion, kaj la partio de la Ŝirinanoj forigis la nogajojn el Krimeo por ĉiam kaj daŭre influadis la regadon de la ĥano, kiu fariĝis daŭre dependa de ili. Post Bahadiro regis ĥano ***Muĥamed IVa Geraj***, kiu translokis la sidejon de la krimeaj ĥanoj de Kezlev/Gözleve al Baĥĉisarajo, kie nova palaco estis konstruita. En sia unua regadoperiodo tiu ĉi ĥano provokis la malkontenton de la bejoj, ĉar li malpermesis al ili militi kontraŭ Ruslando, kaj la sultano estis malkontenta pri li, ĉar sub lia regado la ĥanlando perdis terenon en Kaŭkazo. Pro nesufiĉe aktiva ekstera politiko Muĥamedo estis eksigita de la sultano kaj ekzilita al Rodoso. Sed ankaŭ sub lia posteulo ***Islam IIIa Geraj***, kiu regadis tutan jardekon ĝis 1654, la eksterpolitika situacio ne esence ŝanĝiĝis pozitive por la ĥanlando, kvankam la komenca alianco kun la kozakoj de Saporoĵe, kiuj havis komunan limon kun la krimea ĥanlando, alportis certan profiton en formo de militgajnoj materiaj kaj homaj. La kontrakt-rilatoj inter tataroj kaj kozakoj estis loza kaj ŝanceliĝema. Ĝuste en 1654 okazis la Traktado de Perejaslav, per kiu la kozakoj ĵuris fidelecon al la rusa caro, kio inte alie signifis, ke Ruslando devis proklami la militon kontraŭ Pollando-Litovujo.[55] Per tiu kontrakto kun la militemaj kozakoj, kies lando servis ĝis nun kiel bufro, sed kiu nun estis reuinigita kun Ruslando, la moskvanoj danĝere alproksimiĝis al la limoj de la ĥanlando. Malgraŭ tio, la alianco de Islamo kun Bogdano Ĥmelnickij, hetmano de la kozakoj, tenis ses jarojn, tiel ke ili kune bataladis kontraŭ la poloj kaj litvanoj (aŭ litovoj). Samtempe, la sultano devigis la tatarojn militi kontraŭ Venecio, kion Islamo tamen rifuzis fari, insistante pri la memstareco de sia potenco. Fronte al la nova minaco el nordo, la tatara divano decidis en 1654 proksimiĝi al Pollando-Litovujo kaj subskribi packontrakton kun la poloj. Pro la subita morto de ĥano Islamo, kiu estis konsiderata kiel a kaj justa reganto, la kontrakton subskribis lia posteulo ***Muĥamedo IVa Geraj***, kiu okupis la tronon por la dua fojo ĝis 1666. Konsiderante la politikon de sia antaŭulo erara, Muĥamedo havigis subtenon al hetmano Vygovski, kiu strebis liberiĝi de la rusa dependeco. Kiam la rus-pola konflikto akriĝis, la tataroj decidis subteni la polojn. Je la fino de sia regado Muĥamedo eĉ klopodis emancipiĝi de la kontrolo de la sultano, al kiu la tatar-pola realproksimiĝo ne plaĉis. Kiam la ĥano ankoraŭ kuraĝis rifuzi la partoprenon en turka milito kontraŭ Hungario, li estis eksigita de la sultano kaj ekzilita al Dagestano, kie li forpasis en 1674. En la regadotempo de ***Adil Geraj*** (1666-71) okazis la subskribo de la pactraktato de Andrusovo (1867) inter Polujo-Litovujo kaj la rusa

[55] En la Lublina Unio de 1569 la Pola Reĝlando unuiĝis kun la Litova Grandprinclando (vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Lublina_unio).

carlando, kiu finis la rus-polan militon. La pola respubliko agnoskis la rusan hegemonion super la vojevodioj de Smolensko kaj Ĉernigovo kaj partoj de Ukrainio oriente de la Dnepro, inkluzive Kievon. La teritorio de la kozakoj de Saporoĵe fariĝis lando kune regata de rusoj kaj poloj. Ambaŭ flankoj estis devigitaj defendi sin kontraŭ la Otomana Imperio kaj la krimeaj tataroj. Post Perejaslav, Andrusovo ebligis al Ruslando konsiderinde vastigi sian influon en la regiono, kiu antaŭe estis kontrolata de poloj kaj kozakoj. La specifeco de la regado de Adil estis, ke tiam denove eksplodis internaj tribaj konfliktoj. Adil estis la sola ido de la tribo de la Ĉoban-Gerajanoj, kiu okupis la ĥanan tronon de Krimeo. La Gerajanoj ne agnoskis la legitimecon de la Ĉobananoj okupi la tronon kaj nur malvolonte akceptis la decidon de la sultano konfirmi Adil Gerajon ĥano de Krimeo. Ankaŭ la krimeaj bejoj malemis submetiĝi al li, kaj ili eĉ pli malŝatis lin, kiam li enkondukis pli altajn impostojn. Nekontentaj pri lia politiko, la Ŝirinanoj ribelis kontraŭ li, sed Adil subpremis la ribelon kun la helpo de la otomanoj kaj Mansuraj nogajoj. Dezirante estingi la novajn kverelojn inter la triboj de Krimeo, la sultano ordonis al Adil ĉesigi la persekutadon de la Ŝirinanoj. Fariĝinte viktimo de intrigoj, Adil estis eksigita kiel ĥano kaj sendita en la ekzilon. La sekva, 25a ĥano ***Selim I. Giray***, kiu vivis inter 1631 kaj 1704, kun interrompoj regis kvarfoje kiel ĥano kaj do meritas apartan atenton. Filo de Bahadiro, Selim estis talentita kaj populara politikisto, signifa militisto, kiu dum la pol-turka milito de 1672-76 konkeris la urbon Bar en Ukrainio. Ĉar en 1677 li tamen malsukcesis konkeri la urbon Ĉigirino, kiu estis okupata de la rusoj, li estis eksigita de la sultano kiel ĥano. Ankaŭ lia posteulo ***Murad Geraj*** (1627-96/1678-83), filo de Mubarek, partoprenis en la militoj de la sultano, sed li tamen preferis pacon inter Turkujo kaj Ruslando kaj subskribis la traktaton de Baĥĉisarajo de la jaro 1681, kiu antaŭvidis 20-jaran pacon inter ambaŭ potencoj. Ĉar inter la diversaj aliancanoj aperis kontraŭ-otomana etoso, Murad estis eksigita sub la premo de la sultano kaj anstataŭigita per alia ĥano, kiu nomiĝis ***Haĝi IIa Geraj***, filo de Krym Geraj. Haĝi okupiĝis ĉefe pri financoj, reduktis elspezojn kaj lanĉis kampanjon kontraŭ la tro granda potenco de la bejoj, kiuj subtenis la tribon Ŝirin. La ĉagrenitaj bejoj prisieĝis la palacon en Baĥĉisarajo kaj forpelis tiun ĉi ĥanon, kiu povis savi sian vivon, kaŝante sin en iu fortikaĵo sur otomana teritorio, antaŭ li ekziliĝis al Rodoso. La bejoj petis reinstali *Selimon* en 1648, kiu fakte revenis al la povo kaj denove regis, ĉifoje ĝis 1691. Dum lia regado la paco de Baĥĉisarajo rompiĝis sub la premo de la rusoj, kiuj postulis de Istanbulo cedi Krimeon. Post kiam la turkoj rifuzis tiun postulon, en 1687 rusa armeo konsistanta el cent mil soldatoj kaj komandita de princo Vasilij V. Golicyn atakis Krimeon. La kozakoj, kiuj estis vokitaj de la rusoj helpi, bruligis la stepon de la ĥanlando. Sed la militiro de la rusoj montriĝis malsukcesa. Kiam la sultano devigis la ĥanon partopreni en milito kontraŭ Aŭstrujo, li rifuzis la ordonon, sed ĉar li ne volis akrigi la rilatojn kun la sultano, li abdikis, pilgrimis al Meko kaj estis anstataŭigita per ***Saadet IIa Geraj***, alia filo de Krym Geraj. Tuj post la surtroniga ceremonio en Istanbulo, Saadet, kiu restadis ie inter la okcidenta bordo de la Nigra Maro kaj la Danubo, ricevis sultanan ordonon pretigi armeon kontraŭ Aŭstrujo. Li plusendis la ordonon al Krimeo kaj mem kunmetis nogajan armeon, kun kiu li militiris tra Rumanio, kie li kruele punis la lokan popolon. Sed la ĥano malfruiĝis ĝustatempe aperi kun sia armeo en la loko de la bataloj, dum la turkaj soldatoj mem fiaskis sen la subteno de la tataroj. Saadet, kiu restis malfeliĉa ĥano kaj regis nur mallonge, devis elteni la koleron de la sultano, ne povis reiri al Krimeo sed ekziliĝis, kiel kutime, al Rodoso. Lin sekvis ***Safa Geraj***, kiu regis en 1691-92 sed estis malpopulara. En tiu malfacila momento, *Selim* estis revenigita sur la tronon de la krimea ĥanlando por la tria fojo laŭ peto de la bejoj. Intertempe, oni troviĝis en la epoko de Petro Ia la Granda (1672-1752), kiu fariĝis caro de Ruslando en 1682. Petro atakis Azovon, sendis rusajn soldatojn ĉe la Dnepro kaj konstruis ringon de fortikaĵoj en la regiono de Stavropolo. La malfacila tasko de Selim estis batali kontraŭ Petro, kiu evidentiĝis kiel tro forta ´partnero´. La sultano siaflanke devigis la krimeajn tatarojn partopreni en siaj militiroj en Balkanio. Selim dume helpis al la otomanoj teni Azovon, sed baldaŭ la fortoj ne plu sufiĉis. Petro deziris aliron al la Nigra Maro kaj packontraktis kun la otomanoj, kiuj rericevis Azovon, promesante ke la tataroj ĉesos militi kontraŭ Ruslando. Per tiaj diplomatiaj reguloj la krimeaj tataroj pli kaj pli perdis sian rolon kiel memstara politika kaj milita ´ludanto´. Selim komprenis, ke la kondiĉoj de la traktato ne estis plenumeblaj rilate al la krimea ĥanlando, kiu ne tute volis kaj povis rezigni pri la militiroj, kiuj ja estas grava faktoro de ĝia ekonomio. Troviĝante kiel ĥano en malfacila pozicio inter la volo de la sultano kaj la interesoj kaj reala (mal)potenco de la bejoj, Selim ree abdikis en la jaro 1699, jaro de la pactraktato de Karlovico (26a de januaro), per kiu finiĝis la “Granda Turka Milito” inter la Otomana Imperio unuflanke kaj la Sankta Roma Regno, Pollando, Venecio, Eklezia Ŝtato kaj Ruslando aliflanke. Post la perdo de la batalo ĉe Vieno en septembro 1683, kiu finis la turkan sieĝadon de Vieno, la turkoj ĉiukaze troviĝis en pli kaj pli mizera situacio. Ĉar Moskvo ne plu devis pagi tributon al la

ĥanoj, tio signifis gravan perdon de prestiĝo. ***Devlet Iia Geraj***, kiu estis elektita kiel sekva ĥano, devis konstati, ke la bejoj fajfis pri la rus-turka kontrakto kaj pretigis novan militon kontraŭ Ruslando, kiu tiam estis okupata pri la "Norda Milito". En la pactraktato de Konstantinopolo (1700) la rusa posedaĵo de Azovo estis konfirmita. La ĥano serĉis pretekston por ricevi la permeson de la turkoj por ataki Ruslandon. Sed la sultano malkonsentis kaj reagis per eksigo de tiu ĥano kaj ordonis al Selim reveni en la oficon, por la kvara fojo, en 1702, por fari ordon en la lando. Selim, kiu estis konsiderata kiel taŭga kaj bona ĥano, forpasis la 22an de julio 1704 en la aĝo de 73 jaroj en Baĥĉisarajo, kie lia cindro estis entombigita en maŭzoleo de la moskeo nomata laŭ lia nomo. La du sekvaj ĥanoj, ***Gazi Geraj*** (1704-7) kaj ***Kaplan Geraj*** (1707-8) estis malfortaj regantoj kaj malmulte sukcesis bridi la nogajajn militistojn, kiuj daŭrigis ataki Ruslandon, kaj submeti la ĉerkesajn princojn sub la kontrolon de la krimea ĥanlando. En sia dua oficperiodo ***Devlet IIa Geraj*** (1709-13) intertraktis kun la svedoj pri komunaj militoperacoj kontraŭ Ruslando. Laŭ premo de la rusa flanko, la sultano konservis sian decidon malpermesi al la tataroj militi kontraŭ Ruslando, kaj la rusaj diplomatoj eĉ povis konvinki la sultanon, ke li evitu, ke tataroj kaj kozakoj denove alianciĝu, ĉar tia plano ekzistis. Post tio Petro efektivigis gravegan baton kontraŭ la kozakoj, kies potenco konsiderinde malfortiĝis. La krimea ĥano invitis la kozakojn, kiuj povis savi sian vivon, translokiĝi sur la teritorion de la ĥanlando. En la batalo de Poltavo, okazinta la 27an de junio 1709, la svedoj travivis katastrofan malvenkon, tiel ke la sultano proponis al la sveda reĝo ekzilon en Turkujo. Nova milito inter Turkujo kaj Ruslando eksplodis, kiam la sultano rifuzis ultimaton de Sankt-Petersburgo ekspedi la svedan reĝon el Turkujo. En alianceco kun tataroj, svedoj kaj kozakoj (el Saporoĵe, Dono kaj Kubano), la otomanoj venkis la rusojn ĉe la rivero Prut. La kontraŭ-aŭstra militpolitiko de la du sekvaj ĥanoj, ***Kaplan Geraj*** kaj ***Kara-Devlet-Geraj*** alfrontis la kontraŭstaron de la bejoj, tiel ke la bejoj deziris havi unu el la idoj de Selim kiel ĥanon. Tiel surtroniĝis ***Saadet IIIa Geraj***, kiu militis kun la ĉerkesoj por submeti ilin al la kontrolo de la ĥanlando. Sed lia malfeliĉo konsistis en tio, ke venĝemaj funkciuloj, kiujn tiu ĥano eksoficigis, intrigis kontraŭ li, tiel ke li preferis abdiki kaj forlasi Krimeon. En 1724, la nova ĥano ***Meñli IIa Geraj*** klopodis juste reordigi la internajn aferojn en la ĥana ŝtato kaj puni la Ŝirinajn bejojn, kiuj estis envolvitaj en intrigoj. Post puĉo en Istanbulo ili venĝis sin kaj atingis la demision de Meñli. ***Kaplan Geraj***, kiu triafoje regis kiel krimea ĥano, estis forigita de la sultano en 1736 post malsukcesa defendo de la tataroj kontraŭ la armeo de la rusa feldmarŝalo B. Ch. von Münnich (Minich),[56] kiu enpentris Krimeon, kie li duonsukcese rebatis la tatarojn kaj bruligis la ĥanan palacon en Baĥĉisarajo, inkluzive de ties arkivo, kie konserviĝis la skribaj dokumentoj de la krimeaj tataroj. Sed la rusaj soldatoj forfuĝis de Krimeo, post kiam sur la duoninsulo eksplodis iu epidemio. Kvankam la palaco estis parte rekonstruita, la kruela atako de la rusoj, kiu laŭ iuj rusaj historiistoj eĉ ne estis necesa, longdaŭre fortigis la malamon de la tataroj kontraŭ la rusoj. En la tempo de la sekvantaj ĥanoj, precipe sub ***Fetiĥ Iia Geraj***, la militaj atakoj de la rusoj kontraŭ Krimeo ripetiĝis. Sub la komando de feldmarŝalo Lassi 35 mil rusaj soldatoj enpenetris Krimeon kaj detruis ĝin. Kun la energio de ***Arslan Geraj*** (1748-56) fortikaĵoj estis konstruitaj, moskeoj, novaj minaretoj kaj medresoj estis starigitaj kaj la palaco de la ĥanoj en Baĥĉisarajo estis riparita.

Montefiore donis jenan karakterizon de la palaco: "La palaco de la ĥano estis eklektikisma komplekso de konstruaĵoj, konsistantaj el kastelo, haremo kaj moskeo. Ukrainaj sklavoj konstruis ĝin laŭ la planoj de persaj kaj italaj arkitektoj en maŭra, araba, ĉina kaj turka stilo; al tio aldoniĝis okcidentaj elementoj kiel gotikaj kamentuboj. La plano de la palaco orientiĝis laŭ otomanaj palacoj en Konstantinopolo. Tio signifis, ke la pordegoj kaj kortoj estis direktitaj al la rezidejo kaj la haremo de la ĥano. La internaj kortoj faris trankvilan kaj pacan impreson. Altaj muroj ĉirkaŭis sekretajn ĝardenojn, en kiuj arte konstruitaj fontanoj kviete ŝprucetis. Apud la moskeo de la ĥanoj kun siaj altaj minaretoj troviĝis la nobla tombejo de la Geraja dinastio. Sur kampo de detale ĉizitaj tomboŝtonoj du rotundoj estis konstruitaj ĉirkaŭ la maŭzoleoj de la ĥanoj. Kandeloj brulantaj sub la fenestroj disvastigis dolĉan odoron. La palacon ĉirkaŭis tatara urbo kun banejoj kaj minaretoj en valo limigita per du krutaj rokoj.[57]

[56] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Burkhard_Christoph_von_Münnich.

[57] Montefiore, S.S.: Katharina die Grosse und Fürst Potemkin. Eine kaiserliche Affäre. Frankfurt/M. 2009, p. 538s.



La palaco de la iama ĥano de la tataroj de Krimeo en Baĥĉisarajo (El Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Baĥĉisarajo)

En 1771 giganta rusa armeo, subtenata de 65 mil nogajaj batalantoj, penetris en Krimeon tra Perekopo por okupi la plej gravajn strategiajn punktojn de la duoninsulo. Ĥano ***Maksud Geraj*** forlasis Krimeon. Sub la konkeranto V.M. Dolgorukov[58] komenciĝis la rusa administrado de la lando, kiu estis sankciita de la apogantoj de ***Ŝahin Geraj***, kiu ludis ĉefrolon kiel kalgo, dum ***Sahib IIa Geraj***, frato de Ŝahin, estis instalita kiel ĥano (1771-5). La turkaj garnizonanoj estis forpelitaj de la rusaj fortoj. La ĥano kaj kalgo ankoraŭ klopodis eviti, ke la rusoj okupu la tatarajn fortikaĵojn, ĉar ili timis, ke la rusoj povus daŭre okupi ilian landon. Sed Ŝahin, kiu estis dume sendita al Peterburgo, revenis al Krimeo kiel konvinkita rusiano, kiel la rusa historiografio notis. En la fama rus-turka pactraktato de Küĉük Kajnarĝi (tr. Küçük Kaynarca) de la l0a de julio 1774, kiu devis fini la Rus-Turkan Militon de 1768-1774, la Otomana Imperio devis rezigni pri la ´ukraina´ teritorio (kiu ekde 1764 estis nomata „Nova Ruslando“[59]) kaj agnoski la „ŝtatan sendependecon“ de Krimeo, kiu estis proklamita de tiu pactraktato. Laŭ la sama kontrakto ĉiuj kristanaj loĝantoj de Krimeo devis forlasi la duoninsulon kaj translokiĝi al Ruslando.

Sed la sendependeco de la ĥanlando estis pura formalaĵo, fakte farso, ĉar la ĥano devis submetiĝi al la volo kaj interesoj de la rusa imperiestro, dum pri islamaj aferoj la suverenecon tamen povis konservi la sultano. En la konfuza lukto inter tataroj kaj rusoj por la povo Sahib estis eksigita, kio signifis ke ankaŭ Ŝahin perdis sian funkcion de kalgo, kaj anstataŭigita per ***Devlet IVa Geraj*** por la jaroj 1775-77. Sed Peterburgo tamen insistis pri ***Ŝahin Geraj***, kies ĥanecon la rusoj konfirmis por la tempo de 1777 ĝis 1782. Malgraŭ tio, en ĉi tiu jaro ***Bahadır IIa Geraj*** ankoraŭ sukcesis uzurpi la tronon sed baldaŭ devis cedi ĝin ree al la sama ***Ŝahin***, kiu abdikis kiel plej lasta ĥano en 1783, kiam Krimeo estis aneksita de Ruslando (pri tio vd. pli sube).[60] Per tio la historio de la krimea ĥanlando estis en principo finita, sed ***Bahadır IIa Geraj*** ankoraŭ formale oficis kiel ĥano de Krimeo ĝis 1790.[61]

[58] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Долгору́ков-Кры́мский_Васи́лий_Миха́йлович.
[59] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Novorusio, http://karty.narod.ru/great/nvr/nvr.html.
[60] Post la venko de la rusoj super la kubanaj nogajoj Ŝahin fariĝis estro de Kubano. Esperante ricevi lokon sur la trono de Persio, Ŝahin intertempe vivis en Tamano, Voroneĵo kaj Kalugo, antaŭ ol li rajtis iri al Turkujo, kie li estis kondamnita iri al la ekzilo en Rodoso, ĉar oni suspektis lin, ke li povus politike intrigi.
[61] Laŭ Kozlov, S.Ja. / Ĉiĵova, L.V.: Tjurkskie narody Kryma. Karaimy, Krymskie tatary, Krymĉaki. Nauka Moskva 2003, p. 157-176.

**La vojaĝoj de Martinus Broniovius al Krimeo**

Utilajn konojn pri la vivo en Krimeo kaj la situacio en la krimea ĥanlando ni posedas dank´ al kelkaj unikaj okcidentaj vojaĝraportoj el tiu tempo, inter kiuj elstaras la priskriboj de aŭtoroj el Polujo-Litovujo, inter kiuj menciindas la nomoj de Maciej z Miechowa (1457-1523), Wencław Mikołajewicz (Michalon Lituanus, ĉ. 1490-1560) kaj ***Martinus Broniovius*** (Marcin Broniewski de Biezdzfedea). La ĉi-lasta vizitis Krimeon en la jaroj 1578, 1579, 1587 kaj 1591, kie li pasigis entute naŭ monatojn. Krom la priskribo de la ravaj pejzaĝoj de la duoninsulo, kiujn li postlasis en sia fama *Tartariae descriptio*, la pola diplomato liveris interesajn detalajn sciigojn pri la juraj kutimoj de la krimeaj tataroj. Al Krimeo Broniovius veturis en la nomo de la pola reĝo por igi la tatarojn rezigni pri atakoj kontraŭ Polujo-Litovujo[62] kaj anstataŭ tio prefere militi kontraŭ Moskvo. Kvankam li parolis pri la krimeaj tataroj kiel timindaj barbaroj, kiuj kune kun la turkaj ĝemeloj okupas landon de la okcidenta civilizo, Broniovius pentris ĝenerale tamen pozitivan karakterizon pri la sinteno de la tataroj rilate la traktadon de la eksterlandaj gastoj, de la propraj komunumanoj kaj de la polaj civitanoj, kiuj estis retenataj de la tataroj sur Krimeo kadre de la sklava komerco.[63]

Vojaĝante tra Braclaw (Bratislavia, Braslavia), limurbo al Podolio, Kamenec (-Podolsk), Ĥotin, Soroki/Soroca, Baraboj (Beribonium), Hacibey (loko kie poste estos fondita Odeso) kaj Oczakovia (Oczakow/iv),[64] kie troviĝis fama fortikaĵo, Broniovius atingis la urbon Perekop, la limpunkton al Krimeo, kiu estis kontrolata de la krimeaj tataroj. De tie li daŭrigis tra Cosslovia al Inkerman kaj Ĥersonesos, turke nomata Sarigermen, kie li vidis la ruinojn de la fama antikva urbo. Tra Imaboli li venis al la monto Mangup (Mancopia),[65] kie li vizitis la restaĵojn de la fortikaĵoj, en kiuj la krimeaj tataroj kutimis malliberigi la moskvajn ambasadorojn. De Baĥĉisarajo li daŭrigis sian (realan aŭ virtualan) vojaĝon al Sudak kaj Kafo (Feodosija), ĉiam kun aparta atento al kasteloj, preĝejoj kaj riveretoj kaj al la heredaĵo de diversaj popoloj, kiuj tie vivis kaj konstruis kaj postlasis siajn spurojn. Plej ofte Broniovius renkontis nur ruinojn, sed la kultur-pejzaĝo, kiun li trovis, sendube ravis kaj fascinis lin. Eksterordinaraĵo de Krimeo konsistas en tio, ke ĝia norda parto estas ekstrema stepa ebenaĵo, dum la sudo havas altajn montojn kaj densajn arbarojn. En la nordo troviĝas multaj vilaĝoj, en la sudo ekzistas veraj urboj. Nature, la historia priskribo de la deveno de la krimeaj tataroj fare de Broniovius ne estis scienca, sed tio ne estis la ĉefa celo de lia raporto. Pli grava kaj interesa estis la priskribo de la moroj kaj kutimoj de la krimeaj tataroj. Tiel li raportis, ke la ĥanoj bone edukas siajn filojn, havas, laŭ muzulmana kutimo, multajn virinojn, kun kiuj ili havas infanojn aŭ kiujn ili edzinigas kun noblaj tataroj aŭ turkoj. Sed kiel kristano Broniovius kritikis la islaman kredon, kiun la tataroj ricevis de la turkoj, kiel „malĝustan“ religion. Aliflanke, li observis, ke en la socio de la ĥanlando regis speco de absoluta justeco kaj ke krimoj, almenaŭ laŭ okcidenta jura kompreno, tie ne okazis. Ŝajnas, ke Broniovius estis forte impresata de la tradicia gastamo, kiu havis altan prioritaton ĉe la tataroj, dum certaj ´gastoj´, ekzemple ambasadoroj de Pollando aŭ Ruslando, povis esti malbonŝance traktataj, laŭ la politikaj kaj ekonomiaj interesoj de la reganta ĥano. La simplaj homoj povis komuniki siajn zorgojn kaj problemojn al la ĥano. La sklavoj (el Hungario, Ruslando, Valaĥio, Moldavio) estis utiligataj por la agrikulturo kaj la konstruado de domoj. Ankaŭ grekaj kristanoj estis uzataj por tiaj laboroj, dum multaj tataroj en la urboj mem ne laboris kaj nur malofte okupiĝis pri komerco, ĉar tion faris precipe turkoj, armenoj, judoj kaj ĉerkesoj. La ĥanoj devis esti entretenataj de siaj subuloj, kiuj liveris la nutraĵojn kaj aliajn necesajn rimedojn kaj varojn, ĉar ili mem produktis nenion. Kristanoj, nomataj filistoj aŭ ciganoj, havis la plej malaltan rangon. Ankaŭ la tataroj, kiuj vivis en la stepo, engaĝis sklavojn por sia laboro. La tataroj havis sufiĉe da ĉevaloj, kameloj, bovoj kaj ŝafoj por manĝi ilian viandon. Ili trinkis ankaŭ brandon kaj vinon kaj manĝis panon kompare kun la malriĉuloj, kiuj nutris sin ĉefe per milia kaĉo kun lakto aŭ akvo. Kvankam ankaŭ tiuj sciigoj restis supraĵaj, plej detale Broniovius dediĉis sian raporton al la preparado de la militiroj kaj la praktikoj dum tiuj militoj mem, el kiu la supraj informoj

[62] Mapojn vd. en Vikipedio sub „Grossfürstentum Litauen“.

[63] M. Khodorovsky en Russia´s Steppe Frontier (Bloomington 2002) taksis, ke en la unua duono de la 17a jc la krimeaj tataroj havis 150-200´000 rusajn sklavojn, kiuj valoris po 5 rublojn por persono. Se la rusa ŝtato devintus reaĉeti tiujn homojn, ĝi devintus elspezi inter 750´000 kaj 1 miliono da rubloj.

[64] Broniovius uzis ĉefe la antikvajn aŭ latinajn nomojn de la koncernaj landoj kaj urboj; kvankam la toponimo ´ukraina´ jam estis uzata, Broniovius ne menciis ĝin. (Pri la deveno de la toponimo ´ukraina´ vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ukrainio#La_deveno_kaj_formoj_de_la_nomo (pri la detaloj vd. la ukrainlingvan version).

[65] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Mangup.

estas parte ĉerpitaj. La polan reĝon verŝajne ĉefe interesis la taktiko kaj strategio de la milita medio aŭ arto de la tataroj, al kiu apartenis ankaŭ trompi la kontraŭulon, por povi adekvate reagi al tataraj atakoj. Unu el la taskoj de la litovaj, moskvaj kaj alilandaj diplomatoj estis reaĉeti siajn ´civitanojn´, kiujn trafis malliberecο ĉe la tataroj, kontraŭ pago, pri kiu oni laŭkaze interkonsentis kun la tataroj, aŭ interŝanĝi siajn malliberulojn kontraŭ tataraj kaptitoj. Broniovius finis sian raporton per la klarigo, ke partopreni en militiroj estis por la tataroj granda honoro, kaj ke la ĥano aparte laŭdis kaj honorigis la plej bravajn soldatojn, tiel ke eĉ iliaj parencaj posteuloj povis profiti tiun honoron, kiu estis heredebla.**[66]** La raporto de Broniovius, kiu laŭ la substanco de sia informaro estas multe tro magra kaj mankohava kaj kiu havigas ĉefe negativan imagon pri la krimeaj tataroj, devas esti legata kun singardo, sed kiel arkeologoj emfazis, ĝi havas ankaŭ arkeologian valoron.[67]



Tataroj de Krimeo en tradiciaj kostumoj (19a jc.)

## Sub la protekto de la Otomana Imperio


Kiel konate, en 1453 Konstantinopolo, la ĉefurbo de Bizanco, estis konkerita de la otomanoj, kio signifis grandan katstrofon por la kristana mondo. Sed por la tataroj de Krimeo tio certe estis bona novaĵo. En 1453 ĥano Haĝi Geraj renkontis la komandiston de la otomana floto, Demir Kjaĥej, tra kiu kun la sultano estis subskribita traktato pri amikeco, kiu konsiderinde faciligis la reciprokajn rilatojn de la partneroj kaj la aliron de la otomanoj al Krimeo.

En 1475 la otomanoj invadis sudan Krimeon per granda armeo kaj faligis diversajn fortikaĵojn, kiuj estis defendataj de kristanoj en Kafa, kie ĉefe loĝis krimeaj armenoj. Krom tio, ili rompis la fortikaĵojn de la ĝenovanoj ĉe la Azova Maro kaj orienta flanko de la Nigra Maro kaj atakis la kastelon de la Teodora princlando, tiel ke la otomanoj enkasigis tiujn fortikaĵojn kaj urbojn sen granda kontraŭstaro de la lokaj kristanoj, kiuj libervole submetiĝis al la otomana hegemonio, por eviti militan kaptitecon aŭ perdon de la vivo. Krom Kafo, la turkoj ekposedis la urbojn Mangup, Sudak (gr. Sidagios, ven. Soldaia, ĝen. Sudacum), Ĉufut-Kale (Kirkel) kaj 111 vilaĝojn. La milita sukceso de la otomanoj signifis ankaŭ por la krimeaj tataroj, ke ili estis devigitaj agnoski la hegemonion de la Otomana Imperio, se ili ne volis riski anekson de sia duoninsulo fare de Turkujo. Tiu hegemonio kaj la kun ĝi ligita vasaleco estis agnoskita de la krimeaj ĥanoj en 1478. Estonte, la krimeaj tataroj dependis de la (bon)volo de la sultano, kvankam ili povis konservi relative altgradan aŭtonomecon, ankaŭ sur la kampo de la ekstera politiko. Ekzemple, nomumo de nova ĥano ne povis okazi sen konfirmo flanke de la Alta Pordo,[68] kiu funkciis kiel sucerano[69] rilate al la krimea ĥanlando. La kondiĉoj por la vasaleco[70] estis jenaj: 1e La ĥano reprezentis la plenan povon kun la rajto nomi kaj eksigi oficistojn; 2e La ĥano povis esti nur ano de la tribo Geraj, 3e;

[66] Vd. Albrecht, S. : Die Tartariae descriptio des Martinus Broniovius. Entstehung und Wirkung eines Gesandtenberichts aus dem Krimkhanat. Krimkhanat als Gleichgewichtsfaktor in Osteuropa (17.-18. Jahrhundert). En: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. p. 154. Germana traduko kun la latina teksto estis publikigita en libro aperinta ĉe http://www.schnell-und-steiner.de/artikel_6833.ahtml. Rusan tradukon de Tartariae descriptio (de 1867) vd. sub http://www.vostlit.info/Texts/Dokumenty/Krym/XVI/Bronevskij/frametext.htm.
[67] Vd. la kontribuaĵon de Rainer Schreg en http://www.schnell-und-steiner.de/artikel_6833.ahtml.
[68] Alia nomo por la sidejo de la otomana registaro.
[69] Pri la signifo de tiu termino vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Suzerainty.
[70] Difinon de la vasaleco vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Vasall.

Heredantoj de la trono (kalgoj), same la ĥano mem, devis estis konfirmitaj de la sultano; Kiel plej supera reganto de la krimea jurto la sultano povis devigi la ĥanon kaj ties popolon partopreni en liaj militoj, sed la ĥano mem ne rajtis komenci militon aŭ subskribi pactraktaton; 5e En la funkcio de kalifo la sultano estis konsiderata kiel protektanto de la islamanoj sur Krimeo; li rajtis nomi kaj eksigi superajn ekleziajn funciulojn kaj teni en Gözleve propran armean garnizonon.[71]

En otomanaj historiaj libroj oni povas legi, ke okaze de la konfirmo de la ĥanoj de Krimeo far la Alta Pordo en Istanbulo ili ricevis de la sultano specialan inaŭguran dokumenton kaj specialajn insignojn kiel flagon, plumfaskon, ĉevalo(j)n, klabon, sabron kaj honorajn vestaĵojn. Per la havigo de tiaj valoraj insignoj la sultano montris sian apartan estimon al la ĝingisidoj ĥanoj de Krimeo. Kaj efektive inter la vasaloj de la otomanoj la ĥanoj de Krimeo ĝuis apartajn estimon kaj privilegiojn[72]
Per tio la memstareco de la krimeaj ĥanoj kaj de la krimea ĥanlando finiĝis, kaj la krimea ĥanlando ricevis la statuson de vasala ŝtato de Turkujo, sen fariĝi marioneto de la sultano, kiel la rusa historografio ŝatas aserti, ĉar ke la krimea ĥanlando konservis sian privilegian statuson rilate al la Otomana Imperio. Kiel ajn, la rilato de la krimea ĥano al la sultano estis speciala, kaj komplika.[73] Eble pro tio, kaj malgraŭ la embarasa vasala statuso, la tataroj de Krimeo ne kutimis ribeli kontraŭ la otomanoj sed male, konsideris sin iliaj aliancanoj, kaj la turkoj vidis sin kiel protektantojn kaj klientojn de la krimeaj tataroj. Certe, la tataroj volis esti almenaŭ egalrajte traktataj de la turkoj, sed ili tamen estis rigardataj kiel pli malgranda partnero. Al tiuj pretendataj rajtoj apartenis mem decidi pri la enspezoj el la sklava komerco (de kiu ankaŭ la turkoj volis profiti),[74] mem postuli tributon de Polujo-Litovujo kaj Moskvo, produkti proprajn monetojn kaj mencii en la vendreda preĝo krom la nomo de la sultano ankaŭ la nomon de la ĥano.[75] Kontraŭ la mono, kiun la ĥanoj ricevis el Turkujo, la tataroj liveris al la otomanoj peltojn, buteron kaj salon, da kio ili havis abunde. Ŝajnas, ke tiu sistemo de preskaŭ idealaj reciprokaj rilatoj permesis al la tataroj de Krimeo, kiuj fariĝis malgranda regiona potenco, sufiĉe bone vivi. Tiel, la sultano povis utiligi la tatarojn de Krimeo por konservi sian influon en la nigramara regiono, kaj aliflanke la tataroj ricevis de la turkoj la garantion, ke ili ne estos atakataj de Ruslando.





Otomana Imperio en 1580

[71] Vd. Kozlov, S.Ja. / Ĉiĵova, L.V.: Tjurkskie narody Kryma. Karaimy, Krymskie tatary, Krymčaki. Nauka Moskva 2003, p. 177.
[72] Vd. Papp, S.: Die Inaugurationen der Krimkhane. En: En: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. Ss. 76, 87.
[73] Vd. ankaŭ la kontribuaĵon de Kerstin S. Jobst en http://www.schnell-und-steiner.de/artikel_6833.ahtml, p. 16.
[74] Oni estimas, ke en la 15-17a jc. c. 2,5 milionoj homoj el hodiaŭa Ukrainio estis vendataj sur la sklava merkato de Krimeo. Ankaŭ la ĝenovanoj, kiuj havis koloniojn sur Krimeo, partoprenis en tiu komerco.
[75] Samloke.

**Ruslando fortiĝas kaj rebatas la tatarojn de Krimeo, dum Turkujo perdas sian influon**

La potenco aŭ influo de la ĥanoj de Krimeo, kiuj parte estis aliancanoj (aŭ rivaloj) de la nogajoj, ekster Krimeo mem etendiĝis ĝis la stepoj de suda Ukrainio. En la 16a jarcento, kiam ĝi atingis la kulminon de sia prosperado, la ĥanlando ampleksis ankaŭ la terenon de la nogaja hordo inter Azovo kaj Kubano, plus kelkan parton de la regiono ĉirkaŭ la rivero Don. La militiroj de la tataroj de Krimeo estis entreprenataj en interkonsento kun la otomanoj. Tiel, ĝis la mezo de la 16a jarcento okazis pli ol 50 krime-tataraj militiroj sur la teritorion de Ukrainio, kiu parte estis gardata de la tieaj kozakoj kaj ties hetmanoj kaj atamanoj, kaj kontraŭ la Moskva Regno, kiu estis devigata pagi jaran tributon, same kiel Pollando. Moskvo reagis per plano, kiu devis ĉesigi la atakojn kaj invadojn de la krime-tataroj ĉe la sudaj limoj. Ankaŭ la pol-litova regno, kiu ampleksis vastajn ukrainajn teritoriojn, estis koncernata de la tataraj atakoj, sed ĝi estis armee tro malforta por kontraŭstari la furorajn rajdistojn, kiuj havis kelkdek mil soldatojn je dispono. Post kiam la rusoj konkeris la urbojn Kazano (1552) kaj Azovo (1739 kaj 1774), ili komencis enfokusigi Krimeon, kiu prezentis taŭgan aliron al la Nigra Maro. Ruslando estis definitive interesata ricevi la okcidentajn kaj sudajn najbarajn teritoriojn. En tiu senco en 1654 okazis, sub la fifama kozaka hetmano Bogdan (Bohdan) Ĥmelnickij, la „unuiĝo“ de Ukrainio kun Ruslando en la Traktato de Perejaslav,[76] kio esence ŝanĝis la ekvilibron de la potencoj. En la jaroj 1687 kaj 1689 la moskva princo Vasilij Golicyn lanĉis du militirojn kontraŭ la tataroj de Krimeo, kiuj restis ankoraŭ sensukcesaj. Nur Petro Ia (nomata la Granda), kiu fondis en 1703 Sankt-Peterburgon, kiu fariĝis en 1712 nova ĉefurbo de Ruslando, povis eviti la tatarajn militirojn sur sia teritorio kaj sukcesis rebati la tatarojn de Krimeo mem, kiuj en 1771 estis armee venkitaj. En la fama rus-turka pactraktato de Küĉük Kajnarĝi (turkl.: Küçük Kaynarca, kr.-tat.: Küçük Qaynarğa) de la l0a de julio 1774, kiu devis fini la Rus-Turkan Militon de 1768-1774, la Otomana Imperio devis rezigni pri la ´ukraina´ teritorio (kiu ekde 1764 estis nomata „Nova Ruslando“[77]) kaj agnoski la „ŝtatan sendependecon“ de Krimeo por ne plu povi enmiksiĝi. Ruslando ricevis la rajton libere ´naĝi´ sur la Nigra Maro, kaj Turkujo mem esence malfortiĝis kiel regiona grandpotenco kaj praktike perdis sian influon sur la krimea duoninsulo. Tio signifis, ke la otomanoj ne plu kapablis reale protekti la tatarojn de Krimeo, tiel ke ankaŭ la legendeca povo de la krime-tataroj disfalis kaj ne plu sufiĉis por rezisti kaj sin defendi kontraŭ la pli potenca rusa malamiko. La celo de la Ŝirinaj kaj Barinaj bejoj ne estis formi aliancon kun Ruslando, sed sendependiĝi de la turkoj.

Krimeo devis kompreni, ke komenciĝis la rusa periodo, kiel prologo al ĝia anekso fare de Ruslando en 1783. Tiel, la tataroj de Krimeo fariĝis ne nur senesperaj viktimoj de la ruslanda imperiismo, sed ankaŭ tragikaj atestantoj de ´malgranda´ eŭropa mondmilito, kiu furoris ĉirkaŭ ilia duoninsulo kaj en kiu partoprenis ankaŭ Svedujo, Danlando kaj Prusujo.




Teritorio de la krimea ĥanlando en la tempo de ĝia „sendependeco“ (ĉ. 1774)

[76] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Vertrag_von_Perejaslaw.
[77] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Novorusio.

**Katerina IIa kaj la unua rusa anekso de Krimeo en 1783**

Intertempe, en 1762, ***Katerina IIa*** (nomata la Granda) puĉe akaparis la tronon de Ruslando, kies grandegan ekspansian premon sentis praktike ĉiuj najbaraj popoloj de orienta Eŭropo (oni pensu nur pri la rusa partopreno en la divido de la pol-litova regno aŭ pri la batalado kontraŭ la ukrainaj kozakoj). La ruslanda imperiismo signifis ankaŭ enorman danĝeron por la ekzisto de la krimea ĥanlando mem. La ĥanoj de Krimeo de la 18a jarcento pli kaj pli komprenis sian malfacilan situacion kaj klopodis savi la potencon de sia dinastio per ´pozitiva´ diplomatia rilatado kun la rusoj.

La rusa regado de Katerina IIa (1762-96) kongruis kun la tipo de la absoluta monarkio, kiu konformis al la „klera despotismo"[78] de la tiama tempo. Germanino laŭ deveno, Katerina sentis sin devigata sekvi la principojn de ´racia´, ´tolerema´ kaj ´pragmatisma´ politiko. Tiu politiko celis la ´naturan´, ´logikan´ unuigon de la Imperio, pri kies reguligaj fortoj la tiamaj rusaj politikistoj estis konvinkitaj. Rilate Krimeon, la rusa politiko estis ankaŭ koloniisma, kio inkluzivis la zorgon pri eventualaj danĝeroj, kiuj povus aperi ĉe la novaj periferioj, precipe okcidenta kaj suda, kie vivis kontraŭrusaj popoloj. Finfine, la tataroj de Krimeo signifis por la rusoj tradician malamikon, kiu kaŭzis grandajn problemojn ĉe la sudaj limoj de la imperio. Rusaj politikistoj kaj diplomatoj estis konvinkitaj, ke estus pli bone fopreni Krimeon de la turka sucereneco kaj submeti ĝin sub la kontrolon de Ruslando. Do, la diskuto pri la akaparo kaj anekso de Krimeo estis malfermita.

Inter 1767 kaj 1771 la ĥanlando suferis perturbojn pro la oftaj sinsekvoj de ĥanecoj (Arslan, Maqsud, Qırım, Devlet IVa, Qaplan IIa, Selim IIIa), kio kaŭzis al Krimeo certan politikan malstabilecon. Kiam ĥano Kaplan Geraj, kiu pretis kunlabori kun la rusoj, estis anstataŭigita de la turkoj per alia ĥano (Selim IIIa), kiu estis pli lojala al Istanbulo, la rusoj utiligis la okazon por enmiksiĝi. Sub la komando de Vasilij M. Dolgorukov la rusa armeo invadis Krimeon kaj okupis grandan parton de ĝi tamen sen renkonti kontraŭstaron de la popolo, kiu estis ĉifoje pli milde traktata ol en la tempo de von Münnich. Tiuokaze, Dolgorukov publikigis manifeston en la nomo de Katerina, kiu promesis al Krimeo kaj ties ĥanoj la restarigon de la plena sendependeco, kiu estis perdita en la 15a jarcento dank´ al la turkoj, kiuj submetis la ĥanojn al sia volo. Malgraŭ konstanta premo flanke de gvidaj politikistoj kaj diplomatoj de la regno, Katerina ne urĝis aneksi la duoninsulon kaj dume lasis regadi en Krimeo la anojn de la dinastio Geraj kiel ĥanojn kiel kutime. Tiuokaze eĉ la malnova paradigmo rilate al la tataroj, kiuj estis ĉiam traktataj kiel malamikoj de Ruslando, estis mirakle ŝanĝita: El agresemaj krimuloj la krimeaj tataroj subite fariĝis kompatindaj viktimoj de la turkoj, kiuj estis liberigitaj de la rusoj, kies carino Katerina IIa kvazaŭ prenis ilin sub sian protekton kaj redonacis al ili la ŝtatan sendependecon! Sed jenaj incidentoj tamen rapidigis la antaŭvideblan decidon aneksi Krimeon. Ankoraŭ dum la intertraktoj kun la rusoj en Baĥĉisarajo la rusa ambasadoro estis arestita laŭ ordono de ĥano Sahib IIa Geraj (1771-5). Lia posteulo, ĥano Devlet IVa Geraj (1775-7), eĉ aŭdacis revizii la traktaton de Küĉük Kajnarĝi, sed tamen sen ricevi la apogon de la turkoj, kiuj tiam estis okupataj pri milito kontraŭ Persio.[79] En 1777 Katerina ordonis al sia armeo invadi Krimeon kaj postulis la instalon de Ŝahin Geraj kiel ĥanon,[80] cetere kun la konsento de la nogajoj. Kiel reprezentanto de la klerismo, kio evidente plaĉis al Katerina, Ŝahin celis modernigi la ĥanlandon, sed samtempe komencis agi kontraŭ la turkoj, defendante la interesojn de la rusoj. Paralele, Ruslando komencis loĝigi t.n. "albanojn", kiuj konsistis el slavoj kaj grekoj kaj probable estis rusaj soldatoj, kiuj estis senditaj al Krimeo kun specialaj taskoj. Certe, la tataroj, precipe parto de la Ŝirinaj kaj Barinaj bejoj, ne bonvolis akcepti tiun situacion, ribelis kaj rifuzis Ŝahinon kaj anstataŭe elektis Bahadır IIan Geraj kiel ĥanon. Sed ĉia ribelado estis sensenca kaj rapide subpremata. En 1782 la rusoj ree enoficigis ĥanon Ŝahin, donante al li novan ŝancon reformi sian ŝtaton laŭ rusaj imagoj. En tio la rusoj havis gravan avantaĝon: Ili povis minaci, ke ili aneksos Krimeon, se la interkonsentoj de la traktato ne estas respektataj. Nu, ŝajnas ke Ŝahin agis laŭ sia maniero, ignorante rusajn konsilojn kaj per tio evidente tro streĉis la paciencon de la gvidaj funkciuloj en Sankt Peterburgo. Finfine, grafo kaj feldmarŝalo ***Grigorij Potjomkin*** (1739-91), ĉefa politika kaj privata fidindulo de Katerina,[81] kaj aliaj kiel Aleksandro Bezborodko, influa ŝtata sekretario de

---

[78] Germanlingve „aufgeklärter Absolutismus", ruslingve „просвещённый абсолютизм", Eo-traduko laŭ Vikipedio (https://eo.wikipedia.org/wiki/Klera_despotismo).

[79] En 1773-5 en Ruslando furoris la fifamaj ribeloj de Emel´jan Pugaĉëv. Rimarko: Povas esti, ke en ĉi tiu ĉapitro kelkaj bazaj historiaj eventoj estas ripete menciitaj, tamen ĉiufoje en iom alia kunteksto.

[80] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Şahin_Giray.

[81] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Grigorij_Potjomkin.

la administracio en Sankt Peterburgo,[82] kiuj estis la esencaj motoroj de la akaparo de Krimeo, sukcesis konvinki la carinon efektivigi la anekson de Krimeo. Tio finfine okazis la 8an de aprilo 1783 per oficiala manifesto de la ruslanda imperiestrino, en kiu estis klarigitaj ankaŭ la cirkonstancoj, motivoj kaj pravigo de la anekso.[83] Potjomkin, kiu respondecis pri la regulado de la aferoj en „Nova Ruslando", eĉ vidis la akiron de Krimeo en la kunteksto de la ĝenerala ekspansia politiko de la eŭropaj kaj mondaj grandpotencoj. Potjomkin notis, ke la carino estis *devigita* aneksi Krimeon, ĉar aliaj grandpotencoj faris la samon kun aliaj landoj, ekzemple Francio kun Korsiko, Aŭstrujo kun Bukovino, ktp. Krom tio li avertis, ke ĉiuj ŝtatoj klopodas dispartigi inter si Azion, Afrikon kaj Amerikon. Do, la akaparo de Krimeo devas esti vidata kaj komprenata ankaŭ en la kadro de la ĝenerala kolonizado de tiu epoko. Ajna kritiko kontraŭ la rusa projekto de la akaparo de Krimeo estis rifuzata kaj kontraŭbatalata.

Nature, de la krimeaj tataroj Ŝahin Geraj estis konsiderata kiel perfidulo, sed kelkaj historiistoj tamen vidis lin kiel solan alternativon al la rekta rusa regado. Oni emfazis lian utilan kunlaboron kun Katerina IIa kaj akcentis lian okcidentan klerisman edukadon. Sed la ŝajn-memstara ĥanlando, kiel ĝi ekzistis inter 1774 kaj 1783, estis konsiderata kiel nenormala afero kaj ĝia enkadrigo en la rusan imperion kiel tragika sed logika, neevitebla sekvo.[84] Kvankam la plej lasta ĥano Ŝahin Geraj celis reformi la tataran ŝtaton laŭ rusaj imagoj - tiu intenco rikoltis la kontraŭstaron de certaj bejoj kaj murzoj - li ne plu povis malebligi la pereon de la ĥanlando, ĉar la politika konstelacio funde ŝanĝiĝis. Ŝahino estis devigita abdiki kaj veturis al Sankt-Peterburgo, kie li estis arestita kaj ne rajtis forlasi sian loĝejon.[85]

Kompreneble, la Otomana Imperio ne agnoskis la rusan anekson de Krimeo. La sultano nomis alian reganton, unue *Şahbaz (Ŝaĥbaz) Geraj* (1787-89),[86] kiu estis la tria filo de ĥano Arslan Geraj, kiel ĥanon de Krimeo. Post lia eksigo nova ĥano fariĝis *Baĥt Geraj* (1789-92), plej aĝo filo de Qırım (Kerim) Ia Geraj. Ambaŭ ĥanoj rezidis en Budĵak en suda Besarabio,[87] kie troviĝis ilia fortikaĵo. En 1792, post la fino de la rus-turka milito kaj la pactraktato de Jassy, la otomanoj finfine agnoskis la rusan hegemonion super Krimeo, kaj Budĵak, kiu troviĝas en suda Besarabio, same estos aligita al Ruslando kaj perdos memstarecon. Baĥt Geraj estis vokita al Istanbulo, kie li abdikis kaj estis sendita al Kreto, de kie li poste migris al Turkujo.[88]

Fakte, en Ruslando la rusa politika elito evitas paroli pri „anekso", „konkero" (zavoevanie), „submetado" (pokorenie") aŭ „koloniigo" (aŭ „kolonizado). Anstataŭ tio oni uzas terminojn kiel „reunuiĝo" (vossoedinenie), „aliĝo" (prisoedinenie) aŭ „akiro" (priobretenie). La rusoj preferas vidi la tutan procezon de la „kolonizado", „konkerado" ktp. pozitive: por ili temis pri „civilizado" de „sovaĝaj" triboj por povi alporti al ili la progreson de la moderna (rusa) civilizacio, sendube kiel parto de la eŭropa civilizacio. Ĉi tiu ideo estis klare esprimita en la cirkulero de Gorĉakov de la jaro 1864, en kiu la tiama ministro pri eksteraj aferoj konsideris tiun politikon kiel „devon de civilizitaj ŝtatoj", kaj Ruslando estis nepre konsiderata kiel tia, dum la tataroj estis pentritaj en plej malhelaj koloroj kiel primitiva, sovaĝa, antaŭmoderna tribo. Ankaŭ la rusa historiisto Vasilij Kljuĉevskij (1841-1911) atribuis al la faktoro de la kolonizado en la rusa historio kvazaŭ-naturan kvaliton. Precipe la ekzemplo de Krimeo ŝajnis konfirmi tion por longa tempo. Krom tio, ĉi tiu cara akiraĵo vekis la impreson, kaj konvinkon, ke en la kazo de Krimeo temas pri „origine rusa" teritorio, do ĝia akiro, anekso estis deklarita kiel natura afero, precipe lige kun la sekurigo de la landlimoj. La fakto, ke tamen temas pri klasika koloniisma ago, estis prisilentita en la rusa, kaj posta sovetia historiografio, kiu neis, ke Krimeo estis traktita kiel rusa kolonio. Oni simple konsideris la duoninsulon rusa tero ekde la antikva tempo, kaj klarigis, ke la anekso aŭ reunuiĝo de Krimeo restarigis la naturajn rajtojn de la rusa popolo, al kiu tiu duoninsulo apartenas. La rusa historiografio estas fifama pro la kaprica reinterpretado kaj spontana reviziado de la historio kaj ŝanĝado de validaj historiaj paradigmoj, fakte ĝis hodiaŭ, kio faras la prihistorian diskuton kun rusoj tiel malfacila.

---

[82] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Andrejewitsch_Besborodko.

[83] La manifesto de Katerina IIa de 1783 estis titolita per „o prinjatii Krymskago poluostrova (…) pod deržavu Rossijskuju" (kio signifas: „akcepto en la sinon de la Ruslanda ŝtato", kaj la tiama rusa formulo por „aneksi" estis „vzjat´ pod deržavu Našu". (La originalan rusan tekston de la manifesto vd. sub http://sevkrimrus.narod.ru/ZAKON/manifest.htm).

[84] Vd. Jobst, Kerstin S.: Die Perle des Imperiums. Der russische Krim-Diskurs im Zarenreich. Konstanz 2007.

[85] Laŭ propra deziro, Ŝahin Giray povis translokiĝi al Edirne, kie li jam pasigis sian infanaĝon. Sed ĉar la turkoj suspektis, ke li povus uzurpi la regadon en Turkujo, li estis transportita al Konstantinopolo kaj poste ekzilita al Rodoso (laŭ PIV: Rodiso), kie li estis mortigita.

[86] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Шахбаз_Герай.

[87] Rumanlingve: Bugeac.

[88] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Бахт-Гирей_I.

Kiel iu posteulo de la Geraj-dinastio poste provis klarigi la tiamajn eventojn, la rusa anekso de Krimeo ne havis etnajn aŭ naciismajn motivojn, sed rezultiĝis pro la ruza ludo inter rusaj kaj turkaj diplomatoj, pro la internaj kvereloj ĉe la krimeaj tataroj, pro la malfortiĝo de la Otomana Imperio kiel regiona grandpotenco kaj pro la perdo de suda Ukrainio, kie la kozakoj forfalis kiel aliancanoj kaj limgardistoj. Certe, la rusoj de longe komprenis la geostrategian signifon de la krimea duoninsulo, ĉar kiu posedas Krimeon, tiu povas regi la Nigran Maron. Katerina IIa ŝajnis senti sin kiel en fabelo el ´1001 noktoj´, en kiu oni ne scias, ĉu oni maldormas aŭ sonĝas. Al tiu fabelo apartenis ankaŭ la beleco kaj ekzoteco de la krimea duonsinulo, pri kiu la rusoj en la regno revis sed mem sciis malmulte kaj kiun ili unue devis malkovri kiel ´perlon de la imperio´, same kiel aliajn regionojn en Kaŭkazo kaj Siberio, kiujn ili konkeris. Tiel, Krimeo, kiu fariĝos nepre admirata terpeco de la tuta homaro, ricevis plurajn gravajn signifojn por Ruslando: mitologian, geostrategian-armean, politikan, ekonomian, kulturan-turisman. En tio la historio de la krimeaj tataroj, kiu estas integra parto de la historio de Krimeo dum preskaŭ 350 jaroj, kaj kiu estas konsiderata de la rusoj kiel nigra makulo, estas nepre ekskludita el la patriotisma rusa percepto de Krimeo kiel ´origine´ rusa/slava tero.[89]



Imperiestroj de Ruslando Petro Ia la Granda, Katerina IIa la Granda kaj Grigorij Potjomkin, lakeo kaj amato de Katerina; Rusaj militistoj Burkhard Christoph Graf von Münnich (Minich), Vasilij Miĥajloviĉ Dolgorukov, O.A. Igel´ström.

## Karakterizo de la rusa regado de Krimeo post la anekso

Plenumi la decidojn de la cara aneksa manifesto devis barono O.A. Igel´ström.[90] Krom zorgi pri tio, ke la tataroj ne transiru al la rusa armeo kaj ke rusaj oficiroj ne vizitu tatarajn haremojn, li devis fari ampleksan analizon de la administra, jura kaj kultura strukturoj de la ĥanlando, kiu devis esti integrata en la strukturojn de la rusa imperio. Aperis multaj praktikaj problemoj, ĉar la rusoj renkontis Krimeon kiel ´terra incognita´, kio malfaciligis efikan administradon kaj rapidan sukcesan integradon. Ne nur la karaktero de la heredataj tataraj socio kaj agrikulturo estis fremda por la rusoj, sed eĉ la geografio, topografio kaj klimato estis ne sufiĉe konataj al ili. Eĉ sufiĉa karta materialo ne ekzistis kaj devis unue estis akirata aŭ produktata, kaj informoj pri tataraj kaj kristanaj vilaĝoj kaj preĝejoj unue devis esti kolektataj. En tio kunlaboris tataroj mem. La situacio sur la duoninsulo estis malfacila, des pli ke la lando estis vaste detruata post multaj militoj kaj forlasita de amaso de homoj, verŝajne temis pri duono de la loĝantaro, kiu ne plu ekzistis. Al tio apartenis la fakto, ke laŭ la deziro de Ruslando en la 1770aj jaroj multaj kristanoj, ĉefe grekparolantaj, forlasis la duoninsulon. Post la anekso de Krimeo okazis ankaŭ drasta elmigrado de tataroj, kiu ripetiĝis en postaj jaroj kaj jardekoj, precipe ankaŭ lige kun nesolvitaj problemoj de la termezurado.

En administra rilato la iama ĥanlando ricevis post la anekso novan ordon. En 1783 estis instalita „Krimea regiona registaro“, kiu estis estrata de *Ŝirin bej Mehmetŝa*, kiu ricevis la rangon de guberniestro (namestnik). Kiel rezidejo de tiu egistaro estis decidita la urbo Qarasuvbazar (r. Belogorsk, ukr. Bilohirsk).

La 8an de februaro 1784 Katerina IIa sendis sian favorulon Grigorij Potjomkin al Krimeo kun la tasko starigi *Taŭridan distrikton* (oblast´) kaj realigi la administrajn unuojn laŭ rusa ŝtata modelo kun la

[89] Vd. Die Perle des Imperiums. Der russische Krim-Diskurs im Zarenreich. Konstanz 2007.
[90] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Iosif_Igelström.

instalado de la respektivaj juraj instancoj. Potjomkin praktike fariĝis sola nova potenca ĝenerala estro de Krimeo, de la insulo Tamano kaj de la regiono de Kubano kaj de multaj aliaj regionoj.[91]

La mankon de tataroj en tiu nova administra sistemo oni klarigis per tio, ke la tataroj ne scipovas la rusan lingvon, nek konas la rusajn leĝojn, laŭ kiuj la duoninsulo estis rekonstruata kaj kiuj perfortis la tatarojn, kiuj ĝis nun vivis laŭ aliaj politikaj, juraj kaj kulturaj tradicioj kaj kutimoj, kaj kiuj ne estis demanditaj de la rusoj pri siaj deziroj kaj preferoj. Nu, estas konate, ke Potjomkin revis pri Krimeo sen tataroj, kaj lia malica, genocidema revo certe kontribuis al la forpuŝado de la tataroj de Krimeo. Tiel, post nova rus-turka milito, kiu komenciĝis en 1787, ĉirkaŭ 30 mil tataroj, kiuj konkludis, ke jam ne plu eblos restarigi islaman reĝimon, forlasis Krimeon kaj translokiĝis al Turkujo. Dum la akiro de Krimeo havis por la rusoj sendube grandan militan kaj geostrategian signifon, kiu esprimiĝis ankaŭ en la fondo de la havenurbo Sebastopolo (anstataŭ la tatara Aqyar, Акъяр) jam en 1783 nur kelkajn semajnojn post la formala anekso de Krimeo, por la tataroj de Krimeo la anekso de la duoninsulo signifis la enkadrigon de la strukturoj de la iama ĥanlando en la administracion de la Ruslanda Imperio, do la perdon de sia memstareco, sendependeco kaj suvereneco.

En 1787, okaze de la 25a datreveno de sia surtroniĝo, Katerina IIa persone vojaĝis al „Nova Ruslando" kaj Krimeo por inspekti la verkon de Potjomkin kaj montri al la reprezentantoj de la eŭropaj monarkioj la novan „helenan" heredaĵon, kiun la carino propagandis kadre de sia vizio de la „greka projekto", kiu enhavis ankaŭ la planon likvidi la Otomanan Imperion por restaŭri la Bizancan Regnon, kiu pereis en 1453, kiam Konstantinopolo estis konkerita de la turkoj. Sed pri tiu tro ambicia plano la carino devis rezigni, inter alie ĉar la aliaj eŭropaj grandpotencoj ne estis interesataj pri ĝi kaj havis aliajn prioritatojn kaj problemojn por solvi ol helpi al la rusoj restarigi la Orientromian Regnon. La konkero, anekso kaj submetado de Krimeo al Ruslando devis esti alimaniere pravigita de la rusoj ol per la nebula „greka projekto".[92] Post la anekso de Krimeo, kiu okazis en mirinda jaro, kiam milito inter Ruslando kaj Turkujo hazarde ne okazis,[93] en Ruslando ´pragmataj´ konsideroj fariĝis pli signifaj kaj aktualaj anstataŭ la vana vizio de la carino pri la trono de Bizanco. Necesis strategie sekurigi la novan akiraĵon, kio inkluzivis la daŭran provizadon de la loĝantoj kaj soldatoj, kio estis malfacila tasko, ĉar mankis moderna trafika infrastrukturo, regulaj epidemioj malhelpis la laboron kaj mankis taŭgaj laborfortoj. Tataraj militistoj nun eĉ povis esti (mis)uzataj por la batalo kontraŭ la turkaj muzulmanaj fratoj dum la rus-turka milito de 1787-92.

Katerina ekvojaĝis en januaro 1787 de Sankt-Peterburgo tra Velikie Luki, Smolensk, Novgorod-Severskij kaj Ĉernigov al Kievo, kie oni devis atendi tri monatojn ĝis la glacio sur la rivero Dnepro degelis. Tie aperis pompa floto de sep luksaj ŝipoj en romia stilo, kiujn Potjomkin speciale fabrikigis, kun 3000 helpantoj, kiuj postveturis tiun floton en 80 pli malgrandaj ŝipoj. Post Kievo oni haltis en Ekaterinoslav (kiu same estis konstruita de Potjomkin). En Ĥerson oni renkontis Jozefo IIan (kiu aperis inkognite kiel „Grafo de Falkenstein"), la imperiestron de la Sankta Romia Imperio,[94] kiu akeptis la inviton de Katerina, ĉar li volis persone konatiĝi kun la situacio surloke. Tra la herba stepo (kiun oni celis kaŝi al la carino per starigo de dekoraciaj ŝajn-konstruaĵoj, kiuj konsistis el nuraj fasadoj kaj eĉ ne portis tegmentojn[95]), Katerina kaj Jozefo veturis per trajno ĝis Perekop, kie oni trapasis la linion al la krimea duoninsulo. La vojaĝantoj estis honore ´akceptitaj´ de 1200 tataroj en plena armea garnituro, speciala gvardio el tataraj murzoj formis la personan eskorton de Katerina kaj dek du junaj tataroj servis al si kiel paĝioj. Post ripozaj restadoj en diversaj tataraj vilaĝoj, la 20an de majo Katerina atingis la iaman rezidejon de la krimeaj ĥanoj, Baĥĉisarajo. Survoje ŝia kaleŝo preskaŭ akcidentigis en dekliva punkto inter rokoj, kie la ĉevaloj iris tro rapide, sed la atentemaj tataraj akompanantoj kapablis savi la situacion kaj evitis falon de la vagono. Katerina loĝis en la ĉambroj de la ĥano, al kiuj apartenis la belega aŭdienca salono de la Gerajanoj. Jozefo ricevis ĉambron, kiu estis elektita de frato de la ĥano. Potjomkin preferis loĝi en la haremo. Katerina estis ravita pro la bona odorado kaj lumigado de la ĉirkaŭaĵo, kiun Potjomkin, kiu

[91] Lian plenan titolaron vd. en la ruslingva versio de Vikipedio pri Potjomkin.

[92] Al kiu apartenis la refondo de iamaj krime-tataraj urboj kiel novaj rusaj urboj kaj la grekigo de iliaj nomoj (ekzemple Ĥerson, Simferopol´, Evpatorija, Mariupol´, Melitopol´, Nikopol´, Stavropol´, Tiraspol´, Odeso).

[93] Entute okazis 11 militoj inter Ruslando kaj Turkujo (liston vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/History_of_the_Russo-Turkish_wars).

[94] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Jozefo_la_2-a_(Sankta_Romia_Imperio).

[95] Tiuj konstruaĵoj fariĝis poste konataj kiel „Potjomkinaj vilaĝoj". Ŝajnas, ke tiu legendo naskiĝis pro ĵaluzo kaj envio flanke de la kontraŭuloj de Potjomkin.

perfekte organizis la tutan vojaĝon, speciala aranĝis. Okaze de la manĝoj la carino akceptis la lokajn muftiojn kun granda respekto. La muezino vokis la kredantojn de la loka loĝantaro al preĝado, kaj la carino donacis du moskeojn al la muzulmana komunumo. La vizitprogramo devis esti ege interesa: Dum la tri ĉefdiplomatoj Nassau, Ségur kaj Ligne detale inspektis la urbon Baĥĉisarajo kaj esperis vidi tatarajn virinojn, Potjomkin restis en la haremo por spekti prezenton de ´arabaj dancistinoj´, dum Jozefo vizitis la lokon Ĉufut-Kale (Kirkel), kie vivis la malgranda sekto de la judaj karaimoj, kiuj rifuzis kredi la talmudon.[96] Post tranoktado en Baĥĉisarajo, la vojaĝantoj daŭrigis sian ´inspektan vojaĝon´ kaj alvenis en Inkermano, kie Potjomkin speciale mendis konstrui belegan kastelon, de kiu la gastoj havis mirindan rigardon al la Golfo de Aĥtiar de la Nigra Maro, kie ili surprize ekvidis kvardek novajn militŝipojn, kiujn Potomkin same ordonis fabriki. Jozefo, kiu restis skeptikema kaj kritikema dum la tuta vojaĝo, ĉar li malfidis la rusan ´propagandon´, estis ŝokita, kiam li vidis tiun modernan ŝiparon, kiu formis parton de la nova floto de Sebastopolo. Ĉi tiu haveno estis konstruita antaŭ tri jaroj, kaj Potjomkin sukcesis starigi la tutan floton en daŭro de du jaroj, kio estis apenaŭ kredebla. Orkestro ludis, la kanonoj de la floto pafis bonvenigan saluton kaj en la montaro tataraj rajdistoj prezentis ŝajn-batalan spektaklon. Per la impresaj instrumentoj de sia nova militpotenco la rusoj volis ankaŭ montri, ke ene de 30 horoj ili kapablus okupi Istanbulon. En Sebastopolo ambaŭ imperiestroj efektive diskutis pri milito kontraŭ la otomanoj. Sed ankaŭ la turkoj pretis militi. Katerina leviĝis por fari patosan alparoladon kun flataj vortoj al la adreso de Jozefo, kiu devis havi embarasajn sentojn de admiro, ĵaluzo kaj envio pri la rusaj sukcesoj en la suda periferio, kiuj kvazaŭ estis la ripeto de la siatempa sensacio en la nordo sub Petro la Granda, kiu ordonis konstrui Sankt-Peterburgon. Potjomkin, kiu ricevis la titolon de "Princo de Taŭrido", estis festata kiel heroo. Post tio la carino estis kondukita al la marbordo, kie ŝi eniris malgrandan ŝipon por veturi al la proksima Sebastopolo mem, kie staris la nova floto. Denove kanonoj pafis por bonvenigi ŝin, kaj la matrosoj ĝoje kriis. Sur ŝtona ŝtuparo la gastoj paŝis al la Admiralejo, kie Katerina rezidis. Dum Katerina mem laŭdis la sukcesan koloniigan projekton de sia princa feldmarŝalo, kiu el dezerto faris prosperan pejzaĝon, Jozefo nomis Sebastopolon plej bela haveno, kiun li iam ajn vidis. Cent kvindek ŝipoj tie estis parkitaj ne kiel ekspoziciaj objektoj, sed kiel maŝinoj pretaj por militi. Krom ŝipriparejoj kaj kanonaj baterioj, kiuj estis instalitaj por protekti la havenon, estis videblaj ankaŭ vendejoj, du malsanulejoj kaj unu kazerno, preĝejoj kaj lernejoj. Jozefo, kiu klopodis resti sobra, estis profunde impresata pri la verko de Potjomkin, en kiu li povis trovi neniun mankon. Tamen ŝajnas, ke Jozefo havis malbonan opinion pri la karaktero de Katerina, kiu ne emis akcepti bonintencajn avertojn kaj nur atendis taŭgan momenton por ekmiliti kontraŭ Turkujo. Poste, la gastoj, kiuj devis esti konvinkitaj pri la historia valoro de tiu suda regiono, ankoraŭ vizitis la ruinojn de la antikva urbo Ĥersoneso. Tra Simferopolo,[97] Karasuvbazar (Belogorsk), Sudak, Staryj Krym kaj Feodosija (iama Kafo), kie okazis diversaj eventoj kaj aranĝoj lige kun la vizito de la carino, Katerina forlasis Krimeon post 12 tagoj tra Babasan, Uŝun kaj Perekop, de kie ŝi daŭrigis sian longan vojaĝon tra Mariupol´, Taganrog, Azov, Kursk, Tula, Moskvo, Novgorod por reveni al Sankt-Peterburgo.[98] Cetere, ĉiujn dek verstojn inter Ĥerson kaj Simferopol Potjomkin ordonis starigi malgrandan monumenton el ŝtono kun surskribo en rusa kaj turka lingvoj, kiu devis memorigi pri la veturo de la carino en Taŭrido.[99] Post Katerina ĉiuj imperiestoj de Ruslando vizitis Krimeon.

En 1797 caro Paŭlo Ia konfirmis novan sistemon de la teritoria administrado de Krimeo. Tiel, *Novrusia gubernio* estis fondita, al kiu apartenis ankaŭ la eksa Taŭrida distrikto (Krimeo). La nova gubernio estis divita laŭ ujezdoj,[100] la nomo de Krimeo malaperis. Ĉefurbo farigis Ekaterinoslav.[101]

Laŭ dekreto de imperiestro Aleksandro Ia en 1803 estis formita nova *Taŭrida Gubernio.*[102] La sporada administra reorganizado de la lando, kiu ankaŭ sekvigis konstante novajn responsajn funkciulojn,

---

[96] Pri la loko vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĉufutkaleo.

[97] Laŭ dekreto de Katerina IIa la urbo Simferopolo estis nove fondita en februaro 1784 anstataŭ la tatara Aqmescit aŭ Ak-Meĉet.

[98] Pli da detaloj vd. sub http://krymology.info/index.php/Путешествие_Екатерины_II_в_Крым. La plej detalan priskribon pri la vojaĝo de Katerina al Taurido probable liveris A.G. Brikner (Brückner) en Istorija Ekateriny Vtoroj (1883/5, kiu aperis en germana kaj rusa lingvoj). Resuman priskribon de tiu vojaĝo oni trovas ankaŭ ĉe: Montefiore, S.S.: Katharina die Grosse und Fürst Potemkin. Eine kaiserliche Affäre. Frankfurt/M. 2009, ĉap. Kleopatra.


[99] Kvin tiaj monumentoj estas konservitaj. Unu el ili troviĝas sur la teritorio de la hana palaco en Bahcisarajo.

[100] Signifon vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ujezdo.

[101] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Novorossiya_Governorate. Ĉi tiu urbo nuntempe nomiĝas Dnepropetrovsk.

[102] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Gouvernement_Taurien. Laŭ la censo de 1897 la Taŭrida Gubernio havis 1´447´790 loĝantojn, el tiuj estis 611´121 ukrainoj, 404´463 rusoj, 196´854 tataroj, 78´305 germanoj, 55´418 judoj kaj 10´112 poloj. Laŭ religioj: 74% ortodoksoj, 13% islamanoj, 4,8% protestantoj, 4,6% judoj kaj 2% romkatolikoj.

kiuj devis solvi la multfacetajn problemojn, havis gravajn kaj precipe negativajn sekvojn por la (iamaj) tataraj terposedantoj, inter kiuj nature troviĝis multaj bejoj kaj murzoj, kies terenoj estis remezuritaj kaj konsiderinde limigitaj. Dum unu parto de la iama parcelo transiris al ŝtata posedo, alian ricevis la nova posedanto. Ekzemple Ŝirin bej Meĥmetŝa ricevis tutan valon.[103] Okazis longdaŭraj kvereloj kun la rezulto, ke kelkaj klanoj povis konservi sian posedon, dum aliaj perdis ĝin. La rusa sistemo konis jenan trukon: Oni konfiskis la posedaĵon de tataraj terposedantoj, tiel ke al la tataroj mankis dokumentoj, per kiuj ili povus repostuli sian posedaĵon. Per tiu administra politiko oni intence kreis kontraŭdirojn kaj kverelojn inter la koncernataj personoj kaj grupoj, ĉar tia cinika politiko de ´divide et impera´ montriĝis por la rusoj pli kaj pli sukcesa.







Taŭrida Gubernio kaj „Nova Rusio“
(https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/4/41/Gubernia_de_Tavria_-_Imperio_ruso.png, https://en.wikipedia.org/wiki/Novorossiya, https://ru.wikipedia.org/wiki/Таврическая_губерния)






[103] Pli detale pri tio vd. ce Kozlov/Ĉiĵova 2003, p. 185s.

**La tataroj de Krimeo en la 19a jarcento**

En la 1770-aj jaroj la Krimea ĥanlando havis ĉ. 500´000 loĝantojn, de kiuj 92 % estis tataroj. Post la anekso de Krimeo en 1783 fare de Ruslando okazis, kiel aludite, amasa elmigrado de tataroj de Krimeo en Turkujon, Rumanujn, Bulgarujon (kiuj apartenis al Turkujo) sed ankaŭ en Usonon kaj Germanujon, kvankam la rusoj faris en sia aneksa manifesto „sanktajn" promesojn al la tataroj, ke oni traktos ilin bone kaj respektos iliajn rajtojn kaj privilegiojn, por gajni ilian favoron kaj por eviti ribelojn. Sed la krimeaj tataroj, kiuj anstataŭ bona traktado perdis sian politikan kaj ekonomian potencon, ne povis fidi tiujn promesojn. La elmigrado okazis en pluraj ondoj depende de gravaj politikaj okazaĵoj, ekzemple post la Traktato de Jassy (1792), lige kun la Rus-Turka Milito de 1807-11 kaj precipe post la granda Krimea Milito de 1853-56 (nomata de la rusoj Orienta Milito), dum kiu la tataroj de Krimeo estis kulpigitaj de Ruslando esti agentoj de la Otomana Imperio! Tiel, inter 1783 kaj 1860 duono de tataroj de Krimeo forlasis la duoninsulon.[104] Sekve, en la dua duono de la 19a jarcento la nombro de tataroj de Krimeo procente esence reduktiĝis: Dum en la momento de la rusa anekso la tataroj de Krimeo konsistigis ankoraŭ pli ol 80 procentojn de la loĝantaro de Krimeo, ĝis la fino de la 19a jarceto ĝia parto falis al 34 procentoj. Tiu demografia procezo, kiu estis intencata kaj akcelata de la rusaj aŭtoritatoj, samtempe favoris la sisteman loĝigon de slavoj kaj aliaj etnoj. La krimeaj tataroj estis puŝataj al regionoj interne de Krimeo, kies tereno estis malpli fruktodona. La nogajoj estis lerte interrivaligataj kun la tataraj elitoj de la iama ĥanlando, tiel ke la nogajoj formigris al la kubana regiono kaj liberigis la stepon en norda Krimeo, kiu povis esti replenigata per ukrainoj kaj rusoj. La grekoj kaj armenoj, kiuj formis integran parton de la krimea civilizo, forlasis Krimeon jam pli frue kaj trovis novan loĝlokon norde de la Azova Maro, kie ili fondis novajn koloniojn (ekzemple la urbon Mariupolo). Tiel, en la dua duono de la 19a jarcento la tataroj de Krimeo, iama ĉefmalamiko de la rusoj ĉe la suda perioferio, restis nur malgranda etna minoritato sur la duoninsulo, kiu perdis grandparton de sia iama tereno kaj fariĝis subuloj de la rusa caro sen ajna influo aŭ granda signifo.[105]

Lige kun la reloĝigo de Krimeo la rusoj ankaŭ diskutis pri definitiva forpelado de la tataroj, ĉar la rusoj ĉiam kredis, ke Krimeo estus pli bona, pli sekura kaj pli utila, se ĝi estus libera de tataroj. Koncerne la restaĵojn de la tataroj, kiuj ne forlasis Krimeon, la rusa politiko celis ilian pli malpli perfortan aŭ naturan integradon kaj asimiladon en la ruslandan socion, simile kiel en la kazo de la ruslandaj judoj kaj aliaj etnoj. Al tio apartenis ankaŭ ortodoksaj baptoj. Malgraŭ provoj integri la tatarojn en la rusan socion, certaj tavoloj de la krimeaj tataroj restis en si mem tamen sufiĉe fermitaj kaj estis malfacile integreblaj aŭ asimileblaj, kvankam iuj partoj de iliaj elitoj povis esti pli facile kooptitaj aŭ absorbitaj de la carisma potenco, des pli ke tatara rezisto kontraŭ tiu potenco grandparte forestis. Precipe la muzulmanaj kamparanoj praktike ne estis asimileblaj laŭ burokrata aŭ perforta maniero. Kvankam la servuteco ne estis aplikata al la tataraj kamparanoj, ilia situacio tamen malboniĝis, ĉar la novaj mastroj klopodis limigi iliajn rajtojn, kun la sekvo, ke multaj kamparanoj forlasis Krimeon. En decembro 1831 la krime-tatara muzulmana organizaĵo ricevis la statuson de ŝtata ruslanda institucio. Laŭ dekreto de la reganta imperiestro Nikolao Ia estis permesite al la krime-tataraj muzulmanoj, ke la organizita taŭrida islama eklezia registaro havas la laŭleĝan rajton mem decidi siajn internajn problemojn, kiuj koncernas religiajn aferojn (ekzemple repondecon pri moskeoj kaj koranaj lernejoj kaj vakufaj terenoj), la islaman juron (ekzemple impostojn, diservon) kaj la formojn de la vivo (ekzemple naskiĝojn, geedziĝojn, mortojn kaj edukadon de infanoj). Kvankam la tataran gimnazion de Simferopolo finis nur malmultaj lernantoj, la islama edukado tamen ne ĉesis funkciadi. Per tiaj liberecoj la islama vivo de la krimeaj-tataroj revigliĝis, tiel ke en la jaro 1910 oni nombris pli ol 1500 religiajn servistojn.[106] Sed la celoj de la tatara integriĝo ne estis vere atingitaj fakte ĝis la fino de la carisma tempo, kvankam parto de la tatara socio intertempe ja rusiĝis.

---

[104] Laŭ T. Lopuchina en la periodo ĝis 1850 la loĝantaro kreskis de 137´000 al 242´000 homoj. Ĉar post la Krimea Milito, t.e. en la 1850-60aj jaroj, multegaj tataroj de Krimeo forlasis la duoninsulon, nome ĉ. 200´000 tataroj, de unu miliono da loĝantoj tie restis en 1885 ankoraŭ unu centmilo da tataroj. (http://www.archipelag.ru/authors/lopuhina/?library=1152). Kaj la Granda Sovetia Enciklopedio, vol. 35, en artikolo pri la Krimea ASSR enhavas la informon, ke inter 1860 kaj 1862 231´177 tataroj forlasis Krimeon. (Vd. Conquest, R.: Stalins Völkermord, 1970, p. 60).

[105] Vd. Kappeler, Andreas: Russland als Vielvölkerreich: Entstehung - Geschichte - Zerfall. 2008. p. 48-50.

[106] Vd. Kozlov/Ĉiĵova 2003, p. 187, laŭ Fisher 1978, p. 97s.

Malgraŭ la ekzisto de tiaj problemoj, la tiama enkadrigo de Krimeo en la strukturojn de la ruslanda administracio montriĝis por la rusoj sukcesa kaj utila entrepreno, ĉar ili povis konsideri la ĉefajn celojn atingitaj: la duoninsulo fariĝis pli kaj pli ruseca kaj perdis sian tataran karakteron.[107]

Ĉar la Krimea Milito, kiu okazis inter 1853 kaj 1856 inter Ruslando kaj la Otomana Imperio, estis la plej signifa milita konflikto en Eŭropo inter la Napoleonaj Militoj (ĝis 1815) kaj la Unua Mondmilito (1914-18), estas adekvate diri kelkajn frazojn pri ĝi ĉi tie kiel grava epizodo de la historo de Krimeo. Tiu milito, en kiu rekte partoprenis ankaŭ Francujo, Britio kaj la Sardina Reĝlando, kiuj helpis al la turkoj, esence malfortigis Ruslandon, dum Francujo povis regajni sian statuson kiel grandpotenco. En septembro 1854 britoj kaj francoj atingis la golfon de Evpatorio norde de Sebastopolo kaj invadis la duoninsulon, kie ĉe la rivero Alma ili renkontis la rusojn, kiujn ili venkis en batalo. En oktobro la okcidentaj aliancanoj daŭrigis sian militiron per ĉirkaŭado de Sebastopolo, kiun ili sieĝis, dum la rusa generalo Eduard Totleben rapide konstruis grandan fortikaĵon, kiun li eĉ sukcesis defendi. La ĉefkomandistoj de la francoj kaj angloj perdis la vivon pro ĥolero. Provo de la rusoj ĉesigi la sieĝon de Sebastopolo kondukis en oktobro 1854 al la Batalo de Balaklavo, ĉar dum la sieĝo de Sebastopolo la britoj starigis sian bazon en tiu havenurbo. La rusoj povis detrui parton de la brita armeo, sed la sieĝo de Sebastopolo tamen ne povis esti finita. La milito kulminis en la Batalo de Inkermano, en kiu kaj rusoj kaj britoj perdis multajn soldatojn (ne temas pri miloj sed pri centoj). En majo 1855 sur Krimeo troviĝis 35´000 britaj kaj 100´000 francaj soldatoj kune kun 14´000 italoj el Sardinio. Post unujara sieĝado de Sebastopolo kaj la sukcesa sturmado kontraŭ la fortikaĵo de Malakovo la rusoj devis cedi kaj forlasi la urbon. En novembro 1855 la nova caro-imperiestro Aleksandro IIa vizitis Krimeon, kaj en marto 1856 Ruslando interpaciĝis kun siaj malamikoj en la Traktato de Parizo, post perdo de miloj, dekmiloj, eble centmiloj da soldatoj (precizaj ciferoj ne ekzistas). La Krimea Milito, kiun Ruslando nete perdis, evidentigis la faktojn, ke Ruslando troviĝis en senespera stato, ke ĝia armea teknologio estis malnova kaj la strukturoj de la ekonomio kaj industrio de Ruslando, kiu ankoraŭ ne abolis la servutecon, eksmodaj kaj malefikaj. Ĉi tiu embarasa situacio de Ruslando, kies armea potenco tamen restis signifa, igis la caron enkonduki reformojn kaj renovigi la armeon. Sed la rezistado flanke de la malnova konservema aristokrataro kontraŭ reformoj estis forta kaj bremsis la projekton. Entute, la rusoj gajnis la konscion, ke la malnovaj gloraj tempoj de militaj venkoj (ekzemple kontraŭ la tataroj) sub Petro la Granda kaj Katerina IIa dume pasis.[108] Necesis atendi la alvenon de caro Aleksandro IIIa (1881-94), kiu akcelis la armean kaj ekonomian progreson ĉe samtempaj totala sufokado de internaj politikaj liberecoj kaj homaj rajtoj, kaj, tamen, aplikado de paca ekstera politiko kaj subtenado de la artoj.[109] Lia posteulo Nikolao IIa, perdis la rus-japanan militon, enkondukis la demokration, kaŭzis kontraŭ-carisman revolucion kaj enmiksis la landon en la unuan mondmiliton. Ruslando travivis unu katastrofon post la alia, ĝis kiam en 1917 la bolŝevikoj-komunistoj de Lenin faligis la caran reĝimon kaj perforte transprenis la povon en Ruslando.





Bildoj de la Krimea Milito

[107] Jobst, Kerstin S.: Vision und Regime. Die ersten Jahrzehnte russischer Krimherrschaft. En: Klein, Denise (eld.): The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century). Harrassowitz Wiesbaden 2012. S. 211-21.
[108] Pliajn informojn vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Krimkrieg#Krieg_auf_der_Krim. Literatura rekomendo: Orlando Figes: The Crimean War. A History. New York 2011. (Ekzistas ankaŭ germanlingva traduko).
[109] Post longa marĝenigo kaj subtaksado de la signifo de tiu caro, la naciisma-patriotisma historiografio en Ruslando de Putin kvazaŭ rehonorigis lin (serĉu en la reto la artikolon kun la titolo Длинный век «после Александра»).

**La nacia movado de la krimeaj tataroj vekiĝas**


Meze de la 19a jarcento la nacia movado de la tataroj de Krimeo komencis prosperi por eviti la pereon kaj estingiĝon de ilia kulturo sub la sufoka rusa jugo, kiu lasis ĉion nerusan putri aŭ eĉ aktive detruadi. Al la aktiva rusiga procezo apartenis, ke la kulturaj monumentoj de la tataroj de Krimeo, kiujn la rusoj celis forviŝi, estis disfalantaj,[110] kaj ke la krime-tatara kulturo fariĝis marĝena, efemera fenomeno. La komenco de la nacia renaskiĝo estis inaŭgurata de ***Abduraĥman Qırım Havadĵe*** kaj ***Abdurefi Esadulla (Üsein Abdurefi/Абдрефи́евич) oğlu Bodaninskij*** (1877-1938)[111]. Dum Havadĵe instruis la krime-tataran lingvon en Simferopolo kaj en 1850 eldonis en Kazano rus-tataran konversacilibron, Bodaninskij aperigis en 1873 en Odeso rus-tataran lernolibron, evoluigis kun siaj junaj disĉiploj taŭgan lernmetodon kaj kun la subteno de progresemaj mulahoj ellaboris programojn por apliki ilin en klerigaj institucioj.



Üsein Abdurefi Bodaninskij

La nacian movadon de la tataroj de Krimeo esence fekundigis la tatara intelektulo ***İsma(ğ)il (Mustafa oğlu) Bey Gasp(ı)ralı (Gasprinskij)***, kiu vivis de 1851 ĝis 1914. Li fokusis sian klerigan-modernigan movadon, kiun li nomis „dĵadidismo“,[112] al la fortigo de la kulturo, antaŭ ĉio la konstruado de lernejoj kaj la disvastigo de la tataraj lingvo kaj literaturo. Lia propagando celis precipe nepolitikan sintezon inter la islama kaj okcidenta kulturoj kaj pledis por eŭropa modernigo de la socia, konservante la lojalecon rilate al la carismaj potenculoj. En tio elstaris ne nur lia klopodo krei novan krime-tataran literaturan lingvon, sed ankaŭ modernan kaj pli facilan *panturkan* lingvon sen arabaj kaj persaj arkaismoj. Krom tio, li fondis gazeton por virinoj kaj starigis la „Unuiĝon de la muzulmanoj de la Ruslanda Imperio“, kaj liaj romanoj aperis en la krime-tatara gazeto *Perevodčik*/*Tercüman* (Tradukisto).[113] Per tiuj agadoj li kaj liaj klerigaj kolegoj ne nur sekvis la tiamajn modajn kultur-klerigajn movadojn de aliaj etnoj en orienta Eŭropo (ekzemple bulgaroj), sed preparis ankaŭ la vojon al la panislama kaj panturkisma movadoj. Sed la aktivecoj de Gasprinskij, kiu kunlaboris kun reprezentantoj de aliaj turkaj popoloj, trovis la suspekton kaj malfidon de la carisma polico, ĉar liaj intencoj estis direktataj ankaŭ kontraŭ la rusigo de la tataroj. Post la morto de İsma(ğ)il Gasprinskij, kies dua edzino Zuĥra Akĉurina entuziasmiĝis pri la ideoj de sia edzo, en 1914, lia filo Refat daŭrigis redaktadi la gazeton *Perevodčik/ Tercüman,* kaj lia filino Ŝefika Gasprinskaja redaktis ĵurnalon por krime-tataraj virinoj.

[110] Edward Lazzerini: The Crimea Under Russian Rule, 1783 to the Great Reforms. Russian Colonial Expansion to 1917. Edited by Michael Rywkin. London: Mansell Publishing Limited, 1988.
[111] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Боданинский_Усеин_Абдрефиевич, http://maidan.org.ua/arch/krym/1291990928.html kaj http://ru.krymr.com/content/article/26720633.html
[112] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Jadid.
[113] Notojn pri la biografio de Gasprinskij en la angla kaj rusa lingvoj vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Ismail_Gasprinski. Ruslingvajn artikolojn pri Gasprinskij vd. sub http://ru.krymr.com/content/article/26911248.html, http://www.tatworld.ru/article.shtml?article=174, http://kpi.ua/ru/node/7502, http://islam-today.ru/istoria/ismail-gasprinskij-samyj-znamenityj-krymskij-tatarin kaj http://live-krym.ru/ves-kryma/izvestnye-lichnosti-v-krymu/item/493-ismail-gasprinskij-velikij-prosvetitel-kryma.html. Krome vd. La kontribuaĵojn pri Gasp(ı)ralı/Gasprinskij en: Hakan Kırımlı: National movements and national identity among the Crimean Tatars (1905-1916). Leiden. E.J. Brill, 1996.
(Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/293925690).



Gasprinskij (maldekstre) kun azerbajĝanaj kolegoj en Bakuo en 1907, fotoj de Gasprinskij kaj monumento al Gasprinskij en Baĥĉisarajo. (El Vikipedio)

Precipe post la (grandparte sensukcesa) kontraŭ-carisma revolucio de 1905 en Ruslando de caro Nikolao IIa, la nacia movado de la tataroj de Krimeo alprenis propran dinamikon, ĉar la pli radikalaj elementoj kaj precipe la pli juna generacio ne estis interesataj pri panturka, sed postulis propran krime-tataran identecon kaj deziris havi propran ŝtaton. Ĉi tiuj ideoj kolektiĝis en la partio „Vatan“, kiu estis fondita en 1909. Ankaŭ en Istanbulo ekzistis radikala grupo de krime-tataraj ´naciistoj´, sed neniu el tiuj grupiĝoj ricevis vastan subtenon ĝis 1917.[114]

## Sub la komunismo kaj la leninisma nacia politiko post 1917 en Ruslando

Post la abdiko de caro Nikolao IIa la 15an de marto 1917 la Konsilio de ruslandaj muzulmanoj decidis kunvoki en Petrogrado Tutruslandan Kongreson de muzulmanoj por diskuti la teritorian kaj nacian aŭtonomecon de la tataroj de Krimeo. Dum la rusa revolucio de februaro 1917 la tataroj de Krimeo ankoraŭ limigis siajn klopodojn al kulturaj interesoj, anoj de la radikala inteligencio fondis la partion „Milliy Fırqa“, kiu adoptis la postulon pri fondo de krime-tatara ŝtato kaj ludis ŝlosilan rolon ĉe la starigo de krime-tatara parlamento („Kurultaj“) en decembro 1917. Esencaj por la religia kaj nacia politiko de la krimeaj-tataroj fariĝis du dekretoj de la sovetia potenco de 1917: la „deklaracio pri la rajtoj de la popoloj de Ruslando“ de la 2a/15a de novembro kaj la „alvoko al ĉiuj laborantaj muzulmanoj de Ruslando kaj de la oriento“ de la 24a de novembro/7a de decembro. La kurultajo elektis nacian registaron de la tataroj de Krimeo kaj proklamis „Krimean Demokratian Respublikon“, kiu ekzistis nur ĝis la definitiva venko de la bolŝevikoj en januaro 1918, kiuj starigis sian ruĝan potencon en Simferopolo. Prezidento de la respubliko fariĝis **Numan Çelebi Cihan**.[115] Sed okazis, ke dum la interna milito en Ruslando krime-tatara registaro estis restarigita kiel marioneto de la germana armeo, kiu instalis la litovan generalon Sulkeviĉ, kiu devis, surbaze de sia islama kredo, devigi la tatarojn al kunlaboro. Sed pro sia ekspluatema politiko la germana potenco estis malpopulara inter tataroj, kaj post la malapero de la germanoj fine de 1918 „Milliy Fırqa“ eluzis la situacion por restarigi la povon, sed post kelkaj semajnoj ĝi denove estis forpuĉita de la komunistoj. En majo 1919 la „Blanka Armeo“ de generalo Denikin, kiu estis la kontraŭulo de la Ruĝa Armeo, konkeris la duoninsulon kaj akaparis la povon. La ekstrema kontraŭ-tatara sinteno de la blankuloj kaŭzis, ke radikalaj maldekstruloj de „Milliy Fırqa“ serĉis la kunlaboron kun la komunistoj. Admiralo P.N. Vrangel´ promesis al la tataroj ricevi kulturan kaj religian aŭtonomecon. Tiel, en oktobro 1920 Krimeo estis renkonkerita de la bolŝevikoj en kunlaboro kun la tataroj de „Milliy Fırqa“, malgraŭ ampleksa liverado de britaj armiloj por la blankuloj. La bolŝevikoj promesis al la tataroj reekzameni ilian nacian demandon. Poste, la esperoj de la anoj de „Milliy Fırqa“ estis trompitaj kaj ili mem perfiditaj de la komunistoj ĉirkaŭ Béla Kun, kiuj sufokis la sendependismajn strebadojn de la tataroj de Krimeo. „Milliy

[114] G. Sasse: Die Krimtataren. En: Ethnos-Nation. Jk. 4 (1996), n-ro 1-2, p. 23s.
[115] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Noman_Çelebicihan.

Fırqa“ estis proklamita de la komunistoj kiel kontraŭ-revolucia partio, kaj nur malmultaj maldekstraj tataroj estis akceptitaj de la Komunisma Partio por povi partopreni en la politika vivo.[116] Inter 1917 kaj 1922 50 mil krimeaj tataroj mortis pro malsato kaj same multaj elmigris al Turkio.

Favorante la islamajn popolojn kaj ties nacikomunismajn grupojn, la 18an de oktobro 1921 la sovetia registaro dekretis, cetere kontraŭ la protesto de la lokaj (rusaj) partiaj organoj, la fondon de la „Aŭtonoma Socialisma Sovetrespubliko de Krimeo“ (Krymskaja ASSR) kiel integra parto de RSFSR. Tio tamen ne signifis, ke la subteno al la sovetia potenco inter tataroj nepre estis aparte granda, kvankam multaj tataroj montriĝis lojalaj rilate al la komunisma reĝimo. En la nova komunisma ŝtato ankaŭ la tataroj de Krimeo estis koncernataj de ĉiuj fazoj de la sovetia politiko pri etnoj, nacioj kaj lingvoj. Tiel, ekzemple en la periodo de la „korenizacija“ la tataroj de Krimeo povis profiti avantaĝojn de sia statuso. Lenin, kiu rifuzis kaj kondamnis la „grandrusan ŝovinismon“ de la carismo, ne nur pledis por la plena egaleco de ĉiuj sovetrespublikoj, sed li propagandis ankaŭ la „pozitivan diskriminacion“ de la rusa kulturo por forviŝi naciismajn separatismajn strebadojn flanke de la rusa etno. Al tiu koncepto, nomata „korenizacija“, apartenis la strategio, ke oni disponigu al la lokaj partiaj instancoj ´indiĝenajn´ funkciulojn, kiuj konas la kulturon kaj tradiciojn de la loka popolo. La intenco de tiu strategio estis la ´indiĝenigo´ kiel formo de psikologia efiko por ŝajnigi, ke la soveta potenco estas loka, popoleca (aŭ populara), hejma afero, kaj por eviti la impreson, ke tiu potenco estas importita aŭ altrudita de la rusa ŝovinismo (kies karakteron Lenin bone komprenis). En la propagando de la soveta potenco la loka lingvo devis ludi centran rolon. Modernigaj agadoj sur la eduka kampo kiel ekzemple alfabetigaj kampanjoj en la lokaj kaj gepatraj lingvoj devis malfortigi la kontraŭsovetiajn sentojn kaj kontraŭrusajn emociojn kaj disvastigi la socialismajn ideojn. Per aliaj vortoj, malkovrante en la etnaj komunumoj „altan revolucian potencialon“, Lenin propagandis sian portataran politikon kiel bonan volon por rekompenci la koloniisman subpremadon de la caristoj kaj klopodis gajni la subtenon kaj fidon de la islamaj popoloj por la ideoj de la bolŝevisma-socialisma revolucio. Kompreneble, la stato aŭ fazo de la etneco kaj nacieco devis esti nur provizora, ĉar ankaŭ la etnaj komunumoj devis iam submetiĝi al la pli alta celo de la „unueco de la proleta socio“.

De tia leninisma nacia politiko la tataroj de Krimeo povis profiti en tio, ke ili estis (eĉ tro) reprezentataj sur ĉiuj registaraj niveloj, kvankam ili havis nur 25% de la tuta popolo, kiu nombris en 1926 714´000 anojn, dum la plimulton formis rusoj kun 42%, aliaj estis ukrainoj. La krime-tatara komunisto **Veli Ibrahimov** (Ibragimov), gvidanto de la maldekstra alo de „Milliy Fırqa“, kiu efike propagandis la lingvon kaj kulturon de la tataroj, estis elektita kiel prezidanto de la ekzekutiva komitato de la Krimea ASSR. Tataroj ricevis multajn postenojn en la partio, ŝtato kaj ekonomio. La lingvo de la krimeaj tataroj fariĝis dua oficiala lingvo apud la rusa, kaj en la lernejoj okazis instruado en la tiu lingvo. En 1926 ekzistis 750 lernejoj kun tatara instrulingvo kaj pli ol 2000 instruistoj, kiuj instruis 35´000 lernantojn. Krome ekzistis aro de superaj kaj fakaj lernejoj, kiuj proponis siajn kursojn en la tatara lingvo. Funkciis Ŝtata Tatara Teatro, scienca instituto por naciaj rilatoj, Muzeo de la Oriento, kaj kelkaj eldonejoj publikigis librojn kaj gazetojn en la krime-tatara lingvo.

Sed kiam en Moskvo Stalin akaparis la povon, kiu komencis timi, ke oni povus perdi la centran kontrolon pri la situacio en Krimeo, la „tatarigo“ kaj la „ora periodo“ de la krime-tatara kultura prospero trovis sian aprubtan finon. En 1927 estis lanĉita kampanjo kontraŭ „burĝaj naciistoj“, kiu kondukis en 1928 al la persekutado kaj arestado de gvidaj intelektuloj de la komunumo de la tataroj de Krimeo. Ankaŭ Veli Ibrahimov, Usein Bodaninskij kaj la sciencisto Bekir Ĉoban-zade[117] estis arestitaj, akuzitaj pro „naciismaj aktivecoj“ kaj likviditaj kune kun aliaj krime-tataraj politikistoj. Laŭ la fifamaj stalinaj listoj de NKVD estis neniigitaj ankaŭ multaj aliaj signifaj reprezentantoj de la krime-tatara kulturo kiel Asan Sabri Ajvazov, Jakub Abljamitov, Jakub Azizov, Osman Akĉokraklı, Ramazan Aleksandroviĉ, Jag´´ja Bajraŝevskij, Dĵafer Gafarov, Kerim (Qırım) Dĵemaledinov, Sulejman Idrisov, Ibraim Ismailov, Abdulla Latif-sade, Fevzi Musanif, Mamut Nedim, Abduraim Samedinov, Il´jas Tarĥan, Server Trupĉu, Seitdĵelil´ Ĥattatov, Biljal Ĉagar, k.a.[118] La krime-tatara ekleziularo estis disbatita, islamaj funkciuloj estis senditaj al prizonoj. Entute 35´000-40´000 tataroj estis deportitaj, kaj miloj mortis dum la perforta kolektivigo de la agrikulturo kaj dum la malsatkrizoj de la 30aj jaroj (1932/33 kaj 1937/38), tiel ke la parto de la popolo de

---

[116] K. Kramer, Die Geschichte der krimtatarischen Volkes, p. 6-8.
[117] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Бекир_Ваапович_Чобан-заде.
[118] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Usein_Bodaninsky.

la tataroj de Krimeo falis al 20%. Per la enkonduko de la cirila alfabeto, kiu sekvis post la araba kaj latina, la krime-tatara lingvo estis malfortigita favore al la rusa lingvo, kiu estis adoptita kiel sola oficiala lingvo, dum la restaĵoj de la tataraj politiko kaj kulturo estis forigitaj.[119]

**Dua mondmilito kaj deportado de la tataroj de Krimeo**

La Dua Mondmilito (1939-45) fariĝis ĉefa traŭmato por la tataroj de Krimeo en la moderna tempo kaj esenca tragika sperto, kiu formis la konscion de ĉiuj postaj generacoj de tataroj de Krimeo.

En aŭtuno 1941 la germana armeo sub la gvido de generalo Manstein kunlabore kun rumanaj soldatoj okupis Krimeon kaj restis tie ĝis aprilo 1944. Granda parto de la tataroj de Krimeo bonvenigis la germanojn kiel liberigantojn de la stalinisma teroro. La germanaj armeo kaj administracio en principo bone traktis la tatarojn, kiujn ili volis gajni kiel aliancanojn kontraŭ la sovetianoj. La tataroj povis malfermi aron da kulturaj kaj religiaj instalaĵoj, kaj per la fondo de la „Muzulmana Komitato" en Simferopolo la tataroj eĉ ricevis formalan politikan reprezentejon. Sed ankaŭ tataraj „memdefendaj taĉmentoj" estis starigitaj, kiuj estis komandataj de germanaj oficiroj, por batali kontraŭ la rusaj kaj ukrainaj partizanoj. Tiel, portempe ĉ. 20´000 tataroj portis germanajn armilojn – kio estis granda nombro, se oni konsideras, ke la tuta krime-tatara popolo havis 200´000 anojn. Multaj el tiuj „libervoluloj" venis el germanaj koncentrejoj, kiujn ili povis forlasi, se ili pretis aliĝi al la germana armeo. Sed baldaŭ la tataraj sentoj rilate al la germanaj okupantoj malvarmiĝis, kiam fariĝis evidente, ke la germanoj ne subtenas tatarajn interesojn sed puŝas grand-germanajn celojn, kaj kiam la tataroj komprens, ke Krimeo servos al la germanoj kiel nura kolonia objekto. Ŝajnas, ke ekzistis plano deporti la tatarojn kaj anstataŭigi ilin per germanoj el Sudtirolo kaj Besarabio. Hitler, kiu celis purigi Krimeon de ĉiuj fremdaj elementoj, deziris, ke Simferopolo estus nomata "Gotenburgo"[120] kaj Sevastopolo "Theoderichhafen". Generalfeldmarŝalo Erich von Manstein, kiu komandis la germanan armeon sur Krimeo, ordonis "respekti la religiajn kutimojn de la tataroj", kaj lia posteulo feldmarŝalo Ewald von Kleist postulis "trakti la tatarojn kiel aliancitajn federulojn".[121] Ĉ. 29´000 tataroj pereis en la batalo kontraŭ la okupantoj.



Adolf Hitler kaj liaj krimeaj milit-komandistoj Erich von Manstein, Ewald von Kleist, Erwin Jaenecke, Kurt Zeitzler, Maximilan Fretter-Pico, Erik Hansen. Kiel la rusoj, ankaŭ la germanoj volis konkeri Krimeon, purigi ĝin de fremdaj elementoj kaj ekspluati ĝin kiel kolonion.

Ŝajnas, ke jam en 1941 Stalin havis la intencon prevente deporti la krimeajn tatarojn malantaŭ Uralon, sed la rapida progreso de la germana armeo en la milito malhelpis la realigon de tiu plano.

Post la foriro de la germana armeo en aprilo 1944 Krimeo estis renkonkerita de la Ruĝa Armeo, kiu lanĉis malferman teroron kontraŭ la tataroj kaj terure venĝis sin pro ilia perfido de la kunlaboro kun la hitleraj faŝistoj. Laŭ ordono de Stalin jam en majo 1942 ĉiuj tataroj de la regionoj de Krasnodaro kaj Rostovo nordoriente de la Nigra Maro devis esti forpelitaj kaj senditaj al Centra Azio kaj Siberio. Post du

[119] G. Simon: Die nationale Bewegung der Krimtataren. Teil I. (1975). p. 7-9; G. Sasse: Die Krimtataren (1996), p. 24s.; K. Kramer, Die Geschichte der krimtatarischen Volkes (2003), p. 8-10.

[120] En decembro 1941 en Simferopolo okazis masakro, en kiu ĉ. 14´000 judoj estis murditaj de la nazioj ene de malmultaj tagoj.

[121] Vd. http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-46353381.html, https://de.wikipedia.org/wiki/Schlacht_um_die_Krim, https://de.wikipedia.org/wiki/Schlacht_um_Sewastopol_1941-1942, http://www.deutsche-biographie.de/sfz42656.html, http://www.lexikon-der-wehrmacht.de/Personenregister/Z/ZeitzlerKurt-R.htm.

jaroj ĉi tiu sorto trafis ankaŭ la tatarojn de Krimeo mem. Elstaran rolon en la operacoj kontraŭ la tataroj de Krimeo ludis Lavrentij Berija, la fifama ĉefo de NKVD kaj ŝlosila figuro de la stalinisma teroro en Sovetunio entute, kiu senskrupule, fanatike kaj efike plenumis la volon de la politburoo, regata de Stalin, kiu mem komencis timi liajn potencon kaj ´popularecon´.

La 10an de majo 1944 Berija sendis al Stalin telegramon, laŭ kiu la sovetia gvidanto estis informita, ke pli ol 20´000 tataroj dizertis el la Ruĝa Armeo kaj aliĝis al la kontraŭa flanko de la malamiko. Krom tio li raportis, ke oni kaptis intertempe 5381 krime-tatarajn kunlaborantojn (ĉi tiu cifero verŝajne esti troigita). Surbaze de tiuj sciigoj Berija postulis kolektivan punadon de la popolo de la tataroj de Krimeo kaj ilian forigon de la duoninsulo. Laŭ Berija, antaŭ la milito sur Krimeo ekzistis 218´000 tataroj. La venontan tagon, do la 11an de majo, la „Defenda Konsilio“ (GKO), diru I. Stalin, subskribis la dekreton pri la kompleta deportado de la tataroj de Krimeo al Uzbeka SSR, kiu estis fiksita en la dekreto n-ro 5859ss.[122] Por doni impreson pri la severeco de la akuzoj kontraŭ la krimeaj tataroj kaj de la intencoj de Stalin, ni redonu ĉi tie tradukon de la preamblo de la originala teksto de la koncerna rezolucio:

*"Dum la Dua Mondmilito multaj krimeaj tataroj ŝanĝis la patrujon, dizertis el la Ruĝa Armeo, kiu defendis Krimeon, kaj transiris al la flanko de la kontraŭulo, aliĝis al libervolaj tataraj milittrupoj, kiuj estis formataj de la germanoj, kaj batalis kontraŭ la Ruĝa Armeo. En la periodo de la okupacio de Krimeo fare de la faŝisma germana armeo krimeaj tataroj partoprenis en germanaj puntaĉmentoj kaj aparte distingis sin per siaj brutalaj venĝaj finkalkuloj kun sovetiaj partizanoj. Krimeaj tataroj helpis ankaŭ al la germanaj okupantoj organizi perfortan kondukadon de sovetiaj civitanoj en germanan sklavecon kaj amase ekstermis la sovetian popolon.*
*La krimeaj tataroj aktive kunlaboris kun la germanaj okupaciaj aŭtoritatoj, partoprenante en la tiel nomataj ´tataraj naciaj komitatoj´, kiuj estis organizataj de la germana spionado, kaj estis vaste utiligataj de la germanoj por distribui spionojn kaj sabotulojn dorse de la Ruĝa Armeo. La ´tataraj naciaj komitatoj´, en kiuj gravan rolon ludis la tataraj elmigrintoj de Belogvardejsk, agadis kun la subteno de krimeaj tataroj kun la celo persekutadi kaj subpremadi la netataran loĝantaron de Krimeo kaj laboris por prepari perfortan eksiĝon de Krimeo el Sovetunio kun la helpo de la germanaj armataj fortoj. Konsiderante la supre diritan, la Ŝtata Defenda Komitato dekretas: Ekzili ĉiujn tatarojn el la teritorio de Krimeo kaj transloki ilin por konstanta loĝado kun la statuso de specialaj loĝantoj en la distriktoj de Uzbeka SSR. NKVD devas fini la operacon ĝis la 1a de junio 1944."*[123]


En la sekva parto de la dekreto, kiu estis subskribita de Kalinin, Gorkin, Stalin kaj Ĉadaev, estis listigitaj ĉiuj rimedoj, kiuj estas prenendaj por efektivigi tiun operacon. Pluraj popolkomisariatoj (ministerioj) estis inkluzivitaj en la operacon, kiu estis perfekte planata, organizata kaj efektivigita: Krom Berija (NKVD) ankaŭ Kaganoviĉ kaj multaj aliaj estis menciitaj kun sia nomo. Membroj de la politburoo kiel Molotov, Malenkov, Mikojan, Kosygin, Ĵdanov kaj aliaj altranguloj de la sovetia politiko ricevis kopion de la dekreto, krom Ĥruŝĉov, kiu evidente ne estis envolvita, kvankam en tiu tempo li jam estis membro de la prezidio de KPSS kaj funkciis kiel ĉefministro de Ukraina SSR.


Stalin, Kalinin, Berija

[122] Kiel la judoj nomas sian deportadon (katastrofon) „ŝoao“ kaj la armenoj „aghet“, la krimeaj tataroj nomas ĝin „sürgün“.
[123] Traduko el la rusa lingvo de A.K. La rusan tekston de dekreto n-ro 5859 vd. sub http://www.memorial.krsk.ru/DOKUMENT/USSR/440511.htm, http://sevkrimrus.narod.ru/ZAKON/1944.htm. aŭ http://www.memory.gov.ua/publication/dokumenti-shchodo-deportatsii-z-krimu-predstavnikiv-krimskotatarskogo-ta-inshikh-narodiv. Jam la 2an de aprilo estis subskribita alia dekreto n-ro 5943ss

Koncerne la aserton de la dekreto pri la kunlaboro, la vero estas, ke multe pli da krimeaj tataroj batalis en la Ruĝa Armeo ol kunlaboris kun la germana armeo. Ankaŭ la nombro de dizertintoj estis konsiderinde pli malalta ol indikite de Berija. Krom tio, granda parto de la tataroj de Krimeo adoptis ´neŭtralan´ sintenon rilate al Sovetunio kaj nazia Germanio (kiu ne helpis al ili savi sin). Flanke de Sovetunio la faktoj do estis torditaj kaj falsitaj. La vera intenco de Stalin estis forigi la tatarojn de Krimeo, ĉar ŝajnas, ke li timis ilian eventualan kontraŭstaradon kaj opozicion, kio povus ĝeni liajn planojn de la kompleta kontrolado de Krimeo, kiuj devis esti rusa.

En la frua mateno de la 18a de majo 1944 sovetiaj soldatoj komencis efektivigi la ordonon n-ro 5859ss. En la operaco partoprenis ĉ. 23´000 soldatoj kaj oficiroj kaj 9000 membroj de la sekurecaj servoj. La deportado trafis la tatarojn neatendite, kaj inter la translokotaj homoj troviĝis ĉefe virinoj, infanoj kaj maljunuloj, ĉar la viroj servis en la armeo. La tataroj havis nur kelkajn minutojn da tempo por kolekti ĉefajn havaĵojn por la vojaĝo. Ĉiu familio rajtis kunporti 500 kilogramojn da pakaĵoj, dum la resto de la posedaĵo estis konfiskita de la ŝtato kaj devis esti rekompencata poste. Post ilia forpelado el la domoj kaj loĝejoj, la tataroj estis kondukataj al la stacidomoj. Tie oni perforte puŝis ilin en la trajnojn, en kiuj ili devis elteni longan vojaĝon, kiu daŭris ne malpli ol tri semajnoj ĝis Centra Azio, precipe Uzbekio. Tiumaniere, laŭ sovetiaj indikoj 180´000 personoj estis deportitaj en 67 trajnveturoj. Aliaj 11´000 tataroj estis vokitaj servi en la armeo aŭ senditaj al karbominejoj por laboro. Tiel, inter la 18a kaj 20a de majo 1944 la sovetia ŝtato deportadis 194´155 tatarojn de Krimeo, kio signifis, ke ene de tri tagoj la tuta krime-tatara popolo estis malaperigita de sia patrujo. Ĝis la deportado en 1944 multaj krimeaj tataroj vivis en la urboj kaj regionoj Baĥĉisarajo (89%), Qarasuvbazar (Belogorsk, 42%), Aluŝta (63%) kaj Sudak (70%), urboj, kiuj malpleniĝis en majo 1944.



Kie krimeaj tataroj laŭprocente plimulte loĝis en 1939

La plimulto de la deportitoj estis senditaj precipe al (la dezertoj de) Uzbekio (aŭ Uzbekistano) en la ĉirkaŭaĵo de Taŝkento, kie gis la 1a de julio 1944 alvenis 35´750 familioj aŭ 151´424 individuoj, kiuj devis loĝi en „speciala setla zono“, kies limojn ili ne rajtis forlasi. En la 14a jarcento Uzbekio, kiu du jarcentojn antaŭe estis invadita de la mongoloj, estis regata de Timuro (Tamerlano). Post tiu dato alvenis ankoraŭ kelkmil tataroj. Sed la krimeaj tataroj estis deportitaj ankaŭ al Kazaĥstano, Jakutio kaj Baŝkirio. En tiuj loĝzonoj, kiuj aspektis kiel koncentrejoj de la gulago kaj kiuj estis gardataj kaj kontrolataj de la polico kaj de agentoj de la sekurecaj servoj, la tataroj devis loĝi dense kunpuŝataj en primitivaj domoj kaj elteni mankojn de spaco, hejtmaterialo kaj provizado per nutraĵoj kaj medikamentoj. Post la sovetia venko en la dua mondmilito ankaŭ la revenintaj tataraj ruĝarmeanoj estis postsenditaj al Centra Azio – ĉirkaŭ 8000.

Arkivaj dokumentoj, kiuj estis konsulteblaj post la fino de Sovetunio en la 1990aj jaroj, atestis la katastrofan situacion de la tataroj de Krimeo dum ilia amasa deportado al Centra Azio, Uralo kaj Siberio. Survoje pereis 7900 homoj pro nesufiĉa nutrado, elĉerpiĝo de la fortoj kaj rapide eksplodantaj malsanoj. Sed ankaŭ en la novaj loĝzonoj multaj tataroj mortis pro manko de nutraĵoj, trinkakvo, akcepteblaj higienaj kondiĉoj kaj pro tifo, kiu tie furoris. Sub tiaj cirkonstancoj en la unuaj ses monatoj forpasis 13´592 personoj. Ĝis la jarfino de 1945 la cifero de viktimoj kreskis al 26´775. Tiel, en la unuaj 18 monatoj 14% de la deportitaj tataroj perdis sian vivon. Statistikaj ciferoj forte varias laŭ sovetiaj kaj

krime-tataraj fontoj. Laŭ krime-tataraj indikoj de la jaroj 1965/66 entute 238´500 tataroj estis deportitaj for de Krimeo. 86,4% estis virinoj kaj infanoj sub 16-jaraĝaj. En la unuaj 18 monatoj mortis 109´956 homoj, kio egalas al 46,2% de la deportitaj tataroj. Pro la genocida karaktero de tiu deportado, multaj krimeaj tataroj parolas pri „genocido“, kiun ili komparas kun la sorto de armenoj kaj judoj.[124]

Paralele al la sentatarigo de Krimeo, la sovetia potenco forviŝis ĉiujn spurojn de la tatara kulturo sur Krimeo, kun la escepto de la ĥana palaco en Baĥĉisarajo, kiu servis al turismaj kaj literaturaj (Puŝkin!) celoj. La historio estis reskribata de la sovetiaj komunistoj tiel, ke la komenco de la civilizo de Krimeo estis fiksita per la jaro de la unua anekso de Krimeo fare de Ruslando en la jaro 1783 kun la intenco kaj celo nei la antaŭan historion de la tataroj de Krimeo, kies kulturaj atingoj ne plu estis menciitaj en sovetiaj lernolibroj. Male, la tataroj estis misfamigataj kiel nomadoj kaj komercistoj de sklavoj kaj kulpigataj kiel perfiduloj en diversaj gravaj historiaj eventoj kiel ekzemple dum la Krimea Milito (1853-56), en 1918 (germana marioneta registaro) kaj 1942 (germana sieĝo de Sebastopolo). La operaco de la deportado de la tataroj de Krimeo restis sekreto kaj estis menciita nur en junio 1946 en iu ŝtata sovetia publikaĵo. Ankaŭ la decido de la Supera Soveto de la 30a de junio 1945 pri la malfondo de la Krimea ASSR kaj la enkadrigo de ĝia teritorio kiel simpla distrikto sen aŭtonomeco en la konsiston de RSFSR restis longe prisilentata.[125] Ĝis la ´donaco´ de Krimeo al Ukrainio.

Depost la deportado la krimeaj tataroj ne plu aperis kiel memstara etno en la statistikoj, sed ili estis kune nombrataj kun ĉiuj ceteraj tataroj de Sovetunio, kaj se Moskvo menciis tatarojn, oni pensis unuavice pri la tataroj de Kazano. Nur en 1989 la krimeaj tataroj reaperis en sovetiaj statistikoj kiel memstara etno.

Ankaŭ en la fifama Konferenco de Jalta, okazinta en februaro 1945, la sovetia krimo kontraŭ la krimeaj tataroj (kaj aliaj popoloj de Sovetunio) ne estis traktita. Churchill, Roosevelt kaj Stalin havis aliajn, pli urĝajn militajn temojn por pridiskuti kaj decidi: la divido de Germanio laŭ diversaj okupaciaj zonoj, la disdivido de orienta Eŭropo laŭ influaj zonoj, la sovetia interesoj en Azio. Kiel orienta limo de Pollando estis fiksita la t.n. Curzon-linio. La problemo de la milionoj da forpelitaj homoj devis esti traktita en pli posta konferenco. Krom tio oni subskribis traktaton pri la rehejmigo de sovetiaj civiluloj kaj anoj de la Ruĝa Armeo, kiuj troviĝis sub la protekto de la okcidentaj aliancanoj.[126]



Churchill Roosevelt kaj Stalin en Jalta en 1945

## Kiel kaj kial Krimeo fariĝis parto de Ukrainio en 1954

Post la milito Krimeo estis distrikto de RSFSR. Laŭ la narativo, la historio de la transdono, cedo aŭ donacado de Krimeo al Ukrainio en la jaro 1954 havas antaŭan historion kaj komenciĝis per postulo de Stalin al la adreso de la kievaj regantoj dum la dua mondmilito, kiu kaŭzis la koleron de Nikita Ĥruŝĉov, kiu dum la milito organizis la partizanan batalon en Ukrainio kaj estis komisiito de la politburoo ĉe

[124] Krom tataroj de Krimeo, en la tempo de la stalinismo estis deportataj ankaŭ aliaj popoloj de Sovetunio: karaĉajoj, kalmikoj, ĉeĉenoj kaj inguŝoj, balkaroj, volgiaj germanoj kaj mesĥetoj (t.e. mesĥetaj turkoj). (Vd. http://www.faz.net/aktuell/politik/die-gegenwart/russland-deportierte-voelker-12804712.html?printPagedArticle=true#pageIndex_2 kaj http://www.zeit.de/2003/28/A-Berija ). Pri la deportado de la krimeaj tataroj rakontas Mustafa Dĵemilev sub https://www.youtube.com/watch?v=GTazHO9ICvQ.

[125] G. Simon: Die nationale Bewegung der Krimtataren. Teil I. (1975). p. 11-12; K. Kramer: Die Geschichte der krimtatarischen Volkes (1996). p. 10-15.

[126] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Konferenz_von_Jalta.

diversaj frontoj kaj bataloj (Stalingrado, Kursko). Ankoraŭ en 1944 la sovetia gvidanto postulis de Kievo cent mil ukrainajn laborfortojn, kiuj devus helpi rekonstruadi Ruslandon, kiu estis vaste detruata dum la milito. Ĥruŝĉov, 1944-47 estro de la ukraina KP, reagis kun ĉagreno, ĉar finfine ankaŭ lia lando, Ukrainio, ne malpli forte suferis sub la detruoj kaŭzataj de la milito. Laŭ Lavrentij Pogrebnjov, tiama aparatulo de la ŝtataj sovetiaj sindikatoj, kiu ĉeestis la koncernan momenton, Ĥruŝĉov kriis: „Ukrainio kolapsis kaj nun ni ankoraŭ estas ekspluatataj“! Sed Ĥruŝĉov ne povis permesi al si malobei ordonon de Stalin, kaj li havis ´genian´ ideon: Li konsentis disponigi la postulatan kvanton de homoj, *se oni donacos al li Krimeon.* Dek jarojn poste, en 1954, Krimeo estis efektive transdonita al Ukrainio. Tiam Ĥruŝĉov sidis en Moskvo kaj estris la tutsovetian KP. Kio okazis kaj kiel tio povis okazi?

La decido de la prezidio de CK de KPSU transdoni Krimeon al Ukraina SSR estis prenita okaze de la 300a datreveno de la Traktato de Perejaslav (8a de januaro). La Traktaton oni, t.e la rusoj, konsideris (kaj daŭre konsideras) kiel akton de la historia unuiĝo de Ukrainio kun Ruslando. La temo estis traktita dum kunsido de la Prezidio de la CK de KPSU, kiu okazis la 25an de januaro, kiel 11a traktaĵo de la tagordo, kies pridiskuto daŭris nur 15 minutojn. La koncerna dekreto portis la daton de la 19an de februaro 1954 kaj estis publikigita la 9an de marto en *Vedomosti Verchovnogo Soveta SSSR*, do en la novaĵbulteno de la Supera Soveto de USSR, kun jena teksto: *„Dekreto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR pri la transdono de la Krimea Distrikto el de la konsisto de RSFSR en la konsiston de USSR. Konsiderante la komunecon de la ekonomio, teritoria proksimeco kaj proksimaj agrikulturaj kaj kulturaj rilatoj inter la Krimea Distrikto kaj Ukraina SSR, la Prezidio de la Supera Soveto de USSR decidas: Konfirmi la komunan deziron de la Prezidio de la Supera Soveto de RSFSR kaj la Prezidio de la Supera Soveto de USSR transdoni la Krimean Distrikton el de la konsisto de RSFSR en la konsiston de URSS.“* La dekreton subskribis: ***Kliment E. Voroŝilov***, prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR,[127] kaj N. Pegov, sekretario de la Supera Soveto de USSR. Moskvo, Kremlo, la 19an de februaro 1954. (Nek la nomo de Ĥruŝĉov, nek tiu de ĉefministro Malenkov,[128] nek tiu de ***Leonid Kiriĉenko***, kiu tiam oficis kiel Unua sekretario de la ukraina KP kaj kiu estis rekte koncernita de la interkonsento,[129] nek la nomo de ***Dem´jan Korotĉenko***, kiu prezidis la Superan Soveton de Ukrainio,[130] aperis en la dekreto.)

La teritoria ŝanĝo okazis apenaŭ rimarkite, do sen propaganda bruo, kvazaŭ kiel eta piednoto de la historio kaj politiko, en majo 1954, kiam en Sovetunio oni festis tiun 300an datrevenon de la Traktato de Perejaslav (1654). En la sovetia gazetaro la okazaĵo ne estis komentita, kaj ankaŭ en la Memuaroj de Ĥruŝĉov, kiuj aperis en 1970, la temo de la teritoria ŝanĝo de Krimeo en 1954 ludis neniun rolon.

Ĉirkaŭ la iom enigma krimea decido de 1954 cirkulis inter observantoj de la historio diversaj spekulativoj kaj interpretaj versioj, sed ŝajnas ke la vero neniam povis esti trovita. Kiel fiksan pravigon la dekreto menciis la „komunecon de la ekonomio, la teritorian proksimecon kaj la proksimajn agrikulturajn kaj kulturajn rilatojn“, kiuj devis esti fortigataj inter Krimeo kaj Ukrainio. Kiel okazo servis, kiel konate, la 300a datreveno de la Traktato de Perejaslav. Kiel gvida protagonisto de tiu nekutima ideo estis konsiderata Nikita Ĥruŝĉov mem, kiu celis, laŭ iuj rusaj historiistoj, kontentigi la politikistojn en Kievo kaj sekurigi sian propran potencon.[131] Se reveni al la epizodo rakontita komence de ĉi tiu ĉapitro, oni povus pensi, ke la sovetia ŝtato devis plenumi sian promeson, kiun Stalin faris en 1944 al Ĥruŝĉov, kiam li estis partiestro en Ukrainio. Do, okazis ke Ĥruŝĉov mem plenumis ĝin, ĉar Stalin ne plu vivis. Do, al la historia vero eble iomete kontribuas ĉiuj tiuj versioj.

---

[127] Kune kun Stalin kaj la aliaj membroj de la polituroo (Mikojan, Molotov, Kaganoviĉ kaj Kalinin) Voroŝilov donis jam en 1940 la konsenton al la propono de Berija mortpafi 21-22´000 polojn (ĉefe oficirojn) en Katyn. Dum la Rusa Civitana Milito Voroŝilov ordonis amaspafadojn, kaj kiel popolkomisaro pri defendo li subskribis dum la sangaj purigoj listojn por mortpafi 142 komandistojn de la Ruĝa Armeo. Molotov respondecis pri la kolektivigo de la agrikulturo, dum kiu kvin milionoj da „kulakoj“ estis senditaj en la gulagon, li kunrespodecis pri la malsatkrizo en Ukrainio kaj subskribis minimume 342 listojn kun po 100 nomoj de homoj, kiuj devis esti mortpafitaj. Mikojan organizis purigojn en Armenio, dum kiu miloj da homoj perdis sian vivon. Kaganoviĉ respondecis pri la disbato de la rezisto kontraŭ la kolektivigo en Ukrainio kaj Norda Kaŭkazo, dum kiu laŭ lia ordono miloj da homoj estis mortpafitaj; krome li subskribis minimume 189 listoj, sur kiuj troviĝis la nomoj de 19´000 „malamikoj de la popolo“. Ankaŭ Kalinin subskribis multajn tiajn listojn. La urbo de Kantio daŭre portas la nomon de tiu amasmurdisto! (Vd. Urban, Thomas: Katyn 1940. Geschichte eines Verbrechens. München 2015. S. 35ff.).

[128] Georgij Malenkov, kun kiu Ĥruŝĉov kverelis pri la demando de la „Kolektiva Gvidado“, estis ĉefministro de SU en 1953-55.


[129] Pri li vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Alexei_Illarionowitsch_Kiritschenko.

[130] Pri li vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Demjan_Korottschenko.

[131] Laŭ Nikolaj Starikov kaj Dmitrij Beljaev (kiuj starigis la konspiran hipotezon, ke Stalin estis mortigita per veneno kaj ke ĉe lia morto temis pri ŝtata puĉo, en kiu Ĥruŝĉov (kiun ili konsideras senutila por Sovetunio) estis envolvita kaj kiu estis ligita ankaŭ kun la ekzekuto de Berjia).

Laŭ Orest Subtelny, kanada historiisto kun ukrainaj radikoj, la decido transdoni Krimeon al Ukrainio en 1954 ne estis tiel altruisma, kiel oni povus kredi. En tiu tempo, Krimeo havis multajn ekonomiajn problemojn, la infrastrukturo estis detruita de militoj, la loĝantoj vivis en mizero, kaj la deportado de la krimeaj tataroj al Centra Azio postlasis demografian vakuon kun gravaj sociekonomiaj sekvoj. Ankaŭ la situacio en Ukrainio mem estis malfacila. Ĉu kun tiu rigardo al la aferoj povus kongrui la ideo, ke Ĥruŝĉov eble iel volis helpi al Krimeo? Aleksej Adĵubej, la bofilo de Ĥruŝĉov, kiu akompanadis la novan ŝtatestron dum ties vojaĝoj tra la lando, rakontis jenan epizodon: Kiam Ĥruŝĉov vizitis Krimeon en oktobro 1953, li montris sin konsternita pri la katastrofa stato kaj la malkontenteco de la loĝantaro de la duoninsulo. Post la reflugo al Kievo, Ĥruŝĉov diskutis la aferon kun la partiaj gvidantoj de Ukrainio, kun kiuj li interkonsentis la transdonon de Krimeo al Ukrainio, kio inkluzivis la translokadon de certa nombro de ukrainoj al la duoninsulo, kiuj helpu evoluigi ĝin. Nelonge post tio, la partiaj gvidantoj en Kievo montris sin kontentaj pri la unuaj pozitivaj rezultoj de la ukrainigo de Krimeo: ili konstatis kun ĝojo kaj fiero, ke la ukraina lingvo disvastiĝis en publikaj lokoj de Krimeo, kie instruistoj el Ukrainio sukcese instruis la ukrainan lingvon inter la junularo. Sed tiaj atingoj estis esence nur simbolaj kaj formalaj, ĉar Ĥruŝĉov, kiu mem kontraŭbatalis la ukrainan naciismon, ne povis estis interesata puŝi la etnan ukrainigon de Krimeo, des pli ke la tuta sovetia ŝtato pli kaj pli forte orientiĝis laŭ la rusaj lingvo kaj kulturo.

Kiel la filo de Ĥruŝĉov, Sergej Nikitiĉ, klarigis en intervjuo en 2008, la decido de Ĥruŝĉov estis ligita kun la konstruado de akvokanalo inter norda Krimeo kaj la akvorezervujo de Kaĥovka ĉe la Dnepro kaj kun la deziro financi grandegajn hidroteknikajn projektojn kadre de la sama sovetia respubliko.



Ĥruŝĉov, Voroŝilov, Kiriĉenko, Korotĉenko, Malenkov

La dokumentoj ĉirkaŭ la krimea decido de la jaro 1954 estis publikigitaj nur en 1992, post la malfondo de Sovetunio, precipe en kontribuaĵo de la historia fakĵurnalo *Istoričeskij archiv.* La trovitaĵoj montris, ke la tiamaj debatoj ne koncernis la teritorian ŝanĝon de Krimeo, sed ĉefe demandojn de la agrikulturo.

Kiel unu el la plej akraj kritikantoj de la transdono de Krimeo al Ukrainio elpaŝis post la publikigo de la koncernaj aktoj en 1992 Evgenij Ambarcumov, kiu estis vicparolisto de la Supera Soveto en la erao de Gorbaĉov. Li konstatis la fakton, ke la respondecaj juraj instancoj ne estis konsultitaj kiel tion postulis la konstitucio, kaj la personan interkonsenton de Ĥruŝĉov kun la tiama estro de la ukraina KP, Leonid Kiriĉenko, kiu estis samtempe kandidato de la CK de KPSU kaj fera lojalulo de Ĥruŝĉov, Ambarcumov eĉ komparis kun la sekreta Hitler-Stalin-Pakto de la jaro 1939. Fakte, nur malgranda cirklo de funkciuloj estis informita pri la intencoj de Ĥruŝĉov rilate Krimeon, kaj pri la antaŭvidita transdono de Krimeo al Ukrainio la Superaj Sovetoj en Kievo kaj Moskvo eĉ ne voĉdonis, kion ili tamen devintus fari laŭ la valida soveta leĝo, sed okazis, ke nur iliaj prezidioj decidis la projekton. Pro tio Ambarcumov opiniis, ke tiu decido devus esti klasifikita kiel malvalida kaj kontraŭleĝa, des pli, ke dum la koncerna kunsido preskaŭ la duono de la membroj forestis, kaj neniu reprezentanto de Krimeo esprimis kontraŭan opinion. Tamen, kiel oni eksciis, Pavel Titov, tiama partiestro de Krimeo, en januaro 1954 estis vokita al Moskvo, kie oni komunikis al li la intencon pri la planita teritoria ŝanĝo de la Krimea distrikto. Kiam li protestis kontraŭ tiu intenco, li estis tuj anstataŭigita per la ukraino Dmytro Poljans´kyj. Tiel L.G. Mezencev, unua anstataŭanto de Titov, poste memoris la okazaĵon. Tial, la 21an de majo 1992 la Supera Soveto de RSFSR proklamis la krimean decidon de 1954 nevalida ex tunc (retroefike), kaj en 2015, unu jaron post la dua anekso de Krimeo, la ĝenerala prokuroraro de Ruslando konstatis, ke la „transdono de la Krimea Distrikto

al Ukrainio kontraŭdiris la konstitucion[132]. Do, eblas konkludi la historion tiel, ke iusence temis pri la privata afero de Ĥruŝĉov, kiu persone reguligis la projekton,[133] kiu ne estis konforma al la sovetia konstitucio kaj lezis la validan leĝon.

Ke Krimeo en 1954 estis transdonita al Ukrainio pro tio, ĉar la sovetianoj (rusoj) celis ŝarĝi la ukrainojn per la respondeco pri la deportado de la krimeaj tataroj, kiel J.A. Mace supozis,[134] estas tamen malverŝajne. Kiel iuj okcidentaj historiistoj atentigis, la krimea decido de 1954 havis plej verŝajne ĉefe ekonomiajn (kaj strategiajn) kaŭzojn, kiel la koncerna dekreto kredinde skribis[135] kaj la filo de Ĥruŝĉov klarigis. Krom tio la administra aparteneco de Krimeo al Ukraina SSR aŭ al RSFSR ne ludis tre gravan rolon, ĉar ambaŭ respublikoj formis parton de Sovetunio. Eble la ukraina ricevo de Krimeo signifis tamen prestiĝan gajnon por Ĥruŝĉov kaj estis ankaŭ neta malŝarĝo por Ruslando.



ВЕДОМОСТИ
ВЕРХОВНОГО СОВЕТА
СОЮЗА СОВЕТСКИХ СОЦИАЛИСТИЧЕСКИХ РЕСПУБЛИК

9 марта 1954 г. № 4 (798) Год издания 17-й

УКАЗ ПРЕЗИДИУМА ВЕРХОВНОГО СОВЕТА СССР

**О передаче Крымской области из состава РСФСР в состав УССР**

Учитывая общность экономики, территориальную близость и тесные хозяйственные и культурные связи между Крымской областью и Украинской ССР, Президиум Верховного Совета Союза Советских Социалистических Республик постановляет:

Утвердить совместное представление Президиума Верховного Совета РСФСР и Президиума Верховного Совета УССР о передаче Крымской области из состава Российской Советской Федеративной Социалистической Республики в состав Украинской Советской Социалистической Республики.

Председатель Президиума Верховного Совета СССР К. ВОРОШИЛОВ.

Секретарь Президиума Верховного Совета СССР Н. ПЕГОВ.

Москва, Кремль. 19 февраля 1954 г.




Krimea dekreto de 1954 kaj teritoria evoluo de Krimeo
(pligrandigoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Krim#/media/File:The_transfer_of_Crimea.jpg
https://de.wikipedia.org/wiki/Ukrainische_Sozialistische_Sowjetrepublik#/media/File:Ukraine-growth.png)

## Lukto de la krimeaj tataroj por rehabilitado post la morto de Stalin (1954-1967)

La morto de Stalin en marto 1953[136] kaj la lukto de Ĥruŝĉov por stabiligi sian potencon kaŭzis, ke la sovetia registaro principe ŝanĝis la traktadon de deportitaj popoloj en Sovetunio. La "degela vetero" rompis la glacion de la kruda stalinismo. Ĥruŝĉov komencis eĉ akre kritiki sian antaŭulon, kondamnis personkulton, la rolon de NKVD, la distanciĝon de leninismaj principoj kaj partiaj normoj. Inter 1954 kaj 1956 la reprezalioj kontraŭ la deportitaj popoloj estis nuligitaj, tamen dume sen politika rehabilitado de la koncernataj popoloj. Tio sekvis nur en lia sekreta parolado dum la XXa parta konferenco de la 25a de

[132] Vd. http://de.sputniknews.com/politik/20150627/302967698.html#ixzz3wrJxaYlk. Starikov/Beljaev klarigas, ke pri ŝanĝo de limoj inter sovetiaj respublikoj instruis artikoloj 16 kaj 18 de la Konstitucio de URSS, kaj artikolo 33 de la Konstitucio de RSFSR difinis la kompetencojn de la Prezidio de la Supera Soveto de RSFSR. Inter ili la rajto ŝanĝi limojn ne troviĝis. Fakte, neniu konstitucia organo de RSFSR rajtis doni la permeson por ŝanĝi tian limon. Punkto „d" de la artikolo 14 de la Konstitucio de URSS havigis la kompetencojn por *konfirmi* kelkaj aŭde limoj inter respublikoj al la kompetencoj de la superaj organoj de la Unio, sed *permeson* por tia ŝanĝo la respublika Konstitucio rajtis doni al neniu. Laŭ tio, do eblis konfirmi ĝin, sed oni ne rajtis alpreni decidon. Krom tio, en tia kazo necesis okazigi referendumon (precipe en la koncernata regiono mem, t.e. en la Krimea Distrikto mem) laŭ artikolo 33 de la Konstitucio de RSFSR. Sed ĝi ne okazis. Pro tio diversaj aŭtoroj venis al la konkludo, ke la transdono de Krimeo al Ukrainio signifis lezon de la leĝo. (Vd. Starikov, N. / Beljaev, D.: Rossija, Krym. Istorija. SPB 2015, p. 82).

[133] Laŭ http://www.welt.de/print/wams/kultur/article125588099/Wie-die-Krim-zur-Ukraine-kam.html.

[134] Vd. Laas, N.A.: Istorija krymskich tatar perioda pozdnego stalinizma i chruščevkoj „ottepeli": ekskurs v anglojazyčnuju istoriografiju. p. 252.

[135] Luchterhandt: Die Krim-Krise von 2014. *Osteuropa* (DGO) 5-6/2014, p. 63.

[136] Sovetian televidan elsendon de tiu tempo vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=7TXP9JLa6zs.

februaro 1956, kiam Ĥruŝĉov kritikis la "arbitran" persekutadon kaj mortigon de "miloj" da homoj "sen tribunala juĝo" kaj menciis la sorton de la kalmikoj, ĉeĉenoj, inguŝoj, karaĉajoj kaj kabardino-balkaroj. La germanojn, mesĥetojn kaj krimeajn tatarojn li lasis nemenciitaj, sed ŝajnas ke li ankaŭ diris, ke la „ukrainoj povis eviti la sorton de la krimeaj tataroj nur tial, ĉar ili estis tro multnombraj kaj ne ekzistis loko, kien oni estus povinta deporti ilin".[137] Kompare kun la krimeaj tataroj, la popoloj de Kaŭkazo rericevis sian teritorian aŭtonomecon.[138] La rehejmigo de tiuj popoloj trovis sian finon en 1960. Per dekreto de la prezidio de la Supera Soveto de USSR de la 28a de aprilo 1956 la tataroj de Krimeo ricevis la rajton libere moviĝi en la lando, tamen sen garantio, ke ilia konfiskita posedaĵo povos esti redonita aŭ rekompencita. Kaj reveni al Krimeo ankoraŭ estis malpermesite al ili. La tataroj devis subskribi promeson, ke jam okaze de la deportado ili rezignis pri la tuta posedaĵo. Sen tio ili ne povis ricevi enlandan pasporton.

Certe, ilia oficiala ignorado fare de Ĥruŝĉov signifis grandan baton por la krimeaj tataroj, kiuj decidis per aliaj manieroj atingi siajn rajtojn kiel popolo (kaj ne nur kiel nacia minoritato). La nacia movado de la krimeaj tataroj por rehabilitado komenciĝis en 1956/7, nelonge post la seniluziiga elpaŝo de la sovetia gvidanto. En la monatoj post la XXa partia kongreso miloj da krimeaj tataroj sendis individuajn kaj kolektivajn leterojn al la CK de KPSU kaj aliaj pintaj instancoj de partio kaj ŝtato, en kiuj ili postulis la plenan politikan rehabilitadon kaj la permeson reveni al Krimeo. La unua tia kolektiva letero, kiu estis skribita en la nomo de la tuta popolo kaj kiu portis 6000 subskribojn, estis transdonita al la sovetia registaro en julio 1957. En marto kaj aŭgusto 1958 sekvis peticioj kun entute 28´000 subskriboj. Ĝis printempo 1971 al la sovetiaj instancoj estis direktitaj ĉirkaŭ 40 tiaj kampanjoj, kiuj portis dekmilojn da subskriboj de krimeaj tataroj en la nomo de la junularo, virinoj, militaj veteranoj. Ĉi tiu amasmovado atingis sian kulminon en la jaroj 1965-67. Por sia letero al la XXIIIa partia kongreso en marto 1966 la krimeaj tataroj kolektis pli ol 130´000 subskribojn. Kaj tio ne estis ĉio. Laŭ propraj indikoj, ĝis somero 1969 la tataroj skribis milojn da kolektivaj leteroj, kiuj estis senditaj ankaŭ la la respublikaj instancoj de Uzbekio, al la gazetaro kaj al la tribunaloj, tiel ke pli ol tri milionoj da subskriboj estis kolektitaj. Unika kampanjo!

La sovetia registaro nervoze reagis al la agadoj de tiaj naciaj movadoj, kiuj faris kion ili volis kaj kiujn oni ne povis centre kontroli. Kaj ĝi reagis per reprezalioj. La unuaj arestoj de krimeaj tataroj okazis en 1959. Sed la sovetia registaro timis apliki pli drastajn metodojn kontraŭ tuta popolo, ekzemple ĝia fizika neniigo aŭ totala malaperigo en la gulago, ĉar tio povus havi gravajn sekvojn en la interna kaj ekstera politiko. La sovetiaj aŭtoritatoj ankaŭ ne arestis unuavice subskribintojn de memorandoj kaj petleteroj, sed precipe ĝiajn lanĉintojn kaj verkintojn. En la 1960aj jaroj la persekutoj de la krimeaj tataroj okazis laŭ la maniero de la persekutado de similaj nonkonformismaj (protest-)movadoj ene de la sovetia socio. Oni ĉikanis tiujn homojn per interparoloj kun sekurecaj organoj, traserĉadoj de loĝejoj aŭ administraj punoj kaj malliberigoj. Laŭ ampleksa kompilaĵo, kiun la krimeaj tataroj faris en 1973, pli ol 5000 anoj de la krime-tatara popolo suferis diversspecajn reprezaliojn. Kelkdek tataraj komunistoj estis ekskluditaj el la partio, ĉar ili partoprenis en la nacia movado, kaj ĉirkaŭ 100 junuloj estis eksigitaj el Komsomolo. La polico disbatis kunvenojn pli ol dudek foje kaj arestis partoprenantojn. Pli ol 200 krimeaj tataroj estis juĝitaj en 50 procesoj kaj senditaj al malliberejoj por pluraj jaroj, kaj kelkaj estis liveritaj al psikiatriaj klinikoj, kiuj estis preferata rimedo de la sovetia justico por silentigi ribelemajn aktivulojn. La bazo por la juĝoj formis art. 191/4 pri "disvastigo de falsaj elpensaĵoj, kiuj misfamigas la sovetian ordon", kaj art. 191/6 pri „organizado aŭ aktiva partopreno en grupaktivecoj, kiuj lezas la socian ordon" de la punkodo de Uzbeka SSR. Tiuj artikoloj antaŭvidis punojn de ĝis trijara arestado en malliberejo kaj kongruis kun la paragrafoj 190/1 kaj 190/3 de la punkodo de RSFSR. Tiuj paragrafoj estis transprenitaj de ĉiuj respublikaj punkodoj kaj estis aplikataj, ofte en kombinoj kun aliaj artikoloj, ĉie kontraŭ la nacia kaj religia opozicio. La koncernaj movadoj estis en si mem konsiderataj kiel krimaj kaj malamikaj, ĉar ili ne submetiĝis al la centra kontrolo de la sovetia reĝimo. Kulmino de tiu procesondo okazis en julio/aŭgusto 1969 en Taŝkento. Oni ne devas aparte mencii, ke dum tiuj procesoj la punkoda ordo estis grave lezata de la sovetia flanko, ĉar la procesoj estis arbitre okazigitaj kaj manipulataj, kaj la ebleco por la akuzitoj

[137] Vd. http://www.politaia.org/geschichte-hidden-history/abrechnung-mit-stalin-nikita-s-chruschtschow-1956-vor-dem-xx-parteikongres-der-kpdsu. La koncerna frazo mankas en ĉi tiu verzio: http://www.1000dokumente.de/index.html?c=dokument_ru&dokument=0014_ent&object=pdf&st=&l=de.
[138] Vd. http://www.1000dokumente.de/?c=dokument_ru&dokument=0014_ent&object=translation&l=de.

defendi sin estis tre limigita. Multaj taŝkentaj advokatoj rifuzis defendi tiajn akuzitojn, ĉar ili timis perdi sian laborlokon. Unu el la plej konataj kondamnitoj estis Reŝat Dĵemilev (1931-2002), kiu devis iri por tri jaroj en la laborlagron en la Krasnojarska regiono (1973).[139]

Alia signifa aktivulo de la krimeaj tataroj kun sama nomo estis/as Mustafa Dĵemilev (nask. 1943). En 1961 li fondis la subteran organizaĵon "Unio de la krime-tatara junularo". En 1966 li estis arestita kaj kondamnita al 18 monatoj da arestado en malliberejo (ĉar li rifuzis soldatservi en la Ruĝa Armeo). En la prizono li estis akuzita pro kontraŭsovetia propagando. En 1969 li fondis, kun Andrej Saĥarov kaj aliaj sovetiaj disidentoj, la "Iniciatgrupon por defendi la homajn rajtojn en Sovetunio". Kune kun eksgeneralo Pjotr Grigorenko, kiu apogis lian agadon, Dĵemilev estis arestita kaj kondamnita al trijara arestpuno en malliberejo. 1972-74 li laboris, severe kontrolata de KGB, en iu kolĥozo en Uzbekio. En 1974 li estis denove arestita kaj kondamnita al unujara arestpuno en labortendaro (en la distrikto Omsk), ĉar li provis transdoni al la usona prezidento Niksono peticion koncerne la aferojn de la krimeaj tataroj. En la laborlagro li malsatstrikis dum 303 tagoj kaj plu vivis nur dank al deviga nutrado. La sovetiaj aŭtoritatoj certe ne kompatis lin, sed male, ree kondamnis lin al du kaj duono da jaroj da arestado en severa laborlagro. En postaj jaroj Dĵemilev suferis pliajn gravajn reprezaliojn kaj estis ekzilita eĉ al fora Jakutio. En 1983 li estis denove arestita kaj deportita al la distrikto Magadano, kie li estis retenita en alia punlagro. Oni riproĉis al li, ke li misfamigis la politikon de Sovetunio kaj agitis kontraŭ la ŝtato, ĉar inter alie Dĵemilev subskribis proteston kontraŭ la sovetia invado en Afganion. Kiam Gorbaĉov fariĝis nova ĉefo de KPSU, Dĵemilev estis liberigita kaj translokiĝis al Krimeo, kie li sukcese organizis la amasan revenadon de krimeaj tatroj en ties iaman patrujon.[140]

Entute kvar foje reprezentantoj de la sovetia potenco akceptis delegaciojn de la krimeaj tataroj, nome en 1957, 1965, 1966 kaj 1967. En la unuaj du jaroj ili estis akceptitaj de A. Mikojan, tiama ŝtatestro, poste de M. Georgadze, kiu oficis kiel sekretario de la Supera Soveto, kaj en 1967 ili estis akceptitaj de Andropov (vd. sube). En tiuj renkontiĝoj la sovetiaj gvidantoj klopodis trankviligi la tatarojn per iuj promesoj. Sed ili tute ne interesiĝis ricevi limigitan kulturan aŭtonomecon en Uzbekio, kie vivis 70 procentoj de la krimeaj tataroj.

Sen bona organiza laboro tiaj leteraj kampanjoj certe ne estintus imageblaj. Ilian sukceson ebligis la ekzistado de la "konstantaj reprezentantoj de la krimeaj tataroj", kiuj ekagadis en 1964 kiel speco de lobio por la interesoj de la krimeaj tataroj kaj kiuj estis la lanĉintoj kaj aŭtoroj de tiuj memorandoj kaj peticioj. La nombro de tiuj reprezentantoj variis dum la jaroj. Ili devenis el plej diversaj urboj kaj vilaĝoj por reprezenti la tieajn grupojn, de kiuj ili estis delegitaj kaj financitaj. La reprezentantoj konsideris plej grave esti en Moskvo por persone transdoni siajn leterojn al la centraj sovetiaj organoj, por peti aŭdiencojn kaj ricevi respondojn. Tiel, inter 1964 kaj 1973 tie aperis sinsekve pli ol 5000 reprezentantoj, kiuj regule informis sian popolon pri la aktuala stato de la aferoj. Sed la tataraj reprezentantoj ne estis tre bonvenaj. Ekde 1968 ili estis serĉataj de la polico, arestitaj kaj perforte resenditaj al siaj loĝlokoj en Uzbekio, tiel ke oni parolis pri "malgrandaj deportadoj", kaj la moskvaj hoteloj ricevis la ordonon malakcepti krimeajn tatarojn. Tio signifis, ke ekde 1969 ne plu eblis havi konstantajn reprezentantojn en Moskvo. La institucio mem pluekzistadis, kaj la reprezentantoj kunvenis de tempo al tempo laŭ konspira maniero por pridiskuti la aferojn de la movado. Al tiu movado krome apartenis en la loĝlokoj de la krimeaj tataroj specialaj "Agadgrupoj por subteni partion kaj ŝtaton ĉe la solvo de la nacia demando de la krime-tatara popolo". Ĉi tiuj agadgrupoj kunvokis kunvenojn kaj renkontiĝis sur loka aŭ interregiona niveloj. Post la falo de Ĥruŝĉov en oktobro 1964 inter la krimeaj tataroj vekiĝis la espero, ke la nova kolektiva registaro povus bonvole rilate al iliaj petoj kaj deziroj, kaj tiel la movado atingis novan kulminon kadre de la preparado de la XXIIIa partia konferenco en marto 1966. La nombro de tataraj reprezentantoj en Moskvo kreskis al 125, pli ol 14´000 leteroj atingis la centrajn organojn, kaj la reprezentantoj transdonis al la CK sep volumojn, kiuj dokumentis la situacion de la krime-tatara popolo post la deportado en 1944. Sed ankaŭ ĉifoje la centraj instancoj kaj la partia kongreso ignoris la postulojn de la krimeaj tataroj, arestis kaj forpelis ilin de Moskvo en la 25a de junio 1966. La seniluziigitaj krimeaj tataroj reagis per organizado de ondo de protestaj manifestacioj, en kiuj partoprenis centoj kaj poste miloj da krimeaj tataroj. Tiaj amaskunvenoj okazis en Bekabad kaj Angren (oktobro 1966) kaj en Taŝkento (julio kaj septembro 1967) kaj estis

[139] Pri lia sorto vd. la artikolon Решат Джемилев рассказывает о Мустафе Джемилеве sur http://www.milli-firka.org kaj https://uk.wikipedia.org/wiki/Решат_Джемілєв.
[140] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Mustafa_Abduldschemil_Dschemiljew.

perforte disbatitaj de la polico. Okazis pogromecaj tumultoj kaj arestoj de protestantoj, kontraŭ kiuj estis pronocitaj juĝoj por 15-taga arestado en malliberejo. Pluraj organizintoj estis akuzitaj kaj kondamnitaj al plurjara arestado en lagra malliberejo. En somero 1967 la bruo ĉirkaŭ la krimeaj tataroj kreskis, kiam en Moskvo troviĝis pli ol 400 reprezentantoj. La 20an de junio la politburoo de KPSU sentis sin devigita trakti la problemon de la krimeaj tataroj, kaj jam la sekvan tagon KGB-ĉefo Andropov, ĝenerala prokuroro Rudenko, la ministro pri internaj aferoj Ŝĉelokov kaj la sekretario de la Supera Soveto Georgadze akceptis delegacion de 20 krimeaj tataroj. Oni klarigis al ili, ke la problemoj de la krimeaj tataroj povas esti deciditaj nur plej supre de la politika hierarkio, sed Andropov anoncis baldaŭan politikan rehabilitadon, dum la demandon pri la reveno al Krimeo li ne respondis klare. Andropov devis riski, ke lia ´bonvola´ sinteno estas interpretita kiel "kontraŭsovetia". Krom tio oni promesis, ke ĉiuj juraj kazoj rilate la krimeajn tatarojn estos reekzamenataj kaj ke ili rajtos okazigi kunvenojn en Uzbekio, okaze de kiuj la krimeaj tataroj intencis disanonci la rehabilitadon. Sed tiuj du promesoj ne estis efektivigitaj, kaj la krimeaj tataroj esis trompitaj. La okazigitajn kunvenojn de la krimeaj tataroj de la 27a de aŭgusto kaj 2a de septembro, kiuj estis anoncitaj de la organizantoj al la CK de Uzbekio, la polico utiligis por enkonduki novan ondon de arestoj. La nervozeco de la sovetiaj aŭtoritatoj ĉiam kulminis en la 18a de majo kaj 18a de oktobro, kiam la krimeaj tataroj kutimis memori la tagon de la deportado en 1944 kaj la fondon de la Krimea Respubliko en 1921. En tiuj tagoj la polico nepre klopodis eviti novajn manifestaciojn, blokante la aliron al la Lenin-monumentoj, ĉar en tiuj tagoj la krimeaj tataroj volis meti florkronojn ĉe tiuj monumentoj je la honoro de Lenin, al kiu la krimeaj tataroj dankis pozitivan nacian politikon, kiu donis avantaĝojn ankaŭ al la krimeaj tataroj.

Post tio la politika rehabilitado de la tataroj de Krimeo estis proklamita per dekreto (ukazo) de la prezidio de la Supera Soveto USSR de la **5a de septembro 1967**. La dekreto havis la titolon "Pri la civitanoj de tatara nacieco, kiuj pli frue vivis sur Krimeo".[141] En tiu dekreto, subskribita de Nikolaj Podgornyj (kiu estis Unua sekretario de la ukraina KP inter 1957 kaj 1963) kaj M. Georgadze, iamaj decidoj kaj akuzoj de ŝtataj organoj kontraŭ la tuta krime-tatara popolo estis nuligitaj. Aliflanke, la dekreto konstatis, ke la tataroj, kiuj pli frue vivis sur Krimeo, firme integriĝis en Uzbekistano kaj aliaj sovetiaj respublikoj kaj ĝuas plenajn rajtojn de sovetiaj civitanoj, ankaŭ politikajn. Per tio oni verŝajne celis diri, ke la tataroj havas sian loĝlokon kaj ĉion kion ili bezonas kaj ke por la translokiĝo de tiu popolo al Krimeo kialo do ne ekzistas. Oni promesis helpon al ili sur ekonomia kaj kultura kampoj. Alia ordono de la Supera Soveto de la sama tago klare konfirmis al la krimeaj tataroj, ke ili "rajtas loĝi sur la tuta teritorio de Sovetunio, konforme al la validaj leĝoj pri laboro kaj pasportoj". Ĉi tiu formulo ne donis al la krimeaj tataroj definitivan klarecon, ĉu ili rajtas kolektive reveni al Krimeo aŭ ne, sed male, ĝi enhavis ruzan klaŭzon por malhelpi la revenon de la tataroj al Krimeo, kie certe neniu volis revidi ilin. Malgraŭ tio, en la sekvaj monatoj centoj de familioj de krimeaj tataroj revenis al Krimeo proprainiciate, kun personaj riskoj, kiuj estis apenaŭ antaŭvideblaj.[142]

Sed la krimeaj tataroj ne konsentis pri la konkludo de la sovetia registaro, kiu asertis, ke ili plene integriĝis en Uzbekio. En nova protesto, kiun la krimeaj tataroj sendis al la Supera Soveto de USSR, estis notite, ke "nur la popolo mem povas decidi, ĉu ĝi integriĝis aŭ ne en iu loko. La krime-tatara popolo opinias, ke estas neeble integriĝi en lokoj de deviga ekzilo." Dum la krimeaj tataroj, kiuj timis, ke la formala rehabilitado povus sankcii ilian ekzilon en sia "rezervejo" en Uzbekio, atentigadis pri la diskriminacio koncerne ilian loĝrajton, la sovetiaj aŭtoritatoj atentigis pri la komplete ŝanĝiĝinta demografia strukturo sur Krimeo post la dua mondmilito.[143] Evidente temis pri nekongrua argumentado.

Do, la esencaj tri kaŭzoj por bloki grandskalan revenon de la tataroj sur Krimeon estis a) la maldeziro de la politikaj gvidantoj de Uzbekio, kiuj timis perdi la laborforton de la deportitoj, ĉar la krimeaj tataroj estis konsiderataj kiel pli kleraj ol aliaj, b) la kontraŭstaro de la novaj rusaj loĝantoj de Krimeo mem (kiuj cetere sukcese evitis ankaŭ la amasan loĝigon de ukrainoj), kaj c) la suspekto de la centra sovetia registaro, kiu konsideris la krimeajn tatarojn en politika rilato ne sufiĉe fidindaj aŭ lojalaj. Necesis eviti novajn riskajn faktorojn sur Krimeo en formo de tataraj agadoj kontraŭ la rusoj, ĉar Krimeo akiris grandan strategian-militan signifon por Moskvo, kvankam la duoninsulo nun apartenis al

[141] Anglalingvan tekston de la dekreto vd. sub http://www.iccrimea.org/surgun/sovietdecree1967.html.
[142] Vd. Simon, G.: Die nationale Bewegung der Krimtataren (1975). Teil I, p. 13-19; Teil II, p. 1-6.
[143] Vd. Halbach, U.: Aktuelle Entwicklungen in der nationalen Bewegung der Krimtataren, 1988, p. 13.

Ukrainio.[144] Krimeaj tataroj, kiuj aŭdacis reiri al Krimeo, estis misfamigitaj kiel "aŭtonomiistoj" kaj "aventuristoj", dum la aŭtoritatoj de Uzbekio kondutis kiel la "rasistoj de Memfiso".[145] De 1950/9 Uzbekio, kiu funkciis kvazaŭ kiel libere kaj krude ekspluatebla kolonio de Moskvo, estis regata de la uzbeka verkisto, sovetia diplomato kaj komunisma partiestro *Ŝarof Raŝidov*.[146] Kiel li mem, ankaŭ lia posteulo (de 1983) *Inomĵon Usmonĥodĵaev* poste estis akuzita pro korupto kaj nepotismo kadre de la fifama "kotona skandalo" kaj kondamnita (en 1989) al 12-jara arestado en prizono, kin li povis forlasi du jarojn poste.[147] Ĉu eventuale ankaŭ krimeaj tataroj estis envolvitaj en koruptaj skandaloj en Uzbekio, ne estas konate (al mi).



Sovetiaj gvidantoj Mikojan, Andropov, Podgornyj, Breĵnev, Raŝidov

**La krime-tatara nacia movado depost 1967**

Esploristo M. Altan-Batu distingis kvar periodojn de la evoluo de la naciliberiga movado de la krimeaj tataroj: Komenca periodo (1956-64), plej aktiva periodo (1964-69), kriza periodo (1969-87) kaj renoviga periodo (de 1987).[148]

En la tempo de la plumpa poststalinisto Leonid Breĵnev, kiu en Sovetunio mem estis karakterizata kiel "stagna peridodo",[149] delegacioj de krimeaj tataroj ne plu estis akceptitaj, ĉar la sovetiaj potenculoj ne pretis konsideri pliajn postulojn de ilia flanko. Male, pluraj reprezentantoj de la krimeaj tataroj estis arestitaj, juĝitaj kaj senditaj en malliberejojn. La plej drasta kazo de Mustafa Dĵemilev estis rakontita supre. Ankaŭ la oficiala kultura produktado de la krimeaj tataroj en Uzbekio restis tre modesta: nur malmultaj libroj povis aperi, la loka televido dissendis programojn en krme-tatara lingvo nur malofte kaj Radio Taŝkento disaŭdigis elsendojn nur dum unu horo ĉiusemajne en krime-tatara lingvo, precipe popolan muzikon. Aperis du gazetoj: *Lenin bajrag"y* (Ленин байрагъы, Lenina flago, de 1957)[150] kaj *Jıldız* (Stelo, de 1976), sed tiuj publicaĵoj estis enhave ege primitivaj kiel la plimulto de la tiama (loka) sovetia gazetaro en minoritaj lingvoj. Adekvata lerneja instruado ne estis ebla, kaj je dispono estis nur malmultaj instruistoj. Multaj krimeaj tataroj estis asimilitaj kaj rusigitaj kaj grandparte perdis la kapablon flue paroli kaj skribi en sia lingvo, precipe la junaj generacioj. Krime-tataraj kulturaj asocioj funkciis kadre de uzbekaj organizaĵoj. Pro manko de materiaj rimedoj la nivelo de la laboro estis malalta. Multaj krimeaj tataroj bojkotis tiujn asociojn, ĉar ili vidis en ili instrumentojn por perforte reteni la krimeajn tatarojn en Uzbekio. La oficialuloj, kiuj preferis enoficigi lojalajn partianojn inter krimeaj tataroj, utiligis la malmultajn ekzistantajn kulturajn instalaĵojn de la krimeaj tataroj por pruvi, ke ili havas kion ili

---

[144] Vd. Luchterhandt, O.: Die Krim-Krise von 2014. *Osteuropa* 5-6/2014, p. 63s.
[145] Vd. Conquest, R.: Stalins Völkermord, 1970, p. 220.
[146] https://en.wikipedia.org/wiki/Sharof_Rashidov.
[147] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Inomjon_Usmonxoʻjayev. Rusan dokumentan filmon pri la kotona skandalo vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=VZ3bhflFr0s.
[148] Vd. Laas, N.A.: Istorija krymskich tatar perioda pozdnego stalinizma i chruščevkoj „ottepeli": ekskurs v anglojazyčnuju istoriografiju. p. 255.
[149] Kvankam nemalmultaj sovetianoj memoras la 1970ajn jarojn kiel „plej bonan tempon" en Sovetunio, precipe el ekonomia vidpunkto (kompare kun tio, kio estis antaŭe).
[150] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Yani_dyunya

bezonas, dum neoficialaj tataraj agadoj ne estis subtenataj de la ŝtato. La neoficialaj funkciuloj de la krimeaj tataroj en Uzbekio konsideris tiujn oficialulojn “perfiduloj”. La Granda Sovetia Enciklopedio (1973) skribis, ke „la lingvo de la tataroj estis parolata ĝis 1944 sur Krimeo kaj estas nuntempe parolata grandparte en Uzbeka SSR”. Neoficiale aŭ oficiale la krime-tatara lingvo estis konsiderata kiel dialekto de la tatara lingvo.

Daŭraj ĉikanoj, persekutoj, arestoj kaj persekutoj celis lacigi kaj elĉerpi la fortojn de la nacia movado de la krimeaj tataroj, sed ili ne lasis sin malkuraĝigi. Kiam la 21an de aprilo 1968 en la uzbeka urbo Ĉirĉik krimeaj tataroj volis omaĝi la naskiĝtagon de Lenin, la polico forpelis ilin per akvoĵetiloj kaj bastonoj. Kiel respondecaj ordonintoj de tiu atako estis menciitaj la sekretario de la urba partio, Jakubov, la komandisto de la loka garnizono, Ŝaral´jov, kaj la sekretario de la uzbeka KP, Lomonosov. Pli ol 300 manifestaciantoj, al kiuj oni riproĉis, ke ili “ribelis kontraŭ la ŝtato”, estis arestitaj, dum 12 personoj, de kiuj multaj eĉ ne partoprenis la manifestacion, estis kondamnitaj al longa arestado en malliberejo. En Samarkando la aŭtoritatoj provokis tumultojn, post kiam ili akuzis la tatarojn, ke ili lezis armenan tombejon. La 22an de aprilo Ajder Bariev flugis al Moskvo por transdoni proteston al Rudenko, kiu rifuzis trakti la plendon. Post tio Pjotr Grigorenko (vd. sube) skribis al Rudenko por klarigi al li la problemon. Sed la solidareco inter krimeaj tataroj daŭre estis sufiĉe forta. 800 krimeaj tataroj aperis en somero 1968 en Moskvo. Sed ili estis kaptitaj kaj reekspeditaj per kamionoj al Uzbekio; la tuta operaco estis gvidata de generala Volkov, ĉefo de la moskva sekureca servo. La moskva ŝtata prokuroro Stasenkov klarigis al ili, ke la krime-tatara demando “estas solvita por ĉiam”. La 21an de julio 1968 – oni troviĝis en la tempo de la “Praga Printempo” kaj unu monaton antaŭ la invado de sovetiaj trupoj en Ĉeĥoslovakion – la krimeaj tataroj eldonis “Alvokon al la monda publiko”, subskribitan de 118 personoj, en kiu ili prezentis siajn postulojn kaj petis helpon, por ke ili povu reiri al Krimeo. La sovetia reakcio atingis novan kulminon, kiam la 1an de julio 1969 dek krime-tataraj gvidantoj estis akuzitaj en taŝkenta tribunalo pro “kontraŭsovetia propagando”. La kondamnitoj ricevis drastajn prizonajn punojn. Iuj el ili, kiuj jam troviĝis en la malliberejo, tamen estis liberigitaj. Grigorenko, kiu veturis al Taŝkento por helpi la akuzitojn, estis arestita. Kelkaj krimeaj tataroj sendis proteston al la Homrajta Komisono de UN.[151]

Ampleksa deklaracio direktita de la krimeaj tataroj al la XXIVa kongreso de KPSU en marto 1971 prezentis 55´000 subskribojn. Okaze de la 50a datreveno de la fondo de USSR du petleteroj al la sovetia registaro en somero 1972 trovis kune 38´000 subskribojn. Alia letero al la CK en decembro 1973 estis subskribita de 6´800 tataroj. La akrigo de la situacio de la krimeaj tataroj estis kaŭzita ne nur pro la ĝenerala subpremado de la libereco en la breĵneva tempo, sed ankaŭ pro la ´kulpo´ de la krimeaj tataroj mem, kiuj komencis serĉi rilatojn kun la en- kaj eksterlanda publiko, precipe en la medioj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj estis ligataj kun la klopodo akiri la subtenon flanke de la movadoj por homaj kaj civitanaj rajtoj en Sovetunio mem kaj de la internacia komunisma movado, de kiu oni postulis, ke ĝi enmiksiĝu por helpi la krimeajn tatarojn. Pri la propra sovetia ŝtatpartio oni estis seniluziigita, ĉar ĝuste de ĝi la krimeaj tataroj atendis, ke ĝi trovos “leninisman solvon” de la krime-tatara demando. Sed la oficiala rehabilitado de 1967 evidentiĝis kiel pura formalaĵo sen senteblaj sekvoj, kaj vera internacia helpo por la krimeaj tataroj ne okazis. Pro tio la situacio de la krimeaj tataroj restis nekontentiga kaj ilia nacia demando nesolvita. En tiaj cirkonstancoj la tono de la argumentado de la krime-tatara samizdato fariĝis pli kaj pli akra kaj radikala. Oni komencis paroli pri “naciliberiga movado”, kiu batalas kontraŭ la “malamikoj de la socialismo”, kiuj perversigis la leninismon (evidente temis pri la aktuala sovetia registaro). Per tio la radikala alo de la krime-tatara naciisma movado, kiu pretendis reprezenti la “veran leninismon” kaj elpaŝis kontraŭ “reviziismo” kaj “kontraŭ-revolucio”, alprenis konspiran karakteron kaj iusence mem fariĝis sektema (aK), transprenante la saman ideologian terminaron de la leninistoj kaj stalinistoj, sen alternativo demokratie solvi la konflikton, kio en Sovetunio, kiu estis ´totalisma´ ŝtato, estis neebla afero. La deportado de 1944 estis interpretita kiel fina akto de la *carisma* politiko, kiu estas plenumenda de la partio de la sovetia potenco, kiu celas liberigi Krimeon de la krimeaj tataroj kaj neniigi la malgrandajn popolojn per genocido kaj teritoria anekso.

Krom de Andrej Saĥarov mem, gravan moralan apogon la nacia movado de la krimeaj tataroj ricevis de la supre menciita eksa sovetia generalmajoro Pjotr Grigorenko (kiu estis de ukraina deveno) kaj de la rusa verkisto Aleksej Kostjorin, kiuj montris sin solidaraj kun la krimeaj tataroj. Kostjorin, membro de la KP de 1916, kiu en pli fruaj jaroj engaĝiĝis jam favore al la ĉeĉenoj kaj volgiaj germanoj, resendis

[151] Vd. Conquest, R.: Stalins Völkermord, 1970, p. 219-223.

sian membrokarton al la partio. En kuraĝa parolado okaze de la naskiĝtago de Kostjorin en 1968 Grigorenko laŭdis la insistan kaj noblan lukton de la krimeaj tataroj por sia politika rehabilitado, kontraŭ diskriminado kaj por homaj rajtoj. Li atentigis, ke laŭ art. 123 de la sovetia konstitucio la rekta aŭ nerekta limigo de la rajtoj de civitanoj lige kun ilia rasa aŭ nacia aparteneco estas malpermesata kaj punenda de la leĝo. Laŭ tio, la leĝo do estis je la flanko de la krimeaj tataroj. Grigorenko avertis la tatarojn, ke ili ne subtaksu la danĝeran karakteron de siaj malamikojn, ĉar ili estas malhonestaj, kaj ke eĉ inter krimeaj tataroj mem troviĝas tiaj homoj. Li kuraĝigis ilin daŭrigi sian lukton, eluzante la rajtojn de parolado kaj gazetaro, kunvenoj, manifestacioj kaj protestmarŝoj. Krome, li rekomendis al ili kontakti ĉiuspecajn "progresemajn" homojn en Sovetunio kaj alvoki la mondan publikon kaj la internaciajn organizaĵojn por klarigi al ili, ke ĉe la deportado de 1944 temas pri genocido, almenaŭ laŭ la difino de Unuiĝintaj Nacioj. Dum Kostjorin forpasis en 1968, Grigorenko, kiu kuraĝis kritiki la sovetian reĝimon pro ties laŭdira forlaso de la leninisma kurso, estis arestita kaj malaperis por longa tempo en psikiatria kliniko.[152] Apartajn leterojn krimeaj tataroj sendis al Kurt Waldheim, ĝenerala sekretario de UN, kiu mem partoprenis kiel germana soldato en la dua mondmilito en diversaj militkrimaj operacoj kontraŭ diversaj landoj kaj popoloj, kaj al Nicolae Ceauşescu, fifama prezidento de Rumanio, kiu kuraĝis kontraŭstari Moskvon ene de la komunisma bloko, sed mem draste subpremis sian popolon, precipe la etnajn minoritatojn de la hungaroj kaj germanoj.

Al tiu tuta tuta konflikto kontribuis la kolero de la krimeaj tataroj, kiuj komprenis, ke la sovetiaj instancoj malhelpas la reintegriĝon de la tataroj, kiuj revenis al Krimeo. Ŝajnas, ke la lokaj instancoj de Krimeo ricevis la ordonon rifuzi al la revenintoj la restadpermeson aŭ helpi al ili trovi laborlokon. Elspezante sian tutan monon, multaj tataroj vane vagadis tra Krimeo por trovi restadon kaj laboron, por finfine esti arestitaj de la polico kaj resenditaj al Centra Azio. Laŭ indikoj de krimeaj tataroj, en la unua jaro post la rehabilitado ĉirkaŭ 12´000 nacianoj estis forpelitaj de Krimeo. Nur 18 familioj kaj 13 individuoj sukcesis ricevi restadpermeson, dum 17 estis punitaj pro malobeo de pasportaj reguloj, kontaŭstarado kontraŭ la ŝtato aŭ partopreno en la nacia movado. Tiel, en 1968 ripetiĝis similaj pogromecaj scenoj kiel ili okazis jam en 1944. Al la krimeaj tataroj estis eĉ malpmermesite loĝadi en ukrainaj limregionoj proksime de Krimeo. Kelkaj familioj ripete veturis al Krimeo kaj ĉiam denove estis reekspeditaj. Tiel, en la jaroj 1968-9 nur ĉirkaŭ 900 familioj aŭ 4000 individuoj ricevis restadpermeson sur Krimeo, parte post multaj kvereloj kun la aŭtoritatoj, kiuj daŭris dum jaroj. De tiuj 900 familioj ĉirkaŭ 250 venis kun oficialaj laborfortoj, kiuj estis rekrutitaj en Centra Azio. La kandidatoj devis promesi, ke ili ne partoprenas aŭ subtenas la nacian movadon de la krimeaj tataroj. Ŝajnas, ke la sovetia registaro celis elsekigi la nacian movadon de la krimeaj tataroj en Centra Azio. Sed ekzistis ankaŭ multaj krimeaj tataroj, kiuj estis integritaj en Centra Azio kaj eĉ ne deziris reveni al Krimeo. Ŝajnas, ke tiu klopodo reteni la krimeajn tatarojn en Centra Azio havis ankaŭ ekonomian aspekton, ĉar la sovetia registaro volis eviti, ke relative bone edukitaj fakuloj forlasu la subevoluintajn regionojn de Uzbekio. En la postaj jaroj novaj restadpermesoj por Krimeo ne plu estis donitaj. Anstataŭ krimeaj tataroj, la sovetia registaro loĝigis sur Krimeo centmilojn da rusoj kaj ukrainoj. Laŭ krime-tataraj indikoj, ankaŭ post 1967 la manipulata reloĝigo de Krimeo estis akcelata kaj atingis 40-45´000 migrantojn en ĉiu jaro. Pri konfliktoj kun krimeaj tataroj la oficiala sovetia gazetaro ne raportis. Aliflanke, la "krime-tatara demando" internacie vekis la atenton kaj intereson de la okcidenta publiko, des pli ke ĝis 1979 oni eksciis pri la arestado de almenaŭ 17 gvidantoj de la krimea nacia movado,[153] tiel ke la afero iĝis pli kaj pli embarasa por la sovetia registaro, kiu estis alfrontita per malagrabla kritiko el eksterlando. Sed ĉar la logiko de la politika pensado en Okcidento ne multe impresis la sovetiajn gvidantojn, kiuj rigide insistis pri siaj konvinkoj, la "krime-tatara demando" daŭre restis nesolvita ankaŭ sub Jurij Andropov kaj Konstantin Ĉernenko, kiuj sekvis en la ofico kiel ĉefoj de KPSU post la longe atendata morto de la malsana Breĵnev en 1982.[154] Do, necesis atendi pli favorajn tempojn.

[152] Biografiajn notojn vd. sub http://mirror577.graniru.info/Society/History/m.207454.html. La anglalingva teksto de la parolado de P. Grigorenko estas trovebla sub http://www.iccrimea.org/surgun/grigorenko.html.
[153] Laŭ Sasse, Die Rückkehr-Bewegung der Krimtataren, p. 339.
[154] G. Simon: Die nationale Bewegung der Krimtataren (1975). Teil II, p. 6-19.

**Evoluo dum la regadoperiodo de Miĥail Gorbaĉov (dua duono de 80aj jaroj)**

Novajn esperojn por solvi sian sorton la krimeaj tataroj havis, kiam en marto 1985 nova ĝenerala sekretario de KPSU fariĝis Miĥail Sergeeviĉ Gorbaĉov (nask. en 1931). Sub la sloganoj de "transparenteco" (glasnost´) kaj "rekonstruado" (perestrojka), kiujn li propagandis, la problemoj de Sovetunio devis esti larĝe diskutataj kaj solvataj. Certe, lia politiko liberigis temojn, kiuj antaŭe estis severe subpremataj kaj tabuataj. Subite ĉio iris tro rapide, tiel ke la "procezo", kiun Gorbaĉov lanĉis, ne plu estis haltigebla. Sub Gorbaĉov Ruslando, Eŭropo kaj la tuta mondo estis enkondukataj al la postkomunisma epoko, kun neantaŭvideblaj sekvoj. La okcidentanoj entuziasmiĝis pri liaj politikaj intencoj kaj la unika karismo de "Gorbi", kiu malfermis Sovetunion al la mondo, tiel ke ĝi pli kaj pli perdis la hororon, kiun ĝi disradiis ankoraŭ dum la regadotempo de Breĵnev, Andropov kaj Ĉernenko, kiuj reprezentis la malnovan ideologion, kiu formis integran parton de la Malvarma Milito.


La novan politikan klimaton ankaŭ la krimeaj tataroj certe volis eluzi por siaj celoj. La jubilea datreveno de la oktobra revolucio en 1987 donis al ili okazon por atentigi pri la propra situacio. La 11-12ajn de aprilo de tiu jaro en la domo de Mustafa Ĥalilov en Taŝkento (Uzbekio) okazis unua kunsido de la "Tutunia kunveno de la delegitoj de la iniciataj grupoj de la krime-tatara nacia movado" (CIG).[155] La delegitoj aprobis "peticion de la krime-tatara popolo", kiun ili volis sendi al la ĝenerala sekretario de KPSU, en kiu la postuloj de la krimeaj tataroj al la sovetiaj aŭtoritatoj estis ripetataj. Gorbaĉov estis rememorigita pri tio, ke malgraŭ konstanta sendado de delegitoj al Mokvo kaj dekmiloj da leteroj al la centra sovetia gazetaro, la naciaj rajtoj de la krimeaj tataroj ankoraŭ ne estas restarigitaj. Krom tio oni bedaŭris, ke neniu sovetia gazeto traktis la temon ĝis nun, kaj ke anstataŭ tio centoj de aktivuloj suferis persekuton kaj reprezaliojn kiel eksigon el lernejoj kaj el la partio, kiel ekziladon kaj ekscivitanigon, malliberigon en lagroj kaj sendadon al psikiatraj klinikoj. Oni emfazis, ke tia praktiko ne estas kongrua kun la validaj leĝoj de Sovetunio, kiu subskribis ankaŭ diversajn homrajtajn konvenciojn de la internacia juro. Kiel konkretaj postuloj estis menciitaj en la letero: senprokrastaj paŝoj por baldaŭa reveno de la tataroj al Krimeo; restarigo de la "nacia ŝtateco en nia nacia patrujo Krimeo"; nuligo de ĉiuj dekretoj, kiuj limigas la rajtojn de la krimeaj tataroj; liberigo de ĉiuj enprizonigitaj krimeaj tataroj kaj rehabilitado de ĉiuj subpremataj krime-tataraj gvidantoj; publikigo de ĉiuj leteroj kaj petioj de la krimeaj tataroj kaj aliaj civitanoj, akcepto de krime-tataraj reprezentantoj far partiaj gvidantoj.

Sed malgraŭ glasnosto kaj perestrojko, la sekva ´dialogo´ kun partiaj kaj ŝtataj instancoj montriĝis sufiĉe malfacila. Gorbaĉov mem ne respondis kaj daŭre hezitis solvi la krime-tataran demandon laŭ la imago de la krimeaj tataroj, sed anstataŭ li, la 26an de junio 1987 Pjotr Demiĉev, vicprezidanto de la Supera Soveto (kaj antaŭe ministro pri kulturo dum multaj jaroj[156]), akceptis delegacion de krimeaj tataroj kaj faris al ili ne pli ol la promeson, ke li transdonos iliajn petojn al Gorbaĉov kaj konsilis al ili forlasi Moskvon. Same reagis jam la sovetiaj gvidantoj, kiuj akceptis tatarojn en antaŭaj jaroj. Ĉar tiu renkontiĝo ne kontentigis la tatarojn, ili restis en Moskvo. La 6an de julio okazis manifestacio de ĉirkaŭ 120 krimeaj tataroj sur la Ruĝa Placo proksime de la Lenina maŭzoleo, dum kiu ili prezentis afiŝojn kun sloganoj kiel "redonu la patrujon al nia popolo!", "restarigu la rajtojn de la krimeaj tataro!j", "demokratio, glasnosto ankaŭ por la krimeaj tataroj!" ktp. Agentoj de KGB forprenis iliajn afiŝojn kaj klopodis forpeli la manifestaciantojn, kiuj sidiĝis sur la tero kaj rifuzis foriri, daŭrigante laŭtkrii diversajn sloganojn. Sed baldaŭ la polico aperis kaj ordonis al la protestantoj forlasi la Ruĝan Placon. Kelkaj el ili transiris al la konstruaĵo de la CK KPSU ĉe la Malnova Placo. Tie la polico same provis forpeli ilin. Post tio estis anoncite, ke Demiĉev akceptos la tatarojn. La delegacio konsistis el kvin personoj, kiuj eksciis, ke la akcepto okazis laŭ mendo de Gorbaĉov. Demiĉev klarigis, ke estonte tuta vico de partiaj sekcioj estos okupataj por ekzameni la postulojn de la krimeaj tataroj, tiel ke necesas atendi du-tri semajnojn. Al la tataroj oni denove konsilis haltigi la protestagadojn kaj forlasi Moskvon. Malgraŭ tiu admono, la krimeaj tataroj ne cedis kaj daŭrigis siajn aktivecojn en la ĉefurbo. La 7an de julio tri tataroj partoprenis en la malfermo de la "glasnost-klubo", kiu estis organizita de moskvaj homrajtaj defendistoj, inter alie Larisa

[155] Ruslingve Central´naja Iniciativnaja gruppa, CIG). Surbaze de Central´naja Iniciativnaja gruppa (CIG) fondiĝis la plej influaj organizaĵoj "Nacia Movado de la krimeaj tataroj" (Nacional´noe Dviženie Krymskich Tatar, NDKT), kiu estis fondita de Jurij Osmanov en la valo de Fergana, kaj "Organizaĵo de la krime-tatara nacia movado" (Organizacija Krymskotatarskogo Nacional´nogo Dviženija, OKND). OKND estigis en majo 1989 en Taŝkento kun la celo kunordigi la agadojn de la regionaj grupoj ene de la nacia movado kaj konstrui efikan strategion.

[156] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Pjotr_Nilowitsch_Demitschew.

Bogoraz, edzino de Anatolij Marĉenko, kiu elpaŝis favore al la rajtoj de la krimeaj tataroj kaj pereis en sovetia prizono la antaŭan jaron post kvarmonata malsatstriko.[157] Cetere, tiun fondan kunvenon ĉeestis ankaŭ eksterlandaj gazetaraj korespondantoj, sed invititaj sovetiaj ĵurnalistoj ne aperis. Dum la kunveno la tataroj klarigis la kaŭzojn de sia manifestacio sur la Ruĝa Placo kaj raportis pri la posta akcepto ĉe la CK KPSU. La 8an de julio grupo de krimeaj tataroj renkontiĝis kun la verkisto Evgenij Evtuŝenko, kiu esprimis sian solidarecon kun la lukto de la krimeaj tataroj kaj mem skribis noton al la adreso de la prezidio de la Supera Soveto de USSR. Reage al la iamaj akuzoj kontraŭ la krimeaj tataroj, kiuj estis stigmatizitaj de la stalinistoj kiel perfiduloj de Sovetunio, lia letero entenis inter alie la atentigon, ke la krimeaj tataroj heroe batalis kontraŭ la germanaj faŝistoj, kaj la postulon, ke oni finu la "kontraŭhumanecan rilaton al plenrajta membro de nia socio kaj ebligu al ili vivi kaj labori tie", kie ili sentas sin hejme, nome sur Krimeo. Cetere Evtuŝenko opiniis, ke la reveno de la tataroj al Krimeo kontribuus al la prosperado de Krimeo kaj al la amikeco inter la popoloj de "nia patrujo".[158] Per tio la fama sovetia poeto, kies patro estis de germana deveno, faris al la krimeaj tataroj gravan komplezon. Krom Evtuŝenko ankaŭ aliaj sovetiaj verkistoj kaj artistoj esprimis sian solidarecon kun la krimeaj tataroj, inter kiuj menciindas Bulat Okudĵava, Anatolo Pristavkin kaj Sergej Baruzdin.[159]



Sovetianoj, kiuj apogis la krimeajn tatarojn kaj pledis por ties rajtoj: Saĥarov, Grigorenko, Evtuŝenko, Okudĵava, Pristavkin, Baruzdin.

La antaŭvidita kreo de speciala komisiono ĉe la Supera Soveto okazis la 9an de julio kaj havis la taskon "ekzameni la demandojn levitajn de la krimeaj tataroj". La "Gromyko-komisiono", kiel tiu gremio ankaŭ estis nomata, ĉar ĝi estis prezidata de Andrej Gromyko, kiu tiam estris la prezidion de la Supera Soveto de USSR kaj funkciis kiel formala ŝtatestro, konsistis el naŭ altrangaj membroj, inter kiuj ses apartenis al la politburoo, inter alie Viktor Ĉebrikov, ĉefo de KGB, V. Vorotnikov, ĉefministro de RSFSR, kaj A. Jakovlev, konsilisto de Gorbaĉov. En tiu komisiono troviĝis ankaŭ la partiaj ĉefoj de Uzbekio (I. Usmonĥodĵaev) kaj Ukrainio (V. Ŝĉerbickij), krome P. Demiĉev, vicprezidanto de la prezidio de la Supera Soveto de USSR, A. Luk´janov, sekretario CK KPSU, kaj G. Razumovskij. Aligitaj al tiu ŝtata komisiono estis diversaj lokaj komisionoj el Uzbekio, Taĝikio, Krasnodaro, Ĥersono kaj Krimeo. Pri la oficialaj reprezentantoj flanke de la krimeaj tataroj en tiu komisiono aperis la kritiko, ke oni elektis reprezentantojn, kiuj ĝuas tro grandan fidon de la aŭtoritatoj. La tasko de la laborgrupoj devis esti fari proponojn pri "nuligo de malfaciligoj por la krimeaj tataroj en siaj loĝlokoj" kaj "precizigi" la kondiĉojn por loĝi, studi kaj labori sur Krimeo "en individuaj kazoj". Krom tio, oni intencis intensigi la flegadon de la lingvo, folkloro kaj historio per aperigo de pli da libroj, fondo de novaj gazetoj kaj firmigo de la kultura heredaĵo de la krimeaj tataroj. Iu delegacio vizitis Uzbekion. Por altigi la premon la krimeaj tataroj anoncis, ke ili organizos novajn manifestaciojn, se la krime-tataraj postuloj ne estos pozitive responditaj ĝis la 26a de julio. Sed Gorbaĉov ne akceptis ultimatojn. Certe, ankaŭ li hezitis permesi al la tataroj amase reveni al Krimeo kun la kutima klarigo de la sovetiaj instancoj, ke tie nun ekzistas alia demografia situacio kaj ke unue oni devas konsulti la opinion de la rusoj, ukrainoj kaj aliaj naciecoj, kiuj tie vivas.

---

[157] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Anatoli_Tichonowitsch_Martschenko.
[158] La tekston vd. sub http://kirimtatar.com/index.php?option=com_content&task=view&id=434.
[159] Pri ilia signifo vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jewgeni_Alexandrowitsch_Jewtuschenko, https://de.wikipedia.org/wiki/Bulat_Schalwowitsch_Okudschawa, https://de.wikipedia.org/wiki/Anatoli_Ignatjewitsch_Pristawkin, https://ru.wikipedia.org/wiki/Сергей_Алексеевич_Баруздин.

La 23an de julio okazis nova plurhora manifestacio ĉe la rezidejo de la CK KPSU, kie ĉirkaŭ cent krimeaj tataroj postulis renkontiĝon kun Gorbaĉov. Sed el la konstruaĵo eliris nur la estro de la akceptejo de la CK, A. Molokoedov. Posttagmeze la tataroj migris al la Ruĝa Placo, kie ili estis haltigitaj de la polico. Sekve, ĉirkaŭ 600 homoj sidiĝis sur la tero kaj rifuzis forlasi la placon, antaŭ ol iliaj postuloj ne estos plenumitaj. Vespere okazis neantaŭvidita afero, kiu esence turnis la pluan evoluon. En la televido la centra sovetia novaĵagentejo TASS publikigis komunikon, kiu ege surprizis la krimeajn tatarojn, kiuj apenaŭ povis kredi kio okazis. La komuniko enhavis eldirojn, formulojn kaj konstatojn, kiuj estis prezentitaj kvazaŭ kiel ripeto de la riproĉoj kaj akuzoj de 1944 kontraŭ la krimeaj tataroj: Estis konfirmite, ke la siatempa deportado de la krimeaj tataroj al Centra Azio okazis lige kun ilia kunlaboro kun la germanaj faŝistoj, ke kun germana aprobo siatempe estis fondita “muzulmana kongreso” kaj “krimea registaro”, ke krime-tataraj libervoluloj aktive partoprenis en la kontraŭbatado de partizanoj kaj en la starigo de “mortiga zono”, ke “ekstremistoj” de la krimeaj tataroj okazigis punekspediciojn kontraŭ alietnaj loĝantoj de Krimeo, pro kio mortis 86´000 homoj, kaj ke en iu sovĥozo krime-tataraj “perfiduloj” bruligis vivantajn homojn en forno. Kvankam en la komuniko oni konfesis, ke la decido deportadi la tutan krime-tataran popolon estis eraro, ĉar ankaŭ miloj da tataroj batalis kontraŭ la faŝistoj, kaj ke oni devas havi komprenon por la tiama decido, kiu respegulis la “malfacilajn militajn cirkonstancojn kaj la etoson de tiu tempo”, kiuj estas ligitaj kun la faŝisma atako kontraŭ Sovetunio, la stigmo kontraŭ la krimeaj tataroj kiel perfiduloj estis konservata. Krom tio TASS avertis, ke la rehabilitado de la krimeaj tataroj de 1967 jam plene okazis per la restarigo de iliaj konstituciaj rajtoj, ke pli ol dek mil tataroj estis reloĝigitaj sur Krimeo kaj ke tiu procezo estos daŭrigata. Ripetiĝis ankaŭ la argumento, ke la demografia situacio sur Krimeo ŝanĝiĝis, tiel ke oni estas devigata solvi la problemojn trankvile, konsiderante la interesojn de ĉiuj popoloj vivantaj sur Krimeo. Kvazaŭ la sovetia ŝtato timis tion, TASS avertis, ke alvokoj de la krimeaj tataroj al la publiko en eksterlando ne servas al la afero. La komuniko donis impreson pri tio, en kiu direkto la sinteno kaj laboro de la Gromyko-komisiono iros.

La reago de la krimeaj tataroj, kiuj estis ŝokitaj pri tiu TASS-komuniko, kiu estis publikigita la postan tagon ankaŭ en la centra gazetaro, estis tute negativa kaj konsterna. En la loĝlokoj de la krimeaj tataroj formiĝis novaj iniciataj grupoj, centoj da reprezentantoj estis senditaj al Moskvo, kaj iu “kunveno de krime-tataroj laboristoj” en la urbo Jangijul,[160] kie vivis Mustafa Dĵemilev, postulis la reprenon de tiu komuniko, kiu laŭ la opinio de la krimeaj tataroj estis verkita de malamikoj de la perestrojko kaj nur misinformis la publikon. En malferma protesto al la CK KPSU kaj al la Supera Soveto de USSR, kiu estis verkita de membroj de CIG-membroj (Fuat Abljamitov, Seitumer Emin kaj Amet Abduramanov), krime-tataraj reprezentantoj kiel la militaj veteranoj Bekir Umerov, Eskender Fazylov kaj Amza Ablaev publike eldiris sian opinion pri tiu TASS-komuniko kaj precizigis kaj regustigis ĝiajn falsajn asertojn kun la averto, ke la deportado de 1944 egalis al forpelo de tuta popolgrupo, ke ĝin konsistigis fakte 27% (kaj ne 19%) tataroj kaj ke malbonaj intencoj flanke de la muzulmana kongreso kaj krimea registaro ne ekzistis. Oni klarigis ankaŭ, ke la viktimoj de faŝimaj atakoj en la operaca regiono de partizanoj fakte estis ĉefe krime-tataraj vilaĝoj, kaj ke en la menciita eksceso en la sovĥozo ´Krasnyj´ partoprenis nur du tataroj. Ankaŭ iuj sovetiaj intelektuloj vidis en la TASS-komuniko nur provon refreŝigi la kolektivan akuzon kontraŭ la krimeaj tataroj pere de sanga nigrapentrado kaj la intencon lanĉi malamon kontraŭ ili.

Por emfazi sian proteston kontraŭ la komuniko de TASS, la 25an de julio la krimeaj tataroj okazigis sian plej grandan manifestacion sur la Ruĝa Placo. Duonmilo levis afiŝojn kun portretoj de Lenin kaj Gorbaĉov, kriante sloganojn kiel “Patrujo! Patrujo!”, “Gorbaĉov! Gorbaĉov!”, “Honto al TASS”! ktp. La polico ne intervenis sed ŝirmis la manifestaciantojn kontraŭ la ĉirkaŭanta publiko per kordono. 150 protestantoj restis nokte sur la placo.

La 26an de julio Aleksandr Vlasov,[161] ministro pri internaj aferoj, anoncis al la krimeaj tataroj la proponon esti akceptitaj de Gromyko persone. Sed la krimeaj tataroj rifuzis tiun proponon, ĉar ili volis esti akceptitaj de Gorbaĉov mem.

---

160 Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Янгиюль.

161 Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_Vlasov_(politician).



Komisionanoj, kiuj devis okupiĝi pri la krimeaj tataroj en 1987: Gromyko, Ĉebrikov, Jakovlev, Vorotnikov, Ŝĉerbickij, Usmonĥodĵaev.

Nu, okazis, ke la 27an de julio Gromyko akceptis delegacion de 21 krimeaj tataroj en la Kremlo. La kunvenon ĉeestis ankaŭ Vlasov kaj Demiĉev. Ĉeestantaj atestantoj poste rakontis, ke Gromyko alvokis al pacienco, ne donis konkretan respondon sed antaŭ ĉio disbatis ĉiun esperon pri reveno de la tataroj al Krimeo.[162] Ŝajnas, ke tio estis la ´oficiala´ kaj definitiva respondo de la ŝtato. Pli da substanco la krimeaj tataroj ne povis atendi de la Gromyko-komisiono. La sekvan tagon la tataroj kolektiĝis en la parko de Izmailovo kaj decidis resti en Moskvo por daŭrigi siajn protestojn kaj ankaŭ direkti siajn postulojn al la gvidantoj de la registaroj de la mondo por peti helpon. La polico komunikis al la tataroj, ke ili rajtas daŭrigi siajn manifestaciojn en Moskvo ekster la Ruĝa Placo. Tamen la polico ĉikanis unuopajn tatarojn, kiuj tranoktis en loĝejoj de moskvaj disidentoj kaj alvokis ilin forlasi la ĉefurbon. Fine de julio ĉirkaŭ 110 krime-tataraj reprezentantoj troviĝis en Moskvo. 200 okazigis manifestacion sur la Puŝkina Placo fakte sen esti ĝenata de la polico.

La reagoj de la ŝtataj instancoj al la agadoj de la krimeaj tataroj en Moskvo estis registrita en sekreta dokumento de la 6a de aŭgusto kun la titolo "Pri la efektivigo de la preventa laboro de la prokuroraj organoj inter krimeaj tataroj vivantaj en Uzbekistano". La evidenta celo de la aŭtoritatoj estis pli draste kontroli kaj subpremi la protestojn de la krimeaj tataroj. Samtempe en Uzbekio estis fondita laborgrupo de 11 ´fidindaj´ personoj, kiuj devis ´harmoniigi´ la laboron kun la Gromyko-komisiono. Por protesti kontraŭ tiu nova komisiono la 9an de aŭgusto okazis manifestacio en la urbo Bekabad, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 2000 homoj. Por malrapidigi la procezon, Buturlin, la prokuroro de Uzbekio, ripetis la frazaĵojn de la Gromyko-komisiono kaj admonis la tatarojn, ke "neorganizitaj manifestacioj kaj malrespektado de la publika ordo estas malpermesataj" kaj ke oni havu paciencon kaj donu al la komisiono la eblecon "trankvile solvi tiun komplikan demandon".[163]

Novan kulminon de la publika atento la krimeaj tataroj atingis en aŭtuno lige kun la 18a de oktobro, kiu, kiel konate, estas la dato de la fondo de la krimea ASSR en 1921. Jam la 7an de oktobro, tago de la konstitucio, ĉirkaŭ 2000 tataroj komencis marŝi de Taman´ en la krasnodara distrikto al Simferopolo, ĉefurbo de Krimeo. La antaŭan tagon la gazeto de Krasnodar, *Sovetskaja Kuban´*, avertis pri planita provokado de krime-tataraj "ekstremistoj" kaj minacis akuzi la protestantojn pro foresto ĉe la laborloko. La marŝo tamen komenciĝis sed estis baldaŭ haltigita, ĉar la aŭtoritatoj rifuzis al la marŝantoj atingi Krimeon, kiu estis fermita laŭdire pro iu bruta epidemio. Ŝajne okazis ankaŭ detruado de fenestroj de busoj. La 15an de oktobro la Gromyko-komisiono anoncis novajn kulturajn rajtojn por la krimeaj tataroj por haltigi la ekscesojn de la krime-tatara nacia movado.[164]

Sed la tuta ĝisnuna peza procezo havis ankaŭ pozitivajn aspektojn por la krime-tatara movado. En la ĉefa raporto okaze de la 4a Tutunia kunveno de CIG, kiu okazis la 23an de aprilo 1988 en la vilaĝo Paĥta, oni povis legi, ke la krimeaj tataroj konkludis, ke la sovetiaj aŭtoritatoj almenaŭ agnoskis la ekziston de krime-tatara nacia demando kaj de la krime-tatara nacio kiel tia, ke la krime-tatara demando fariĝis internacie atentata temo kaj, trie, ke la nombro de subtenantoj al la justaj postuloj de la krimeaj tataroj kreskis.

162 Laŭ Internacional´nyj bjulleten ´Glasnost´. Eldono 2-4/1987, p. X.
163 Pliajn detalojn vd. sub http://kirimtatar.com/index.php?option=com_content&task=view&id=434.
164 Laŭ Halbach, U.: Aktuelle Entwicklungen in der nationalen Bewegung der Krimtataren. Berichte des BIOst 11/1988.

Fakte, nur la duondemokratiaj balotoj al la Supera Soveto de USSR en 1989 alportis novan progreson por la krimeaj tataroj. Kun la apogo de rusaj intelektuloj, kun kiuj la krimeaj tataroj kunlaboris en la 60aj jaroj kaj kiuj estis elektitaj en la sovetian parlamenton, nova komisiono estis fondita, kiu helpis al la tataroj reveni al Krimeo. La sama komisiono ankaŭ apogis la ideon restarigi la aŭtonomecon de la Krimea ASSR, kiu estis likvidita en 1945. Dekreto de la 14a de novembro 1989 de la Supera Soveto antaŭvidis la plenan restarigon de la rajtoj de la krimeaj tataroj. Ĉi tiu evento signifis la komencon de vasta revena procezo kaj de intensa diskutado pri la politika statuso de Krimeo.[165] En 1990 cent mil personoj de krime-tatara origino reatingis sian malnovan patrujon, Krimeon.

### Evoluo dum la ukraina sendependeco de la 1990aj jaroj

*Amasa reveno de la tataroj al Krimeo:* La nacia movado de la krimeaj tataroj distingis sin de aliaj homrajtaj organizoj en Sovetunio (disidentoj, judoj) per sia amasa karaktero kaj sia firma volo kolektive revenigi la popolon al Krimeo. Se en 1979 sur Krimeo vivis nur ĉirkaŭ 5000 krimeaj tataroj (unu procento de ĉiuj krimeaj tataroj, kiuj vivis dise tra Sovetunio), ĝis printempo 1987 ilia nombro atingis 17´500 personojn. Okaze de la tutsovetia censo de la 1a de januaro 1989 oni nombris sur Krimeo 38´400 tatarojn. Fine de 1990 estis jam cent mil kaj en junio 1991 oni kalkulis 130´000 kaj fine de tiu ĉi jaro pli ol 150´000 revenintojn.

Intertempe, Sovetunio disfalis kaj Ukrainio fariĝis sendependa ŝtato. 73´981 personoj, kiuj registris sian loĝlokon sur Krimeo je la 1a de decembro 1991, laŭ la ukraina leĝo pri civitaneco aŭtomate fariĝis ŝtatanoj de Ukrainio. Por la unua duono de la 90aj jaroj oni antaŭvidis scenaron, ke al Krimeo povus reiri eĉ (aŭ almenaŭ) 350´000 krimeaj tataroj, kio signifus dek procentojn de la tuta loĝantaro de Krimeo, kie en 1995 loĝis 2,6324 homoj. Laŭ indikoj de la ministerio pri internaj aferoj de Ukrainio, la 1an de januro 1996 sur Krimeo estis registritaj fakte nur 220´555 krimeaj tataroj. Ĝis la 1a de majo de tiu jaro 1996 revenis entute 240´000 krimeaj tataroj. En komparo kun la jaro 1783, kiam Krimeo estis aneksita de Ruslando kaj kiam sur la duoninsulo vivis 90%, kaj en 1944, kiam tie loĝis 25-29% da krimeaj tataroj, 10% estas relative malalta cifero. En tuta Sovetunio vivis ĉirkaŭ duonmiliono da krimeaj tataroj, kaj se oni aldonas la nombron de la krimeaj tataroj vivantaj en diasporo, tiukaze temas pri kelkaj milionoj.

Sed la procezo de la amasa reveno de tataroj al Krimeo, kiu estis ligita kun multaj malfacilaĵoj, problemoj kaj obstakloj, estis subite haltigita. Dum en 1991 revenis 42´000 krimeaj tataroj, en 1994 revenis nur 11´000 kaj en 1995 eĉ nur iom pli ol 9000 aŭ 2130 familioj, laŭ alia fonto estis nur po 5000 en 1994 kaj 1995. La cifero de 240´000 signifas, ke proksimume same multaj krimeaj tataroj restis aŭ devis resti en siaj antaŭaj loĝlokoj de Centra Azio kaj aliaj regionoj de eksa Sovetunio. Kial? Ĉefe soci-ekonomiaj kaŭzoj devigis ilin dume rezigni pri translokiĝo al Krimeo, kie estis malfacile ricevi loĝejon aŭ trovi laboron. Tiel oni povas diri, ke la krime-tatara nacio estis disigita laŭ tri partoj, nome unua, kiu povis reiri al Krimeo, dua, kiu devis resti en Centra Azio, kaj trie, kiu vivis en eksterlando (diasporo). Certe tio ne povis esti sen politikaj, moralaj, psikologiaj kaj etnokulturaj sekvoj. La nacia movado de la krimeaj tataroj konsideras tiujn problemojn unurangaj kaj urĝe solvendaj, ĉar sen kunigo de la tuta popolo sur Krimeo la nacia renaskiĝo ne povos plene okazi kaj sukcesi. Pro tio la krimeaj tataroj peticiis al la prezidento de Ukrainio, Leonid Kuĉma, al la deputitoj de la ukraina parlamento, al la Alta Komisaro de UN pri Homaj Rajtoj kaj al OSKE por peti helpon kaj apogon.[166]

*Civitaneco:* Multaj krimeaj tataroj havis uzbekajn, taĝikajn aŭ ruslandajn pasportojn. Pretendi la ukrainan ŝtatanecon povis nur tiuj, kiuj loĝis sur Krimeo jam en 1991, kaj tiuj, kiuj povis pruvi, ke ili mem aŭ iliaj rektaj antaŭuloj naskiĝis sur Krimeo, havis la rajton civitaniĝi laŭ pli facila maniero. Sed multaj tataroj perdis siajn pruvilojn dum la deportado en 1944 kaj do devis pruvi, kiel ĉiuj aliaj enmigrintoj, ke ili vivis kvin jarojn sur la duoninsulo. Sen tio oni havis malavantaĝojn rilate voĉdonrajton, privatigon de

[165] Vd. Sasse, G.: Die Krimtataren. En: Ethnos-Nation 1-2/1996, p. 27.

[166] Vd. Obraženie krymskotatarskogo naroda „0 bespravnom položenii krymskotatarskogo naroda i ignorirovanii ego zakonnych interesov“, in: Avdet, Nr. 1, 13.l.l997, p. 1.

tereno kaj serĉadon de loĝejo kaj laborloko. Malgraŭ ĉi-koncernaj iniciatoj de la Meĝliso,[167] kiu ne estis agnoskita de la krimea registaro, la ukraina parlamento ne larĝigis la leĝon pri civitaneco.[168]

*Aŭtonomeco:* En unua referendumo de la 20a de januaro 1991, en kiu partoprenis 80% de la voĉdonrajtaj civitanoj de Krimeo, 93% de la voĉdonintoj esprimis sin por la aŭtonomeca statuso de Krimeo. La duoninsulo devintus fariĝi ASSR kadre de USSR anstataŭ de RSFSR. En marto 1991 okazis tutsovetia referendumo pri la demando ĉu konservi la unuiĝon de respublikoj. Por tiu propono voĉdonis sur Krimeo 87,6% de la homoj, kompare kun 70,5% tutunie. La duan demandon pri la politika sendependeco de Ukrainio jesis sur Krimeo 84,7%, kompare kun la tutlanda ukraina averaĝo de 80,2%. Sub la impreso de la fiaskinta aŭgusta puĉo“ en Moskvo[169] la parlamento (Verĥovna Rada) de Ukrainio formale proklamis la ŝtatan sendependecon en la 24a de aŭgusto 1991. En la tutlanda ukraina referendumo, kiu devis okazi post tiu proklamo kaj kiu efektive okazis la 1an de decembro, nur 54,2% de la voĉdonintoj de Krimeo voĉdonis por la disiĝo de Sovetunio. Tiam, la krimeaj tataroj ankoraŭ ne apogis la ukrainan ŝtatan sendependecon. Baldaŭ montriĝis, ke Kievo bezonas la krimeajn tatarojn kaj la krimeaj tatarojn bezonas Kievon por kontraŭbatali la ambiciojn kaj agresojn de la rusoj. Depost la malfondo de Sovetunio, la “Centro de la krime-tatara nacia movado“ kondukis por-ukrainan kurson, apogante la ukrainan sendependecon same kiel la ukrainan statuson de Krimeo, de la Nigramara Floto kaj de la urbo Sebastopolo.

*Kurultajo kaj Meĝliso:* Meze en tiuj perturboj pri sendependeco kaj aŭtonomeco de Krimeo en junio 1991 la Dua Kurultajo[170] estis kunvokita, dum kiu la konstanta rajtigita reprezenta organo, la Meĝliso, konsistanta el 33 membroj, estis formita. 262 delegitoj plus kelkaj gastoj el eksterlando renkontiĝis la 26an de junio en Simferopolo. Kiel prezidanto de la Kurultajo estis elektita Mustafa Dĵemilev, kiu estis prezentita jam supre. La Kurultajo estis refondita post kiam la politikaj gvidantoj de Krimeo en januaro 1991 volis okazigi referendumon pri la restarigo de “Krimea Aŭtonoma Socialisma Respubliko” (ASSR). Anstataŭ tio, la “Organizaĵo de la krime-tatara nacia movado” (OKND) postulis la starigon de krime-tatara aŭtonomeco laŭ la naciteritoria principo.

*Politikaj movadoj:* Kiel supre jam menciiite, surbaze de la “Centra Iniciata grupo” (CIG) fondiĝis la plej influaj organizaĵoj “Nacia Movado de la krimeaj tataroj” (Nacional´noe Dviženie Krymskich Tatar, NDKT), kiu estis fondita de Jurij Osmanov en la valo de Fergana, kaj “Organizaĵo de la krime-tatara nacia movado” (Organizacija Krymskotatarskogo Nacional´nogo Dviženija, OKND), kiu estiĝis en majo 1989 en Taŝkento kun la celo kunordigi la agadojn de la regionaj grupoj ene de la nacia movado kaj konstrui efikan strategion. NDKT strikte rifuzis rigidan organizan strukturon, kiel ĝin posedis OKND. En la elektoj al la kurultajo NDKT ne partoprenis kaj rifuzis ĉian kunlaboron kun ĝi, preferante flegi bonajn rilatojn kun la rusnaciaj aŭ komunismaj grupoj. En novmbro 1993 Osmanov, gvidanto de NDKT, estis mortigita en Simferopolo. Sed inter krimeaj tataroj NDKT pli kaj pli perdis influon. En la balotoj al la krimea parlamento de printempo de 1994 ĝi ricevis nur 5,5% de la krime-tataraj voĉoj. Tamen ĝi restis la plej grava opozicia partio. En tiuj balotoj gajnis la listo de la Kurultajo per pli ol 89% kaj sekve povis unuigi ĉiujn 14 krime-tatarajn mandatojn. En marto 1996 la nova ĉefo de NDKT, Abduraimov, elpaŝis en komuna manifestacio kun la komunisma partio kaj pledis por la restarigo de Sovetunio kaj la formado de slav-turka unuiĝo.

Krom OKND kaj NDKT ekzistis ankoraŭ du malgrandaj radikalaj naciismaj grupoj: Milliy Fırqa (naciisma partio), kiu estis (re)fondita en somero 1993, kaj Adalet (justeco), fondita en 1995. Kvankam ili ne estis kompromisemaj, ambaŭ partioj apogis la Kurultajon kaj volis kunlabori kun la Meĝliso. Por

---

[167] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Mejlis_of_the_Crimean_Tatar_People.

[168] La aferoj kun la civitaneco estis aparte komplikaj kaj groteskaj: La vojo al la ukraina ŝtataneco estis blokita por la krimeaj tataroj per klaŭzo, laŭ kiu en la momento de la ŝtata sendependiĝo de Ukrainio en 1991 ĉiuj loĝantoj de Ukrainio aŭtomate ricevis la ukrainan ŝtatanecon, se ili loĝis kvin jarojn en la lando. Sed je tiu dato la plimulto de la krimeaj tataroj ankoraŭ ne revenis al Krimeo, do ili ne povis plenumi tiun kondiĉon, tiel ke en 1996 ĉirkaŭ duono de revenintaj krimeaj tataroj ne estis ukrainaj ŝtatanoj. En majo 1997 la leĝo estis ŝanĝita: Por ricevi la ukrainan ŝtatanecon la klaŭzoj de la kvinjara limdato por loĝado en Ukrainio kaj la devigo koni la ukrainan lingvon estis nuligitaj. Sed aperis nova problemo: Krimej tataroj devis pruvi, ke ili ne posedas duan ŝtatanecon (kiun la plimulto ja havis), ĉar la koncerna ukraina leĝo ne antaŭvidas duoblan ŝtatanecon. Kaj Uzbekio postulIs pagon por la pruvo, ke oni rezignis pri la uzbeka ŝtataneco! (Vd: Sasse, G.: *Die Krim - regionale Autonomie in der Ukraine*, p. 23s.)

[169] Vd. http://www.ifhv.de/documents/huvi/selectedarticles/3-2014-heintze.pdf kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Augustputsch_in_Moskau.

[170] La 1a Kurultajo estis malfermita la 10an de decembro 1917. (Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Kurultai)

NDKT kaj Adalet la revenigo de la krimeaj tataroj al Krimeo havis unuarangan prioritaton. La “Centro“ konsideris Krimeon nacia teritorio, pri kiu la krime-tatara popolo havas nacian suverenecon, kaj intencis fondi nacian ŝtaton. La postulo de la krimea parlamento, ke la tataroj devas havi kvoton de 3,5% de la deputitaj mandatoj, estis rifuzita de la Meĝliso kiel nesufiĉa. La “Centro“ postulis la rajton de krime-tatara vetoo rilate al ĉiuj gravaj politikaj demandoj, aŭ kvoton de pli ol unu triono de la parlamentaj mandatoj, aŭ la agnoskon de la Kurultajo kiel dua ĉambro de la krimea parlamento. Malgraŭ tio, nova propono de la krimea parlamento, kiu garantiis al la krimeaj tataroj 14 de entute 98 mandatoj por la baloto de 1994 estis akceptita de ili. Rigarde al la malfacilaĵoj ĉe la reintegrado de la krimeaj tataroj, la “Centro“ rezignis pri sia bojkota sinteno, donante la preferon al parta kunlaboro kun la politikaj organoj de Krimeo. Sed kiam en 1995 la tatara kurultaj-frakcio bojkotis parlamentajn kunsidojn kaj kelkaj deputitoj eĉ komencis malsatstriki, ĉar laŭ ilia opinio en nova konstitucia projekto la rajtoj de la krimeaj tataroj estis tro malbone garantiataj, oni promesis al ili kvoton de 15%. Antaŭvidate estis, ke la tataroj havu tataran vicĉefministron kaj tataran vicparlamentestron, sed tio ne sufiĉis por ili. Aliflanke, la preteco de la rusa plimulto en la parlamento fari pliajn cedojn al la tataroj estis limigita. Kaj por konservi sian influon la “Centro“ devis liveri konkretajn rezultojn precipe en sociekonomia rilato. De la siaj reprezentantaj organoj, precipe de la Meĝliso, la krimeaj tataroj atendis, ke ili instalos sistemon de efika ŝtata subvenciado ĉe la disponigo de loĝejoj, laborlokoj kaj kulturaj institucioj. Estas klare, ke por tiaj celoj estis bezonata ege multe da mono. En februaro 1997 okazis disputo inter Mustafa Dĵemilev, kies aŭtoritateco ŝrumpis, kaj lia anstataŭanto Refat Ĉubarov, gvidanto de la kurultaj-frakcio, kiu estis fondita en majo 1995. Kompreneble, ankaŭ la nacia tatara movado ne estas libera de rivaleco inter diversaj ambiciaj tataraj politikaj gvidantoj, kiuj celas altiri la atenton de la popolo, kiu havas grandajn atendojn, kun tendencoj al skismo. La plej urĝaj problemoj, kiujn la Meĝliso devis solvi, estis organizi la revenadon de la krimeaj tataroj al Krimeo kaj, due, restarigi normalajn homajn vivkondiĉojn por la revenintoj. Do, la politika premo sur la “Centron“ kreskis, kaj la politika ekvilibro sur Krimeo restis malstabila ne nur pro la krime-tatara demando, sed ankaŭ pro la ukrain-rusa rivaleco kaj la tensioj inter la krimea registaro kaj la ukraina parlamento kaj en la krimea parlamento mem. La Tria Kurultajo komencis sian laboron en la 26a de junio 1996.[171]

*Prezidento de Krimeo:* Kiam en januaro 1994 okazis elekto de “prezidento” de Krimeo, komenciĝis nova ´varma´ fazo de la regionismo aŭ seperaratismo de Krineo. Elektita al la ofico estis *Jurij Meŝkov*[172] (72,9%), kandidato de la moskvema “Rusia Bloko”, anstataŭ, kiel oni esperis en Kievo, *Nikolaj Bagrov* (23,4%), malnova komunisto kaj ĉefo de la Supera Soveto de Krimea ASSR inter 1991 kaj 1995,[173] kiu proponis sin kiel partie sendependan kandidaton. Meŝkov enkondukis molan puĉon, faciligante la rilatojn kun Rusio, enkondukis la moskvan horan reĝimon kaj ignoris la opiniojn kaj decidojn de Kievo. Ĉar la rusoj krude troigis la spacon, kiun ili kredis povi uzurpi por siaj celoj, Kievo sentis sin devigita bremsi la rusnaciisman separatisman evoluon sur Krimeo, kiu povis finiĝi per anekso de Krimeo far Rusio: en marto 1995 la prezidenta posteno de Krimeo estis abolita, kaj Kuĉma submetis la sekurecajn organojn de Krimeo al la centra kontrolo kaj minacis per dissolvo de la krimea parlamento. Meŝkov forveturis al Moskvo.[174] En tiu fazo Rusio evidente ankoraŭ ne estis interesata aŭ preta aneksi Krimeon, ĉar Moskvo, kie ankoraŭ regis prezidento El´cyn, estis okupata per aliaj problemoj kiel la senkoloniigo de Ruslando kaj la militoj en Kaŭkazo.[175]

*Etnaj konfliktoj:* En la 1990aj jaroj etnaj konfliktoj ne okazis kiel ili estis antaŭvidataj en Okcidento. Diversaj internaciaj organizaĵoj klopodis malakrigi la etnajn konfliktojn sur Krimeo. UN planis pagi sumon de 15 milionoj da usonaj dolaroj kadre de sia reintegra kaj evolua programo por Krimeo. Per tio oni celis konstrui etne miksitajn loĝkvartalojn. OSKE okupiĝis pri prevento de konfliktoj inter rusoj, ukrainoj kaj tataroj. Bonaj politikaj rilatoj inter krimeaj tataroj kaj aliaj popolgrupoj sur Krimeo ekzistis praktike nur inter la “Centro de la krime-tatara nacia movado“ kaj demokratiaj ukrainaj grupoj. La komuna timo de rusa minaco estis tro granda (kiel la jaro 2014 konfirmos). La rilatoj inter krime-tataraj organizaĵoj kaj rusaj politikaj grupoj estis streĉitaj, malbonaj sentoj ambaŭflanke ankoraŭ tro fortaj. La krimeaj tataroj konsideris la registaron de Krimeo kaj la rusajn partiojn instrumentoj de la rusa imperiismo aŭ sovetia subprema tradicio. Aliflanke, multaj krimeaj rusoj konsideris la tatarojn kiel danĝeron, ĉar ili

---

171 Historion de Kurultajo vd. sub http://qtmm.org (Kurultaj, rusa versio).
172 Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Yuriy_Meshkov.
173 Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Mykola_Bahrov.
174 Detale ri tiuj prezidentaj elektoj ĉe vd. Sasse, G.: Die Krim - regionale Autonomie in der Ukraine, p. 10-18.
175 Sasse, G.: Die Krim - regionale Autonomie in der Ukraine, p. 25s.

povus malhelpi proprajn interesojn. Kunlaboro kun grekoj, bulgaroj, armenoj, germanoj, krimĉakoj kaj karaimoj apenaŭ ekzistis, kvankam la krimeaj tataroj apogis ankaŭ parlamentan reprezentadon favore al tiuj popolgrupoj. En la parlamentaj elektoj de 1994 tiuj popolgrupoj ricevis la garantion de po unu mandato.

*(Soci-)ekonomia situacio:* Krimeo suferis en la 90aj jaroj je profunda sociekonomia krizo kaj alta senlaboreco, kio esence malhelpis sukcesan reintegradon de la krimeaj tataroj sur Krimeo. Nature, la daŭra ekonomia krizo, la malalta vivnivelo kaj la drasta malriĉeco de vastaj popoltavoloj de Ukraino ne formis taŭgajn kondiĉojn por efika ekonomia evoluado de Krimeo. Laŭ oficialaj indikoj, de 240´000 krimeaj tataroj, kiuj revenis al Krimeo ĝis 1996, la duono ne havis propran loĝejon, kaj 15´000 familioj troviĝis sur atendolistoj por ricevi propran loĝejon. 25´000 posedantoj ne kapablis fini la rekonstruadon de siaj loĝejoj kaj domoj, ĉar mankis materialoj, kiuj fariĝis tro multekostaj pro pli ofta mendado. Multaj domoj pli similis al konstru-ruinoj. En 180 de 240 krime-tataraj vilaĝoj ne ekzistis akvo nek elektro. Krom tio mankis objektoj de socikultura signifo, servoj kaj medicinaj instalaĵoj. 40´000 homoj estis senlaboraj, pliaj 30´000 laboris en aliaj profesioj aŭ ne havis regulajn enspezojn, vivante sub la minimumo de ekzistado. Al la krizo kontribuis la cirkonstanco, ke pro la alta nombro de elmigrintoj en la centraziaj loĝlokoj de la krimeaj tataroj la valoro de loĝejoj, en kiuj vivis krimeaj tataroj, falis, krom tio la inflacio senvalorigis la monon (la rublo estis anstataŭigita per iu nacia pseŭdo-valuto). Alia problemo estis, ke sur Krimeo funkciis propra mafio, kiu komplikis la tutan ekonomian situacion.

Kreskis malsaniĝoj kaj mortoj, precipe de infanoj. Tiel, la kreskado de la popolo aŭtomate estis bremsata. En 1996 la nombro de mortintoj jam superis tiun de la naskitoj. Sub tiaj evidente malfavoraj kondiĉoj la nacia movado de la krimeaj tataroj pli kaj pli transformiĝis al opozicia organizo por kritiki tiujn (politikajn) fortojn, kiuj estas konsiderataj kiel respondecaj por tiu mizero, nome la ukraina kaj krimea registaroj. Alia problemo de la 90aj jaroj estis la perforta malhelpo de krimeaj administrantoj, kiuj rifuzis al tataroj okupi sian iaman terenon. Eĉ okazis senskrupula detruado de domoj kaj loĝejoj aŭ tendumejoj, kiujn la tataroj komencis konstrui post propriniciata okupado de tereno (samozachvat), ki estis akompanata de amasa protestado. Oni parolis ankaŭ pri pogromoj kontrau tataroj. Post kiam en marto 1993 aperis speciala dekreto pri la disponigo de tereno por civitanoj kaj aliaj dekretoj, tiuj ekscesoj praktike finiĝis. En iuj kazoj la okupata tereno eĉ povis esti legalizita.

Laŭ eldiro de Mustafa Dĵemilev, por la reloĝigo kaj reintegrado de la revenintaj krimeaj tataroj necesus giganta financa helpo de almenaŭ 2,8 miliardoj da usonaj dolaroj. En 1996 Ukrainio volis pagi 118 miliardojn da karbovancoj (ĉ. 700´000 usonaj dolaroj), sed la gvidanto de Milliy Fırqa kaj la vicĉefministro de Krimeo, Ilmi Umerov, diris, ke tiu sumo ne sufiĉas. Por premi la ukrainan registaron, ke ĝi pagu pli da mono, li minacis adopti neŭtralecan politikon en la krimea parlamento por malrekte favori rusajn interesojn. Ukrainio adoptis duoblan strategion: Unuflanke ĝi promesis financan subtenon por teni la krimeajn tatarojn kiel aliancanojn kontraŭ rusaj ambicioj, aliflanke Kievo ne pretis agnoski la krimeajn tatarojn kiel indiĝenan popolon (korennyj narod), pri kio la tataroj insistas, kaj la Meĝlison kiel legitiman reprezentanton de la krimeaj tataroj, ĉar en kazo de tia agnosko ĝi timus plifortigon de la krime-tataraj aŭtonomecaj strebadoj kaj la protestojn flanke de la krimeaj rusoj.

Do, ekonomie, Krimeo dume ne povis multe profiti de sia aŭtonomeca statuso. Planoj transformi la duoninsulon al libera ekonomia zono fiaskis. Nur en la norda parto de la duoninsulo realiĝis iu eksperimenta ekonomia zono ("Sivaŝ"), la unua laŭ sia speco en Ukrainio entute. La lama privatiga procezo estas ligita kun la krimaj strukturoj sur Krimeo. La turismo kaj armea-industria ´komplekso´ suferis malkreskon. Krimeo dependas de la energio kaj akvo de Ukrainio.[176] La registaro de Turkio planis konstrui mil loĝejojn por krimeaj tataroj kaj rilatis kun la Meĝliso. Ankaŭ turkaj komercistoj investis monon sur Krimeo. Tio kaŭzis reagon de rusaj naciistoj, kiuj avertis pri la danĝero de islamigo de Krimeo aŭ eĉ parolis pri la risko de reunuiĝo kun Turkio.[177]

*Kulturo kaj religio:* Kompare kun aliaj kampoj, la revivigo de la tatara kulturo sur Krimeo progresis: Novaj moskeoj kaj koranlernejoj estis fonditaj, malnovaj estis redonitaj kaj restaŭritaj, instruado en krime-tatara lingvo estis enkondukita kaj krime-tataraj lernejoj estis malfermitaj. En Simferopolo

---

[176] Sasse, G.: Die Krim - regionale Autonomie in der Ukraine, p. 5.

[177] Pri la rilatoj inter Turkio kaj la krimeaj tataroj vd. http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/asien/die-tuerkei-und-die-krimtataren-hilflose-blutsbrueder-12831574.html kaj Gasimov, Zaur: Nahe Verwandte, so fern. Die Türkei, die Tataren und die Krim. En: *Osteuropa* (DGO Berlin) 5-6/2014, p. 311-22.

fakultato pri krime-tatara lingvo kaj pedagogia altlernejo estis instalitaj. Ekzistis pluraj gazetoj, televidaj kaj radio-elsendoj en krime-tatara lingvo, krome tatara literatura sekcio en la eldonejo Tavrija, kaj funkciis nacia biblioteko "Izmail de Gaspra", krome teatro, muzikensembloj kaj belarta muzeo. Sed nur duono de la krimeaj tataroj flue parolas sian nacian lingvon.

Kvankam la krimeaj tataroj restis lojalaj al la sunaisma islamo, religia radikalismo neniam ludis gravan rolon en la civitana nacia movado de la krimeaj tataroj, kaj la Meĝliso komprenas sin strikte laika kaj neŭtrala politika organo. Tamen, ekzistas timo pri enmiksiĝo de radikalaj islamistoj de ekstere. La islamaj aktivuloj de Krimeo ne restis pasivaj: En novembro 1995 okazis la unua kunveno (Kurultajo) de la krimeaj muzulmanoj, kaj en ĝia preparado aktive kunlaboris la partio Adalet. La renaskiĝo de la islamo sur Krimeo timigas antaŭ ĉio la kristanajn popolgrupojn. La muezino, kiu ĝis 1991 ne estis aŭdebla, nun denove vokas siajn komunumanojn al regula preĝado. S. Ĉervonnaja atentigis, ke en la 1990aj jaroj sur Krimeo ĉiu modelo de la historia evoluo travivis sian renaskiĝon, kio kaŭzas konkurencon. Sed la islamo sur Krimeo servas al siaj adeptoj unuavice kiel spirita, morala, kultura movado, kiu donas al la krimeaj tataroj la senton de bonfarto kaj protektado de iliaj valoroj kaj tradicioj kaj kiu esprimas la ideon pri la unueco de la islama kaj turklingva mondo.[178]

*Konstituciaj disputoj:* En la konstitucia propono de la 29a de aprilo 1992 (art. 110-113) la „Krimea Aŭtonoma Respubliko" estis difinita kiel parto de Ukrainio. Sed jam ekzistis la leĝo de la 12a de februaro 1991 pri la restarigo de „Krimea ASSR" (tiam sendependa Ukrainio ankoraŭ ne ekzistis). Laŭ tio, Krimeo devis ricevi propran konstitucion, kiu devis kongrui kun tiu de la leĝopropono de la ukraina parlamento. Sed la konstitucio, kiun la organoj de Krimeo proponis, estis rifuzita de la ukraina parlamento la 17an de marto 1995 kaj anstataŭigita per ukraina leĝo pri „Krimea Aŭtonoma Respubliko". Krom tio, la tiama ukraina prezidento Leonid Kuĉma publikigis leĝon, kiu parte submetis la registaron de Krimeo al la kontrolo de la ukraina registaro. Sekve, la registaro de Krimeo planis demandi la popolon en referendumo, ĉu ĝi volas akcepti la reenkondukon de la konstitucio de 1992. Sekvaj kvin demandoj fariĝis aktuale esencaj: 1e teritoria statuso de Krimeo; 2e statuso de Rusia Nigramara Floto; 3e statuso de Sebastopolo; 4e divido de la povo inter aŭtonoma krimea administracio, administracio en Simferopolo kaj ukraina registaro; 5e situacio de la tataroj de Krimeo. Por solvi ĉi tiujn demandojn parte estis konsultita OSKE, precipe la Alta Komisaro pri naciaj minoritatoj (HKNM), kiu almenaŭ atingis unuflanke la reprenon de la en 1995 planita referendumo pri la konstitucio de Krimeo de 1992 kaj aliflanke la promeson de Kievo garantii vastan aŭtonomecon al Krimeo. Per tio la tensioj inter tataroj kaj rusoj devis esti reduktitaj. En 1995 la nova registaro de Krimeo submetis proponon de nova konstitucio, kiu tamen estis rifuzita de la krimeaj tataroj. HKNM peris plibonigon de la konstitucia teksto, tiel ke en 1996 la ukraina parlamento akceptis novan leĝon pri la aŭtonomeco de Krimeo. La bulteno *Urjadovyj kur´er* nomis tiun provon „kvadratigo de la cirklo".[179]

Nesolvita restis la demando pri la reintegrado de la revenintaj krimeaj tataroj. Post la ratifo de la ukrain-rusa traktato pri amikeco kaj kunlaboro kaj la reguligo de la ĉeesto de la Nigramara Floto, la tensioj sur Krimeo reduktiĝis. Ili tamen rekreskis en 2008, kiam Rusio komencis distribui rusajn pasportojn al la loĝantoj de Krimeo. La ukraina flanko timis, ke tiu faro povus konduki al rusa armea interveno sub la preteksto de la protekto de propraj ŝtatcivitanoj. Ke tiu timo ne estis vana, konfirmis en 2009 la postulo de iu parlamentano de la „Rusa Bloko" en la krimea parlamento, ke Rusio intervenu en Krimeo laŭ sama maniero kiel en Sudosetio kaj Abĥazio. La tensioj atingis eĉ la ukrainan parlamenton, kie en 2010 okazis tumulto pro la longigo de la kontrakto pri la Nigramara Floto ĝis 2041.[180]

## Dua rusa anekso de 2014 kaj ĝia antaŭhistorio

La plej nova krizo ĉirkaŭ Krimeo estas politika, parte milita konflikto, kiu disvolviĝis per kaŝita interveno (invado) de ekstere kaj finiĝis per la anekso de Krimeo fare de Ruslando en marto 2014, kiu internacie estas kontestata. Kvankam la ruza plano de Ruslando (t.e. de Putin) akapari Krimeon ekzistis verŝajne jam

---

[178] Laŭ: Platen, M. von: Die Rückkehr der Krimtataren in ihre historische Heimat. Aktuelle Analysen des BIOst, 33/1997; Červonnaja, S.: Die Bürgerrechtsbewegung der Krimtataren in den neunziger Jahren. En: *Osteuropa* (DGO) 2/1999, p. 175-186.
[179] Sasse, G.: Die Krim - regionale Autonomie in der Ukraine, p. 8.
[180] Vd. http://www.ifhv.de/documents/huvi/selectedarticles/3-2014-heintze.pdf kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Autonome_Republik_Krim.

delonge, la okazo por Ruslando aneksi Krimeon, kiu estis ukraina teritorio, havas sian genezon en la krizo en Ukrainio de la jaroj 2013/14 mem, kiu progresis de pli malpli longdaŭra paca protestado sur la (Eŭro-) Majdana Placo en Kievo,[181] al politikaj tumultoj en Kievo kaj militaj agresoj sur Krimeo kaj en Donbaso.

Estus tro amplekse mencii ĉiujn unuopajn eventojn, kiuj okazis lige kun la Krimea krizo de la jaro 2014 (kaj antaŭaj kaj sekvaj jaroj), des pli ke ne ĉiuj eroj rekte tuŝas la tatarojn de Krimeo, pri kiuj ni ĉefe interesiĝas en tiu ĉi studo. Por kompreni la ĝenerala situacion kaj la sekvojn tamen estas necese resumi la evoluon kaj noti la ĉefajn okazaĵojn de la jaroj 2012-2014, kiuj kondukis al la anekso de Krimeo fare de Ruslando.

Se temas pri la jaroj antaŭ la anekso de Krimeo en 2014, necesas mencii almenaŭ la esencajn eventojn en Ukrainio, kiujn influis la kontraŭdira politiko inter la prezidento (Viktor Janukoviĉ[182]) kaj la registaro unuflanke kaj la opozicio aliflanke. Kialo por tiu konflikto estis la diverĝa sinteno pri la irenda vojo de Ukrainio, ĉu ĝi akcelu la integriĝon en Eŭropan Union, kion la okcidentanoj kaj ´liberalaj´ ukrainoj deziris, aŭ ĉu ĝi restu forte ligita kun Ruslando kaj la Eŭrazia Unio, kio estis la volo de Putin kaj grandparto de la popolo en orienta Ukrainio. Konkretan objekton de la kverelo formis la „kontrakto pri asociiĝo“ por faciligi liberan komercon, kiun Ukrainio devintus subskribi kun Eŭropa Unio, sed kiu finfine ne estis subskribita, pro la kontraŭstaro de Ruslando, kies ukraina vasalo estis Janukoviĉ.[183] Ĉi tiu fiasko kondukis al furiozaj protestoj sur la (Eŭro-)Majdana Placo en Kievo, kiuj estis organizataj aŭ subtenataj de la (heterogena) ukraina opozicio kaj kiuj direktis sin rekte kontraŭ la politiko de Janukoviĉ. La protestoj kaŭzis ne nur multnombrajn viktimojn, sed kondukis ankaŭ al la faligo de la prezidento la 22an de februaro 2014 post kvazaŭ-puĉo kontraŭ li, sekve al kiu Janukoviĉ fuĝis el la lando (al Rusio). EU agnoskis la transiran prezidenton Oleksander Turĉinov[184] kaj la registaron de Arsenij Jacenjuk,[185] kiu la 27an de februaro estis elektita kiel nova ĉefministro, kiel legitiman, al kiu ĝi esprimis la daŭran deziron subskribi la nomitan asociigan kontrakton. Moskvo reagis kun konsterno: Putin rifuzis agnoski la transiran registaron en Kievo, kiu laŭ Moskvo estis la rezulto de kontraŭleĝa puĉo kaj neakceptebla eksoficigo de la prezidento fare de la ukraina parlamento. Ruslando lanĉis grandiozan kontraŭ-, propagandon kontraŭ la ukraina registaro, kiun ĝi perceptis kiel instrumenton de ukrainaj naciistoj kaj “ekstremistoj“ kaj kiun ĝi misfamigis kiel “faŝisman ĵunton“ (kio evidente estis absurda troigo). Post kiam la ukraina parlamento volis ankaŭ aboli la statuson de la rusa lingvo en la orientaj ukrainaj regionoj kaj sur Krimeo (kion Turĉinov tamen povis eviti), Putin vidis alveni la momenton por konkrete agi kaj komencis enkonduki la anekson de Krimeo. Rusiaj oficiroj komencis paroli kun politikistoj de Krimeo por enoficigi novan krimean ĉefministron, kio estis akompanata de sendado de sekretaj (evidente rusiaj) soldatoj sur Krimeon, kies tasko estis fari politikan premon kaj prepari la anekson kaj okupacion de Krimeo, t.e. ĝian aliĝon al la Ruslanda Federacio aŭ reunuiĝon kun Ruslando, kiel tiu akto estas oficiale nomata en Ruslando. V.A. Konstantinov, la estro de la parlamento de Krimea Aŭtonoma Respubliko, vojaĝis al Moskvo por paroli pri secesio de Krimeo de Ukrainio[186] kun la intenco nuligi la „Ĥruŝĉovan“ decidon de 1954. Samtempe komenciĝis plej diversaj sovaĝaj provoj de la rusa flanko pravigi la proprajn farojn sur Krimeo. Laŭ Putin, kiu diris tion en la 23a de februaro, Ruslando devas repreni Krimeon „por doni al la loĝantoj de Krimeo la eblecon mem decidi pri la propra sorto“. Laŭ la opinio de la rusia registaro, en Kievo la politikan povon akaparis „ekstremistoj“ kaj „faŝistoj“, ĉar en la politikaj ŝanĝoj ludis rolon la radikalaj partioj „Svoboda“ kaj “Dekstra Sektoro“, kiuj adoras la politikiston Stepan Bandera,[187] kaj en Ukrainio kaj sur Krimeo la rusa popolo estis minacataj de genocido. En la sekvo la ruslandaj ŝtataj amaskomuniloj lanĉis grandstilan bruegan kaj longdaŭran propagandan kampanjon kontraŭ Ukrainio, kiu eĉ vekis la atenton de la Alta

[181] Pri kio temas vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Euromaidan.
[182] En 2010, Janukoviĉ estis elektita en 2010 per 48% kiel nova prezidento de Ukrainio, kontraŭ la volo de la protagonistoj de la „oranĝa revolucio“, kiu komenciĝis en 2004 en Ukrainio post popola protesto kontraŭ korupto kaj trompado. Janukoviĉ gvidis porrusan politikon, kiu estis neakceptebla por parto de la ukraina popolo, kiu vidis en tio la daŭrigon de la praktikado de korupto, trompado kaj falsado. En 2013 sekvis novaj opoziciaj protestoj kontraŭ li. Pri li vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Viktor_Janukoviĉ.
[183] Pri la historio de tiu konflikto vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ukraine_und_die_Europäische_Union#Assoziierungsabkommen.
[184] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Olexander_Turtschynow.
[185] Anstatau Mykola Azarov (https://en.wikipedia.org/wiki/Mykola_Azarov), kiu demisiis la 28an de januaro. Pri Jacenjuk vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Arsenij_Jazenjuk.
[186] Cetere, en la partio de Janukoviĉ oni neniam parolis pri secesio de Krimeo.
[187] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Stepan_Bandera.

Komisaro de UN pri Homaj Rajtoj, kiu malkovris en tiu propagando ankaŭ elementojn de malamo kaj rasismo, kiuj estas malpermesitaj de la internacia juro. La 25an de februaro en Simferopolo okazis perforta kunpuŝiĝo inter krimeaj tataroj, kiuj pledis por Ukrainio, kaj (probable organizataj) manifestanciantoj, kiuj pledis por la aliĝo de Krimeo al Ruslando. Baldaŭ montriĝis, ke Ruslando rekte enmiksiĝis per siaj anonimaj ´verdaj´ soldatoj (kiuj ne estis signitaj), kiuj, bone organizitaj kaj apenaŭ rimarkitaj de la krimea popolo, okupis strategie gravajn objektojn kaj iom post iom transprenis la ukrainajn instalaĵojn. Ukrainio retiris sian armeon el Krimeo kaj Ruslando konfirmis la finon de la funkciado de la ukraina armeo sur Krimeo. Sekve okazis elŝanĝo de la registaro de Krimea Aŭtonoma Respubliko. Kompreneble, la registaro de Kievo (kiu en tiu periodo mem ne estis demokratie legitimita) kontestis aŭ neis la legitimitecon de tiu nova transira registaro de Krimeo. La 27an de februaro armitaj fortoj („memdefendantoj de la ruslingva popolo de Krimeo“) okupis la Krimean Parlamenton, postulante la okazigon de referendumo por aligi Krimeon al Ruslando. Laŭdire 61 de 64 ĉeestantaj deputitoj voĉdonis por okazigo de referendumo por sendependigi Krimeon aŭ reunuigi ĝin kun Ruslando, kiu devintus okazi la 25an de majo samtempe kun la prezidentaj balotoj en Ukrainio. Sed la kvorumo de 51 membroj ne estis atingita. La parlamenta kunsido estis nepublika kaj manipulita. Sergej Aksjonov, membro de la marĝena partio „Rusa Unueco“, kiu estis civitano de Ruslando (de 2003), fariĝis nova ĉefministro de Krimeo anstataŭ Anatolij Mogiljov kaj ne plu agnoskis la suverenecon de Ukrainio. Li ankaŭ submetis la ukrainan armeon sur Krimeo al sia ordona povo. Dum la ukraina registaro ne agnoskis lin ĉefministro, Aksjonov konsideris Janukoviĉ laŭleĝa prezidento de Ukrainio. Aksjonov vizitis Putin en Moskvo kaj petis Ruslandon protekti Krimeon antaŭ „perfortemaj ukrainaj naciistoj kaj ekstremuloj“ kaj restarigi la pacon. Laŭ iu UN-dokumento, ĉi tiu peto estis subtenita ankaŭ de Janukoviĉ. La ukraina ministro pri internaj aferoj kvalifikis la situacion sur Krimeo kiel armitan invadon kaj okupacion fare de la rusia armeo. La 28an de februaro la ukraina registaro petis, laŭ art. 34s. de la UN-Ĉarto, trakti la situacion sur Krimeo sur la tagordon de la Sekureca Konsilio. La koncerna kunsido okazis la 1an de marto. Sed Rusio ne agnoskis la ukrainan reprezentanton, kiu partoprenis en la nomo de la „kontraŭleĝa“ registaro.[188] Ukrainio kaj Grandbritio kvalifikis la invadon de rusiaj trupoj sur Krimeo kiel „akton de agreso“., kvankam estas dubinde, ĉu tia agreso laŭ difino de la UN-Carto vere okazis, ĉar tio estus ligita kun la perforto de armiloj, kiu estas direktita kontraŭ alia ŝtato. Pro tio pli trafa estis la pli prudenta pritakso de Usono, laŭ kiu temis pri rusa milita interveno sen jura bazo kaj ke ĝi lezis la suverenecon kaj sendependecon de Ukrainio. (Cetere, la internacia juro diferencas inter agresmilito kaj agresa akto.)

En la sama tago de marto Putin, prezidento de Ruslando, petis la Federacian Konsilion sendi rusajn soldatojn en Ukrainion por protekti etne rusajn civitanojn, kiu laŭ lia kompreno tie estis minacataj de genocido. La rusiajn soldatojn sur Krimeo Putin interpretis kiel „lokajn memdefendantojn“, sed poste li konfirmis, ke rusiaj soldatoj fakte subtenis tiujn lokajn memdefendantojn. Fakte temis pri ruslingvaj „kozakoj“, kiuj devis veki la impreson, ke la ĉeesto de rusiaj trupoj en Krimeo ĝuas grandan apogon inter la krimea popolo. Samtempe, la ukraina armeo estis alarmita. La homrajta organizaĵo Human Rights Watch observis mistraktadon de civilaj personoj fare de la rusia armeo. Efektive, unu kadavro estis poste trovita en la arbaro de Bilohirsk - la viktimo estis juna krimea tataro, kiu protestis kontraŭ la rusa renverso sur Krimeo.

La 6an de marto la parlamento de Krimeo pledis por aliĝo al Ruslando. La 11an de marto, la parlamento de Krimeo proklamis sendependan „Krimean Aŭtonoman Respublikon“. La 16an de marto okazis la urĝe kaj improvize aranĝita referendumo pri la statuso de Krimeo, anstataŭ la 30an de marto (la 25a de majo iĝis superflua). Ĉar Krimeo apartenis al Ukrainio, laŭ ukraina (kaj internacia) juro ĉi tiu referendumo, same kiel la nova registaro de Krimeo mem, estis kontraŭleĝaj kaj havas neniun signifon aŭ valoron por Ukraino. Jam la 14an de marto, la konstitucia tribunalo de Ukrainio deklaris tiun referendumon kontraŭleĝa. Putin klarigis, ke li havas neniun planon aneksi Krimeon kaj ke la civitanoj de Krimeo povas libere decidi sian sorton. La Krimea parlamento invitis observantojn de OSKE kontroli la baloton sur Krimeo, sed OSKE rifuzis la inviton, ĉar ĝi konsideris la referendumon kontraŭleĝa kaj ĉar

[188] Dum Rusio entute ne agnoskis la tiaman registaron en Kievo, Usono konsideris tiun registaron kiel registaron “de la popolo“. Laŭjure do temis pri de facto-registaro, kiu akiris la povon laŭ vojo, kiu ne estis laŭkonstitucia. Tamen, tiu registaro reprezentis la ŝtaton de Ukrainio, kiu estis internacie agnoskita, des pli ke tiu registaro promesis baldaŭ okazigi baloton por konfirmi ĝin, kion ĝi ankaŭ faris, kaj estis konfrimita. Do, aliaj ŝtatoj estis devigitaj intertrakti kun tiu registaro, sendepende de la demando laŭ kiu vojo ĝi akapris la povon.

OSKE ne ricevis inviton de la ukraina registaro. Laŭ la publikigita rezulto, 96,77 procentoj de la partoprenanto en la referendumo voĉdonis por aliĝo de Krimeo al Ruslanda Federacio, la kvoto de la partopreno estis 83,1%. Sed la vera kvoto de partopreno estis verŝajne nur 30-50%, ĉar la krimeaj tataroj kaj parto de la ukrainoj bojkotis la referendumon, same kiel la pora procentaĵo de la baloto estis takseble nur 50-60%. Same voĉdonis la civitanoj de la urbo Sebastopolo. Unu tagon post la referendumo „Krimea Respubliko" petis Ruslandon aliĝi al la Federacio. La dokumento de la aliĝo estis subskribita la 18an de marto en la moskva Kremlo, kun parolado de Putin, kiu proklamis la aliĝon de Krimeo kaj de la urbo Sebastopolo kiel 84a kaj 85a subjektoj de Ruslanda Federacio. Laŭ lia opinio, la krimea referendumo de la 16a de marto 2014 okazis laŭ demokratia maniero kaj konformis al la internacia juro. La reunuiĝon li pravigis per historiaj argumentoj kaj ke la plimulto de la popolo de Krimeo deziris ĝin. La decidon de 1954 li klasifikis kiel eraron kaj lezon de la tiam valida juro. Krome, la reunuiĝon de Krimeo kun Ruslando Putin komparis kun la germana reunuiĝo, kiu konformis al la volo de la popolo kaj cetere trovis subtenon de Ruslando. La sendadon de rusiaj soldatoj sur Krimeon li pravigis kiel permeson kompletigi la armeon lige kun la Nigramara Floto, kiu tie havas sian sidejon.[189] La 21an de marto la kontrakto estis ratifita de la Federacia Konsilio de Ruslando, kio signifas, ke Moskvo (Putin) komencis konsideri Krimeon integra parto de Ruslanda Federacio kaj, Sebastopolo estis nomita „sankta loko por ĉiuj rusoj".[190]



РАСПОРЯЖЕНИЕ

ПРЕЗИДЕНТА РОССИЙСКОЙ ФЕДЕРАЦИИ

**О подписании Договора между Российской Федерацией и Республикой Крым о принятии в Российскую Федерацию Республики Крым и образовании в составе Российской Федерации новых субъектов**

1. Одобрить проект Договора между Российской Федерацией и Республикой Крым о принятии в Российскую Федерацию Республики Крым и образовании в составе Российской Федерации новых субъектов.

2. Считать целесообразным подписать Договор, предусмотренный настоящим распоряжением, на высшем уровне.

КАНЦЕЛЯРИЯ

Президент Российской Федерации В.Путин

17 марта 2014 года
№ 63-рп



Same koncize kiel en 1954: La dokumento de la anekso de Krimeo en 2014. Teksto: *„Ordono de la prezidento de la Ruslanda Federacio pri subskribo de Traktakto inter Ruslanda Federacio kaj Krimea Respubliko pri la akcepto (prinjatii) de la Krimea Respubliko en la Ruslandan Federacion kaj formado de novaj subjektivoj en la konsisto de la Ruslanda Federacio. 1. Aprobi la projekton de Traktakto inter Ruslanda Federacio kaj Krimea Respubliko pri la akcepto de la Krimea Respubliko en la Ruslandan Federacion kaj formado de novaj subjektivoj en la konsisto de la Ruslanda Federacio. 2. Konsideri celkonforma la subskribon de la Traktakto, antaŭvidita de ĉi tiu ordono, sur pli alta nivelo. La prezidento de la Ruslanda Federacio V. Putin. Kancelierejo. La 17an de marto 2014. N-ro 63-rp."*

Sur la foto oni vidas la momenton de la subskribo de la anekso en la Moskva Kremlo fare de Putin kaj krimeaj politikaj reprezentantoj.

[189] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Rede_Wladimir_Putins_zum_Beitritt_der_Krim_am_18._März_2014. La germana registaro rifuzis la komparon, kiun Putin faris kun la germana reunuiĝo. La brita registaro kritikis sep falsajn prezentojn en la parolado de Putin. La usona prezidanto Obama riproĉis al Putin, ke li celas ŝanĝi la validan ordon en Eŭropo. Laŭ la germana gazetaro (ekz. *Spiegel*) la tuta kampanjo de Putin servis kiel venĝo kaj estis direktita kontraŭ la Okcidento por devigi ĝin akcepti kaj respekti Ruslandon kiel grandpotencon. Germanlingvan tradukon de la parolado de Putin aperigis *Osteuropa (*DGO Berlin) 5-6/2014, p. 87-100.

[190] Tiel mi aŭdis la koncernan frazon en la vesperaj novaĵoj de RTR Planeta la 19an de januaro 2016.

**Pritakso de la anekso de Krimeo laŭ la internacia kaj ukraina juro kaj laŭ ruslanda interpreto**

Certe, la secesia procezo sur Krimeo, kiu inkluzivas la ĉeeston de fremdaj (rusiaj) trupoj kaj ties aktivecojn sur Krimeo, la dubindan elekton de Sergej Aksjonov de la 28a de februaro 2014, kiu estis verŝajne *devigita* de la rusoj fariĝi ĉefministro de Krimeo, kaj lian (mem)elekton aŭ nomumon kiel ĉefkomandisto de ĉiuj armeaj fortoj de Krimeo (krom de la Rusia Nigramara Floto),[191] la deklaron de la sendependeco de Krimeo de la 11a de marto 2014, la referendumon de la 16a de marto 2014[192] kaj la sekvantan peton al Rusio akcepti Krimeon (kaj Sebastopolon) kiel novajn subjektojn de la Ruslanda Federacio, t.e. aligi Krimeon al Ruslando, kion la monda ŝtataro konsideris kiel kontraŭleĝan anekson, havas plurajn aspektojn kaj facetojn, kiuj estas detale analizendaj laŭ la ukraina kaj internacia juro kaj laŭ rusa interpretado. Estas evidente, ke la rusiaj decidoj pri Krimeo kaŭzis gravegan konflikton kun tiuj diversaj juraj interpretoj.

Ĉar la jura pritakso de la anekso de Krimeo esence koncernas ankaŭ la krimeajn tatarojn, mi iom detale okupiĝos ĉi tie pri ĝi.

Enkonduke oni povas konstati, ke ĉiuj decidoj, kiuj estis prenitaj de la krimea parlamento kaj de la rusia flanko en marto 2014 lige kun la eksigo de Krimea Aŭtonoma Respubliko el Ukrainio kaj lige kun ĝia aligo al la Ruslanda Federacio, kontraŭstaris ne nur la internacian juron kaj la konstitucion kaj leĝarojn de Ukrainio kaj Krimea Respubliko. Kiel Otto Luchterhand avertis en 2014 kaj kiel Elena Luk´janova precizigis en 2015, malrespektata estis ankaŭ la konstitucio, le leĝoj kaj reguloj de Ruslando mem (kio ĉi-supre estos montrate pli detale). Ĉiukaze, Putin ne havis la rajton subskribi la koncernajn dekretojn, ĉar laŭ art. 53 de la Viena Konvencio de la 21a de majo 1969 pri la juro de kontraktoj (aŭ traktatoj), tiaj kontraktoj (aŭ traktatoj) estas konsiderendaj kiel senvaloraj kaj nulaj, se ili lezis devigajn normojn.[193] Do, el la vidpunkto de la nomitaj konstitucioj ĉiuj tiam faritaj decidoj devas esti konsiderataj kiel kontraŭleĝaj, senvaloraj kaj nulaj. Tio signifas, ke laŭ la ukraina kaj internacia juro Krimeo daŭre estas nekontestebla integra parto de Ukrainio. Do, Krimeo nuntempe devas esti konsiderata kiel teritorio, kiu estas okupata de Ruslando kontraŭ la internacia juro kaj kontraŭ la rusa juro mem. Laŭ la valida ukraina konstitucio, al kiu Aŭtonoma Krimea Respubliko estis submetita, AKR havis nur limigitajn jurajn kompetencojn kaj rajtojn kadre de la regiona memadministrado kaj tute ne rajtis eksiĝi el Ukrainio, nek peti aliĝon al alia ŝtato. Laŭ art. 138 de la ukraina konstitucio Krimeo rajtis nur okazigi referendumojn rilate al regionaj demandoj, dum demandoj pri la teritoria konsisteco povas esti deciditaj nur kadre de naciaj referendumoj aŭ decidoj de la nacia parlamento. Ankaŭ la parlamento kaj registaro de AKR neniel rajtis fari tiajn decidojn, kiel ili estis faritaj en marto 2014.

El la vidpunkto de la internacia juro, la vico de agoj, lanĉitaj kaj efektivigitaj de Ruslando, kiel la (sekreta) sendado de propraj soldatoj por transpreni la kontrolon pri gravaj strategiaj instalaĵoj, kiel la enoficigo de nova registaro, kiu submetiĝas al la volo de fremda ŝtato, nome Ruslando, kiel la unuflanka eksigo de Krimeo el la origina ŝtato (Ukrainio) kaj ĝia integrado en la konsiston de alia ŝtato (Ruslando) estas konsiderataj kiel kruda enmiksiĝo de Ruslando kaj gravaj lezoj, kiuj laŭ la internacia juro estas strikte malpermesataj (sendepende de la demando, ĉu aliaj ŝtatoj faras la samon aŭ ĉu Ruslando konsideras Krimeon rusa tero).[194] Post la fuĝo de prezidento Janukoviĉ kaj la registara renverso en Kievo en februaro 2014, Ruslando sendis sen la konsento de la ukraina registaro sufiĉe grandan trupon de armitaj fortoj[195] al

[191] En la elektoj de la 31a de oktobro 2010 la marĝena partio „Russkoe Edinstvo“ de Aksjonov, kiu estas speco de filio de la kremla partio „Edinaja Rossija“ ricevis nur 4,02%, kio signifis 30´000 voĉojn kaj 3 mandatojn.

[192] Pri la karaktero de tiu sendependeco kaj okulfrapa manipulado de la referendumo de la Kremlo pli detale skribis: Luchterhand, Otto en: *Osteuropa* (DGO Berlin) 5-6/2014, p. 75s.

[193] Vd. Luchterhand, Otto: Die Krim-Krise von 2014, Staats- und völkerrechtliche Aspekte. En: Zerreissprobe. Ukraine: Konflikt, Krise, Krieg. *Osteuropa* (DGO Berlin) 5-6/2014, p. 61-86.

[194] Eĉ se en antaŭaj jaroj okazis dubindaj militaj intervenoj en Serbio, Irako, Libio ktp. flanke de la Okcidento (ĉefe kun la celo forpeli brutalajn diktatorojn kaj fini la murdadon de civilaj loĝantoj), tio ne signifas, ke Ruslando rajtas fari la samon en aliaj ŝtatoj.

[195] Plej verŝajne la esenca parto de tiu trupo (spec-naz), kiu fariĝis konata kiel „verdaj viretoj“, kiuj estis sekrete transportitaj per aviadiloj kaj helikopteroj rekte el Ruslando al Krimeo, apartenis al la „Ĉefa Administracio por spionado de la ĝenerala stabo de la Armeo de Ruslanda Federacio“ (GRU), kiu estas parto de la armea sekreta servo de Ruslando. Ili devas obei la ordonojn de la ministro pri defendo de Rusio kaj de la prezidento de Rusio, kiu estas la ĉefkomandisto de la armeo de la lando. Oficiale, la aktiveco de tiuj spez-naz-trupoj de GRU estas sekreta, pro kio Ruslando ne parolis pri engaĝo de tiaj trupoj sur Krimeo. Pro tio oni devas supozi, ke la „lokaj memdefendaj fortoj“, pri kiuj oni parolis kaj kiuj laŭdire obeis la ordonojn de „ĉefkomandisto“ Aksjonov, estis nenio alia ol tiaj spec-naz-fortoj, kiuj ekzistis jam en Sovetunio. Ĉe tiu trupo, kiu estis elektita por la krimea

Krimeo kun la celo meti la parlamenton kaj registaron sub premo kaj la duoninsulon mem sub rusian kontrolon por prepari aŭ enkonduki la procezon de teritoria ŝanĝo.[196] La rusa operaco kontraŭ Krimeo komenciĝis la 27an de februaro, kiam en Kievo Arsenij Jacenjuk estis elektita kiel nova ĉefministro. Dum la okupado de la parlamento de Krimeo la samaj „verdaj viretoj“, kiuj en Ruslando estas nomataj „afablaj homoj“, forpelis la gardistojn de la ukraina ministerio pri internaj aferoj, hisis la flagon de Ruslando kaj spontane kunvenigis en sekreta kunsido parton de deputitoj (de kiuj la plimulto apartenis al la „Partio de regionoj“ de Janukoviĉ). Ili devis fordoni siajn moveblajn telefonojn por eviti komunikadon kun la ekstera mondo.[197]

Do, la menciitaj armeaj agadoj kaj politikaj faroj, kiuj estis perfekte efektivigitaj de la rusa flanko per dubindaj rimedoj, t.e. sub konsiderinda premo, kiu ekskludis la eblecon findiskuti la problemojn kaj montri alternativajn solvojn, estis kontraŭaj al la internaciaj juraj normoj kaj principoj, kiel ili estas difinitaj kaj preskribitaj de la koncernaj dokumentoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj devas esti respektataj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Por fortigi la premon, la koncerna referendumo eĉ estis dufoje puŝita antaŭen, kun ŝanĝiĝanta referenduma teksto (kio probable konfuzis la voĉdonantojn). Pro memoria: La internacia juro staras en principo super la nacia juro. Ankaŭ Ruslando subskribis plurajn kontraktojn kadre de UN, OSKE, Eŭropa Konsilio, „Eŭropa Homrajta Konvencio“, „Venecia Komisiono por demokratio per juro“ ktp., per kiuj Moskvo akceptis tiujn normojn kaj principojn. Krom tio ekzistas pluraj traktatoj kaj kontraktoj inter Ukrainio kaj Ruslando, en kiuj ambaŭ flankoj agnoskis tiujn principojn. Laŭ art. 2 de la „Budapeŝta Memorando“[198] de la 5a de decembro 1994, kiu portas la subskribojn de la prezidentoj de Ruslando (El´cyn), Usono kaj Grandbritio, ĉi tiuj nukleaj potencoj promesis, ke ili respektos la suverenecon kaj la ekzistantajn limojn de Kazaĥio, Belorusio kaj Ukrainio, al kiu ankaŭ Krimeo apartenas, kaj ke neniu el ili direktos siajn armilojn kontraŭ la aliaj. (Sed poste Ruslando kaprice distanciĝis de la interkonsentitaj principoj per la argumento, ke Krimeo ne estas koncernata de la „Budapeŝta Memorando“ kaj ke la anekso de Krimeo fare de Ruslando en marto 2014 havis aliajn kaŭzojn). Krom tio ekzistas la ukrain-rusa traktato pri la Nigramara Floto de Rusio de la 31 de majo 1997 (kiu ekvalidis en julio 1999), kiu antaŭvidas komunan ukrainan kaj rusan uzadon de la armeaj instalaĵoj en Sebastopolo.[199] Ukraina leĝo, kiu koncernas la „Traktaton pri amikeco, kunlaboro kaj partnereco inter la Ruslanda Federacio kaj Ukrainio“, estis subskribita la 31an de majo 1997 en Kievo kaj ratifita de la ukraina parlamento la 14an de januaro 1998; ankaŭ ĉi tiu kontrakto emfazis ĉiujn altajn principojn de la reciprokaj amikeco kaj kunlaboro. Krom tio, daŭre validas la „Fina Interkonsento de KSKE-Helsinko“ de 1975,[200] kiu antaŭvidas pacan solvon de la konfliktoj inter ŝtatoj, la „Traktato de Parizo de 1990 pri nova Eŭropo“[201] kaj la „Bazaj Interkonsentoj inter NATO kaj Ruslando“ de 1997,[202] kaj, ne plej laste, la „Interkonsento inter la ŝtatoj de KSŜ“[203] de la 11a aprilo 1994, kies 5a artikolo fiksis la netuŝeblon de la limoj de tiuj ŝtatoj,[204] al kiuj

---

operaco, kiu estis komandita de Sergej Ŝojgu, ministro pri defendo de Rusio, temis pri la 76a gvardia divizio el Pskov, kiu ankoraŭ en la sama nokto okupis la la konstruaĵojn de la Supera Soveto de Krimeo en Simferopolo. La soldatoj estis sen insignoj, kaj la rusia registaro ne indikis, ke temas pri soldatoj el Rusio kaj eĉ kontestis ĉian partoprenon en la operaco. Ankaŭ la partorpenintaj soldatoj mem ne scis, por kiu operaco ili estos uzitaj kaj kien ili estos transportitaj. Gravan rolon en tiu fazo ludis Oleg Belavencev (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Oleg_Belaventsev). (Vd. M. Sygar. Endspiel. Die Metamorphosen des Vladimir Putin. Köln 2015, S. 328f.).

196 La decidoj kaj ordono invadi Ukrainion kaj transpreni la politikan respondecon por tiu operaco estis farita verŝajne dum kunsidoj de la Sekureca Konsilio de Ruslando sub la prezido de Putin, okazintaj la 21an kaj 25an de februaro (en Novo Ogarjovo).

197 Fel´gengauėr supozas, ke la giganta koncentriĝo de rusaj soldatoj kaj milita aparataro ĉe la orienta limo de Ukrainio celis konfuzi kaj trompi la usonan sekretservon por deflankigi ĝin pri la veraj intencoj de Ruslando – invado, okupacio kaj anekso de Krimeo. Alia hipotezo de la aŭtoro estas, ke per la diversaj provokoj, kiujn Putin lanĉis ĉirkaŭ Ukrainio kaj Krimeo, la rusa prezidento celis interkvereligi la okcidentajn ŝtatojn.

198 Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Budapest_Memorandum_on_Security_Assurances kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Treaty_on_the_Non-Proliferation_of_Nuclear_Weapons.

199 La Kontrakto pri Nigramara Floto de Rusio, kiu finiĝos en 2017, estis longigita en aprilo 2010 ĝis la jaro 2042. Kiel rekompenco (!) Ukrainio ricevis 30-procentan rabaton por gaso el Rusio.

200 Kiu antaŭvidas tutan aron de rimedoj, kiujn la ŝtatoj devas respekti, vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Helsinka_Interkonsento. Cetere, la difino pri netuŝebleco de ŝtataj limoj estis akceptita laŭ postulo de Sovetunio, kiu volis sekurigi sian postmilitan teritorian posedon lige kun la ´germana demando´, kiu tiam ne ankraŭ estis solvita.

201 Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Pintokunsido_de_Parizo.

202 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Nato-Russland-Grundakte.

203 Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Komunumo_de_Sendependaj_Ŝtatoj.

204 Vd. http://cis.minsk.by/reestr/ru/index.html#reestr/view/text?doc=1 n https://ru.wikipedia.org/wiki/Беловежские_соглашения.

ankaŭ Ukrainio apartenis. Krom tio, kaj Ukrainio kaj Ruslando subskribis diversajn konvenciojn pri protektado de minoritatoj. Sendepende de la demando, kia registaro aktuale regas iun landon, la respektado de tiuj bazaj historiaj interkonsentoj kaj traktatoj estas nepre necesa por la stabileco kaj paco en Eŭropo. En tio Ruslando portas aparte grandan respondecon. Ŝajnas, ke Ruslando fajfas pri ĉiuj tiuj interkonsentoj. Sed kion fari? NATO ne riskas militon kun Rusio, despli ke Ukrainio kaj Krimeo ne estas membroŝtatoj de NATO, kiuj estas defendendaj de tiu milita alianco. La momento de la hasta anekso de Krimeo certe estis elektita de Putin ankaŭ sur tiu fono, ĉar li ne povis scii, ĉu NATO baldaŭ akceptos Ukrainion kiel membron laŭ peto (kio tamen estis tre malverŝajna).

Konforme al tiuj konvencioj kaj interkonsentoj, granda parto de la monda ŝtataro decidis konsideri la aligon de Krimeo kiel anekson[205] kaj malagnoskis/as la teritorian ŝanĝon. Per sia vetoo Ruslando sukcesis tamen eviti akcepton de rezolucia propono, kiu estis submetita de 42 ŝtatoj al la Sekureca Konsilio de UN, kiu devintus devigi la ŝtataron malagnoski la rezulton de la Krimea referendumo, (13 de 15 membroj de tiu konsilio kondamnis la teritorian ŝanĝon kontraŭleĝa, kio tamen signifis gravan perdon de politika prestiĝo por Ruslando, kiu rilate tiun ĉi demandon tamen fariĝis internacie izolata). Malgraŭ la rusia vetoo, la anekso de Krimeo objektive tamen *ne povas* esti agnoskita laŭ la validaj reguloj de la internacia juro. La plenkunsido de UN proklamis la referendumon kaj la secesion de Krimeo nevalidaj per la rezolucio 68/262[206] kun plimulto de 100 voĉoj kontraŭ 11 kaj 58 sindetenoj (ĉefe flanke de afrikaj kaj aziaj ŝtatoj inkluzive Hindion kaj Ĉinion), laŭ art. 2, alineo 4 de la UN-Ĉarto, kiu malpermesas aplikon de perforto de unu ŝtato kontraŭ alia koncerne la teritorian integrecon kaj politikan sendependecon de la ŝtato. Laŭ tiu principo Ruslando ne rajtis subteni la secesion de Krimeo, eĉ se la UN-Ĉarto ne malpermesas „intervenon laŭ invito", kio estas principo, kiun la rusia (kaj antaŭe sovetia) flanko regule eluzadis (ekzemple en Afganio en 1979 kaj en Sirio en 2015, sed ankaŭ en Abĥazio, Sudosetio, Transdnistrio). Kondiĉoj por tia solvo tamen estas decido de la Sekureca Konsilio de UN, aŭ la invito devas esti farita de demokratie elektita registaro (en la kazo de Krimeo en 2014 tiu fakto ne ekzistis).

Dum ukrainaj politikistoj kaj okcidentaj juristoj konsideras la secesion (aliĝon, anekson) de Krimeo kontraŭleĝa, argumentante surbaze de certaj punktoj de la internacia juro, kiuj estis menciitaj ĉi-supre, rusiaj politikistoj kaj juristoj preferas baziĝi sur iuj aliaj punktoj de la internacia juro. Emfazante precipe la rajton de popoloj decidi mem sian sorton, la rusoj klopodis pravigi siajn decidojn, kiujn ili faris por aneksi Krimeon. Sed la pretekstecon kaj falsecon de tiu argumentado politikistoj kaj fakuloj de ĉiuj koloroj rapide malkaŝis kaj kritikis. Ĝenerale, la internacia juro indiferente aŭ neŭtrale rilatas al la demando pri memdecido de la popoloj. Kvankam secesio ne estas malpermesata, ne ekzistas principa secesia rajto, kiu estus deduktebla el la rajto de la popoloj mem decidi sian sorton, pri kiu naciaj minoritatoj povus baziĝi, ĉar etna minoritato principe ne havas la rajton je teritoria secesio (ĉar la ŝtataj konstitucioj, kiujn tiuj minoritatoj devas respekti, kutime ne permesas secesion) sed nur rajtas postuli konservadon de sia (etna, kultura) identeco, dum la internacia juro preferas protekti la teritorian integritecon de la ŝtatoj. Krimeo do ne rajtis secesii, ĉar laŭ la ukraina konstitucio ĝi estis/as integra parto de Ukrainio, kiu estas unueca ŝtato.[207] Eĉ se la krimea referendumo estintus justa kaj laŭleĝa, gravas la demando, ĉu la ĉeesto de rusiaj armeanoj sur la teritorio de Krimeo antaŭ la formala proklamo de la sendependeco estis laŭleĝa. Tiun ĉi demandon oni devas klare negative respondi. La armea interveno de Rusio estis klare ligita kun la posta politika procezo de la eksigo kaj anekso de Krimeo, t.e. kun anticipa intencoj de la rusa flanko, eĉ se Putin asertis la malon. La ŝajn-sendependa „Krimea Respubliko", kiu estis proklamita la 11an de marto, estiĝis sub la kondiĉoj de forta rusia premo, de kruda politika enmiksiĝo kaj de armea interveno; pro tio la ŝtataro ne povis agnoski tiun sendependecon, ĉar ĝi klare kontraŭdiris la internacian juron. Kaj kiel dirite, Krimeo ne rajtis peti aliĝon al Ruslando kaj esti akceptita de Ruslando kiel federacia subjekto. Laŭ la internacia juro por la ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj ekzistas klara devigo

[205] Pri la difino de anekso v. https://de.wikipedia.org/wiki/Annexion.

[206] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/United_Nations_General_Assembly_Resolution_68/262.

[207] La ŝtataro singarde praktikas aŭ aplikas la efektiviĝon de la memdecida rajto de popoloj, kiun ĝi preferas ligi kun interna reguligo de la problemoj. Ekzemple art. 3 de la UN-deklaracio pri la rajtoj de la indiĝenaj popoloj de 2007 ja permesas al ili la memdecidan rajton, sed art. 4 limigas tiun rajton al interna aŭtonomeco. Multaj ŝtatoj timas, ke aŭtonomeco povas konduki al secesio. Aliflanke, la organoj de la aŭtonomaj teritorioj estas devigataj esti lojalaj al la centra potenco kaj respekti la leĝojn de la ŝtato, al kiu ili apartenas. Kvankam secesio ĝenerale ne estas malpermesita, gia legitimeco tamen dependas de konkretaj cirkonstancoj (Vd. http://www.tagesspiegel.de/politik/ukraine-hat-die-krim-ein-recht-auf-abspaltung/9602184.html kaj http://www.ifhv.de/documents/huvi/selectedarticles/3-2014-heintze.pdf).

malagnoski ŝanĝon de teritorio, kiu okazis pro apliko de politika premo, (milita) minaco aŭ ajna alia formo de perforto aŭ manipulado. Do, en la kazo de la rusia anekso de Krimeo ekzistas nenio, pri kio oni povintus konsenti favore al la agmaniero de Ruslando. Kancelierino Merkel eĉ nomis la anekson „krimo“.[208]

Por reveni al la secesio, la internacia juro donas al la popoloj la rajton secesii nur en kazo de eksterordinaraj cirkonstancoj kiel ekzemple interna milito, humanitara (aŭ humaneca) katastrofo, aŭ reprezalioj kontraŭ iu etno. En la kazo de Krimeo tiaj cirkonstancoj ne ekzistis, nek la neceso por secesio, eĉ se parto de la rusoj de Krimeo deziris tion. Interna milito, humanitara (aŭ humaneca) katastrofo, aŭ reprezalioj aŭ minacoj kontraŭ la rusoj en formo de genocido flanke de la ukraina registaro post la „faŝisma puĉo“ en Kievo, kiel Putin celis kredigi en sia parolado de la 18a de marto 2014, ne povis esti konstatitaj, do humanitara interveno de Ruslando ne estis bezonata (kompare kun Kosovo, kie jes okazis interna milito, humanitara katastrofo kaj komenco de genocido[209]). Ĉiuj ĉi-rilataj argumentoj, kiujn la rusa flanko prezentis, estis elpsensitaj, pretekstaj kaj ŝajnaj kaj do ne povis esti serioze konsiderataj. Laŭ la internacia juro, interveno en fremda ŝtato per milita perforto por ´savi´ proprajn civitanojn ne estas permesate sen la konsento de tiu ŝtato.[210] Se la rusa UN-reprezentanto Ĉurkin asertis la malon, li eraris (ĉar evidente li false premisis surbaze de la historia procezo de la naciliberiga batalo kaj sendependiĝo de popoloj kadre de la malkoloniiĝo). Nur en kazo de gravaj krimoj kontraŭ iuj etnoj, militaj kaj aliaj lezoj la *internacia komunumo* havas la rajton interveni (kiel en Kosovo). Ruslando ne elĉerpis ĉiujn disponeblajn kaj antaŭvidatajn rimedojn por pace solvi la konflikton en Ukrainio kaj Krimeo; male oni devas riproĉi al Ruslando, ke ĝi havis malbonajn intencojn kontraŭ tiuj landoj, trudante siajn anticipe formitajn intencojn al ili kaj artefarite provokante superfluajn krizojn kaj konfliktojn en tiuj regionoj pere de falsaj asertoj kun la celo malstabiligi, invadi, okupi kaj aneksi ilin. Tio ne signifas, ke en Ukrainio ĉio estus en plej bona ordo, ekzemple ke la homaj rajtoj ne estus grave lezataj (tamen ne grandstile), kiel ĉi-koncerna raporto de la Eŭropa Konsilio konstatis. Malgraŭ multaj klopodoj, bonaj intencoj kaj konkretaj progresoj en la pasintaj du jardekoj, en Ukrainio ekzistis kaj daŭre ekzistas gravaj deficitoj aŭ mankoj rilate la konstruadon de la demokratio, rilate al la juro kaj korupto kaj rilate al la kreado de la civila socio en vasta kompreno. Oni ne devas forgesi la fakton, ke Ukrainio kaj Krimeo daŭre troviĝas en ege malfacila ekonomia stato, kaj ke la tragika historio de tiuj landoj postlasis multajn spurojn kaj vundojn ĉe la ekzamenata popolo. En tio, la demandon pri la kulpo oni prefere ne starigu.[211]

Laŭ la internacia juro, la rajto je memdecido de popoloj devas esti efektivigata kadre de la ŝtato, en kiu la secesiema popolo troviĝas, precipe per taŭgaj formoj kaj rimedoj de la aŭtonomeco aŭ memadministrado. Per sia statuso kiel aŭtonoma respubliko Krimeo havis tiajn formojn kaj rimedojn. Ukrainio ne tuŝis tiun aŭtonomecon, kvankam en la 90aj jaroj okazis disputoj pri la konstitucio. Kaj ankaŭ ´lingva problemo´ ne ekzistis: la rusa, ukraina kaj krime-tatara lingvoj estis egalrajte traktataj kiel oficialaj lingvoj kadre de tiu aŭtonomeco. Se la ukraina parlamento volis aboli la statuson de minoritataj lingvoj, Turĉinov, la tiama provizora prezidento de Ukrainio, povis almenaŭ eviti tiun scenaron per sia vetoo.

Kutime tiaj konfliktoj kiel la krimea daŭras longe kaj ilia solvo postulas grandegan paciencon. Se la juro estis rompita, tio tamen ne signifas, ke la faktoj estas definitive kreitaj kaj devas esti (silente) akceptitaj. Oni devas plue insisti pri la respektado de juraj pozicioj. En intertraktoj kun Ruslando oni devus esplori, ĉu Ruslando eventuale konsentus akcepti aŭtonomecon por Krimeo kadre de Ukrainio, aŭ ĉu Ukrainio fine akceptus la secesion de Krimeo aŭ entute ĝian transiron al Ruslando.[212] En junio 2014 Petro Poroŝenko, nova prezidento de Ukrainio, montris sin optimisma, ke Krimeo estos reunuigita kun

[208] Vd. http://www.faz.net/aktuell/politik/70-jahre-kriegsende/gedenken-in-moskau-merkel-nennt-annexion-der-krim-verbrecherisch-13585275.html#/elections.

[209] Vd. http://pelagon.de/?p=5227. La kazo de Krimeo ankaŭ ne povas esti komparata kun la kazoj de Abĥazio kaj Sudosetio (vd. Luchterhand en: *Osteuropa* (DGO Berlin) 5-6/2014, p. 80.

[210] La UN-Ĉarto, art. 51, antaŭvidas unu solan escepton de permesata perforto: Temas pri la rajto mem defendi sin. Pri tiu ĉi rajto Ruslando evidente ne povas baziĝi, ĉar Ruslando ne estis atakita de Ukrainio. Male, Ukrainio havintus la rajton defendi sin kontraŭ rusa milita agreso, sed Ukrainio preferis ne reataki la rusojn, ĉar tio estus kaŭzinta multajn viktimojn. En sia parolado de la 18a de arto 2014 cinikulo Putin eĉ eksplicite dankis al la ukraina armeo, ke ĝiaj soldatoj ne pafis por eviti sangoverŝadon.

[211] Certe, la rusoj kun sia ŝovinisma kaj imperiisma politiko ludis kaj ludas centran rolon, dum la ukraina popolo – same kiel ĉiuj ceteraj popoloj de la iama Ruslanda Imperio – devas esti konsiderata kiel viktimo. Estas urĝa tempo, ke la rusoj *principe* ŝanĝu sian sintenon.

[212] Vd. http://www.tagesspiegel.de/politik/ukraine-hat-die-krim-ein-recht-auf-abspaltung/9602184.html.

Ukrainio.[213] Sed tio estas verŝajne nura deziro, kiu apenaŭ respegulos la realecon. Krimeo estas verŝajne konsiderata kiel ´perdita´, ĉar la ukraina armeo ne povus rekonkeri ĝin, kaj Ruslando sen dubo defendus ĝin per ĉiuj rimedoj, kiuj estas je ĝia dispono. Oni do povus ankoraŭ diskuti, ĉu la ordono de la kieva registaro de la 24a de marto 2014 retiri la ukrainan armeon kaj la konfirmo de Ruslando de la 28a de marto, ke la ĉeesto de la ukraina armeo sur Krimeo finiĝis, povas esti interpretataj kiel finaj aktoj de la jura transiro de Krimeo de unu ŝtato al alia kaj kiel rezigno de Ukrainio pri sia suvereneco super Krimeo.

Post la anekso de Krimeo fare de Ruslando, Usono kaj Eŭropa Unio enkondukis vastan skalon de sankcioj kontraŭ la „rusa“ registaro de Krimeo kaj kontraŭ diversaj personaroj kaj ekonomiaj branĉoj de Ruslando mem, kiuj estas iel ligitaj kun tiu anekso kaj la agresema politiko de Putin, kio kondukis al nova historia krizo kaj konflikto inter Ruslando kaj la Okcidento, kun simila dimensio al tiu de la Malvarma Milito.[214] Jam de jaroj Vladimir Putin persone entreprenas, cetere ekster ĉiuj demokratiaj normoj kaj juraj principoj (krom la propraj), ĉion eblan harhirtigan ne nur por subpremi la civilan socion en la propra lando, sed ankaŭ por timigi la najbarojn de Ruslando, de Estonio ĝis Japanio, kaj por diskrediti, misfamigi kaj damaĝi la Okcidenton, kiu, laŭ Putin, maljuste traktas Ruslandon (kio estas komplete absurda opinio). Tiel, la Okcidento iusence kapitulacis antaŭ la agresema konduto de tiu ŝtatestro, kiu laŭdire ĝuas grandan popularecon flanke de la ruslanda popolo, kvankam, kiel oni povas konkludi el lia biografio, temas verŝajne pri nura simpla fripono aŭ gangstro kun altgrade evoluintaj ĉekismaj-mafiaj trajtoj, kiu hazarde, arbitre kaj fatale ricevis la ĉefan politikan povon en sia lando, kio certe estos ĝia granda malfeliĉo.[215] Ĉiu iom klera au informita ruso bone scias tion sed hezitas konfesi ĝin. Fakte, Putin restis granda enigmo, kies agoj estas konfuzaj kaj malbone kompreneblaj.[216] Tiu situacio estigas novajn demandojn kiel: ĉu la ruslanda popolo, kiu jam trifoje elektis tiun prezidenton, devos transpreni la respondecon pri la fifaroj (eble krimoj) de la rusa registaro (plenumitaj en- kaj eksterlande) en analoga maniero kiel siatempe la germana popolo estis (almenaŭ morale) devigata transpreni la respondecon pri la krimoj, kiuj estis plenumitaj en la nomo de la nacisocialistoj? Por lando kaj popolo, kiu apogas tian hontindan politikon kaj aprobas la renverson de la intencoj kaj faroj de Miĥail Gorbaĉov, oni povas senti nur profundajn abomenon, malrespekton kaj bedaŭron. Ĉu la rusoj ankoraŭ ne komprenis, ke tiu Putin estas altgrade danĝera ulo? Lau Mustafa Dĵemilev, al kiu la rusoj malpermesas reveni al Krimeo kaj kiu loĝas en Kievo, la „mondo estas en danĝero“ pro la politiko de Ruslando.

Kiel Aleksej Naval´nyj,[217] unu el malmultaj kuraĝuloj en Ruslando, kiuj proprariske aŭdacas kontraŭstari la farojn de la bando de Putin, klarigis, la ŝtata juro de Putin funkcias laŭ la principo „senpuneco kontraŭ strikta lojaleco“. Putin ne batalas kontraŭ la korupto, sed lia bando lerte utiligas ĝin por siaj celoj. Ĉiu, kiu montras sin mallojala al Putin, ricevas gravajn problemojn, la aliaj ricevas avantaĝojn kaj privilegiojn.[218] Tiu ´juro´ nepre validas ankaŭ por la krimeaj tataroj. Unue Putin klopodis ´aĉeti´ la lojalecon de la krimeaj tataroj, farante al ili diversajn promesojn kaj preta al komplezoj. Kiam li rimarkis, ke li malsukcesis kaj ke la krimeaj tataroj ne emas akcepti liajn ´donacojn´, la venĝema rusa ŝtatestro turnis la lancon, kiun li komencis ĵeti kontraŭ la tataroj, kun plena ĉagreno, kolero kaj kun malbonaj intencoj.[219]

Sed Putin ne estas la ĉefa temo de ĉi tiu studo. De la aktuala krizo ankaŭ la krimeaj tataroj estas rekte koncernataj. Amnestio Internacia (AI) kaj Human Rights Watch (HRW) prijuĝis/as la situacion de la homaj rajtoj sur Krimeo tre malbona kaj malfacila.[220] En januaro 2016 delegacio de la Eŭropa Konsilio

---

[213] Vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2014-06/ukraine-krim-petro-poroschenko.

[214] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_von_Sanktionen_in_der_Krimkrise.

[215] Kiel oni eble memoras, Boris El´cyn elektis ĝuste la iaman KGB-agenton Putin kiel sian posteulon (t.e. unue ĉefminstron kaj poste prezidenton), ĉar li kapablis fari tri promesojn: a) ne reenkonduki la komunismon (t.e. daŭrigi la kapitalisman ekonomion) en Ruslandon, daŭrigi la militon kontraŭ Ĉeĉenio kaj protekti la familion El´cyn antaŭ jura persekutado.

[216] Interesajn kaj utilajn konsiderojn pri eblaj influoj de la pensmaniero de Putin provas doni Michel Eltchaninoff: Dans la tête de Vladimir Poutine. Arles 2015; germanlingve: In Putins Kopf. Die Philosophie eines lupenreinen Demokraten. Stuttgart 2016;

[217] Pri li vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Alexei_Navalny kaj

[218] Vd. *Neue Zürcher Zeitung* de la 1a de aprilo 2016, p. 9 (rete: http://www.nzz.ch/international/der-kreml-kritiker-nawalny-im-gespraech-ich-weiss-dass-meine-arbeit-gefaehrlich-ist-ld.10923).

[219] Vd. http://www.welt.de/politik/ausland/article153845271/Wir-warten-auf-den-Tag-an-dem-wir-einmarschieren.html.

[220] Vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-03/amnesty-menschenrechte-krim-russland kaj http://www.nzz.ch/international/der-kreml-kritiker-nawalny-im-gespraech-ich-weiss-dass-meine-arbeit-gefaehrlich-ist-ld.10923. https://www.hrw.org/report/2014/11/17/rights-retreat/abuses-crimea.

vizitis Krimeon por kontroli, ĉu la eŭropa konvencio pri homaj rajtoj estas respektata fare de Ruslando, aŭ ĉu ĝi estas daŭre lezata, kio evidente estas la kazo.

### Nekutima jura debato en Ruslando

Sed ĉu Krimeo vere estas legitima parto de Ruslando kaj ĉu ĝia aliĝo al la Ruslanda Federacio okazis laŭleĝe kaj enorde, kiel la rusa propagando asertas? Sub tiu ĉi moto okazis interesa kontraŭdira debato (fakte du monologoj) inter du rusaj juristoj en la rusia gazetaro. La 19an de marto 2015, do unu jaron post la anekso, en la ´sendependa´ *Novaja gazeta* aperis ampleksa kritika artikolo de Elena Luk´janova, en kiu ŝi nete neis la legitimecon de la aliĝo aŭ aligo de Krimeo al Ruslando, klarigante la punktojn de la drasta lezado de la konstitucio kaj leĝaro de Ruslando mem.[221] Ĝis tiu momento la aliĝo, aligo (aŭ anekso) de Krimeo apenaŭ kaŭzis seriozajn debatojn inter ruslandaj juristoj. Male, la gvidaj juraj fakuloj de Ruslando retenis sian publikan komenton, dum precipe en la interreto iuj junaj juristoj tamen kritike traktis/as la aligon de Krimeo al Ruslando kaj la sintenon de Moskvo rilate la situacion en orienta Ukrainio. Ekzemplo por tia lojala sinteno estis la alvoko de junio 2014, kiu estis subskribita de la prezidanto de la „Ruslanda Unuiĝo por Internacia Juro“, Anatolij Kapustin, kiu estiĝis post komuna konferenco kun la rusia diplomata akademio kaj atestis la intiman interligitecon de gvidaj rusaj juristoj pri internacia juro kun la rusia diplomatio. Ilia argumentado ne ĉiam estas jura, sed grandparte kongruas kun la oficiala linio de la Kremlo. En ĝi oni ripetis la legendon, ke Krimeo estis rusa „dum jarcentoj“ kaj ke ĝia transiro al Ukrainio en 1954 okazis kontraŭleĝe kaj arbitre. Krom tio, la ukraina registaro estas kritikata pro tio, ke ĝi akaparis la povon kontraŭleĝe en formo de puĉo kaj ke Ukrainio estis regata de faŝistoj, ekstremistoj kaj naciistoj. Al tiu ukraina registaro oni riproĉas inter alie, ke ĝi lezas la rajton de la rusoj paroli la rusan lingvon. Oni komparas Krimeon kun Kosovo, kiun oni konsideras kiel precedencon kaj nekutime akre atakas la Okcidenton, precipe Usonon kaj la landojn de Eŭropa Unio, al kiuj oni imputas, ke ili subtenis la starigon de mallegitima reĝimo en Kievo. Samtempe, la rusia flanko rifuzas la kritikon, ke la referendumo sur Krimeo estis efektivigita nur post armea premo de Ruslando kaj ke Moskvo partoprenas en la milito en orienta Ukrainio (Donbaso), kiel mensogojn. Per tio, tiuj juristoj-diplomatoj, inter ili Valerij Zor´kin, la prezidanto de la konstitucia trubunalo de Ruslando, oportunisme respegulis la (dubindajn) vidpunktojn de Putin kaj de la rusa propagando kaj grandparte rezignis prezenti propran opinion.

Fortan principan kritikon la ´krimea´ juĝo de la konstitucia tribunalo de Ruslando de la 19a de marto 2014 ricevis de ***Elena Luk´janova***, kiu kontrolis ĝiajn formalajn flankojn. En tio ŝi avertis, ke ŝin tute ne interesis la politika aŭ morala motivacio de la juĝo, sed nur la demando, ĉu la kontrakto pri la aligo (aŭ aliĝo) de Krimeo al Ruslando *formale* kongruis kun la kutimaj juraj normoj kaj principij kaj konformis al la leĝo de Ruslando mem. En tio ŝi venis al la konstato, ke tiu tribunala juĝo plenumis ok bazajn jurajn lezojn.

Unue, ŝi konstatis, ke jam la ekzamenado de la ratifikita leĝo pri la aliĝo de Krimeo kaj Sebastopolo fare de la konstitucia tribunalo ne okazis laŭ la reguloj, kiuj estas postulataj de la leĝo, kio signifas, ke en tiu ĉi kazo eĉ la konstitucio de Ruslando estis kontraŭdirita. La problemo estas, ke laŭ la leĝo pri konstitucia tribunalo, ĉi tiu instanco ekzamenas internacijurajn kontraktojn de la Ruslanda Federacio nur surbaze de peto fare de iu ŝtata organo, kiu esprimas „dubon pri la konstitucia konformeco de la koncerna kontrakto“. En tiu ĉi kazo la konformeco estis ekzamenata laŭ la peto de prezidento Putin, sed mankas pruvilo, ke li esprimis dubon pri la konstitucia konformeco de la aliĝo.

2e: Laŭ art. 7, alineo 4 de la leĝo pri akcepto de novaj subjektoj, aliĝkontrakto nepre devas esti submetita al la konstitucia tribunalo por esti ekzamenata de iu *neŭtrala* instanco. Fakte, okazis grava kolizio de normoj, kiujn la leĝdonanto devus eviti kaj reĝustigi. Ŝajnas, ke por la konstitucia tribunalo tio ne estis granda problemo. Male, oni eĉ ne traktis ĝin, sed reagis per unuflanka argumentado favore al la akcepto de la decido. En tio Luk´janova vidas pruvon, ke la konstitucia tribunalo *volis* akcepti la decidon, ignorante kontraŭdirajn argumentojn.

3e: Luk´janova kritikis, ke antaŭvidendaj proceduroj, kiuj estas devigaj kaj kutimaj en tia kazo, inkluzive de la akiro de provizora unua ekspertizo, ne influis la alprenon de la juĝo, kvankam la tribunalo havintus la eblecon efektivigi la necesan proceduron, konsiderante ĉiujn paŝojn, kiuj estas preskribitaj de

[221] Pri tio fakte la antaŭan jaron jam atentigis Otto Luchterhand en: *Osteuropa* (DGO Berlin) 5-6/2014, p. 84-86.

la leĝo por proklami la juĝon. Sub tiaj kondiĉoj la kontrakto ankoraŭ ne estus fariĝinta valida (kion oni evidente volis eviti, aK). La tribunalo pravigis la mallongigitan kaj rapidigitan proceduron per la „specialecoj de la kazo“. (vd. ankaŭ punkton 6.)

4e: Post tiuj juraj formalaĵoj, kiuj povas aspekti pedantaj kaj harfendaj sed tamen esencaj, Luk´janova direktis sian ĉefan kritikon kontraŭ la fakto, ke la konstitucia tribunalo rifuzis ekzameni, ĉu la kontrakto entute respektas aŭ ne la internacian juron mem. Per tio ŝi nature tuŝis vundan punkton kaj riskis esti konsiderata kiel komplico de la Okcidento, kvankam laŭ art. 15, alineo 4 de la ruslanda konstitucio, la ĝenerale agnoskataj principoj kaj normoj de la internacia juro kaj la interacijuraj kontraktoj de Ruslando mem formas integran parton ankaŭ de la interna jura ordo de Ruslando, kio signifas, ke ili estas prioritataj kompare kun simplaj rusiaj leĝoj kaj staras super ili. La prioritateco de la internacia juro do devus validi ankaŭ en la kazo de la rusia leĝo pri ratifikado kaj aliĝo. Sed la konstitucia tribunalo ne ekzamenis tion. Male, kiel pravigon ĝi prezentis la klarigon, ke ĝi kompetentas nur pri juraj demandoj, sed ne okupiĝas pri la politika celkonformeco de iu internacia kontrakto (!!).

Kiel 5a punkto, Luk´janova vidis ankaŭ gravan lezon en tio, ke la politikaj reprezentantoj de Krimeo, kiuj subskribis la kontrakton, ne rajtis subskribi ĝin, ĉar ili ne ricevis siajn oficojn kaj mandatojn laŭ la koncernaj *ukrainaj* leĝoj, kiuj validis sur Krimeo, sed pro la tumultoj lige kun la puŝata proklamo pri la sendependeco de Krimeo.[222]

6e: Alia problemo por Luk´janova estis ankaŭ, ke la kontrakto ekvalidis jam antaŭ sia ratifado. Kun referenco al la internacia juro la konstitucia tribunalo aprobis tion. Sed art. 65, alineo 2 de la rusia konstitucio diras, ke nova subjekto estas akceptita de la Ruslanda Federacio nur post la proceduro, kiu estas preskribita de la federacia konstitucia leĝo, kiu difinas, ke iu tia kontrakto ne povas iĝi valida, se la ruslanda konstitucia tribunalo proklamas, ke la kontrakto estas kontraŭleĝa. El tio Luk´janova konkludis, ke laŭ rusia juro tia kontrakto povas ekvalidi nur post ekzamenado fare de la konstitucia tribunalo. Ĉiukaze, Putin ne rajtis subskribi tiun kontrakton.

7e: Laŭ Luk´janova la krimea decido kontraŭdiris ankaŭ la precedencon en la kazo de la armea enĝaĝiĝo de Ruslando en Ĉeĉenio. Tiam la konstitucia tribunalo agnoskis la protekton de la teritoria integreco kiel bazan principon de la konstitucia juro kaj ne vidis spacon por la separiĝo de iu subjekto el la tutŝtata teritorio. Laŭ Luk´janova tiu sama principo devus validi analoge ankaŭ en la kazo de Krimeo, kiu estis integra parto de Ukrainio.

La 8an lezon de la juro Luk´janova vidis en tio, ke ankaŭ la urbo Sebastopolo estis inkluzivita en la kontrakton kaj aliĝon, kvankam la urbo antaŭe ne formis parton de la Krimea Aŭtonoma Respubliko, ĉar por ĝi validis apartaj kontraktoj inter Ukrainio kaj Ruslando, reguligantaj la statuson de la urbo, kiu estas la sidejo de la Nigramara Floto de Rusio. Ankaŭ tiun ĉi demandon la konstitucia tribunalo neglektis respondi.

Por Elena Luk´janova la decido pri la aliĝo kaj akcepto de Krimeo fare de la Ruslanda Federacio estas klasika ekzemplo de la malrespektado de la principo de *rule of law* pro erara interpretado de terminoj kaj pro manipulado de la preskribata proceduro. Ĉi tiun lezon ŝi riproĉis precipe al Valerij Zor´kin, prezidanto de la konstitucia tribunalo, persone, kaj Luk´janova ne hezitis nomi tiun konduton „barbara“. Entute, Luk´janova venis al la konkludo, ke la aliĝo kaj akcepto de Krimeo fare de la Ruslanda Federacio estis efektivigitaj kaj kontraŭ la internacia juro kaj kontraŭ la ruslanda konstitucio. Klara verdikto, kiun verŝajne eĉ Putin impresis, ĉar tiu verdikto, konkludata de saĝa, inteligenta kaj objektiva juristo, estas absolute ĝusta kaj prava. Al Luk´janova ankaŭ tute ne plaĉis ekzemple la fakto, ke gravaj eŭropaj konvencioj, kiuj estas devigaj ankaŭ por Ruslando, ne estas respektataj kaj ke la koncepto aŭ termino pri la „jura ŝtato“ (pravovoe gosudarstvo), kiun ankaŭ Ruslando adoptis en sia jura sistemo, ne estas komprenataj en tiu lando. Ŝian firman malaprobon trovas strukturoj kaj praktikoj de la justico, kiuj estas klare puŝataj de rusiaj juristoj kaj juĝistoj, kiuj dependas de la politiko, kio estas malbona kaj neakceptebla afero laŭ ŝi. Krom tio ŝi prilamentis, ke „bonaj“ kaj sendependaj juristoj estas ekskluditaj en Ruslando, dum en la pasintaj du jardekoj nur politike konformismaj kaj Putin-lojalaj juristoj estis elektitaj al superaj postenoj. La sama problemo pri politika dependeco ekzistis ankaŭ en la kazo de la aligo de Krimeo al la Ruslanda Federacio en marto 2014, kiu estis decidita kaj konfirmita de politike dependaj juristoj kaj juĝistoj, kiuj tordis la juron kaj kondukis ĝin al la absurdo.

[222] Kiel oni povas legi en la supre prezentita „Ordono“ de Putin, Ukrainio eĉ ne estis menciita.

Nature, la kritikita prezidanto de la konstitucia tribunalo de Ruslando, ***Valerij Zor´kin,*** sentis sin provokita respondi per propra repliko, kiun li publikigis la 24an de marto 2015 en *Rossijskaja gazeto,* kiu estas konsiderata kiel organo de la ruslanda registaro, en serio de prijuraj artikoloj, kiujn li aperigas en tiu gazeto jam de jaroj. Tiu artikolo donas bonan impreson pri la pensmaniero de tiu rusia juristo, kiu staras pinte de la konstitucia tribunalo kaj kies sinteno kompletigas la supre traktitajn decidojn de la tribunalo. Zor´kin, kies kontribuaĵoj estas verkitaj en alarmisma stilo, regule avertas la rusian publikon gardi sin antaŭ kaoso kaj pereo, kiuj estas provokataj de ekstere. Aparte timiga ekzemplo en la historio estas por li la okazaĵoj dum la 1990aj jaroj, kiam en Ruslando (sub El´cyn) regis politika malstabileco, ekonomia anarkio kaj jura malcerteco. Ŝajnas, ke tiuj spertoj signifis por Zor´kin daŭran traŭmaton, kiun li evidente neniam digestis. Por eviti ripetiĝon de tia periodo, Zor´kin sentas sin taskata zorgi pri la „sorto de Ruslando“ kaj la neceson adekvate protekti la ŝtaton antaŭ tiaj problemoj. Laŭ Zor´kin nur „forta, potenca ŝtato“ povas garantii stabilecon kaj bonfarton. En tio li ne hezitas ankaŭ admoni la opozicion, ke ĝi evitu kontribui al la malfortigo de la ŝtato, kvazaŭ ĝi estus respondeca pri tio. En tiu senco Zor´kin rifuzas ankaŭ la ´kolorajn´ revoluciojn en diversaj postsovetiaj landoj. Ĉio tio sonas kvazaŭ Putin mem parolus. Al kritiko kontraŭ la konstitucia tribunalo Zor´kin reagas kutime en persona kaj patosa maniero. Post la plendoj de Elena Luk´janova, kiuj estis prezentitaj supre, la tono de lia repliko fariĝis eĉ pli akra, konservema kaj kontraŭ-okcidenteca ol en antaŭaj kontribuaĵoj. Lia artikolo, verkita el la vidpunkto de „ruslanda civitano“, fakte ne estas jura, sed filozofia-morala eseo kun personaj historiaj-politikaj konsideroj. Zor´kin deziras atentigi, ke li ne emas perdi sian tempon per fakdiskutoj inter juristoj (kiuj ne plaĉas al li). Tiu sinteno klarigas, kial li ne deziras okupiĝi pri la argumentoj de Luk´janova, sed fari ion tute alian: alfronti la legantojn per demandoj, kiuj estas direktitaj al sia kolegino kaj responditaj de Zor´kin mem rekte aŭ malrekte.

Laŭ tiu devojiga maniero, kiu ne estas rekte ligita kun la efektiva temo, nome la aligo de Krimeo al Ruslando, la unua bloko de temoj, traktitaj de Zor´kin, do okupiĝas pri la demando kio kuntenas la socion. Tra jarcentoj Ruslando estis kuntenata per „spirita bendo“ (duchovnye skrepy – ĉi tiu termino estis reenkondukita de Putin en 2012, ĉar Putin plendis, ke al la socio mankas la spirita gluo), do Zor´kin sentas la bezonon priskribi la spiritan bazon aŭ gluon, kiu laŭdire kuntenas la rusojn. Laŭ Zor´kin, la juro tamen estas pli grava afero ol la ideologio aŭ ortodoksismo (!). Sen la juro en la postideologia epoko restus nur la „senlima kaoso kaj la socia abismo“. Ĉi tiun konstaton li ligas kun riproĉo al la „tiel nomata klera tavolo de la socio“, al kiu evidente apartenas ankaŭ Luk´janova. Ĝin Zor´kin ankoraŭ nun kulpigas, ke ĝi perfidis Ruslandon per la solidareco montrata kun la „malamata karisma prezidento“ El´cyn. Anstataŭ komenti la argumentojn de Luk´janova, Zor´kin senfine diboĉis pri la eraroj de prezidento El´cyn en aŭtuno 1993, kiam tiu ŝtatestro dissolvis ne nur la parlamenton, sed ankaŭ la konstitucian tribunalon, kio evidente estis granda ŝoko por Zor´kin, kiu jam tiam prezidis ĝin kaj proklamis la dekreton de El´cyn malvalida. El´cyn kritikis la konstitucian tribunalon pro tio, cetere tute prave, ke per sia enmiksiĝo en la politikan batalon ĝi kondukis la landon preskaŭ al interna milito. Per tiu ĉi incidento, kiu devis esti traŭmata por Zor´kin, observantoj klarigas la okulfrapan timon de la konstitucia tribunalo decidi politikajn demandojn nur laŭ pure juraj kriterioj. Al la „tiel nomata klera tavolo de la socio“ Zor´kin krome riproĉas, ke ĝi ĵetis la landon en krizon, ĉar ĝi metis la demokration kaj justecon super la leĝo (sic). Kiel ekzemplojn de sekvoj de tiu situacio Zor´kin mencias la problemojn de la privatigo de la ekonomio, la grandajn sociajn perturbojn kaj la sangajn konfliktojn inter etnoj kaj civitanoj. Ĉion tion li ligas kun la tiama dekreto n-ro 1400, kiun li konsideras kontraŭleĝa. El tio Zor´kin faras paralelon al la Majdana movado en Kievo. Detale li priskribas la politikan ŝanĝon en Ukrainio, kiu laŭ li estis perforta kaj kontraŭleĝa afero, kredante ke tiu ŝanĝo ne estas legitimita de la konstitucio. Same kiel la klera socia tavolo en Ruslando, ankaŭ la klera socia tavolo de Ukrainio fermis laŭ Zor´kin la okulojn antaŭ la problemoj. Eĉ pli drastan kritikon Zor´kin direktas al la Okcidento, kiu laŭ li provokis la kontraŭleĝajn agadojn en Ukrainio same kiel ĝi siatempe provokis la kontraŭleĝajn farojn de El´cyn. En liaj okuloj la majdana movado estis instrumento por la politika puĉo, kiu estis subtenata de la Okcidento. Pro tio Ruslando devis agi por protekti siajn civitanojn sur Krimeo. Rilate la internacian juron, Zor´kin baziĝas sur la principo de la „respondeco protekti“, angle *responsibility to protect,* kiu rajtigas Unuiĝintajn Naciojn interveni por protekti la homajn rajtojn, se iu ŝtato ne kapablas protekti siajn civitanojn. Konforme al tiu principo, li estas konvinkita pri tio, ke lia tribunalo agis kongrue kun la spirito de la ruslanda konstitucio, kiam ĝi punis (sic) la jurajn lezojn en Ukrainio. Ajnan kritikon kontraŭ tiu decido Zor´kin konsideras ne nur kiel falsan komprenon de la juro, sed ankaŭ kiel geopolitikan naivecon. Luk´janova estas kritikita de li pro tio,

ke ŝi reprezentas „negativan sintenon rilate al la potenco“, do, per aliaj vortoj, ke ŝi ne estas sufiĉe patriotisma. Kun tia sinteno ŝi fariĝis, laŭ Zor´kin, parto de geopolitika ludo, kies celo estas malfortigi Ruslandon. Per aliaj vortoj, por Zor´kin, Luk´janova do fariĝis instrumento de la Okcidento kaj malamiko de Ruslando. Fine, Zor´kin ne maltrafis reagi ankaŭ al la termino „barbara“, kiun Luk´janova (eble maltrafe) uzis en sia artikolo, ĉar evidente tiu vorto signifis tro fortan doloron por Zor´kin, laŭ kiu Ruslando travivas nuntempe invadon de falsa okcidenta informado kaj suferas pro postmodernisma okcidenta propagando, kiun li komparas kun la „barbaraj invadoj“ de la Germana Ordeno aŭ la armeo de Napoleono kontraŭ Ruslando. Kontraŭ tiaj invadoj Zor´kin kaj lia konstitucia tribunalo volas protekti la juron.

En principo tiuj torditaj klarigoj kaj malraciaj argumentoj bezonas nenian komenton. Estas evidente, ke Valerij Zor´kin be deziris trakti la kritikon de Elena Luk´janova kaj anstataŭ tio patose meditis pri la imagitaj danĝeroj, de kiuj Ruslando laŭdire estas minacata, por defendi la anekson de Krimeo, kiu estis patriotisma devo. La emocia stilo de lia artikolo havas malmulton komunan kun la sobra analizo de Luk´janova, kiu argumentis pure jure, dum Zor´kin elpuŝis konfuzan, krudan ĝeneralan pseŭdo-politikan monologon, kiu havas neniun ligon kun la problemoj traktitaj de Luk´janova. Estas klare, ke opoziciuloj, inkluzive de krimeaj tataroj, povas atendi neniun protekton de tiu tribunalo, prezidata de Zor´kin, kiu evidente estas pura lakea instrumento de la Kremlo, kies dubindan propagandon Zor´kin helpas jure pravigi, konfirmi kaj disvastigi. En Okcidento oni povas nur miri, ke tia juristo daŭre funkcias kiel ĉefo de la konstitucia tribunalo de Ruslando, kiu devus solvi gravajn jurajn problemojn kaj konfliktojn, anstataŭ pravigi la personajn politikajn ambiciojn de Putin kaj lia bando, kiu helpis aneksi Krimeon.[223]

## La tataroj de Krimeo post la rusa anekso de 2014

La tataroj de Krimeo – entute ĉirkaŭ 300 mil – en si mem grandparte malaprobis la aliĝon de Krimeo al Ruslando kaj bojkotis la krimean referendumon de la 16a de marto 2014. Iliaj senperfortaj gvidantoj esprimis sin kontraŭ la anekso kaj petis apogon de la internacia komunumo. La krimeaj tataroj opinias, ke la duoninsulo apartenas al Ukrainio kaj daŭre devus resti parto de ĝi. La rusa anekso faris la loĝantaron de Krimeo internacie izolita. Aliŝtatanoj bezonas rusian vizon por viziti Krimeon, kaj la oficiala aliro al la duoninsulo el eksterlando estas tre limigita kaj povas okazi nur tra Rusio, precipe per aviadilo el Moskvo.

Post la anekso de Krimeo en marto 2014, la krimeaj tataroj timas konfliktojn kun la nova registaro de Krimeo kaj kunpuŝiĝojn kun la porrusaj milicoj, kiuj estas fifamaj, senskrupulaj bandoj kun terorismaj trajtoj. Laŭ klarigo de Mustafa Dĵemilev, miloj da tataroj intertempe forlasis Krimeon, kvankam la tataraj gvidantoj admonis siajn samlandanojn resti en siaj originaj lokoj. Laŭ indiko de UN, ekde la komenco de la krizo ĝis majo 2014 foriris, devige aŭ libervole, 10´000 homoj, ĉefe tataroj sed ankaŭ ukrainoj kaj rusoj,[224] ĉar la nova registaro komencis draste limigi iliajn rajtojn.

La 29an de marto 2014 la Kurultajo, kiu ne komprenas sin kiel politikan partion, sed kiel parlamenton kaj plej altan reprezentan organon de la krimeaj tataroj, ĝi pledis por la starigo de „naci-teritoria aŭtonomeco“. Laŭdire, tiu intenco estis interkonsentita kun la ukraina parlamento, kvankam la ukraina konstitucio ne antaŭvidas tian aranĝon. Ĉar tataroj vivas dise tra la insulo, kun 0,5 ĝis 29,2 procentoj laŭloke, estus malfacile realigi tian koheran etnan teritorian integrecon. Sed la Kurultajo prenis alian decidon: ĝi proklamis la aliĝon de Krimeo al Ruslando kontraŭleĝa, anoncis rimedojn por puŝi la rajton je memdecido kaj taskis la Meĝlison serĉi la kontakton kun UN, EU, OSKE kaj islamaj organizaĵoj. Samtempe ĝi akceptis la opcion, ke tataraj politikistoj kandidatiĝu por postenoj en la porrusa krimea administra sistemo. Certe, la rusoj klopodos eviti tion. Fakte, ankoraŭ antaŭ la anekso la krimea parlamento postulis la restarigon de la rajtoj de la krimetatara popolo, kio inkluzivus la privilegion de 20 procentoj de parlamentaj mandatoj por la tataroj. Sed nenio restis de tio. Privilegiojn por la tataroj la nova konstitucia projekto ne antaŭvidas kun la klarigo, ke etna kvoto ne kongruas kun la rusiaj leĝoj.

---

[223] Vd. www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen295.pdf. La ligoj al la originaj artikoloj estas notitaj en la teksto. Pri la du aŭtoroj vd. sub https://ru.wikipedia.org/wiki/Елена_Анатольевна_Лукьянова kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Valery_Zorkin.
[224] Pliajn detalojn pri la krizo en Ukrainio kaj Krimeo de la jaro 2014 vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Krimkrise.

La gvidantoj de la krimeaj tataroj emfazis, ke ili ne deziras havi konfliktojn kun la aŭtoritatoj de Ruslando, kaj en sia fama praviga parolado post la anekso de Krimeo de la 18a de marto 2014 la rusia prezidento bedaŭris la sorton de la tatara popolo pro la deportado kaj teroro kontraŭ ĝi kaj oficiale rehabilitis la krimeajn tatarojn.[225] Al tio apartenu ankaŭ la samrajtigo de la tatara lingvo kune kun la rusa kaj ukraina kiel oficialaj lingvoj de la Krimea Respubliko. Sed la tataroj malfidas la promesojn de Putin, kiujn li faris en simila stilo ankaŭ al Tatarstano. Ĉu per tiaj promesoj kaj ĝentilecoj Putin volis nur aĉeti la lojalecon de la tataroj por poste venĝi sin, se okazas negativa reago al liaj komplezoj?

Nova kriza situacio estiĝis en septembro 2014, kiam kadre de la regionaj balotoj en la Ruslanda Federacio okazis sur Krimeo la unuaj elektoj post la anekso, kiam ĉiuj mandatoj de la krimea parlamento estis okupitaj de porrusaj delegitoj. Moskvo celis legitimi la novan politikan statuson de Krimeo per demokratie aranĝitaj parlamentaj balotoj. Sed tiuj balotoj estis akompanataj de traserĉado de oficejoj kaj domoj de krimeaj tataroj, kiuj bojkotis la balotojn. Cetere, nur la duono de la tuta krimea loĝantaro partoprenis en tiuj balotoj, kiuj permesis nenian konkurencon inter politikaj partioj. Tuj post la balotoj sekretaj servoj kaj policistoj de la nova reĝimo lanĉis atakon kontraŭ la Meĝliso kaj traserĉadis ĝiajn ejojn dum 12 horoj; samo okazis al la redaktejo de la gazeto *Avdet* kaj la oficejoj de aliaj instalaĵoj de la krimeaj tataroj. La Meĝliso ricevis ultimaton por forlasi la konstruaĵon en Simferopolo. Krom tio, la rusaj aŭtoritatoj klopodas anstataŭigi la politikajn instancojn de la tataroj per fondado de alternativaj organoj kaj subtenado de opoziciaj partioj (ekzemple la partion „Milliy Fırqa“, kiu troviĝas en opozicio kontraŭ la Meĝliso). Diference de Aksjonov, kiu komunikis, ke nur 15-20 procentoj de la krimeaj tataroj ankoraŭ subtenas la Meĝlison, ***Il´mi Umerov***, membro de tiu organo kaj iama vicĉefministro de la Aŭtonoma Krimea Respubliko, estimis, ke tamen 90% apogas ĝin. Ambaŭ ciferoj, kiuj estas nuraj iloj de la propagando, ne estas kontroleblaj, sed la suspekto, ke la rusoj celas interkvereligi kaj disigi la tatarojn, tamen ekzistas. Laŭ Umerov, la rusa premo kontraŭ la tataroj de Krimeo kreskas.[226]

Agresojn devis elteni ankaŭ ***Mustafa Dĵemilev***,[227] delegito de la Kurultajo, kaj ***Refat Ĉubarov***,[228] lia posteulo kiel estro de la Meĝliso kaj prezidanto de la Monda Kongreso de la krimeaj tataroj. Kiam en aprilo 2014 Dĵemilev volis reveni el Kievo, oni rifuzis lian eniron en Krimeon, klarigante al li, ke li ne rajtos eniri Ruslandon ĝis la jaro 2019, kio signifas samtempe, ke li ne povas reveni al Krimeo.[229] Post kiam en majo miloj da tataroj kolektiĝis apud la limo de Ukrainio por bonvenigi sian gvidanton kaj protestis kontraŭ la malpermeso por Dĵemilev, la rusaj aŭtoritatoj reagis nervoze kaj nomis la protestantojn „ekstremistoj“. En Ruslando tia ´statuso´ povas havi la sekvon, ke suspektindaj personoj estas persekutataj, observataj kaj kontrolataj de la polico kaj justico. Aksjonov kulpigis la tatarojn, ke ili provokas konfliktojn. En julio oni malpermesis ankaŭ al Ĉubarov, kiam li troviĝis en Ukrainio por partopreni kunsidon de la Meĝliso en la urbo Heniĉesk, reveni al Krimeo en la venontaj kvin jaroj.[230] La nova ĉefprokuroro de Krimeo, Natalja Poklonskaja, promesis rigoran persekutadon de „ekstremismaj“ agadoj de la tataroj.[231] Inter alie ŝi fariĝis konata pro tio, ke ŝi anoncis la proponon, ke ĉiu, kiu asertas, ke Krimeo estis kontraŭleĝe aligita al Ruslando, estos punita kaj konsiderata kiel ŝtata malamiko. Por ŝi kaj la rusaj aŭtoritatoj Dĵemilev kaj Ĉubarov evidente estas tiaj kazoj. La rusaj ĉikanoj kontraŭ la tataroj de Krimeo do evidente ekzistas kaj estas serioza kialo por zorgado kaj observado.

Paralele al la tataraj agadoj, sur Krimeo kreskas islamismaj tendencoj kaj estas fonditaj radikalaj islamismaj strukturoj, kiuj povus signifi novan defion por Ruslando. Al la moskva disiga politiko apartenas ankaŭ la ilo fondi paralelajn instalaĵojn por konkurenci tiujn de la kontraŭuloj, kiel la starigo de nova „Taŭrida muftiejo“ en aŭgusto 2014. En tio manipulitaj ekleziuloj disvastigas dubindajn asertojn por

[225] Vd. http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/krim-putin-rehabilitiert-deutsche-und-tataren-12903836.html.
[226] La pritakso de la aktuala situacio sur Krimeo far Il´mi Umerov vd. sub http://www.business-gazeta.ru/article/112111.
[227] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Mustafa_Dzhemilev. En 2005 Mustafa Dĵemilev ricevis la „Victor-Gollancz-premion“; Laŭdacion de Erika Steinbach pri Mustafa Dĵemilev vd. sub http://www.erika-steinbach.de/aktuelles-details/items/laudatio-auf-mustafa-dschemilew.html aŭ https://www.gfbv.de/de/news/laudatio-auf-mustafa-dschemilew-591.
[228] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Refat_Chubarov.
[229] Vd. http://www.welt.de/politik/ausland/article127177373/Tatarenfuehrer-bis-2019-von-der-Krim-verbannt.html.
[230] Pri tio Ĉubarov rakontis en jena intervjuo: http://kirimtatar.com/index.php?option=com_content&task=view&id=614&Itemid=380.
[231] Kiu estas N. Poklonskaja vd. sub http://news.rambler.ru/politics/32463169/?utm_source=adfox_site_36985&utm_medium=adfox_banner_1540761&utm_campaign=adfox_campaign_495794&ues=1.

provoki kaj pravigi novajn fiagadojn. Granda ´specialisto´ por misinformado kaj fuŝpropagando estas la rusia gazetaro kaj televido.[232]

Tiel, la tataroj de Krimeo povus fariĝi denove viktimoj, ĉifoje neglektataj rande de la militaj krizoj en orienta Ukrainio kaj Sirio, al kiuj la mondo turnas sian plenan atenton.[233] La plej nova kverelo de Putin kun sia aŭtokrata gemelo Erdoğan kaj la nova rusia propaganda histerio kontraŭ Turkio, kiu estas konsiderata de la Kremlo kiel nova ĉefmalamiko, certe signifos nenion bonan ankaŭ por la tataroj de Krimeo.

## Registritaj homrajtaj lezoj sur Krimeo

Diversaj homrajtaj organizaĵoj kiel Amnestio Internacia kaj Human Rights Watch, sed ankaŭ Eŭropa Konsilio,[234] OSKE kaj la Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj de UN klopodas observadi la homrajtan situacion sur Krimeo, do la rusaj aŭtoritatoj ne povas kaŝi krimojn, pri kiuj ili respondecas. Pro la politika izoliteco de la duoninsulo estas malfacile sendi observantojn surloken, ĉar la rusaj okupaciaj aŭtoritatoj povas rifuzi ilin. Malgraŭ tio, informoj kompreneble penetras el Krimeo kaj atingas tiujn organizaĵojn. La „Societo por minacataj popoloj“ (GfbV) kolektis tiujn informojn kaj verkis raporton unu jaron post la anekso de Krimeo,[235] el kiu ni ĉerpos ĉi tie la plej atentindajn kazojn. Kvankam la internacia publiko fokusis sian atenton ĉefe al orienta Ukrainio (Donbaso), kie eksplodis milito inter rusaj kaj ukrainaj armitaj fortoj, oni preskaŭ forgesis, ke sur Krimeo okazas gravegaj homrajtaj problemoj kaj lezoj. Sur Krimeo ne malmultaj homoj, kiuj vekis la malplaĉon de la putinistoj, estis malaperigitaj, arestitaj, akuzitaj, kondamnitaj aŭ mortigitaj fare de iuj bandoj, kiuj laboras kaŝe aŭ malkaŝe por la rusaj aŭtoritatoj, ĉefe por la Kremlo kaj FSB. Precipe krime-tataraj aktivuloj, kies liberecoj estis draste limigitaj, estas en la fokuso de agentoj de rusaj sekretaj servoj. Iliaj loĝejoj estis traserĉataj de rusaj policistoj, moskeoj kaj islamaj lernejoj estis kontrolataj, nedezirindaj libroj estis konfiskitaj. Gravaj krime-tataraj politikistoj, kiuj veturis al Ukrainio, ne rajtas reveni al Krimeo.

Kiuj ne deziris peti la ruslandan ŝtatanecon (la limo por peti la rusian ŝtatanecon estis la 18a de aprilo 2014!) – inter ili estas multaj krimeaj tataroj, kiuj preferas konservi la ukrainan civitanecon – tiuj ekhavis gravajn problemojn kaj fariĝis praktike eksterlandanoj.

*Subpremado de la libereco de la gazetaro:* Precipe la gazetara libereco estis draste limigita kaj subpremata. Gazetoj, radio- kaj televidostacioj de la krimeaj tataroj estas silentigataj kaj malpermesataj aŭ ne plu ricevis licencon por disaŭdigi elsendojn. Okazis ĉikanoj kontraŭ la redaktejo de la krime-tatara gazeto *Avdet*, kiu ricevis plurajn leterojn, en kiuj oni riproĉis al ĝi, ke ĝi apogas „ekstremismon“ kaj „interetnan malamon“. La lokaj potenculoj de Krimeo cenzuras la amaskomunikilojn, klopodas kontroladi la informojn, kiujn la krimeaj loĝantoj ricevas, kaj silentigas kritikistojn. Sendependaj kanaloj devis ĉesigi sian laboron. Ĵurnalistoj kaj bloguloj devis fuĝi, ĉar vivi sur Krimeo fariĝis tro danĝere por ili. Juran helpon neniu ricevas.

Tuj post la anekso ĉiuj ukrainaj televidaj kanaloj estis elŝaltitaj el la reto de Krimeo, inter ili la kanaloj Inter, Briz, 1+1, STB, 5a kanalo, Černomorskaja TV, kaj anstataŭigitaj per rusaj aŭ rusiaj televidaj kanaloj. La 1an de aŭgusto 2014 la posedaĵo de la kanalo Černomorskaja TV, sur kies frekvenco nun

---

[232] Vd. Halbach, U.: Repression nach der Annexion. Russlands Umgang mit den Krimtataren. In: *Osteuropa* (DGO) 9-10/2014, p. 189s. (vd. http://khpg.org/en/index.php?id=1410122385, http://www.interfax-religion.ru/?act=news&div=56334 kaj http://www.rosbalt.ru/federal/2014/06/24/1283947.html). Jam en oktobro 2014 la rusa *Nezavisimaja gazeta* skribis, ke Kievo instigas la krimeajn tatarojn lanĉi tumultojn kaj teroron sur Krimeo kune kun islamismaj radikaluloj (kion disvastigis ankaŭ RIA-Novosti (nuna Sputnik, vd. http://de.sputniknews.com/zeitungen/20141008/269741086/Kiew-stiftet-Krim-Tataren-zu-Anschlgen-an.html). En novembro 2015 efektive en Ukrainio okazis grava atenco kontraŭ la kurenta provizado de Krimeo, kio igis iun rusian deputiton konkludi, ke temas pri teroratenco (vd. http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/kein-strom-auf-der-krim-russischer-abgeordneter-spricht-von-terrorakt-13925588.html).
(rete http://de.sputniknews.com/zeitungen/20141008/269741086/Kiew-stiftet-Krim-Tataren-zu-Anschlgen-an.html).

[233] Laŭ http://www.swp-berlin.org/de/publikationen/swp-aktuell-de/swp-aktuell-detail/article/krimtataren_nach_russlands_annexion_der_krim.html aŭ http://www.bpb.de/internationales/europa/ukraine/195184/analyse-die-krimtataren-in-der-ukraine-krise.

[234] Vd. http://www.europarl.europa.eu/meetdocs/2014_2019/documents/droi/dv/102_muiznieksreport_/102_muiznieksreport_en.pdf.

[235] Vd. https://www.gfbv.de/fileadmin/redaktion/.../Memorandum_Krim.pdf.

troviĝas Rossija 24, estis konfiskita. Nur la krime-tatara televida kanalo ATR povis daŭrigi siajn disaŭdigojn, ĝis kiam ĝi same perdis la licencon. La 26an de januaro 2015 OMON-trupoj traserĉadis dum sep horoj la ejojn de ATR en Simferopolo, kontrolis ĉiujn komputilojn kaj forprenis datenojn kaj grandan parton de la arkivo de la stacio. Al ĝi oni riproĉis, ke ĝi favoras „malfidon kontraŭ la ŝtato“ kaj „kritikajn sintenojn pri Ruslando“. La fino por ATR venis en aprilo 2015. La moskva televida kontrolinstanco Roskomnadzor rifuzis doni al la stacio novan licencon pro laŭdiraj formalaj eraroj.[236] Ankaŭ multaj radiokanaloj de Krimeo perdis sian licencon, ekzemple Leader FM, Trans-M-radio same kiel la sola krime-tatara kanalo Mejdan. Anstataŭe, la frekvencojn ricevis diversaj moskvaj kanaloj kiel Zvezda, Russkoe radio Evrazija kaj la radio de la ministerio pri defendo. Ankaŭ la novaĵagentejo „Crimea News Agency QHA“ estis sciigita de Roskomnadzor sen pliaj klarigoj la 20an de februaro 2015, ke ĝi ne ricevos novan licencon. Ankaŭ la koncerna retpaĝo de Roskomnadzor, per kiu uzantoj de la interreto de Krimeo povis registriĝi, ne plu estas je dispono.[237]

Depost la anekso de Krimeo estis *traserĉataj* sennombraj loĝejoj, domoj, moskeoj, preĝejoj, lernejoj, bibliotekoj de krimeaj tataroj. Speciale koncernataj de tiaj traserĉadoj estis krime-tataraj aktivuloj kaj ekleziuloj, membroj de la Meĝliso, krome krimeaj ukrainoj, kiuj publike protestis kontraŭ la anekso. La raporto de GfbV menciis plurajn kazojn, en kiuj la domoj kaj loĝejoj de krimeaj tataroj estis traserĉataj fare de la „organoj“ (FSB, OMON, polico, ministerio pri intermaj aferoj, k.a.). Tia kruda kazo okazis ekzemple al Eskander Bariev, membro de la Meĝliso, la 15an de septembro 2014. 16 armitaj viroj enpenetris lian domon kaj konfiskis liajn komputilojn. Liaj edzino kaj infanoj fariĝis atestantoj de tiu sovaĝa atako. La oficistoj, soldatoj aŭ policistoj diris, ke ili serĉas armilojn, municion kaj malpermesatajn librojn. Permeson por traserĉi la loĝejon ili ne prezentis. Tian traserĉadon devis elteni ankaŭ Mustafa Asaba, estro de la regiona meĝliso de Belgorod la 17an de septembro 2014. Simila vizito okazis en la vilaĝo Kolyĉugino apud Simferopolo.

Krom tio okazis pluraj *murdoj, kidnapoj, malaperigoj, arestoj, malliberigoj.* Ilin registris la observantoj de GfbV, kaj en la sekvo estos menciitaj la plej drastaj kazoj.

La 3an de marto 2014 la krime-tatara aktivulo Reŝat Aĥmetov estis arestita de viroj en kaŝaj uniformoj en la centro de Simferopolo. Lia kadavro, kiu klare montris spurojn de turmento, estis trovita la 15an de marto. Rusaj aŭtoritatoj rifuzis trakti tiun ĉi kazon, kvankam la polico scias, kiu mortigis la viktimon. La koncerna persono troviĝis en la „Donecka Popolrespubliko“ kaj ne povis esti arestita. Alia homo, Stanislav Karaŝevskij, majoro de la ukraina floto, estis mortigita la 6an de aprilo 2014 en sia loĝejo en Novofjodorovka. Evgenij Zajcev, alia majoro de la ukraina floto, kiu laŭdire mortigis Karaŝevskij, estis kondamnita al dujara arestado en malliberejo. Estis mortigitaj en marto 2014 serĝento Serhij Kokurin en Simferopolo per du pafoj, kaj la 20an de aprilo Mark Ivanjuk en la proksimeco de la vilaĝo, kie li vivis,. Kial tiuj homoj estis mortigitaj?

Hazarde aŭ ne, en la sama tago, kiam Putin subskribis la koncernan dekreton pri la aligo de Krimeo al Ruslando, en Simferopolo la tataroj devis entombigi iun tataran aktivulon, kiu estis mortigita de porrusaj fortoj, ĉar li protestis kontraŭ la rusa reunuiga kampanjo. Viktimoj de perfortaj porrusaj agadoj fariĝis ankaŭ aliaj krimeaj tataroj.

Eĉ multe pli da homoj – minimume 18 – malaperis. 6 estis denove liberigitaj, du estis trovitaj mortaj. La ceteraj ne estis trovitaj. Inter ili troviĝis precipe junaj krimeaj tataroj: Timur Ŝajmardanov, Sejran Zinedinov, Valentin Petroviĉ, Islam Dĵepparov, Dĵevdet Islamov, Edem Asanov, Eskender Apseljamov, Artem Dajrabekov, Beljal Biljalov, Usein Seitnabijev. Estis arestitaj la 16an de oktobro 2014 Musa Apkerimov, la 17an Rustam Abduraĥmanov, la 22an Tair Smedljaev, la 25an Edem Ebulisov kaj la 21an de januaro 2015 Edem Osmanov. Krom la ĉi-lasta la viroj estis denove liberigitaj, sed ili ne rajtis forlasi Krimeon.

*Haltigoj, forpeloj, malpermeso reveni al Krimeo:* La 9an de aŭgusto 2014 Ismet Yuksel, estro de la novaĵagentejo „Crimean News Agency“ kaj konsilisto de la Meĝliso, ricevis kvinjaran malpermeson viziti Krimeon. Yuksel, kiu estas turka civitano, vivis 20 jarojn sur Krimeo. Veturante la 21an de septembro 2014 de Kievo al Simferopolo, lia edzino Gajana Yuksel, kiu estas membro de la Meĝliso, estis pelita el la trajno kaj pridemandata dum tri horoj en la stacidomo de Dĵankoj, dum ŝia

[236] Ekzemple en la kazo de la krime-tatara ATR vd. http://www.spiegel.de/politik/ausland/krim-atr-sender-der-krimtataren-vom-netz-genommen-a-1026741.html.
[237] Fonto de ĉi tiu alineo estas http://www.zeitschrift-osteuropa.de/hefte/2015/3/ausgeschaltet.

pasporto estis forprenita. Tiu incidento okazis unu tagon antaŭ la monda konferenco pri indiĝenaj popoloj en Novjorko. Tien vojaĝi volis ankaŭ la krime-tatara sciencisto Nadir Bekir. Sed li estis atakita en Dĵankoj, de kie li volis trajni al Kievo por flugi al Usono. Liaj pasporto kaj movebla telefono estis konfiskitaj aŭ ŝtelitaj. Ankaŭ Sinaver Kadyrov estis haltigita dum multaj horoj kaj pridemandata en Armjansk, kiam li volis veturi al Turkio tra Ĥersono. Kadyrov rifuzis akcepti la rusian ŝtatanecon kaj konservis la ukrainan. Tio signifas, ke li estas konsiderata kiel eksterlandano, kiu devas forlasi Krimeon ĉiujn 90 tagojn. Ĉar Kadyrov lezis la leĝon pri restado de eksterlandanoj, en rapida proceso estis decidite forpeli lin de Krimeo. La 12an de septembro 2014 rusaj limkontrolistoj haltigis la ukraininon Olha Skrypnyk kaj ŝian edzon Vissarion Asejev, kiu estas rusa civitano, en trajno de Moskvo al Odeso. Ambaŭ estas homrajtaj aktivuloj; Olha Skrypnyk estas vicdirektorino de „Crimea Human Rights Field Mission“ kaj direktorino de „Almenida Center for Civic Education“. La paro vivas en Kievo. La 5an de decembro la vicdirektoro de la prokuroraro de Ukrainio, kiu vizitis siajn parencojn sur Krimeo, estis arestita en la trajno de Simferopolo al Kievo. Oni alportis lin al nekonata loko kaj poste malliberigis lin en la prizono de Saki dum dek tagoj. Li estis akuzita pro preparado de atenco kontraŭ la prokuroraro de Krimeo. La 19an de januaro 2015, alia membro de la Meĝliso, juristino Emine Avamileva, estis haltigita en la stacidomo de Armjansk kaj pridemandata de limkontrolistoj sen ricevi klarigon pri tiu ĉikano.

Kiel menciite supre, al ***Mustafa Dĵemilev***, delegito de la Kurultajo, kaj al ***Refat Ĉubarov***, prezidinto de la Meĝliso, estas malpermesate reveni al Krimeo. Dĵemilev ankaŭ ne povis kontakti sian filon, Ĥajser Dĵemilev, kiu estis retenata en iu prizono de la sudrusia regiono Krasnodar, kie li devus esti prijuĝita en tribunala proceso. En majo 2013 Ĥajser pafis kontraŭ Fevzi Edemov, kiu estis dungito de la familio; verŝajne temis pri tragika akcidento, kiu tamen estas traktenda laŭ la kriminala juro. Ĉar Ĥajser estas civitano de Ukrainio kaj ne rajtas esti arestita en Rusio, la rusaj aŭtoritatoj evidente klopodis misuzi lian kazon kontraŭ lia patro.

*Subpremado de la libereco de la kunvenado kaj renkontiĝo:* En novembro 2014 okazis du operacoj kontraŭ partoprenantoj en iuj foiroj en Simferopolo, kie 100 kaj 60 personoj estis haltigitaj kaj kontrolitaj de oficistoj, kiuj diris, ke ili laboras por la rusa ministerio pri internaj aferoj. Ĉiujn arestitojn oni veturigis al la „Centro por prevento de ekstremismo“, kie oni kontrolis iliajn pasportojn, fotis ilin kaj registris iliajn korpajn karakterizaĵojn (DNS). La ĉikanitaj homoj devis subskribi deklaraĵon, ke ili ne plendos kontraŭ la polico. En antaŭaj semajnoj turkaj kaj tataraj kafejoj estis traserĉataj.

Alia kruda incidento okazis la 17an de januaro 2015 en Simferopolo. Kiam Sinaver Kadyrov, unu el la veteranoj de la krime-tatara nacia movado, volis okazigi konferencon de la anoj de sia nova organizaĵo pri protektado de la rajtoj de la krimeaj tataroj, lia aranĝo estis krude ĝenata de iuj viroj, inter kiuj troviĝis kaj krimeaj tataroj kaj rusoj, kiuj laŭte kriaĉis, atakante partoprenantojn kaj minacante gastojn. Ĉeestantaj policanoj restis pasivaj. Verŝajne intermiksiĝis ankaŭ kunlaborantoj de sekretaj servoj. Finfine la organizantoj devis interrompi la konferencon kaj vokis la policon.

La 29an de januaro estis arestita ***Aĥtem Ĉijgoz***, vicprezidanto de la Meĝliso. Li alfrontis la riproĉon, ke li organizis „amasajn“ tumultojn (temis pri manifestacio, kiu okazis la 26an de februaro 2014 en Simferopolo unu tagon antaŭ la rusa transpreno de la povo en Krimeo). Alia partopreninto en tiu manifestacio, Oleksandr Kostenko, estis arestita la 9an de februaro, ĉar oni akuzis lin, ke li vundis iun „Berkut“-policanon.

Aparte nervozaj la aŭtoritatoj montriĝas okaze de la 18a de majo, la tradicia memortago de la krimeaj tataroj pri la deportado en 1944. Por eviti manifestaciojn kadre de la 70a datreveno en 2014, la rusaj aŭtoritatoj malpermesis ĉiujn publikajn kunvenojn ĝis la 6a de junio.[238] La 18an de majo la tataroj almenaŭ rajtis kunveni sur placoj ekster la centro de Simferopolo, ekzemple en tombejoj aŭ iuj apudaj stratoj. La 26an de junio la krimeaj tataroj ricevis malpermeson por memori la tradician „Tagon de la krime-tatara flago“. La 23an de aŭgusto oni malpermesis al ili kunveni okaze de la eŭropa tago de la viktimoj de stalinismo kaj naziismo. La 10an de decembro, internacia tago de la homaj rajtoj, la registaraj konstruaĵoj en Simferopolo estis garditaj de armitaj policistoj kaj t.n. „memdefendaj fortoj“. La Lenina

[238] Aliflanke, la 4an de februaro 2015 antaŭ la palaco Livadija en Jalto estis inaŭgurita nova monumento honore al Stalin, Roosevelt kaj Churchill, okaze de la 70a datreveno de la Jalta Konferenco. La dektuna bronza monumento estis kreita de Zurab Cereteli en 2005, kiam ĝi devintus esti starigita, sed la ukrainaj partioj kontraŭis ĝin. Sed en 2015 nenio povis malhelpi tiun planon. Tamen, unu tagon antaŭ la inaŭguro, kiu estis realigita de Sergej Naryŝkin, prezidanto de la Ruslanda Dumao, Mustafa Dĵemilev protestis kontraŭ la starigo de tiu monumento, kiun li nomis „provoko“.
(Vd. https://lenta.ru/news/2015/02/05/yalta, http://www.bbc.com/russian/russia/2015/02/150205_yalta_troika_monument).

placo estis fermita kaj la preterpasantoj kontrolataj. Kiam la 19an de februaro 2015 la krimeaj tataroj volis memori pri sia unua prezidento Numan Çelebi Cihan (1917), la aŭtoritatoj de Krimeo rifuzis la peton.

La 23an de januaro 2015 tri personoj estis arestitaj en Sebastopolo de la rusia sekreta servo FSB. Oni riproĉis al ili aparteni al la organizaĵo „Hizb ut-Taĥrir al-Islami", kiu estas internacia panislamisma politika partio, kiu estas malpermesita en kelkaj landoj. En Ruslando ĝi estas konsiderata kiel terorisma organizaĵo.[239] En kazo de kondamno pro aparteno al tiu organizaĵo la leĝo antaŭvidas multjaran arestadon en malliberejo. La 26an de januaro tiuj tri arestitoj estis translokitaj al izolita arestejo de la esplora malliberejo en Simferopolo. Ilia sorto estas nekonata.

*Konfiskado kaj „naciigo" de ekonomia posedaĵo:* Kun la helpo de t.n. „memdefendaj fortoj" (Samooborona Kryma), kiuj estas rekte submetitaj al „ĉefministro" Aksjonov, kaj de la polico kaj armeo, la registaro de Krimeo ŝtatigis bankojn, hotelojn, bienojn, benzinejojn, la plej gravajn bakejon kaj laktofabrikon, la studiojn de „Jalta Filmoj" kaj aliajn gravajn komercajn objektojn. Ĉiuj 41 ukrainaj bankoj estis fermitaj kaj anstataŭigitaj per trideko da rusiaj bankoj. La „naciigo" (ŝtatigo) okazas kun la klarigo, ke ĉiuj posedantoj estas koruptaj. La justicministerio en Kievo indikis, ke sur Krimeo pli ol 4000 ukrainoj perdis sian posedon pro tiuj konfiskoj. Laŭ memoro de posedantoj, tia ampleksa ŝtatigo, kiu fakte egalas al perforta rabado kaj ŝtelado de fremda posedaĵo en la spirito de la iredentismo fare de la rusaj okupaciaj aŭtoritatoj ne plu okazis sur Krimeo depost la rusa revolucio en 1917. Juraj plendoj rezultigis nulan rezulton.

*Konfiskado de libroj:* Diversaj libroj, kiuj estas malpermesataj en Ruslando, ne plu rajtas troviĝi en loĝejoj kaj bibliotekoj de la duoninsulo, de tiu ordono estas koncernata ankaŭ islama literaturo. La okupaciantoj aparte alergias pri la libro *Mustafa Jemilev: Crimean Tatar voice not heard for decades* de Gulnara Bekirova, kiu entenas krom memuaroj pri lia disidenta pasinteco ankaŭ la majdanajn paroladojn de la krime-tatara ĉefgvidanto. Alia verko, kiu estas subpremata en Rusio, estas la 12 volumoj de *Ukraina genocido, holodomoro 1932-33* de Vasyl Maroĉok. En januaro 2015 la direktorino de la biblioteko de Feodosio ricevis monpunon pro „posedo de ekstremisma materialo". La prokuroro klarigis, ke la enhavo de la koncernaj libroj estas „kontraŭruse orientitaj". Punon ricevis ankaŭ la direktoro de la centra biblioteko en Kerĉo pro laŭdira „amasa distribuado de ekstremisma materialo". La 10an de septembro 2014 la lernejo en la vilaĝo Tankove, Baĥĉisaraja distrikto, estis vizitata de ses-sep civilaj viroj, kiuj eniris la bibliotekon kaj trovis librojn, kiuj laŭdire estas malpermesataj en Rusio. La konfuzita bibliotekistino ne komprenis aŭ povis diri pri kiuj libroj temas, sed verŝajne temis pri religia literaturo. La viroj postulis forigi ĉiujn krime-tatarajn kaj ukrainajn simbolojn en la lernejo. Tiu persekuta ondo de la rusoj estis komparata kun la kontraŭ-libraj operacoj post la anekso en 1783.

*Ĉikanoj kontraŭ religiaj komunumoj:* Ŝajnas, ke Aksjonov promesis unu aferon, sed en la realeco okazis aliaj, kontraŭdiraj aferoj, tiel ke liaj promesoj estis rompitaj kaj nefidindaj. Tio okazis ankaŭ rilate al ekleziaj aferoj, kie la rajtoj de diversaj religiaj komunumoj estis lezataj, precipe en la kazoj de muzulmanoj, katolikaj kristanoj, ortodoksoj de la Kieva Patriarkejo kaj atestantoj de Jehovo (ĝuste tiuj estas tradiciaj malamikoj de la moskva patriarko). La rusia leĝo pri ekstremismo estis speciale utiligata por persekuti religian literaturon kaj forpeli ekleziajn aktivulojn. Unu pola pastro kaj 23 turkaj imamoj kaj religiaj instruistoj devis forlasi Krimeon. Pli ol 1500 religiaj komunumoj devis fari novan registriĝon laŭ rusia juro, la limdato estis la 1a de januaro 2015. Nur civitanoj de la Rusia Federacio rajtas fondi religiajn organizaĵojn, kaj ekleziaj aktivuloj devas esti reekzamenataj. Sektoj ne ricevas permeson ekzisti. Armenoj, luteranoj kaj grek-katolikaj ne sciis, ĉu ili povos daŭrigi siajn servojn kadre de la ukrainia protekto. La nombro de anoj de la ukraina ortodoksa eklezio draste ŝrumpis. Esadullaĥ Bairov estis kondamnita de la tribunalo de Dĵankoj pagi monpunon pro tio, ke li posedis en sia islama lernejo librojn, kiuj estas malpermesitaj en Rusio. La lezoj de la religiaj rajtoj sur Krimeo estas registrataj de la „Forumo 18".[240]

Multaj kazoj de lezitaj homaj rajtoj kaj krimaj kazoj ne estis traktataj de la justico. Male, en junio 2014 la parlamento ricevis leĝproponon, kiu antaŭvidas amnestion por membroj de la „memdefendaj fortoj" (Samoobrona Kryma), kiuj estas suspektataj pro tio, ke ili faris aparte multajn lezojn kaj krimojn lige kun la okupacio kaj anekso de Krimeo. Ĉi tiu leĝo kontraŭdiras la normojn de la Eŭropa Homrajta Konvencio kaj kondukas al senpuneco. La Homrajta Komisaro de la Eŭropa Konsilio postulis aboli tiujn

[239] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Хизб_ут-Тахрир_аль-Ислами.
[240] Vd. http://www.forum18.org/archive.php?article_id=1989.

memdefendajn trupojn kaj enkadrigi ilin en la normalan policon, dum kulpuloj devas esti akuzitaj kaj punitaj.

Grava problemo estas, ke multaj ukrainaj leĝoj estis ŝanĝitaj al rusiaj, tiel ke la nova jura situacio kaŭzis konfuzon ĉe la loĝantaro, kiu ankoraŭ ne konas tiujn leĝojn kaj eventuale praktikas sian ĉiutagan vivon laŭ la malnovaj leĝoj, lezante novajn, kiuj povas kaŭzi „grizan zonon" kaj riproĉojn, akuzojn kaj kondamnojn kontraŭ la civitanoj de Krimeo flanke de la rusaj okupaciaj aŭtoritatoj.[241]

## Krimeo en 2015/16

Du jarojn post la anekso de la duoninsulo, inter rusoj de Krimeo oni povas observi fortan ĝeneralan aprobon de la "reunuiĝo" kaj aplaŭdon por Putin, malgraŭ pli altaj prezoj kaj pli alta inflacio (26% en 2015), malgraŭ esperata sed neokazinta ekonomia prospero kaj malgraŭ pli forta ŝtata burokratiismo, je kiu la rusoj kutimas kaj kiun ili ŝajnas toleri. Por ili gravas, ke Krimeo estas denove parto de Rusio, dum la ekonomia prospero kaj la homaj rajtoj ŝajnas esti duaranga afero. Ĉie sur Krimeo oni renkontas tabulojn kun la subskribo „Krimeo. Ruslando. Por ĉiam." kun la vizaĝo de Putin, kiu sagace rigardas la homojn, kiujn li ruze trompis. La popolo de Krimeo estas ĝissate indoktrinata per sovaĝa kontraŭ-okcidenta kaj kontraŭ-ukraina propagando; okazas speco de „perfortado de la cerboj", kiel diris iu loka advokato. Reprezialiojn sentas tiuj, kiuj montras sin mallojalaj kaj malobeemaj al la nova reĝimo, kiuj rifuzis la rusian ŝtatanecon kaj kiuj daŭre nostalgias pri Ukrainio. Nature, la polico kaj la sekretaj servoj, kiuj pedante kontrolas kaj cenzuras la amaskomunikilojn kaj observas la aktivecojn de la civitanoj, kaj la armeo ´zorgas´ pri la nova ordo, kiun Putin ordonis perforte altrudi al la krimeanoj. Regule okazis traserĉado de domoj kaj loĝejoj de „opoziciuloj", politikecaj akuzoj, konfiskoj kaj ĉikanoj kontraŭ „dissidentoj" kaj „suspektindaj elementoj" fare de la moskvaj okupaciaj aŭtoritatoj, kiel jam en la tempo de carisma Ruslando kaj stalinisma Sovetunio. La liberalismo, kiu karakterizis la etoson de la duoninsulo, elvaporiĝis kaj estis anstataŭigita per klimato de ĝeneralaj subpremado, sufokado, persekutado kaj malpermesado. Preskaŭ neniu protestas, sed male, timo, indiferenteco, oportunismo, ciniko kaj senespero disvastiĝas pli kaj pli. La turismo lamas, senlaboreco kreskas. Pro bezono de rusa vizo aliŝtatanoj ĉesis alveni al Krimeo, ĉar la oficiala aliro al Krimeo povas okazi nur tra Ruslando. Kun ĉiuj gravaj najbaraj landoj – Ukrainio, Kartvelio kaj eĉ Turkio – Ruslando detruis kaj ruinigis siajn rilatojn. Sur Krimeo, ĉiuj simboloj, kiuj memoras pri Ukrainio, estas rigore elsarkitaj de la novaj rusaj mastroj, kiuj konas neniujn skrupulojn.

Aparte malfacila restis la situacio de la krimeaj tataroj. Ilmi Umerov, laŭprofesie kuracisto kaj iama estro de la baĥĉisaraja distrikto, unu el malmultaj iamaj gvidantoj de la krimeaj tataroj, kiuj povis resti aktiva politikisto sur la duoninsulo, plendis pri minacoj kaj ĉikanoj, kiujn la tataroj ricevas kaj devas elteni. Nun en Baĥĉisarajo la tonon diktas Putin-lojalaj administrantoj. La krimeaj tataroj ne plu ricevis permeson por publikaj ceremonioj kaj manifestacioj, ekzemple por memori pri la deportado de la jaro 1944 al Centra Azio. La televida stacio ATR, kiu ne plu povis akiri licencon, sendas nun el Kievo. Kvankam la tataroj evitis provoki la rusojn kaj ne uzis vortojn kiel „anekso" aŭ „okupacio", ili estas sisteme diskriminaciataj kaj persekutataj en la putinisma duondiktaturo, kies protagonistoj ŝajne celas venĝi la mallojalecon kaj ribelemon de la krimeaj tataroj. Pro la atenco kontraŭ iu grava elektra instalaĵo en Ukrainio, kiu liveris kurenton al Krimeo, en kiu en novembro 2015 partoprenis iuj krimeaj tataroj, la Meĝliso riskis esti klasifikita de Moskvo kiel „ekstremisma" aŭ „terorisma" organizaĵo", kio povas havi gravajn sekvojn por la tuta krime-tatara komunumo. Do, la krimeaj tataroj havas la elekton inter adaptiĝo kaj rezisto. Dume, Ruslando rifuzas gvidi dialogon kun la politikaj reprezentantoj de la krimeaj tataroj, pri kiuj ĝi reelfosis la malnovajn antaŭjuĝojn kaj akuzojn.[242]

Ankaŭ en la dua jaro post la anekso de Krimeo la homrajta asocio „Societo por minacataj popoloj" (GfbV) eldonis detalan raporton pri la aktuala situacio de Krimeo, kun listo de lezoj kaj krimoj plenumitaj de la rusa reĝimo kontraŭ krimeaj tataroj, kiuj rilatas ĉefe kazojn en la jaro 2015. Ke la ĉikanado,

[241] Laŭ https://www.gfbv.de/fileadmin/redaktion/Reporte_Memoranden/2015/Memorandum_Krim.pdf.
[242] Vd. http://www.nzz.ch/international/ein-polizeistaat-im-paradies-1.18714593.

persekutado kaj arestado de krimeaj tataroj ne finiĝis, sed male estis daŭrigata ankaŭ en 2015, ilustras la ĉi-sekvaj ekzemploj.

Inter kazoj de *murdoj, turmentoj, kidnapoj, malaperigoj,* kiuj estis registritaj en 2015, estas menciindaj jenaj: En junio la 60-jaraĝa krimea tataro Kaĥok Muksiddin mortis post perforta batado, kun klara etnisma motivo. En aŭgusto du aliaj tataroj estis murditaj: Memet Selimov kaj Osman Ibragimov. Irvin Kroŝ, alia krimea tataro, estis turmentita de FSB, ĉar la sekreta servo volis, ke li kunlaboru kun ĝi, kion la viktimo rifuzis fari. En aŭgusto malaperis la 45-jara krimea tataro Mukhtar Arislanov, kiu estis instruisto pri sporto kaj trejnisto por ĵudo en Simferopolo. Atestantoj vidis, kiel li estis kidnapita de policistoj. Ruslan Ganiev kaj lia amiko malaperis en decembro en Kerĉo. Ambaŭ estis kredantoj de la islamo. Juraj procesoj estas prokrastataj, kaj pluraj kazoj el la jaro 2014 restis nesolvitaj.

*Malpermesoj reveni al Krimeo kaj malliberigoj:* Al Mustafa Dĵemilev, kiu troviĝas en Kievo, la krimeaj instancoj daŭre malpermesis reveni al Krimeo. Aĥtem Ĉijgoz, Ali Asanov, Mustafa Degermedĵi kaj Asan Ĥarukhov daŭre troviĝis en la malliberejo. Musa Abkerimov, kiu estis akuzita pro tio, ke li atakis anon de la trupo „Berkut“, estis kondamnita al pli ol kvar jara arestado en malliberejo. Oleksandr Kostenko, civitano de Ukrainio, kiu estis arestita en februaro 2014, estis kondamnita en majo 2015 al preskaŭ kvarjara malliberigo. Lige kun la partopreno en malpermesita manifestacio honore al la ukraina nacia poeto Taras Ŝevĉenko, dum kiu oni svingis ukrainajn kaj krime-tatarajn flagojn kaj montris afiŝojn kun sloganoj „Krimeo estas parto de Ukrainio“, en marto 2015 tri personoj estis arestitaj. En marto estis arestita ankaŭ Taljat Junusov, nask. en 1984, al kiu la polico riproĉis, ke li posedis videofilmon pri demonstracio de februaro 2014. Ankaŭ li malaperis en la polica ĝangalo. En aprilo estis arestita Emir-Usein Kuku survoje al la laborloko; li apartenis al la „kontaktgrupo homaj rajtoj“ en la regiono de Jalta. Ĉi tiu grupo fondiĝis en septembro 2014 post la malapero de pluraj krimeaj tataroj. La 18an de majo estis arestitaj de OMON ĉ. 60 partoprenantoj de aŭtomobila sporta veturado en Simferopolo. La evento estis dediĉita al la deportado de la krimeaj tataroj de la jaro 1944. Dum la veturado oni montris krime-tatarajn flagojn. Simila incidento okazis en Baĥĉisarajo. Post plurhora pridemandado ĉiuj homoj tamen estis liberigitaj. La 4an de junio estis kidnapita la krimea tataro Riza Izetov el la vilaĝo Stroganovka fare de armitaj kaj maskitaj viroj.

La 11an de junio, iu rusa tribunalo kondamnis Ĥajser Dĵemilev, filon de Mustafa Dĵemiliev, al kvinjara arestado en malliberejo. Ĥajser jam havis problemojn kun la ukraina justico, kiu riproĉis al li murdon, ŝtelon kaj posedon de armilo. (vd. ankau en la supra ĉapitro).

*Traserĉado de konstruaĵoj kaj konfiskado de libroj:* En la periodo de la raporto sur Krimeo okazis pli ol 100 traserĉadoj de loĝejoj kaj domoj, moskeoj kaj tataraj lernejoj fare de reprezentantoj de diversaj „organoj“ (ĉefe FSB, polico, nekonataj oficistoj) por trovi „ekstremisman“ literaturon. La traserĉadoj okazas ofte surprize kaj arbitre, sen prezentado de ordono aŭ klarigo. Sole en decembro 2015 15 domoj kaj loĝejoj de krimeaj tataroj estis traserĉataj, kaj estis enkondukitaj 14 tribunalaj procesoj kontraŭ krimeaj tataroj. Talat Junusov estis kondamnita al 42 monatoj de arestado sub kondiĉoj. La 3an de decembro 2015 anoj de FSB traserĉis la domon de Ilver Ametov, gvidanto de la regiona meĝliso en Sudak. Okaze de la traserĉadoj oni konfiskis islaman literaturon, sed ankaŭ librojn pri la t.n. holodomoro en Ukrainio en 1932-33 kaj pri la deportado de krimeaj tataroj sub Stalin en 1944. La 23an de januaro 2016 en Alupka estis arestita Muedin Alvapuv post kiam frumatene armitaj policistoj enpenetris la domon de lia familio. Oni traserĉadis la domon kaj konfiskis la komputilon, lian koranon kaj unu aŭtomobilon. Laŭ klarigo de la anstataŭanta prezidanto de la Meĝliso, Nariman Dĵeljal, anoj de lia familio ripete partoprenis en civilsociaj protestoj kaj aktivecoj. La 12an de februaro grupo de 12 krimeaj tataroj, kredantoj de la islamo kaj membroj de la panislama politika partio „Hizb ut-Taĥrir al-Islami“, kiu estas malpermesita en Ruslando, estis arestitaj kaj akuzitaj pro aparteno al „terorisma“ organizaĵo.

Ekzistas listo(j) de „malpermesita literaturo“, sed la popolo ne vere scias kio estas malpermesita, kaj la oficistoj arbitre konfiskas ĉion ajn, kio vekas ilian suspekton. Estis konfiskitaj tiom da aĵoj, inter alie ankaŭ komputiloj kaj moveblaj telefonoj, tiel ke ne eblis fari aktualan statistikon. Oficistoj de la fifamaj „memdefendaj fortoj“ de Krimeo (Samooborona Kryma), kiuj estas kompletigitaj per taĉmentoj de la „Oraj Ursoj“, Vitiaz´“, „Feniks“ kaj aliaj armitaj fortoj, ricevis la licencon de la krimea registaro kontroli ajnan personon, persekuti kaj aresti evntualajn krimulojn kaj transpreni aliajn taskojn, kiujn principe rajtas plenumi nur oficialaj policistoj. Kompreneble, tiuj specialaj fortoj ĝuas plenan senpunecon.

*Persekutadp de ĵurnalistoj kaj subpremado de la gazetara libereco:* Ĉikanoj estis aranĝitaj kontraŭ la ĵurnalistinoj Tatjana Guĥakova, Anna Ŝaidurova, Natalja Kokorina kaj Anna Andrievska.

Eskender Nebijev, kunlaboranto de ATR, estis arestita la 20an de aprilo 2015 post traserĉado de lia domo. Tiun areston sekvis unu semajnon poste la pridemandado de alia kunlaboranto, Amet Umerov, fare de la „Centro de la kontraŭbatalado (aŭ preventado) de ekstremismo“, kiu estas sekcio de la ministerio pri internaj aferoj. La 21an de majo, tri kunlaborantoj de la televida kanalo „Inter“ estis haltigitaj de la polico survoje de Simferopolo al Armjansko kun kvar por-ukrainaj aktivuloj, kun sekva pridemandado evidente por kontroli ilian identecon. La 2an de oktobro rusaj oficistoj traserĉadis la domojn de krime-tataraj kunlaborantoj de la televida kanalo ATR, Elzara Isljamova kaj Lilija Budĵurova, same tiujn de parencoj de Lenur Isljamov, posedanto de la kanalo. Ĉirkaŭ 20 armitaj oficistoj de FSB venis frumatene kaj kunportis „ĉiujn dokumentojn, komputilojn kaj telefonojn“. Ilia advokato ne rajtis ĉeesti. Natalja Kokorina, ĵurnalistino de la novaĵagentejo „Crimean Centre for Investigative Journalism“, estis kunportita de FSB post kvarhora traserĉado de la domo de la gepatroj. Ŝajnas, ke oni esploras kontraŭ ŝi pro iu kritika artikolo, kiun ŝi publikigis en sia platformo.

Estis arestitaj naŭ bloguloj pro „ekstremismaj publikigoj“. La klasifikado kiel „ekstremisma“, „separatisma“ aŭ „terorisma“ okazas laŭ arbitraj kriterioj, kaj iu ajn civitano, kiu estas suspektata pro tia aktiveco, povas esti arestita, akuzita, kondamnita kaj malliberigita. La 18an de januaro 2016 estis arestita la konata krime-tatara ĵurnalisto kaj blogulo Zair Akdyrow, kiam li volis partopreni en la tribunala proceso kontraŭ Aĥtem Ĉijgoz kaj aliaj krimeaj tataroj. Kiam iuj oficistoj klopodis perforte puŝi lin en aŭtomobilon, Akdyrov defendis sin, sed baldaŭ li estis akompanita de deko da policistoj al la proksima policejo, kie oni pridemandadis lin.

Krom ATR estis fermitaj, blokitaj aŭ malpermesitaj ankaŭ *15 minutoj, Krym.Realii,*[243] *Krimskie novosti, Yañı dünya, Zensor.net, Ukrainskaja pravda, BlackSeaNews,*[244] *Forpost, Sobytija Kryma*[245] kaj „Centro de ĵurnalismaj esploroj“,[246] kaj Tvitero estis adaptita al la rusiaj leĝoj.

Je la 1a de aprilo 2015 ĉiuj amaskomunikiloj de Krimeo bezonis novan licencon por povi daŭrigi sian laboron. Kiel supre raportite, la sola krime-tatara televida kanalo ART ne ricevis novan licencon, malgraŭ ripeta klopodo ricevi ĝin. Sama afero okazis al la krime-tataraj gazetoj *Avdet* kaj *Yañı dünya*, kiu havis 3000 abonantojn. Roskomnadzor, la rusia instanco, kiu respondecas pri disdono de tiaj licencoj, rigore rifuzis ilin al agentejoj, kiujn la rusoj ne plu deziras permesi. La 26an de junio 2015 la ministerio pri informado publikigis liston de ĵurnalistoj, kies laboro sur Krimeo estas malpermesita.

Kiel *Krym.Realii* raportis la 7an de februaro 2016, en la nokto de la 18-19aj de novembro 2015 okazis atako kontraŭ la redaktejo de la krime-tatara ĵurnalo *Jıldız*. Kvankam oni frakasis metalajn kradojn, la uloj ne sukcesis penetri en la konstruaĵon mem. Antaŭe fariĝis konate, ke similaj bandoj, kiuj prirabas ankaŭ moskeojn, kiel mesaĝis Riza Fazylov en Fejsbuko, priŝtelis ankaŭ la redaktejon de la gazeto *Yañı dünya*.[247] En februaro 2016 estis anoncite, ke kadre de restrukturado ambaŭ gazetoj estos alkroĉitaj al la holdingo „Mediacentr im. Ismaila Gasprinskogo“, per kio ili perdis sian memstarecon.[248]

Post vizito de Krimeo OSKE kritikis, ke la libereco de opinio kaj gazetaro en tiu lando malboniĝas pli kaj pli.[249] Ankaŭ la organizaĵo „Reporteroj sen limoj“ akre kritikis la „disbatadon de la gazetara pejzaĝo sur Krimeo“.[250]

*Ĉikanoj kontraŭ politikaj reprezentantoj kaj misfamigo de krime-tataraj instancoj:* Kiel raportite, kontraŭ Mustafa Dĵemilev kaj Refat Ĉubarov, reprezentantoj de la Meĝliso, estis eldirita la malpermeso reveni al Krimeo, kiam ili estis en Ukrainio. En majo 2015, kontraŭ Ĉubarov, kiun oni akuzis pro tio, ke laŭdire li alvokis „lezi la teritorian integrecon de la rusia ŝtato“, estis enkondukita jura proceso. Li riskas esti punita je kvinjara arestado en malliberejo.

En septembro la rusa Ministerio pri informado dissendis al la amaskomunikiloj de Krimeo leteron, en kiu oni esprimis la „rekomendon“ ne plu utiligi la vorton „Meĝliso. La leteron verŝajne aŭtoris Natalja

243 Vd. http://ru.krymr.com.
244 Vd. http://www.blackseanews.net.
245 Vd. http://www.sobytiya.info.
246 Vd. http://investigator.org.ua/ru.
247 Vd. http://ru.krymr.com/content/news/27377646.html.
248 Vd. http://newspaperclub.org.ua/2015/12/v-krymu-likvidiruyut-legendarnye-izdaniya-yani-dyunya-i-jyldyz kaj http://www.gipp.ru/viewer.php?id=56253.
249 Vd. http://www.osce.org/fom/143861.
250 Vd. http://www.rferl.org/content/ukraine-crimea-crackdown-journalists/26901125.html.

Poklonskaja, fifama ĝenerala prokurorino de Krimeo. En la letero estis skribite, ke krom la meĝlisoj de la kazanaj tataroj en Tatarstano kaj de la moskvaj tataroj en Ruslando ne ekzistas aliaj meĝlisoj.

Rusaj politikistoj submetis al la prokuroro de Krimeo la peton por plusendi ĝin al la Supera Soveto de Rusio kun la postulo fermi la Meĝlison, kies membrojn kaj fondajn dokumentojn oni klasifikis „ekstremismaj". Krom tio, okazis tuta vico de ĉikanoj kontraŭ krime-tataraj politikistoj: Nariman Dĵeljal, unua anstataŭanta prezidanto de la Meĝliso, kaj Dilaver Akiev, alia membro de la Meĝliso, estis avertitaj, ke ili rezignu pri alvokado al „kontraŭleĝaj ekstremismaj agadoj" – temis pri manifestacio okaze de la 18a de majo, la memortago pri la deportado de la krimeaj tataroj. La manifestacio estis malpermesita.

En oktobro 2015 rusaj politikistoj disvastigis la onidiron, ke la Meĝliso de la krimeaj tataroj rekrutas batalantojn de la „Islama Ŝtato".

*Subpremado de ukrainaj kulturaj instalaĵoj:* Post la anekso de Krimeo, sur la duoninsulo ne nur krime-tataraj, sed ankaŭ ukrainaj institucioj alfrontis gravajn problemojn. La 6an de januaro 2015 la konata teatra lernejo „Svitanok" (sunleviĝo) en Simferopolo, kiu prezentis spektaklojn de infanoj en ukraina lingvo, devis fermi siajn pordojn post malpura kampanjo kontraŭ ĝi. De pli ol 20 jaroj tiu fama teatra lernejo estis integra parto de la kultura vivo de Krimeo. La aŭtoritatoj kulpigis la lernejon, ke ĝi praktikas ukrainan naciismon kaj propagandas okcidentajn simbolojn. Natalja Poklonskaja, ĝenerala prokurorino de Krimeo, admonis ankaŭ ĉiujn „ukrainajn naciistojn kaj radikalulojn", ke ili rezignu pri propraj manifestacioj. Ŝi diris, ke en la malliberejoj estas sufiĉe da loko por ili. 24,4% de la loĝantoj de Krimeo estas ukrainoj. Depost la anekso ankaŭ presaĵoj en ukraina lingvo estis praktike forigitaj de Krimeo. Nur unu televida programo estis konservata. Ukrainaj retpaĝoj estis blokitaj por la loĝantoj de Krimeo. Ankaŭ la instruado por ukrainaj lernantoj estis draste limigita (de 8,2% al 1,2%). La sekcio por ukraina filologio ĉe la Taŭrida Universitato estis fermita kaj la plimulto de la kunlaborantoj estis maldungitaj. Multaj instruistoj, kiuj antaŭe instruis la ukrainan lingvon, devas nun instrui la rusajn lingvon kaj literaturon. Ĉio cetera, kio estas ukraina, estas subpremata. La 14an de oktobro specialaj policaj fortoj de Krimeo arestis tri aktivulojn de la „Ukraina Kulturcentro", ĉar ili demetis florojn ĉe la statuo de Bohdan Ĥmelnyzkyj.

*Subpremado de islamaj aferoj:* Imamo Junus Nemetullaev el la vilaĝo Dolinka ricevis monpunon de 10´000 rubloj, ĉar li estis akuzita pro tio, ke li partoprenis en malpermesita manifestacio okaze de la memortago de la deportado de la krimeaj tataroj. En julio 2015 la lokaj aŭtoritatoj malpermesis al la islama komunumo en Baĥĉisarajo organizi kulturan eventon okaze de la festo „Eid ul-Fitr".[251] Kiel decidis iu tribunalo, imamo Mustafa Jagjaev ne plu rajtas praktikadi sian profesion dum du jaroj, ĉar laŭ la akuzo li diris en junio 2014 „maldecajn aferojn" kontraŭ tri virinoj de la firmao „Ĵeleznodoroĵnyj". La polico aperis antaŭ lia domo, kiun ĝi traserĉis, konfiskante religiajn librojn, komputilajn diskojn, telefonojn, fotografaĵojn kaj aliajn dokumentojn. Ankaŭ la medreso en la vilaĝo Kolĥyrino ne povis daŭrigi sian aktivecon, ĉar al ĝi mankas la necesa licenco. Kontraŭ la moskeo en la vilaĝo Zavet-Leninskij oni ĵetis ŝtonojn, kio igis la lokan imamon Rustem Aĥmetŝaev skribi juran plendon. La 10an de januaro 2016 estis atakita ankaŭ la moskeo de Ay-Serez en la regiono de Sudak. Unu muro de la moskeo, kiu estis ĵus renovigita, estis ŝmirita.

*„Naciigo" de entreprenoj:* Kiel „naciigon" la aŭtoritatoj de Krimeo klasifikis la transprenon de entreprenoj kaj firmaoj de Krimeo, kies posedantoj estas ukrainaj ŝtatanoj. Ili ne estis rekompencataj. Tiu „naciigo" estis efektivigita ĉefe en 2014 kaj komence de 2015. La posedaĵo de entreprenoj, kiuj ne sukcesis registriĝi, aŭtomate transirs al la posedo de la nova krimea registaro, kio egalas al kruda rabado, krima ŝtelado de fremda posedaĵo en la spirito de la iredentismo. Pli ol 500 tiaj entreprenoj estis koncernitaj de tiu „naciigo", kio signifas financan damaĝon de 2,3 milionoj (?) da dolaraj. Unu el tiaj kazoj estas la reto de moveblaj telefonoj „Kyivstar", kiu unue estis fermita, poste „naciigita", transformita kaj refondita kiel movebla telefona reto de Krimeo. Inter la entreprenistoj, kiuj estas koncernitaj de tiu „naciigo" aŭ ŝtatigo, troviĝas ankaŭ kelkaj krimeaj tataroj,

*Blokado kaj atenco:* La 20an de septembro 2015 krimeaj tataroj blokadis kun aliaj aktivuloj la stratajn alirojn flanke de la Ĥersona regiono de Ukrainio al Krimeo. La blokado koncernis nur kamionojn, kiuj transportis nutraĵojn al Krimeo. Unu semajnon poste aktivuloj blokis ankaŭ unu trajnlinion. En novembro aldoniĝis atako kontraŭ iu grava elektra instalaĵo en Ukrainio, kiu estis tiel difektita, ke en Krimeo mankis kurento. Per tiuj agadoj la aktivuloj volis atentigi, ke ankaŭ ukrainaj komercistoj profit-

[251] Pri ĝia signifo vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Eid_ul-Fitr.

done kunlaboras kun la rusaj regantoj de Krimeo. Sed la rusoj aktivigis alian elektran linion, kaj la koncernita ukraina eksportisto riparis la elektran instalaĵon.

*Rifuĝintoj:* En Ukrainio ne ekzistas ekzakta statistiko pri la nombro de krimeaj rifuĝintoj. Oni taksas ke temas pri 20-50´000 personoj, inter ili 15-18´000 krimeaj tataroj. Ne ĉiuj tiuj rifuĝintoj registriĝis. En Ukrainio la rifuĝintoj alfrontas aron de juraj kaj administraj obstakloj, ekzemple legitimiloj donitaj en Krimeo ne validas en Ukrainio.

*Resume kaj konklude:* Ankaŭ en la dua jaro sub rusa administrado en Krimeo okazis gravaj limigoj kaj lezoj de civitanaj liberecoj kaj homaj rajtoj, precipe kontraŭ krimeaj tataroj, sed ankaŭ kontraŭ ukrainoj kaj islamanoj. La rusaj okupaciaj aŭtoritatoj, kiuj estas apogataj de policistoj, juristoj kaj sekretservistoj, kiuj venas rekte el Ruslando, klopodis rigide puŝi kaj trudi siajn imagojn kaj interesojn pri la ŝtata funkciado de Krimeo, sen respekti la interesojn de individuoj kaj la rajtojn de minoritataj grupoj, kiujn la rusoj misfamigis kiel ekstremistojn kaj teroristojn. La libereco de la gazetaro de Krimeo estis grandstile lezata kaj subpremata. Ekde la 1a de aprilo 2015 la amaskomunikiloj de Krimeo estas egalŝaltitaj, kio signifas, ke ili devas reprezenti kaj propagandi la opinion de la registaro. Kanaloj, kiuj estas suspektataj, ke ili ne pretos observi tiujn regulojn, ne plu ricevis licencon por daŭrigi la laboron. Memortagoj kaj manifestacioj de etnaj, kulturaj, lingvaj kaj religiaj minoritatoj estis malpermesataj. Personoj, kiuj malgraŭ malpermeso partoprenis en protestoj kaj manifestacioj, riskis areston, akuzon, kondamnon kaj malliberigon, en iuj kazoj eĉ mortigon. Precipe la krimeaj tataroj suferis kaj suferas je sistemaj diskriminado, ĉikanado kaj subpremado de siaj rajtoj. Laŭ la volo de la moskvaj regantoj, Krimeo devos fariĝi pure rusa, kaj ĉio nerusa estos subpremata kaj elsarkita. La dua jaro estis karakterizata ankaŭ de sentima rezistado flanke de krimeaj tataroj. Ilia blokada sinteno kaŭzis kontraŭan reagon de la rusaj aŭtoritatoj de Krimeo, kiuj minacis fermi la Meĝlison kaj deklari ĝin ekstremisma aŭ terorisma organizaĵo. En tia kazo la tuta krime-tatara popolo riskus esti kolektive konsiderata de la rusoj kiel krimuloj.[252]

## Malpermeso de la laboro de la Meĝliso en 2016

La 18an de aprilo okazis, kion la tataroj de Krimeo timis jam delonge: La justicministerio de Ruslando metis la Meĝlison de la krimeaj tataroj sur la „liston de sociaj asocioj kaj religiaj organizaĵoj, kies laboro estas ligita kun efektiviĝo de ekstremisma agado“. La decido okazis surbaze de propono de la ĝenerala prokuroro de Krimeo, Natalja Poklonskaja, al la Ĉefa Tribunalo de Krimeo, kiu ricevis ĝin jam en februaro.[253] Tio signifas, ke la aktiveco (politika, propaganda) de la 33 membroj de la krime-tatara Meĝliso estas praktike malpermesata en Rusio.[254] La malpermeso, kiu okulfrape estis puŝita en la semajno post la ŝanĝo de la ukraina registaro, kaŭzis internacian kritikon: Eŭropa Unio alvokis Rusion rezigni pri la malpermeso. Thorbjørn Jagland, ĝenerala sekretario de la Eŭropa Konsilio, diris, ke la krimeaj tataroj devus konservi la rajton daŭrigi sian laboron. EK parolis pri „nova dimensio de reprezalioj“.[255] Amnestio Internacia avertis, ke Ruslando detruas minoritatajn rajtojn, kaj la Societo por minacataj popoloj (GfbV) postulis „akran reagon precipe flanke de germanaj politikistoj“. Akraj estis ankaŭ la reagoj el Ukrainio kaj flanke de la krimeaj tataroj mem: Poroŝenko, prezidento de Ukrainio, atentigis, ke „certa linio estas transirita“, kaj la ukraina ministerio pri eksterlandaj aferoj parolis pri „neakceptebla lezo de homaj rajtoj“. La litova ministro pri eksteraj aferoj alvokis EUn kondamni la novan moskvan paŝon. Mustafa Dĵemilev, iama gvidanto de la krimeaj tataroj, kiu vivas en Kievo kaj ne rajtas reveni al Krimeo, parolis pri „militproklamo“ kontraŭ sia popolo.[256] La ŝtata departemento (t.e. ministerio pri eksterlandaj aferoj de Usono) alvokis Rusion nuligi la decidon de la rusia justicministerio. Je tiu okazo la departemento konfirmis la pozicion de Usono, laŭ kiu ĝi ne agnoskas la reunuiĝon de Krimeo kun Rusio, pro kio la

---

[252] Vd. https://www.gfbv.de/fileadmin/redaktion/Reporte_Memoranden/2016/MR-Report-80_2-Jahre-Annexion-der-Krim.pdf.
[253] Vd. http://minjust.ru/press/news/obshchestvennoe-obedinenie-medzhlis-krymskotatarskogo-naroda-vklyucheno-v-perechen.
[254] Vd. http://www.novayagazeta.ru/news/1702576.html.
[255] Vd. http://www.novayagazeta.ru/news/1702438.html.
[256] Vd. http://www.dw.com/de/krimtataren-im-visier-russlands/a-19201865, http://www.zeit.de/politik/ausland/2016-04/krim-selbstverwaltung-russland-verbot-ukraine-proteste, http://www.zeit.de/politik/ausland/2016-04/krim-russland-europarat-besorgnis-verbot-parlament-tataren-diskriminierung, https://www.gfbv.de/de/news/krimtatarischer-medschlis-verboten-7981.

rusiaj leĝoj ne validas sur Krimeo, kiu estas parto de alia ŝtato. Moskvo estis admonita redoni la duoninsulon al Ukrainio.[257]

Unu bona afero por la krimeaj tataroj tamen okazis intertempe: La 12an de novembro 2015, la Supera Konsilio de Ukrainio agnoskis la deportadon de la krimeaj tataroj de 1944 kiel genocidon. Decidita estis en la koncerna dekreto, ke la 18a de majo estu la „Tago de la Memoro de la viktimoj de la genocido kontraŭ la krime-tatara popolo". Laŭ la opinio de la subskribintaj parlamentanoj venis la tempo starigi historian justecon kaj veron kaj la neceso zorgi pri tio, ke similaj okazaĵoj ne ripetiĝu.[258]

Skandalon en Ruslando tamen kaŭzis la kanto „1944" de Jamala, ukraina kantistino de krime-tatara origino, kiu proponis sian kanton por la Eŭropa Kantfestivalo (ESC) de la jaro 2016, por kontribui al la neforgesado de la sorto de la krimeaj tataroj de tiu jaro. Ĉar la reguloj de la kantfestivalo malpermesas politikajn tekstojn, ne estis certe, ĉu la kantistino estos akceptita kiel oficiala reprezentantino de Ukrainio en Stokholmo, kie la konkurso okazos.[259] Malgraŭ rusa kritiko, Jamala estis allasita al la konkurso.[260]

**Konkludaj konsideroj: Al kiu(j) Krimeo apartenas/u?**

La demando, kiu havas la (historian, politikan, moralan, materian) rajton pretendi Krimeon sia lando, estas malfacile kaj ne definitive respondebla, ĉar multaj faktoroj komplike influas la diskuton kaj malhelpas trovi klaran decidon. Unue, pro la multetna karaktero de Krimeo ĝi fakte ne estas klasifikebla aŭ identigebla laŭ unusola popolo aŭ etno. Due, Krimeo neniam estis sendependa ŝtato, kaj pluraj fremdaj ŝtatpotencoj efektivigis sian politikan influon kaj teritorian suverenecon super la duoninsulo. Kvankam ĝis hodiaŭ precipe rusaj kaj ukrainaj historiistoj kaj politikistoj obstine klopodas apartenigi Krimeon al sia lando, klaraj, sendubaj argumentoj, kiuj povus pravigi tiun pretendon kaj konfirmi tiun apartenon favore al unu aŭ alia lando, ne evidentiĝis. En la ukraina historiografio Krimeo kaj la problemo de la krimeaj tataroj estas konsiderataj kiel parto de la ukraina pasinteco. Kvankam formale ili ne havas bazon por tia sinteno nek teritorian aŭ nacian kaŭzon, ukrainaj historiistoj inkluzivas la historion de Krimeo de la postmilita periodo (post la dua mondmilito) en la historion de Ukrainio.[261]

Se ni retrorigardas al la pasinteco por vidi, kiuj popoloj kaj ŝtatoj efektivigis sian suverenecon super Krimeo, ni konstatas:

. - Ĝis la alveno de la tataroj en la 13a jarcento plej diversaj antikvaj popoloj loĝigis Krimeon, precipe grekoj, bizancanoj, peĉenegoj, kipĉakoj, italoj (ĝenovanoj kaj venecianoj), kiuj tie fondis koloniojn, kaj formis, en jura senco, ian suverenecon pri certaj partoj aŭ punktoj de la duoninsulo. Kune kun tiuj antikvaj popoloj malaperis ankaŭ iliaj posedaĵoj, suverenecoj kaj pretendoj sur Krimeo. Ankaŭ la legendecaj taŭridanoj ne plu ekzistas kiel prapopolo de Krimeo.

. - En la jaro 1441 la krimeaj tataroj, kiuj konkeris kaj okupis la duoninsulon de ekstere, fondis la krimean ĥanlandon, kiu ekzistis dum 342 jaroj ĝis la jaro 1783 kaj funkciis kiel (kvazaŭ-)ŝtato.[262] En 1478 la krimeaj ĥanoj, tamen perdis sian memstarecon kaj devis agnoski la hegemonion de la Otomana Imperio (Alta Pordo) super la ĥanlando, kiu rolis kiel sucerano de tiu duon-, ŝajn- aŭ pseŭdosuverena ŝtato, kiu havis nur limigitan politikan memstarecon, funkciante kiel vasalo de la sultano. La komplikajn rilatojn inter la krimeaj tataroj kaj la sultano ni traktis supre. La ĥanoj de Krimeo akceptis (kvankam malvolonte) la dependecon de la otomanoj, kiuj tamen lasis al la tataroj de Krimeo sufiĉe grandan liberecon por decidi

[257] Vd. http://www.novayagazeta.ru/news/1702689.html.
[258] Vd. http://visti.ks.ua/novosti/novosti-hersona/23060-verhovnaya-rada-priznala-genocidom-deportaciyu-krymskih-tatar-1944.html.
[259] Vd. http://www.nzz.ch/international/krimtatarin-singt-von-stalins-verbrechen-1.18699924, http://lyricstranslate.com/de/jamala-1944-lyrics.html (teksto), http://text-lyrics.ru/j/jamala/3092-jamala-1944-perevod-pesni.html (teksto), https://www.youtube.com/watch?v=0C7E19yz23g, http://www.n-tv.de/leute/Ukraine-riskiert-ESC-Ausschluss-article17051896.html, http://www.eurovision.tv/page/news?id=jamala_will_represent_ukraine_in_stockholm.
[260] Vd. http://www.tagesanzeiger.ch/kultur/pop-und-jazz/ukrainisches-lied-beim-esc-zugelassen/story/30837799.
[261] Vd. Laas, N.A.: Istorija krymskich tatar perioda pozdnego stalinizma i chruščevkoj „ottepeli": ekskurs v anglojazyčnuju istoriografiju. p. 248
[262] Malfacile diri, ĉu la krimea ĥanlando estis oficiale agnosikita de aliaj ŝtatoj, kvankam diplomatiaj rilatoj ja ekzistis.

la proprajn aferojn. Ĉar ankaŭ el etnologia vidpunkto Krimeo ricevis fortan tataran karakteron (ĝis post 1783 90% de la loĝantaro de Krimeo estis tataroj) oni povas konsideri la tatarojn ĉefa aŭtoktona popolo (ruslingve: *korennoj narod*) de Krimeo, kiu rajtas konsideri Krimeon almenaŭ kiel (novan) hejmlandon aŭ patrujon post la pereo de la „Ora Hordo", kvankam ankaŭ la tataroj, kiuj origine venis el oriento, siatempe okupis ĝin kiel novuloj (sed multaj lokoj sur Krimeo tiam estis malplenaj). Grava faktoro de la historio de Krimeo kaj de la krimeaj tataroj estas, ke tiu popolo konsideras la ekziston de sia ĥanlando kiel komencon de siaj politika kaj kultura aŭtonomecoj, malgraŭ dependeco de la turkoj, kiuj funkciis kiel iliaj protektantoj.

. - Moskvo argumentas sen granda preteco kontroli au diskuti la verecon de tiu aserto, ke Krimeo fariĝis „eterna" parto de Ruslando, kiam la duoninsulo estis aneksita de Katerina IIa en la jaro 1783. En 1797 la la eksa Taŭrida distrikto (Krimeo) fariĝis parto de la Novrusia gubernio, la nomo de Krimeo malaperis, kaj ĉefurbo de tiu gubernio fariĝis Ekaterinoslav. En 1803 estis formita nova Taŭrida Gubernio.

. - En 1921 la sovetia registaro dekretis la fondon de la „Aŭtonoma Socialisma Sovetrespubliko de Krimeo" (Krymskaja ASSR) kiel integra parto de RSFSR.

. - En 1942-44 Krimeo estis okupata de la germana armeo. Post la milito Krimeo estis distrikto de RSFSR.

. - Laŭ dekreto de la prezidio de la Supera Soveto de USSR en 1954 Krimeo estis eksigita el RSFSR kaj fariĝis integra parto de Ukraina SSR. Precipe post tiu sciencaj kaj publikaj aktivuloj de la ukraina diasporo aktualigis la krimean problemon en la kunteksto de la morala respondeco de la ukraina popolo koncerne la decidon de la sovetiaj politikistoj pri la deportado de la loĝantaro el Krimeo.[263]

. - Intertempe, kaj la Krimea ĥanlando, kaj la Otomana Imperio, kaj la Ruslanda Imperio, kiu konkeris kaj aneksis Krimeon en la 18a jarcento, kaj la tiama RSFSR, kaj Sovetunio (USSR), kiu estis fondita en 1922 kaj kies parto Krimeo fariĝis kadre de RSFSR, kaj Ukraina SSR ne plu ekzistas. La 20an de januaro 1991 93% de la loĝantoj de Krimeo voĉdonis en referendumo por la restarigo de la „Aŭtonoma Socialisma Sovetia Respubliko de Krimeo" (ASSR). La 24an de aŭgusto 1991 Ukraina SSR (t.e. Ukrainio) proklamis sin sendependa ŝtato kadre de la ekzistantaj limoj inkluzive de Krimeo. En 1992 Krimeo ricevis la statuson de Aŭtonoma Respubliko kadre de Ukrainio. La plimulto de la tataroj de Krimeo, kiuj revenis el la ekzilo, loĝas (aŭ loĝis, ĝis marto 2014) en Ukrainio kaj estas ukrainaj ŝtatanoj aŭ civitanoj, kaj ankaŭ post la anekso en 2014 ili konservis la ukrainan ŝtatanecon, se ili ne petis la rusan. Laŭ art. 2 de la „Budapeŝta Memorando" de la 5a de decembro 1994, kiu portas la subskribon de la prezidentoj de Usono, Grandbritio kaj Ruslando (El´cyn), la subskribintaj nukleaj potencoj, promesis, ke ili respektos la suverenecon kaj la ekzistantajn limojn de Kazaĥio, Belorusio kaj Ukrainio, al kiu ankaŭ Krimeo apartenas, kaj ke neniu el ili direktas siajn armilojn kontraŭ la aliaj. Sed poste Ruslando kaprice distanciĝis de la interkonsentitaj principoj kun la argumento, ke Krimeo ne estas koncernata de la „Budapeŝta Memorando" kaj ke la anekso de Krimeo fare de Ruslando en marto 2014 havis aliajn kaŭzojn.

. - Dum Ruslando obstine klopodas pravigi kaj defendi per dubindaj argumentoj, kiujn ni menciis supre, la anekson de Krimeo, kiun Putin evidente planis jam de longe kaj kiun la naciismaj kaj patriotismaj rusoj festas kiel akton de historie grava, prava kaj necesa „reunuiĝo", la Okcidento grandparte kondamnis ĝin kiel krudan lezon de la internacia juro kaj rifuzas agnoski ĝin, ĉar la kondiĉoj kaj cirkonstancoj, sub kiuj tiu „reunuiĝo" aŭ „anekso" prepariĝis kaj efektiviĝis, estis altgrade dubindaj kaj similis al rabado de fremda ŝtatteritorio en la senco de la iredentismo, des pli se la rusoj asertas, ke „Krimeo estas nia". La 27a de marto 2014 cent ŝtatoj subtenis ĉi-koncernan UN-rezolucion pri la neceso konservi la teritorian integrecon de Ukrainio, do ne agnoskis la anekson de Krimeo fare de Ruslando (nur 11 ŝtatoj voĉdonis kontraŭ kaj 58 sindetenis). Kiel ajn, jure kaj formale, Krimeo daŭras aparteni al Ukrainio, des pli ke ankaŭ la registaro en Kievo ne rezignis pri la suvereneco super la duoninsulo, sendepende de la demando, ĉu historie Ukrainio havas ian rajton posedi Krimeon aŭ ne.

. - La fina konkludo estas: Ruslando havas nenian rajton posedi Krimeon. Se la krimeanoj decidas aparteni al Rusio aŭ Ukrainio, tio estas nature alia afero. Nuntempe, ŝajnas ke parto de la krimea popolo, precipe la rusoj, deziras aparteni al Rusio, dum grandparto de ukrainoj kaj krimeaj tataroj rifuzas tion, des pli ke la krimeaj tataroj bojkotis la koncernajn referendumojn. Ideala kompromisa solvo povus esti, se Ukrainio kaj Rusio kune kun la krimeaj tataroj administrus la duoninsulon, kiu havus la statuson de aŭtonoma respubliko, en kiu ĉiuj tri ĉefaj etnoj estas relacie reprezentataj en loka parlamento. Sed ĉar Rusio kaj Ukrainio estas ŝtatoj, kiuj nuntempe malamike rilatas inter si, tio verŝajne ne okazos kaj estas iluzio. Per

[263] Vd. Laas, p. 250.

sia indiferenta internpolitika sinteno kaj pro aliaj prioritatoj Kievo ankaŭ montris, ke ĝi ne estas tre interesata reguligi la etnajn problemojn sur Krimeo kaj komencis engaĝiĝi favore al la krimeaj tataroj nur post la anekso de 2014, kiam ĉio estis jam tro malfrua. Eble en Ukrainio oni konscias, ke la politika aparteno de Krimeo al Ukrainio estis dubinda afero, kiu pli malpli frue estos solvita en la senco kaj laŭ la volo de Rusio. Ŝajnas do, ke precipe la krimeaj tataroj estas la grandaj malgajnintoj de tiu krizo, kiu dume ne estas solvita. La homaro devas helpi al ili, ke ili pluvivu.

Krome, la kazoj de Krimeo kaj orienta Ukrainio (Donbaso) modele ilustris, kio povas okazi, se Ruslando reakaparas ankaŭ aliajn landojn de la ekssovetia zono, ekzemple la Baltajn Ŝtatojn. Probable okazus surpriza kaj perforta okupacio kun antaŭa manipula enmiksiĝo (por helpi la tiean rusan popolon aŭ laŭ alia preteksto kiel ekzemple minacado fare de NATO), totala kontrolo fare de FSB kaj aliaj sekretaj, policaj kaj armeaj fortoj, totala subpremado de la bazaj liberecoj kaj totala rusigo de la politikaj, sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj stukturoj. Praktike ĉiuj landoj, kiuj iam ajn estis sub rusa aŭ sovetia kontrolo, povas esti koncernataj kaj troviĝas en danĝero, eĉ Finlando, Pollando kaj Bulgario, sed ankaŭ tiaj respublikoj kiel Kazaĥio, Uzbekio, Taĝikio kaj aliaj pseŭdoŝtatoj de la regiono, se ili estas konsiderataj de Rusio kiel minaco aŭ malstabiliga faktoro. Laŭ iuj sociologiaj enketoj de ´sendependaj´ ruslandaj esplorcentroj, granda parto de la ruslanda popolo ŝajnas subteni la politikon de Putin. Ĉiujn tiujn riskojn kaj danĝerojn Eŭropo kaj la Okcidento devas konsideri ekstreme serioze kaj reagi per adekvataj rimedoj, eĉ se Moskvo asertas, ke ĝi ne signifas danĝeron por aliaj landoj. Putina Rusio, kiu denove kondutas agreseme, sufiĉe montris kiajn aktivecojn ĝi kapablas lanĉi kaj efektivigi. Fidi al la asertoj kaj promesoj de Putin, kiu adaptas siajn opinion kaj pravigojn laŭ la aktuala situacio, oni ne povas. La rusoj demonstris, ke ili kapablas elpensi ajnan absurdan pretekston aŭ kialon por agi kontraŭ aliaj, kiujn ili malamas, lezante aŭ ignorante ĉiujn promesojn kaj konvenciojn antaŭe faritajn kaj subskribitajn, kiuj ne plu konvenas al ili (ja ne Putin faris kaj subskribis ilin, sed Gorbaĉov, El´cyn kaj aliaj). Sed ĉar la kutima strategio de la rusa politiko jam estas konata, Putin certe havos alian ideon por perpleksigi la mondon per novaj surprizaj paŝoj kaj agadoj, ĉar la ĉefa ideo de Putin, la iama malgranda KGB-agento, estas venĝi ĉiujn malamikojn – en tio li tre similas al Stalin, kiu senkompate kaj fanatike persekutis ĉiujn ideologiajn kontraŭulojn.[264]

### Evoluo de la etna konsisteco de Krimeo

Post la drastaj demografiaj ŝanĝoj, la oficiala konsisteco de la loĝantaro de Krimeo laŭ la tri ĉefaj etnoj en 1989 kaj 2001 estis jena: Rusoj: 65,6% kaj 58,5%; ukrainoj: 26,7% kaj 24,4%; tataroj de Krimeo: 1,9% kaj 12,1%.[265] Laŭ lingvoj (2001): Rusa 77%, tatara 11,4%, ukraina 10,1%. La ukrainoj loĝas precipe en la norda parto de la duoninsulo, la tataroj en la meza kaj (sud)orienta, kaj la rusoj estas forte reprezentataj en la urboj, sudo kaj oriento.[266] Krom tio, sur Krimeo loĝas ankaŭ belorusoj (1979: 43.214, 1989: 50.054), judoj (21.531, 17.731), (aliaj) tataroj (9.656, 10.762) poloj (6.092, 6.157), kaj po kelkmil mordovoj, ĉuvaŝoj, armenoj, moldovoj, grekoj, germanoj, bulgaroj, koreoj, azerbajĝananoj. Ankaŭ jenaj du historiaj etnaj minoritatoj sur Krimeo, kiuj ne aperas en la statistikoj, estas menciindaj: la *krimĉakoj* kaj la *krimeaj kara(im)oj*, kiuj estas turkidaj popoloj kun juda kredo. Iliaj komunumoj estas malgrandaj kaj la lingvoj elmortantaj.[267] La plimulto de la *krimĉakoj* estis mortigitaj en 1941 de germanaj SS- kaj policaj fortoj kaj la sinagogo en Karasuvbazar (Qara-), kiu estis konstruita en 1516, estis detruita. Malgraŭ etnografia manipulado en Krimeo, la duoninsulo restis „vera etnografia muzeo“, kiel la bulteno *Izvestija Tavričeskoj učenoj archivnoj kommissii,* n-ro 52, en 1915, p. 3, skribis.[268]

Por tuta Sovetunio la sovetia statistiko indikis 271´715 krimeajn tatarojn, kio verŝajne estis tro malalta cifero, ĉar pli realismaj taksoj baziĝis sur ĉirkaŭ 300-500 mil.[269]

---

264 Laŭ la libro *Putins verdeckter Krieg* de Boris Reitschuster (aprilo 2016), Putin gvidas sekreta(j)n armeo(j)n en Germanio kaj aliaj landoj, kiun li povas aktivigi laŭbezone en ajna momento, kun la subteno de dekstraj kaj maldekstraj politikaj ekstremistoj en Eŭropo, kiuj subtenas la politikon de Putin kontraŭ EU.

265 Laŭ Sasse, Die Rückkehr-Bewegung der Krimtataren, p. 339.

| | 1897 | 1921 | 1939 | 1979 | 1989 | 1997 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Rusoj | 274.724 | 370.888 | 558.481 (49,6%) | 1.460.98 (68,4%) | 1.629.542 (67,0%) | c. 62% |
| Ukrainoj | (45,3%) | (51,5%) | 154.123 (13,7%) | 547.336 (25,6%) | 625.919 (25,8%) | c. 24% |
| K. Tataroj | 186.212 (34,1%) | | 218.879 (19,4%) | 5.422 (0,3%) | 38.365 (1,6%) | c. 8-10% |

En 1994, la tutan loĝantaron de Krimeo konsistigis 2.632.400 personoj. Laŭ *Krymskaja pravda*, de la 12a de majo 1993, al Krimeo revenis 250´000 tataroj.

Laŭ gepatraj lingvoj (1989)

| | Propra lingvo | Rusa lingvo | Ukraina lingvo |
|---|---|---|---|
| Rusoj | 99,9% | - | 0,1% |
| Ukrainoj | 52,6% | 47,4% | - |
| K. Tataroj | 93,3% | 2,8% | 0,1% |
| Aliaj tataroj | 69,5% | 30,0% | 0,1% |
| Moldovoj | 55,5% | 42,9% | 1,2% |
| Poloj | 9,8% | 67,1% | 21,0% |
| Ĉuvaŝoj | 46,8% | 52,6% | 0,1% |
| Mordovoj | 37,4% | 62,3% | 0,1% |
| Armenoj | 64,2% | 35,3% | 0,1% |
| Grekoj | 22,3% | 76,4% | 0,2% |
| Germanoj | 22,2% | 76,8% | 0,7% |

Pliajn tabelojn svd. Sub https://de.wikipedia.org/wiki/Autonome_Republik_Krim

**Mapo de Krimeo (en la tempo de la Aŭtonoma Respubliko ene de Ukrainio)**




Fonto: https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/4/4d/Karte_der_Krim.png

Administra-teritoria divido de Krimeo: (vd. en Guglo laŭ „Административно-территориальное деление Республики Крым“

**Utiligita fakliteraturo:**


- Bönner, Andreas: *Die Krimtataren. Herkunft, Siedlungsgeschichte und Herrschaftsbildung.* Studienarbeit. Grin 2010. (Utila konciza enkonduka skizo de la historio de la tataroj ĝis 1783.)
- Kramer, Karsten: *Die Geschichte des krimtatarischen Volkes.* Grin 2003. (Utila konciza enkonduka skizo de la historio ĉefe pri la deportado kaj la longa batalo de la restarigo de la rajtoj de la tataroj de Krimeo.)
- Sasse, Gwendolyn: *Die Krimtataren.* En: Ethnos-Nation. Eine europäische Zeitschrift. Jk. 4, n-ro 1-2/1996. (Utila konciza superrigardo pri la historio de la tataroj de Krimeo precipe post la fino de Sovetunio).
- Sasse, Gwendolyn: *Die Rückkehr-Bewegung der Krimtataren.* En: Osteuropa 45/1995, p. 338-348.
- Sasse, Gwendolyn: *Die Krim – regionale Autonomie in der Ukraine.* Köln 1998. (rete: http://www.ssoar.info/ssoar/handle/document/4361).
- Simon, Gerhard: *Die nationale Bewegung der Krimtataren.* En: Berichte des BIOst 30-31/1975.
- Halbach, Uwe: *Aktuelle Entwicklungen in der nationalen Bewegung der Krimtataren.* Berichte des BIOst 11/1988.
- Platen, Maximilian von, Bundesinstitut für ostwissenschaftliche und internationale Studien (eld.): *Die Rückkehr der Krimtataren in ihre historische Heimat.* Aktuelle Analysen des BIOst, 33/1997. (rete: http://www.ssoar.info/ssoar/handle/document/4703).
- Červonnaja, Svetlana: *Die Bürgerrechtsbewegung der Krimtataren in den neunziger Jahren.* En: Osteuropa (DGO) 2/1999, p. 175-186.[270]
- Halbach, Uwe: *Die Krimtataren in der Ukraine-Krise.* SWP 2014 (rete: http://www.swp-berlin.org/de/publikationen/swp-aktuell-de/swp-aktuell-detail/article/krimtataren_nach_russlands_annexion_der_krim.html, http://www.bpb.de/internationales/europa/ukraine/195184/analyse-die-krimtataren-in-der-ukraine-krise aŭ www.laender-analysen.de/ukraine/pdf/UkraineAnalysen141.pdf)
- Halbach, Uwe: *Repression nach der Annexion. Russlands Umgang mit den Krimtataren.* In: Osteuropa (DGO) 9-10/2014, p. 179-190 (vd. http://www.zeitschrift-osteuropa.de/hefte/2014/9-10/repression-nach-der-annexion)
- Luchterhand, Otto: *Die Krim-Krise von 2014, Staats- und völkerrechtliche Aspekte.* En: Zerreissprobe. Ukraine: Konflikt, Krise, Krieg. Osteuropa (DGO Berlin) 5-6/2014, p. 61-86.
- Reinke, Sarah (Ext), Naake, Sandy (red.): *Ein Jahr russische Annexion der Krim. Ein Jahr systematische Verfolgung der Krimtataren und anderer Minderheiten.* Gesellschaft für bedrohte Völker. Februaro 2015. (rete: https://www.gfbv.de/fileadmin/redaktion/Reporte_Memoranden/2015/Memorandum_Krim.pdf)
- Report by Niels Mužnieks, Commissioner for Human Rights of the Council of Europe. September 2014. (rete: http://www.europarl.europa.eu/meetdocs/2014_2019/documents/droi/dv/102_muiznieksreport_/102_muiznieksreport_en.pdf)
- Gasimov, Zaur: *Nahe Verwandte, so fern. Die Türkei, die Tataren und die Krim.* En: Zerreissprobe. Ukraine: Konflikt, Krise, Krieg. Osteuropa (DGO Berlin) 5-6/2014, p. 311-22.
- Kołodziejczyk, Darius .: *Das Krimkhanat als Gleichgewichtsfaktor in Osteuropa (17.-18. Jahrhrhundert).* En: Klein, Denise (eld.): *The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century).* Harrassowitz Wiesbaden 2012. S. 47-58.
- Albrecht, S. : *Die Tartariae descriptio des Martinus Broniovius. Entstehung und Wirkung eines Gesandtenberichts aus dem Krimkhanat. Krimkhanat als Gleichgewichtsfaktor in Osteuropa (17.-18. Jahrhundert).* En: Klein, Denise (eld.): *The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century).* Harrassowitz Wiesbaden 2012. p. 150-168. Temas pri la lbro: Albrecht, S./Herdick, M./Daim, F.: *Im Auftrag des Königs. Ein Gesandtenbericht aus dem Land der Krimtataren.* Regensburg 2011). La koncernan libron eldonis: http://www.schnell-und-steiner.de/artikel_6833.ahtml. (reta eldono de la orignalo: https://books.google.ch/books/about/Martini_Broniouii_de_Biezdzfedea_Tartari.html?id=yAz8toB0aDMC&redir_esc=y)
- Jobst, Kerstin S.: *Die russischen Krim-Debatten im 18. Jahrhundert: Von der terra incognita zur Perle des Imperiums.*. Konstanz 2007. (rete: www.uvk.de/uploads/tx_gbuvkbooks/PDF_L/9783896696380_L.pdf ). Ĉefa verko antaŭ la libroj de Fisher: Joseph von Hammer-Purgstall: *Geschichte der Chane der Krim unter osmanischer Herrschaft aus türkischen Quellen* zusammengetragen mit der Zugabe eines Gasels Schahingerai's als Anhang zur Geschichte des Osmanischen Reichs. Wien : K. K. Hof- und Staatsdruckerei, 1856. 258 p. (rete: https://archive.org/details/geschichtederch01purgoog) (ne utiligita por ĉi tiu studo)
- Conquest, Robert: *Stalins Völkermord. Wolgadeutsche, Krimtataren, Kaukasier.* (El la angla). Wien 1974.
- Kappeler, Andreas: *Russland als Vielvölkerreich: Entstehung - Geschichte - Zerfall.* C.H. Beck München. 2/2008.


[270] Pri S. Červonnaja vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Svetlana_Chervonnaya.

- Kappeler, Andreas: *Kleine Geschichte der Ukraine.* 1/1994, 2/2000/, 3/2009.
- Golczewski, Frank: *Geschichte der Ukraine.* Götttingen 1993.
- Montefiore, Simon Sebag: Katharina die Grosse und Fürst Potemkin. Eine kaiserliche Affäre. Frankfurt/M. 2009, ĉap. Kleopatra.
- Brückner, Alexander: *Katharina die Zweite.* Berlin 1883. (Rusa eldono: Brikner, A.G.: *Istorija Ekateriny Vtoroj* v 3ch tomach. SPB 1885/ Moskva Sovremmenik 1991).
- Schwarz, A.: *Die Kosovo-Frage und die Krim-Frage aus Sicht des Völkerrechts.* 2.4.2015 (s. http://pelagon.de/?p=5227)
- Heintze, Hans-Joachim: *Völkerrecht und Sezession – ist die Annexion der Krim eine zulässige Wiedergutmachung sowjetischen Unrechts?* (rete: http://www.ifhv.de/documents/huvi/selectedarticles/3-2014-heintze.pdf).
- *Spiegel*-artikolon pri la germanaj rilatoj al la krimeaj tataroj de 1967 vd. sub http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-46353381.html.


Esenca anglalingva fakliteraturo:


- Fisher, Alan W.: *The Crimean Tatars.* Stanford 1978
- Fisher, Alan W.: *Between Russians, Ottomans and Turks. Crimea and Crimean Tatars.* Istanbul 1998.
- Fisher, Alan W.: *The Russian annexation oft he Crimea. 1774-1783.* Ann Arbor Michigan London. Univ. Microfilms International, 1977.
- Klein, Denise (eld.): *The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century).* Harrassowitz Wiesbaden 2012. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/279411324).
- Ivanics, Mária: *Die Şirin. Abstammung und Aufstieg einer Sippe in der Steppe.* En: Klein, Denise (eld.): *The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century).* Harrassowitz Wiesbaden 2012. p. 27-44.
- Papp, Sándor.: *Die Inaugurationen der Krimkhane.* En: En: Klein, Denise (eld.): *The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century).* Harrassowitz Wiesbaden 2012. S. 75-90.
- Jobst, Kerstin S.: *Vision und Regime. Die ersten Jahrzehnte russischer Krimherrschaft*. En: Klein, Denise (eld.): *The Crimean Khanate between East and West (15th-18th century).* Harrassowitz Wiesbaden 2012. S. 211-21.
- Williams, Brian Glyn: *The Crimean Tatars: The Diaspora Experience and the Forging of a Nation.* Vol. 2. Eld de N. di Cosmo k.a. Leiden/Boston/Köln 2001.
- Allworth, Edward A. (eld.): *The Tatars of Crimea. Return to the Homeland.* Durham 1998.
- Allworth, Edward (eld.): *Tatars of the Crimea: Their Struggle for Survival.* Durham; London 1988.
- Hakan Kırımlı: *National movements and national identity among the Crimean Tatars (1905-1916).* Leiden. E.J. Brill, 1996. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/293925690).
- Sasse, Gwendolyn: *The Crimea Question: Identity, Transition, and Conflict*, Cambridge, MA: Harvard University Press, 2007 (awarded the Alexander Nove Prize by the British Association for Slavonic and East European Studies). (https://www.swissbib.ch/Record/279411286).
- *Conflict-Prevention in a Transition State: The Crimean Issue in Post-Soviet Ukraine'.* In: Nationalism and Ethnic Politics, Vol. 8, No. 2, 2002, pp. 1-26.
- Uehling, Greta Lynn: *Beyond Memory. The Crimean Tatars Deportation and Return.* New York 2004.
- Vardys, Stanley: *The Case of the Crimean Tatars.* En: Russian Review 2/1971, p. 101-10.
- Pohl, J. O.: *Ethnic Cleansing in the USSR, 1937-1949.* Westport, CT, 1999. p. 171-6.
- Pohl, O.: *Stalin's Ethnic Cleansing of the Crimean Tatars and Their Struggle for Rehabilitation,* 1944-1985. En: The Ukrainian Quarterly. 2004. Vol. 60. № 1-2. P. 33-56.
- Pohl, O.: *The Deportation and Fate of the Crimean Tatars.* (rete: http://www.iccrimea.org/scholarly/jopohl.html).
- Pohl, O.: *«And this Must be Remembered!» Stalin's Ethnic Cleansing of the Crimean Tatars.* (rete: http://www.iccrimea.org/surgun/pohl-asn-2004.html).
- Pohl O. Timeline: Deportation of Crimean Tatars and their National Struggle under Soviet Rule. (rete: http://www.iccrimea.org/surgun/timeline.html)
- Marples, D.: *Stalinism in Ukraine in the 1940ths.* New York, 1992.
- Spector, I.: *The Soviet Union and the Muslim world. 1917-1958.* Seattle, 1959. P. 212.
- Nekrich, A.: *The Punished Peoples: The Deportation and Fate of Soviet Minorities at the End of the Second World War.* New York, 1979.
- Potichnyj, P.: *The Struggle of Crimean Tatars.* En: Canadian Slavonic Papers. 1975. № 2–3. P. 302–318;
- Mace, J. E.: *Crimean Tatars.* By Alan W. Fisher. Stanford, California: Hoover Institution Press, 1978. 264 pp. En: Harvard Ukrainian Studies. 1984. № 3/4. P. 542-3.

- Pri la sklava komerco: Kizilov, M.: *Slave Trade in the Early Modern Crimea from the Perspective of Christian, Muslim and Jewsih Sources.* En: Journal Early Modern History. 11, 2007, p. 1-31; Kizilov, M.: *The Black Sea and the Slaves and Captives in the Fiftheenth to Eighteenth Centuries.* En: International Journal Maritime History, 17/2055, p. 193-218.
- Cemiloglu, M.: *A History of the Crimean Tatar National Liberation Movement: A Sociopolitical Perspectives*. En: Crimea: Dynamics, Challenges, and Prospects. p. 87-105.
- Williams, B. G.: *The Hidden Ethnic Cleansing of Muslims in the Soviet Union: The Exile and Repatriation of the Crimean Tatars.* En: Journal of Contemporary History. 2002. Vol. 37. № 3. p. 323-347.
- Williams, B.G.: *The Crimean Tatars. The Diaspora Experience and the Forging of a Nation.* Boston, Köln, 2001.
- *Crimean Tatars: Repatriation and Conflict Prevention.* New York, 1996
- *Rights in Retreat. Abuses in Crimea.* (HRW-raporto). 17.11.2014. (rete: https://www.hrw.org/report/2014/11/17/rights-retreat/abuses-crimea).

Kelkaj konsultitaj ruslingvaj verkaĵoj:

- Kozlov, S.Ja. / Ĉiĵova, L.V.: *Tjurkskie narody Kryma. Karaimy, Krymskie tatary, Krymčaki.* Nauka Moskva 2003. (Sciencnivela prezentado kun etnografiaj kaj kulturaj akcentoj kaj kun detala skizo de la historio de la ĥanlando laŭ regado de sinsekvaj ĥanoj).
- Starikov, N. / Beljaev, D.: *Rossija, Krym. Istorija.* Eld. Piter SPB 2015. (Tipa ekzemplo de reviziisma prezentado de la historio laŭ la maniero de la Putin-propagando, kiu estas karakterizita de sia absurda, neobjektiva, fantazia kaj falsa manieroj kaj malica tono de la argumentado, sia troiga memglorado de la heroaj epizodoj de la rusa historio kaj sia perfida kaj cinika kontraŭ-ukraina polemiko, kies celo estas nei la ekziston de ukraina nacio kaj la ekzistorajton de ukraina ŝtato). Alia tiuspeca ekzemplo estas: Smirnov, A.: Proekt Novorossija. Istorija russkoj okrainy. Moskva 2015.
- Fel´gengauė̇r, P.: *Operacija „Russkij Krym“.* En: Novaja gazeta 1.3.2014. (germanlingve vd. sub: http://www.zeitschrift-osteuropa.de/hefte/2014/1/operation-russische-krim). (rete: http://www.novayagazeta.ru/columns/62482.html
- *Kratkaja istorija Kryma.* Simferopol´2013. (Enhavo: https://www.swissbib.ch/Record/305632671).
- Guboglu, Michail, Červonnaja, Svetlana: *Krymskotatarskoe nacional´noe dviženie. Tom 1: Istorija, problemy, perspektivy.* Moskva 1992.
- Aksjonov, Sergej: *Procvetanie v edinstve.* En: Rossijskaja gazeta 12.9.2014 (rete: http://www.rg.ru/2014/09/12/aksenov.html)
- Umerov, Il´mi: *„Ja, kak posledovatel´nyj politik, dolžen byl uiti“.* Bisnes online 21.8.2014. (rete: http://www.business-gazeta.ru/article/112111.
- Dubnov, A.: *Krymskie tatary – reabilitacija ili ugroza novoj deportacii.* Echo Moskvy 22.4.2014. (rete: http://echo.msk.ru/blog/dubnov/1305458-echo)
- Laas, N.A.: *Istorija krymskich tatar perioda pozdnego stalinizma i chruščevkoj „ottepeli“: ekskurs v anglojazyčnuju istoriografiju.* (rete: histrf.ru; treege utila kaj interesa superrigardo pri la krime-tatara historiografio laŭ okcidentaj anglalingvaj verkaĵoj).
- Bekirova, G.: *Moskovskie akcii krymskich tatar letom 1987 goda.* En: ATR Radio ´Mejdan´) 5.8.2009 (rete: http://kirimtatar.com/index.php?option=com_content&task=view&id=434 kaj http://ru.krymr.com/content/article/27118135.html)
-

Historiaj dokumentoj:

- Aneksa manifesto de la 8a de aprilo 1783 http://sevkrimrus.narod.ru/ZAKON/manifest.htm.
- Sovetia dekreto n-ro 5859ss. de la 11a majo 1944 pri la krimeaj tataroj http://sevkrimrus.narod.ru/ZAKON/1944.htm
- Sovetia dekreto de la 9a de marto 1954: https://de.wikipedia.org/wiki/Krim#/media/File:The_transfer_of_Crimea.jpg
- Sekreta parolado de Nikita Ĥruŝĉov de 1956: http://www.politaia.org/geschichte-hidden-history/abrechnung-mit-stalin-nikita-s-chruschtschow-1956-vor-dem-xx-parteikongres-der-kpdsu aŭ http://www.1000dokumente.de/index.html?c=dokument_ru&dokument=0014_ent&object=pdf&st=&l=de
- Sovetia dekreto pri la krimeaj-tataroj de la 5a septembro 1967: http://www.iccrimea.org/surgun/sovietdecree1967.html

- Rusia dekreto pri Krimeo de la 17a de marto 2014: https://de.wikipedia.org/wiki/Krimkrise
- Parolado de V. Putin de la 18a de marto 2014 okaze de la reunuiĝo de Krimeo kun Ruslando: https://de.wikipedia.org/wiki/Rede_Wladimir_Putins_zum_Beitritt_der_Krim_am_18._März_2014
- Konstitucija Respubliki Krym, 11.4.2014:
- http://www.rg.ru/2014/05/06/krim-konstituciya-reg-dok.html aŭ https://ru.wikisource.org/wiki/Конституция_Республики_Крым.
- Diversaj dokumentoj de la jaro 2014: http://sevkrimrus.narod.ru/ZAKON/zakoni.htm#krim2014.

Elektitaj gazetartikoloj (ĉefe germanlingvaj):


- Intervjuo kun Vjaĉeslav Ĉornovil. Spiegel. 20.6.1994. (rete: http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-9284118.html)
- Martens, M.: Hilflose Blutsbrüder. FAZnet 4.3.2014. (rete: http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/asien/die-tuerkei-und-die-krimtataren-hilflose-blutsbrueder-12831574.html)
- Sommerbauer, J.: Krimtataren: Nationale Verräter? Bitte nicht schon wieder. Zeit 2.3.2014. (rete: http://www.zeit.de/politik/2014-03/krimtataren-russland-krieg)
- Seewald, B.: Russlands lange Abrechnung mit den Krimtataren. Die Welt 4.3.2014. (rete: http://www.welt.de/geschichte/article125377674/Russlands-lange-Abrechnung-mit-den-Krimtataren.html)
- Von Marschall, Ch.: Hat die Krim ein Recht auf Abspaltung? Der Tagesspiegel 11.3.2014 (rete: http://www.tagesspiegel.de/politik/ukraine-hat-die-krim-ein-recht-auf-abspaltung/9602184.html)
- „Ich vertraue nur noch Allah“. Interview mit Ali Khamzin. TAZ 11.4.2014. (rete: http://www.taz.de/Aussenbeauftragter-der-Krimtataren/!5044412)
- Boy, A.-D.: Zerrissenes Volk. FAZ 15.4.2014. (rete: http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/die-krimtataren-ein-zerrissenes-volk-12894195.html)
- Putin rehabilitiert Krimtataren als Opfer Stalins. FAZ 21.4.2014. (rete: http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/krim-putin-rehabilitiert-deutsche-und-tataren-12903836.html)
- Poroschenko gibt die Krim nicht auf. ZEIT 4.6.2014.
- Refat Ĉubarov: FSB Rossii zakryla mne v“ezd na rodinu. (Interview). 7.7.2014 (rete: http://kirimtatar.com/index.php?option=com_content&task=view&id=614&Itemid=380) (rete http://www.zeit.de/politik/ausland/2014-06/ukraine-krim-petro-poroschenko)
- Aden, M.: Russen wider willen. ZEIT 1.10.2014. (rete: http://www.zeit.de/politik/ausland/2014-10/krim-tataren-ukraine-russland)
- Kiew stiftet Krim-Tataren zu Anschlägen an. Sputnik (iama RIA-Novosti) 8.10.2014 (rete http://de.sputniknews.com/zeitungen/20141008/269741086/Kiew-stiftet-Krim-Tataren-zu-Anschlgen-an.html).
- Bilger, O.: Der erste russische Frühling (Pri la situacio sur Krimeo unu jaron post la anekso). ZEIT 11.3.2015 (rete: http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-03/krim-annexion-russland-putin)
- Rothenberg, Ch.: Ein Jahr nach der Annexion: Die Krim – Paradies und Gefängnis. N-tv 15.3.2015 (rete: http://www.n-tv.de/politik/Die-Krim-Paradies-und-Gefaengnis-article14543896.html)
- Pressefreiheit nach Annexion: Einziger TV-Sender der Krimtataren vom Netz genommen. Spiegel 1.4.2015 (rete: http://www.spiegel.de/politik/ausland/krim-atr-sender-der-krimtataren-vom-netz-genommen-a-1026741.html)
- Ausgeschaltet: Unabhängige Medien auf der Krim. Osteuropa (DGO) 3/2015. (rete: http://www.zeitschrift-osteuropa.de/hefte/2015/3/ausgeschaltet
- Weisflog, Ch.: Der Kampf gegen die russische Erniedrigung. Begegnung mit dem Führer der Krimtataren (Refat Tschubarow). NZZ 24.10.2015 (rete: http://www.nzz.ch/international/europa/der-kampf-gegen-die-russische-erniedrigung-1.18634891)
- „Nur Menschen zweiter Klasse“. Interview mit Mustafa Dschemilew. TAZ 27.11.2015. (rete: http://www.taz.de/Tatarenfuehrer-ueber-Krim-Blockade/!5252029).
- „Wir wollen die Besatzung beenden“. Dunkelheit über der Krim. Interview mit Mustafa Schemilew. ZEIT 27.11.2015. (rete: http://www.zeit.de/2015/48/ukraine-krim-annexion-tataren-stromversorgung-interview)

- Kellermann, F.: Krimtataren: Die grossen Verlierer der Ukraine Krise. Deutschlandfunkt 4.1.2016. (rete: http://www.deutschlandfunk.de/krimtataren-die-grossen-verlierer-der-ukraine-krise.795.de.html?dram:article_id=341438)
- BILD-intervjuo kun V. Putin
- (rete: http://www.bild.de/politik/ausland/wladimir-putin/interview-mit-dem-russischen-praesidenten-russland-44091672.bild.html)
- Musaeva-Borovyk, S.: Zum zweiten Mal der Heimt beraubt. TagesWoche 16.1.2016. (rete: http://www.tageswoche.ch/de/2016_3/international/708796)
- Kellermann, F.: Die Heimat bleibt im Kopf. Deutschlandradio 3.2.2016. (rete: http://www.deutschlandradiokultur.de/krimtataren-im-exil-die-heimat-bleibt-im-kopf.979.de.html?dram:article_id=344516)
- Rüesch, A.: Ein Polzeistaat im Paradies. NZZ 18.3.2016. (rete: http://www.nzz.ch/international/ein-polizeistaat-im-paradies-1.18714593)
- Smirnova, J.: „Wir warten auf den Tag, an dem wir einmarschieren“. Die Fälle Tschijgos, Dschemilev und Isljamov. Die Welt 31.3.2016. (rete: http://www.welt.de/politik/ausland/article153845271/Wir-warten-auf-den-Tag-an-dem-wir-einmarschieren.html)
- Malpermeso de la Meĝliso de la 18a de aprilo 2016
  (rete: https://www.gfbv.de/fileadmin/redaktion/Reporte_Memoranden/2016/MR-Report-80_2-Jahre-Annexion-der-Krim.pdf
  http://minjust.ru/press/news/obshchestvennoe-obedinenie-medzhlis-krymskotatarskogo-naroda-vklyucheno-v-perechen
  http://www.novayagazeta.ru/news/1702576.html
  http://www.novayagazeta.ru/news/1702438.html
  http://www.dw.com/de/krimtataren-im-visier-russlands/a-19201865
  http://www.zeit.de/politik/ausland/2016-04/krim-selbstverwaltung-russland-verbot-ukraine-proteste
  http://www.zeit.de/politik/ausland/2016-04/krim-russland-europarat-besorgnis-verbot-parlament-tataren-diskriminierung
  https://www.gfbv.de/de/news/krimtatarischer-medschlis-verboten-7981
  http://www.novayagazeta.ru/news/1702689.html)

Interretaj resursoj:

- International Committee for Crimea (ICC)
  http://www.iccrimea.org
  En tio speciale: Mubeyyin B. Altan: New Bibliography of the Crimean Tatar History and Literature (vd. http://www.iccrimea.org/scholarly/bibliography.html)
  Pliajn artikolojn vd. sub http://www.iccrimea.org/surgun60.html
- http://kirimtatar.com
- Hejmpaĝo de Qirimtatar.org
- http://www.qirimtatar.org
- TV ATR
  http://atr.ua
- Elsendoj de ATR kun intervjuoj kun gvidantoj de la krimeaj tataroj:
  https://www.youtube.com/watch?v=XGG5TXvXUcw, https://www.youtube.com/watch?v=TU17P_alVZo
- Televidaj intervjuoj kun Mustafa Dĵemilev
- https://youtu.be/ewcby-mtHhU
  https://www.youtube.com/watch?v=dYVhOePWmXg
  https://www.youtube.com/watch?v=PGEKlma7_D4
  https://www.youtube.com/watch?v=GTazHO9ICvQ, https://www.youtube.com/watch?v=hzo0BXUG--4
  Televidaj inervjuoj kun Refat Ĉubarov
  https://www.youtube.com/watch?v=RjWTEL1vAXQ
- Zeitung *Novyj Krym*
  http://www.newc.info
  Zeitung *Krymskaja gazeta*
  http://www.gazetacrimea.ru
- Zeitung *Krymskaja pravda*
  http://c-pravda.ru

- Zeitung *Krymskie izvestija*
  http://new.crimiz.ru
- Zeitung *Krymskoe ėcho*
  http://c-eho.info
- Zeitung *Krymskij telegraf*
  http://ktelegraf.com.ru
- Zeitung *Svobodnaja pressa*
  http://svpressa.ru
- *Black Sea News*
  http://www.blackseanews.net
- *Sobytija Kryma*
- http://www.sobytiya.info
- *Gazetnyj Klub*
  http://newspaperclub.org.ua
- Zeitung *Novosti Sevastopolja*
  http://www.3652.ru
- Zeitung *Novosti Jalti*
  http://www.3654.ru
- Zeitung *Alupki*
  http://www.alupkame.info
- Presseagentur *Novosti Kryma*
  http://news.allcrimea.net
- Zeitung *Novosti Ukrainy*
  http://korrespondent.net/ukraine
- Presseagentur *RIA Novosti Ukrainy*
  http://rian.com.ua
- Sendependa agentejo *Krym.Realii*
  http://ru.krymr.com
- Sendependa portalo *Gazetny Klub*
- http://newspaperclub.org.ua
- Crimean News Agency (sendependa)
  http://qha.com.ua/en
- Radio Svoboda
- http://www.svoboda.org
- Hejmpaĝo de Meĝliso
  http://qtmm.org
- Portal prava čeloveka v Krymu
  http://crimeahr.org
- Centro de ĵurnalismaj esploroj
- http://investigator.org.ua/ru
- Facebook Crimea SOS
  https://www.facebook.com/CrimeaSOS
- Hejmpaĝo de NDKT
  http://www.ndkt.org/ru - Hejmpaĝo de Milliy Fırqa
  http://www.milli-firka.org/language/russian

© Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli, 2015/16. Publikigita en aprilo 2016.

La aŭtoro (nask. 1962 en Svislando) studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko en 1983-91. Krimeon li vizitis en 1989.

(Ĉi tiu versio plene anstataŭas la version aperintan en *Etnismo* 2/2015.)
Noto: La bildoj prezentitaj en ĉi tiu artikolo estis tiel elektitaj, ke ili ne devus kolizii kun la aŭtoraj rajtoj. En kazo de konflikto la aŭtoro petas sciigon al kuenzli@osteuropa.ch.